

eLIBRO

G. K. Chesterton

La naiveco de pastro Brown



INKO

G. K. Chesterton

LA NAIVECO DE PASTRO BROWN

El la angla tradukis

Cecil Bean

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-013-9

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

NOVEMBRO 2000

LA BLUA KRUCO

Inter la arĝenta rubando de la mateno kaj la verda brilanta rubando de la maro, la ŝipo atingis Harwich kaj liberigis amason da homoj kiel muŝaron, inter kiuj la viro kiun ni devas sekvi estis neniel elstaranta... kaj efektive li ne volis elstari. Li aspektis neniel rimarkinda, krom pro kontrasto inter la feria gajo de lia vestaro kaj la oficiala seriozeco de lia vizaĝo. Li portis maldikan, helgrizan jakon, blankan veŝton kaj arĝentkoloran pajlan ĉapelon kun griz-blua rubando. Kontraste lia malgrasa vizaĝo estis nigreta kaj finiĝis per mallonga nigra barbo, kiu aspektis hispana kaj sugestis elizabetan krispon. Li fumis cigaredon kun senokupula seriozeco. Estis nenio, kio montris, ke la griza jako kovras ŝargitan revolveron, ke la blanka veŝto kovras polican karton, aŭ ke la pajla ĉapelo kovras unu el la plej potencaj intelektoj de Eŭropo. Ĉar tiu estis Valentin mem, la Pariza poliestro kaj la plej eminenta detektivo en la tuta mondo; li estis venanta de Bruselo al Londono por efektiviĝi la plej gravan areston de la jarcento.

Flambeau estas en Anglujo. La policianoj de tri landoj estis fine sekvintaj lin de Gento ĝis Bruselo, de Bruselo ĝis la Holanda Hoko, kaj oni konjektis, ke li profitos pro la nefamiliareco kaj konfuzo kaŭzata de la Eŭkarista Kongreso, tiam okazanta en Londono. Kredeble li vojaĝos kiel ia subgrada skribisto aŭ sekretario laboranta rilate al ĝi; kompreneble, tamen, Valentin ne povis esti certa pri tio; neniu povis esti certa pri Flambeau.

Pasis jam multaj jaroj de kiam tiu krimkolosulo ĉesis tumultigi

la tutan mondon; kaj kiam li ĉesis kiel oni diris post la morto de Rolando, venis en la mondon granda trankvilo. Tamen dum liaj plej bonaj tagoj (kompreneble mi volas diri, dum liaj plej malbonaj tagoj) Flambeau estis eminentulo tiel statueca kaj internacia kiel la germana imperiestro. Preskaŭ ĉiumatene la ĵurnaloj anoncis, ke li estas evitinta la sekvojn de unu krimo farante ankoraŭ alian. Li estis Gaskono, kun giganta figuro kaj fizika kuraĝo; kaj oni rakontis pri li anekdotojn plej malverŝajnajn; kiamaniere li renversis iun juĝiston kaj starigis lin sur la kapo "por reklarigi lian cerbon"; kiamaniere li kuris tra la Rue de Rivoli kun policano sub ĉiu brako. Oni tion ĉi devas diri pri li, ke kutime li eluzis sian fantazian fortecon en tiaj sensangaj, kvankam maldignaj, epizodoj; liaj veraj krimoj konsistis precipe el lerta kaj pogranda rabado. Tamen ĉiu el liaj raboj estis preskaŭ kiel nova peko kaj unu sola sufiĉus por unu rakonto. Estis li, kiu estris la grandan Tirolan Laktvendan Kompanion en Londono, sen laktejoj, sen bovinoj, sen ĉaroj kaj sen lakto, sed kun ĉirkaŭ mil klientoj. Ĉi tiujn li servis tute simple, nur transmovante la laktujetojn ĉe aliaj pordoj al la pordoj de siaj klientoj.

Estis li, kiu intime korespondadis kun fraŭlino, kies leteraron oni atente tralegis, per la eksterordinara ruzo, fari etajn kliŝojn de ŝiaj komunikaĵoj sur mikroskopaj vitroj. Tamen entute vasta simpleco karakterizis multajn el liaj provoj. Oni diras, ke iun fojon li repentris noktomeze la domciferojn tra unu tuta strato nur por kapti solan vojaĝanton. Estas tute certe, ke li elpensis moveblan leterkeston, kiun li starigis ĉe stratanguloj en trankvilaj antaŭurboj, esperante, ke fremdaj preterpasantoj enmetos poŝtmandatojn. Fine, oni sciis, ke li estas miriga akrobato; malgraŭ sia granda figuro li povis salti kiel lokusto kaj malaperi en arbsupraĵoj kiel simio. Tial la fama Valentin ne dubis pri tio, ke liaj aventuroj ne finiĝos kiam li estos

lin trovinta. Tamen, kiel lin trovi? Pri tio ĉi eĉ la eminenta Valentin ankoraŭ ne certigis.

Estis io, kion Flambeau, malgraŭ sia alivestiga lerteco ne povis kaŝi, kaj tio estis lia aparta alteco. Se la vigla okulo de Valentin rimarkus altan pomvendistinon, altan grenardiston, aŭ eĉ ioman altkreskan dukinon, eble li tuj arestus tiun. Tamen en la tuta vagonaro estis neniŭ, kiu povus esti la alivestita Flambeau, same kiel ĝirafo neniel povus esti alivestita kiel kato.

Pri la homoj sur la ŝipo li jam certigis; ĉe Harwich ne pli ol ses aliaj aliĝis. Estis malalta fervoja oficisto iranta al la finstacio, tri iomete malaltaj legomkulturistoj kiuj envenis post du stacioj, unu tre malalta vidvino iranta al Londono el malgranda Essex'a urbeto kaj tre malalta katolika pastro el Essex'a vilaĝeto. Vidinte lin Valentin forlasis la serĉadon pro senesperigo kaj preskaŭ ekridis. La malgranda pastro tiel esprimis la esencon de tiuj orientaj ebenaĵoj; li havis vizaĝon tiel rondan kaj stultan kiel Norfolk'a pastpudingo; li havis okulojn tiel senesprimajn kiel la Norda Maro; li kunhavis kelkajn brunpaperajn pakaĵojn, kiujn li tute ne kapablis kunporti. Sendube la Eŭkarista Kongreso elsuĉis el ilia loka stagnado multajn tiajn estaĵojn blindajn kaj sen la povo sin helpi, kiel talpoj elfositaj. Valentin estis skeptikulo de la severa franca tipo kaj ne povis havi amon al pastroj. Sed li certe povis senti kompaton al ili kaj tiu ĉi povus veki ies ajn kompaton. Li portis grandan eluzitan ombrelon, kiu konstante faladis planken. Li ŝajnis ne scii, kiu estas la ĝusta duono de lia ira-revena bileto. Li klarigis kun bovida simpleco al ĉiu en la vagono, ke li devas atenti, ĉar li kunhavas en unu el la brunpaperaj pakaĵoj ion faritan el vera argento kun "bluaj ŝtonoj". Lia strangeta intermikso de Essex'a plateco kun sanktula simpleco konstante amuzis la francon, ĝis la pastro alvenis (iel) al Stratford kun sia tuta pakaĵaro, kaj revenis por sia ombrelo. Kiam li tion faris,

Valentin tiom bonanimis, ke li avertis al li ne prizorgi la arĝentaĵon, pribabilante pri ĝi al ĉiu. Sed al kiu ajn li parolis, Valentin estis atente serĉanta alian; li ĉiam atendis iun ajn, riĉan aŭ malriĉan, viran aŭ virinan, kiu preskaŭis al ses futoj, ĉar la alteco de Flambeau estis ses futoj kaj kvar coloj.

Tamen li elvaĝoniĝis en la stacidomo Liverpool Street, kredante konscience, ke li ankoraŭ ne preterlasis la krimulon. Poste li iris al Scotland Yard por oficialigi sian ĉeeston kaj aranĝi helpdonon, se tio estus bezonata. Poste li ekbruligis cigaredon kaj eliris por longa promenado tra la Londonaj stratoj. Dum li trairis la stratojn kaj placojn preter Victoria li subite paŭzis kaj ekstaris. La placo estis strangeta kaj silenta, tre tipe Londona, plena de hazarda silento. La altaj, krutaĵsimilaj ĉirkaŭaj domoj aspektis samtempe prosperaj kaj neloĝataj; kvadrata arbustdensejo en la mezo ŝajnis tiel forlasita kiel verda Pacifika insulo. Unu el la kvar flankoj de la placo estis multe pli alta ol la aliaj, kiel podio; kaj la perspektivo de tiu ĉi flanko estis interrompata de unu el tiuj admirindaj hazardokazaĵoj Londonaj... restoracio, kiu ŝajne estis erarvaginta el Soho. Ĝi estis objekto eksterordinare alloga, kun pigmeaj kreskaĵoj en potoj kaj longaj, flavblanke striitaj rulkurtenoj. Ĝi staris aparte alta super la strato kaj laŭ la kutima senorda maniero de Londono, ŝtuparo kondukis supren renkonte al la pordo, preskaŭ kiel ŝtupara fajrosavilo supren kondukas al fenestro de unua etaĝo. Valentin staris kaj fumadis antaŭ la flavblankaj rulkurtenoj kaj longe meditis pri ili.

Pri mirakloj la plej nekredebla fakto estas, ke ili okazas. En la ĉielo kelkaj nuboj ja kunfandiĝas ŝajne al la formo de rigardanta homa okulo. Arbo ja elstaras en la pejzaĝo de duboplana vojaĝo kun la preciza kaj ellaborita formo de demandsigno. Mi mem vidis ambaŭ tiujn ĉi okazojn dum la ĵus pasintaj tagoj. Nelson efektive mortis en la momento de venko; tute hazarde iu Williams murdas

viron kies nomo estas Williamson; ŝajnas kiel ia infanmortigo. Mal-longe, ekzistas en la vivo elemento de kobolda koincido, kiun tiuj, kiuj fidas al la prozeco de ĉiutagaj aferoj, povus ĉiam preterlasi nerimarkita. Tio ĉi estas bone esprimata de la paradokso de Poe, ke saĝeco devas ĉiam prikalkuli aferojn neantaŭviditajn.

Aristide Valentin estis ĝisfunde franca; kaj la franca intelekto estas precipe kaj sole intelekto. Li ne estis "maŝino pensanta", ĉar tio estas malinteligenta esprimo de moderna fatalismo kaj materialismo. Maŝino nur estas maŝino ĉar ĝi ne povas pensi. Tamen li estis pensanta homo kaj samtempe simpla. Ĉiujn siajn mirindajn sukcesojn, kiuj ŝajnis kiel ĵonglado, li atingis pere de persistema logiko kaj klara franca pensado. La francoj mirigas la mondon, ne per la enkonduko de paradokso, sed per la efektivigo de veraĵo. Ili plene efektivigas veraĵon... kiel dum la franca revolucio. Sed precize pro tio, ke Valentin komprenis la logikon, li komprenis la limojn de logiko. Nur tiu, kiu nenion scias pri aŭtoveturado, preparolas aŭtoveturadon sen benzino; nur tiu, kiu nenion scias pri logiko, preparolas rezonadon sen fortaj, nedisputeblaj, fundamentaj principoj. Ĉifoje li havis neniajn fortajn aŭ nedisputeblajn principojn. Oni preterlasis Flambeau ĉe Harwich; kaj se li iel estis en Londono li povus esti iu ajn, ĉu alta vagulo sur Wimbledon Herbejo aŭ alta tostestro ĉe la Hotelo Metropola. Meze de tia nuda nesciado, Valentin havis vidpunkton kaj metodon proprajn.

Tiaokaze li prikalkulis la neantaŭviditaĵojn. Tiaokaze, kiam li ne povis sekvi la logikan vojeton, li severe kaj atente sekvis la mallogikan vojeton. Anstataŭ iri al la ĝustaj ejoj . . . bankoj, stacidomoj, renkontejoj . . . li sisteme iris al la malĝustaj ejoj; li frapis la pordon de ĉiu senhoma domo, eniris en ĉiun sakstraton, trairis tra ĉiu per rubo blokita vojeto, ĉirkaŭiris ĉiun kurbstraton, kiu kondukis lin senutile for de la vojo. Li defendis tiun ĉi frenezan faradon per ple-

na logiko. Li asertis, ke se la krimulo lasis postsignon ĉi tiu estas la plej malbona metodo, sed se la krimulo ne lasis postsignon, ĝi estas la plej bona metodo; ĉar estas almenaŭ ebleco, ke la kuriozaĵo, kiu frapis la okulon de la sekvato, povus esti ĝuste tiu, kiu frapis la okulon de la sekvanto. Ie unu homo devas komenci, kaj prefere tie estu kie eble la alia finiĝis. Io pri tiu ŝtuparo suprenkondukanta al la butikoj; io pri la silento kaj strangeteco de la restoracio vekis ĉe la detektivo lian tutan maloftan romantikan fantazion kaj decidigis lin ekfrapi hazarde. Li supreniris la ŝtuparon, sidiĝis ĉe tablo apud la fenestro kaj mendis tason da nigra kafo.

La mateno estis duonpasinta kaj li ankoraŭ ne matenmanĝis; la malgrandaj postrestaĵoj de aliaj matenmanĝoj ĉirkaŭstaris sur la tabloj por rememorigi al li lian malsaton; kaj almetinte al sia mendo frititan ovon, li reve skuis iom da blanka sukero en sian kafon, pri Flambeau senĉese pensante. Li rememoris kiel Flambeau sin savis iufoje per ungotondilo kaj iufoje per brulanta domo; iufoje ĉar li devis pagi por neafrankita letero kaj iufoje per instigo al kelkaj homoj trarigardi teleskopon al kometo, kiu eble detruos la mondon. Li opiniis, ke lia detektiva cerbo estas tiom lerta kiom tiu de la krimulo, kio estis vera. Sed li plene konstatis la malavantaĝon de tio. "La krimulo estas la artisto kreanta, la detektivo estas nur la kritikisto," li diris al si kun acida rideto kaj levis sian tason malrapide al la lipoj, kaj tre rapide demetis ĝin. Li estis enmetinta salon.

Li ekrigardis la ujon, el kiu estis veninta la polvo arĝenta; ĝi estis sendube sukerujo kaj certe estis tiel farita por enhavi sukeron, kiel ĉampana botelo estas farita por enhavi ĉampanon. Li scivolis, kial oni konservas en ĝi la salon. Li esploris por konstati ĉu ekzistas ujoj pli kutimaj. Jes, certe; estas du saluojj tute plenaj. Eble la spicaĵo en la saluojj estis iel speciala. Li gustumis ĝin; ĝi estis sukero. Tiam li ĉirkaŭrigardis al la restoracio kun nova intereso por ekstro-

vi, ĉu estas aliaj postsignoj de tiu unika artisteco, kiu metas sukeron en la salujojn kaj salon en la sukerujojn. Krom iu stranga makulo, farita per malpala fluido sur unu el la blanke tapetitaj muroj, la tuta ejo ŝajnis esti bonorda, gajeca, kaj ordinara. Li sonorigis por la kelnero.

Kiam tiu oficisto aperis kun la hararo iomete taŭzita kaj pro la frua horo iomete nebulokula, la detektivo (kiu ne malestimis la pli simplajn specojn de spriteco), petis, ke li gustumu la sukeron por konstati, ĉu ĝi atingas la altnivelon kutima ĉe la hotelo. La rezulto estis, ke la kelnero subite oscedis kaj vekigis.

”Ĉu vi ĉiumatene ĉi tiel subtile ŝercas kun viaj klientoj?” demandis Valentin. ”Ĉu la interŝanĝo de sukero kaj salo kiel ŝerco neniam tedas vin?”

La kelnero, kiam la ironio pliklariĝis, balbute certigis al li, ke oni nenial intencis tion; devas esti eraro plej stranga. Li prenis la salujon kaj rigardis ĝin ankaŭ, dum li pli kaj pli embarasiĝis. Fine li abrupte petis pardonon kaj rapidis for, kaj post kelkaj sekundoj revenis kune kun la posedanto. La posedanto ankaŭ ekzamenis la sukerujon kaj poste la salujon; la posedanto ankaŭ embarasiĝis.

Subite la kelnero ekbalbutis, ŝajne pro ekfluego da vortoj.

”Mi kredas,” li balbutis laŭ itala parolmaniero, ”Mi kredas, ke estas tiuj du pastroj”

”Kiu du pastroj?”

”La du pastroj,” diris la kelnero, ”kiuj almure ĵetis la supon.”

”Almure ĵetis la supon?” rediris Valentin, certa ke tio sendube estas ia stranga itala metaforo.

”Jes, jes,” diris la servisto ekscitite, indikante la malhelan makulon sur la blanka papero, ”ĵetis ĝin tien... muren.” Valentin demande rigardis la posedanton, kiu tuj donis pli detalan raporton pri la afero.

”Jes, sinjoro,” li diris, ”estas tute vere, tamen kredeble ĝi neniel rilatas al la afero de la sukero kaj salo. Du pastroj envenis tien ĉi tre frue por trinki supon... tuj kiam ni demetis la fenestro-kovrilojn. Ili ambaŭ estis kvietaj, bonmoraj homoj; unu el ili pagis kaj eliris; la alia, kiu ŝajnis esti homo entute pli malrapida, bezonis kelkajn minutojn por kolekti siajn aĵojn. Tamen li fine eliris. Tamen en la momento antaŭ ol li pasis en la straton, li intence prenis la supujon, kiun li ankoraŭ nur duone malplenigis, kaj ĵetis la supon trafe al la muro. Mi mem estis en la malantaŭa ĉambro kaj la kelnero ankaŭ; tiel mi povis nenion fari, krom elkuri kaj konstati, ke la butikoj estas senhoma. Ne fariĝis grava difekto, tamen abomena aplombaĉo estis; mi provis kapti la virojn sur la strato. Ili estis tamen jam tro malproksime; mi nur rimarkis, ke ili malaperis ĉirkaŭ la plej proksima angulo en straton Carstairs.”

La detektivo ekstaris, kun ĉapelo surkape kaj bastono en la mano. Li jam decidis, ke en la tuta mallumo de sia menso, li povas nenion fari krom sekvi la unuan strangan fingron, kiu indikas la vojon; kaj ĉi tiu fingro estis sufiĉe stranga. Paginte la monon kaj tintiginte malantaŭ si la vitrajn pordojn li estis baldaŭ rapide traŝanta en la alian straton.

Estis feliĉe, ke eĉ en tiaj febraj momentoj li ne konfuziĝis kaj lia okulo ĉion rimarkis. Io en butikfenestro preterglitis lin kiel fulmo, tamen li reiris por rigardi ĝin. Estis ordinara legom- kaj frukt-vendejo kaj la varoj estis aranĝitaj subĉiele kaj ĉiu havis karteton kun sia prezo kaj nomo.

En la du plej facile videblaj fakoj estis du amasoj da nuksoj kaj oranĝoj respektive. Sur la nuksamaso kuŝis karto sur kiu estis klare skribita per blua kredo ”Bongustaj Tanĝeraj Oranĝoj, du por unu penco”. Sur la oranĝoj troviĝis priskribo egale ĝusta kaj klara, ”Brazilaj Nuksoj, Plej Bonaj, 4 pencoj por funto.” S-ro Valentin rigarda-

dis ĉi tiujn afiŝojn kaj imagis, ke li rekontis ĉi tian subtilan spritecon antaŭe, efektive antaŭ nelonge. Li atentigis al la ruĝvizaĝa fruktisto, kiu iomete malbonhumore rigardadis tien kaj tien ĉi en la strato, tiun malprecizecon pri liaj reklamoj. La fruktisto nenion diris sed abrupte reĝustigis la kartojn. La detektivo, sin apogante elegante al sia bastono, daŭris ekzameni la butikon. Fine li diris, "Mi petas, sinjoro, ke vi pardonu mian ŝajnan sencelecon, sed tre plaĉus al mi, fari al vi demandon pri eksperimenta psikologio kaj la interrilato de ideoj."

La ruĝvizaĝa vendisto rigardis lin per okulo minacanta, tamen li gaje daŭrigis, svingante sian kanon, "Kial," li daŭigis, "Kial du malĝuste metitaj karto en legomvendista butikon similas al pastra ĉapelo veninta al Londono libertempe? Aŭ, se mi ne klare esprimas, kion mi volas diri; kio estas la mistera ligilo, kiu kunigas la ideon de nuksoj reklamitaj kiel oranĝoj, kun la ideo de du pastroj, unu alta, la alia malalta?"

La okuloj de la vendisto elstaris el lia kapo kiel tiuj de heliko; kaj momente ŝajnis, ke li sin ĵetos kontraŭ la fremdulo. Fine li kolere balbultis: "Mi ne scias, kiel estas via afero, sed se vi estas ilia kunulo... diru, de mi, ke mi defrapos iliajn stultajn kapojn, pastroj aŭ ne, se ili renversos denove miajn pomojn."

"Efektive?" demandis la detektivo kun granda kompatato. "Ĉu ili do renversis viajn pomojn?"

"Unu el ili, jes," diris la kolera vendisto laŭ la Londona parolmaniero, "renversis ĉiujn sur la straton. Mi ja kaptus la stultulon, se ne necesis rekolekti ilin."

"Kien iris tiuj du pastroj?" demandis Valentin.

"Tra tiu dua strato, maldekstre, kaj poste trans la placon," senhezite diris la alia.

"Dankon," respondis Valentin kaj malaperis kiel feo. Ĉe la mal-

proksima flanko de la dua placo li trovis policanon kaj diris: "Estas urĝe, oficiro; ĉu vi vidis du pastrojn kun nigraj ĉapeloj?" La policano mallaŭte ekridis kaj diris: "Mi ja vidis ilin, kaj mi dirus, ke unu estis ebria. Li staris meze de la strato tiom konfuzite, ke..."

"Kien ili iris?" ekdiris Valentin.

"En la flava omnibuso, kiu iras al Hampstead," li respondis. Valentin montris sian oficialan karton kaj rapide diris: "Alvoku du el viaj viroj, ili kuniru kun mi sekve," kaj transiris la vojon kun tia infekta energio, ke la pezega policano obeis, eĉ facilmove. Post minuto kaj duono alvenis al la francadetektivo, inspektoro kaj civile vestita oficiro.

"Nu, sinjoro," komencis tiu kun ridetanta graveco, "kaj kion... ?"

Valentin indikis subite per sia kano; "Mi klarigos al vi sur la imperialo de tiu omnibuso," li diris kaj jam estis kuranta tien kaj tien ĉi tra la trafika konfuzaĵo. Kiam ili tri spiregante sidiĝis sur la supraj seĝoj de la flava veturilo, la inspektoro diris: "Ni povus iri kvaroble pli rapide per taksifakro."

"Tute vere," kviete respondis ilia kondukanto, "se ni nur sciis kien ni iras."

"Kien do ni iras?" demandis la alia. Dum kelkaj sekundoj Valentin fumadis sulkigante la frunto; kaj elprenante la cigaredon li diris: "Se vi scias, kion homo faras, iru antaŭ li; tamen se vi volas konstati, kion li faras, restu malantaŭ li. Erarvagu kiam li erarvagas, haltu, kiam li haltas, veturu tiel malrapide kiel li. Tiam vi povos vidi, kion li vidis kaj agi kiel li agis. Ni povas nenion fari, krom vigle atendi ion strangan."

"Kian strangaĵon?" demandis la inspektoro.

"Ian ajn strangaĵon," respondis Valentin kaj obstine silentiĝis.

La flava omnibuso rampis tra la nordaj vojoj, ŝajne dum horo post horo; la eminenta detektivo ne volis ion plu klarigi, kaj eble liaj

helpantoj sentis silentan kaj kreskantan dubon pri lia celo, eble ankaŭ silentan kaj kreskantan deziron tagmanĝi; kaj la longaj stratoj de la nordlondonaj antaŭurboj ŝajnis esti entendiĝi, po longeco post longeco kiel infera teleskopo. Estis unu el tiaj vojaĝoj, kian farante homo senĉese sentas, ke li nepre estas atinginta la finon de l'universo kaj poste eltrovas, ke li nure estas ĉe la komenco de la Parko Tufnell. Londono iom post iom formortis je malpuretaj trinkejoj kaj malgajaj arbustejoj kaj poste neklarigeble renaskiĝis je brilantaj kaj larĝaj stratoj kaj buraĉaj hoteloj. Estis kiel trapasi dek tri apartajn trivialajn urbojn, unu tuŝantan la alian. Tamen, kvankam la vintra krepusko jam minacis la vojon antaŭ ili, la Pariza detektivo ankoraŭ sidis silenta kaj vigla, rigardante la fasadojn de la stratoj, kiuj preterglitis ambaŭflanke. Kiam ili jam lasis la antaŭurbon Camden Town malantaŭ si, la policanoj preskaŭ ekdormis; almenaŭ ili eksaltetis, kiam Valentin ekstaris, manfrapis ambaŭ surŝultre kaj kriegis al la veturigisto, ke li haltu.

Ili defalis la ŝtupojn al la strato ne sciante kial ili formoviĝis, kaj kiam ili ĉirkaŭrigardis por konstati, ili trovis Valentin, kiu triumfe indikas fenestron maldekstre. Ĝi estis granda fenestro en la larĝa fasado de orumita kaj palaca trinkejo; ĝi apartenis al la fako aparte konservata por respektula tagmanĝado, kaj portis etiketon "restoracio". Ĉi tiu fenestro, kiel la aliaj en la hotela fasado, estis el frostita kaj desegnita vitro; sed en la mezo estis granda nigra frakaso kiel stelo en glacio.

"Fine nia postsigno!" kriis Valentin, ŝvingante la kanon, "la domo kun la frakasita fenestro."

"Kiu fenestro? Kiu postsigno?" demandis lia ĉefhelpanto "ĉu vi havas pruvon, ke ĝi estas iel kunligata kun ili?"

Valentin preskaŭ rompis sian bambuan kanon pro ekkolero. "Pruvon!" li kriegis, "Bona Dio! li serĉas pruvon. Kompreneble es-

tas dudek kontraŭ unu, ke ĝi efektive ne rilatas al ili. Tamen kion alian ni povas fari? Ĉu vi ne komprenas, ke ni aŭ devos sekvi unu fantazian eblecon aŭ hejmeniri kaj enlitiĝi?" Li bruiris en la restoracion sekvate de siaj kunuloj, kaj ili baldaŭ sidis ĉe malgranda tavolo manĝante malfruan tagmanĝon kaj rigardante la stelon de frakasita vitro de interne.

Eĉ tiel ĝi ne estis pli informdona al ili.

"Mi rimarkas, ke via fenestro rompiĝis," diris Valentin al la kelnero, kiam li pagis la kalkulon.

"Jes, sinjoro," respondis li, atente kalkulante ŝanĝmonon, al kiu Valentin senvorte aldonis grandegan trinkmonon. La kelnero sin rektigis kun milda sed ne miskomprenbla vigleco.

"Ha, jes, sinjoro," li diris, "tre stranga afero, tio, sinjoro."

"Ĉu? Klarigu al mi," diris la detektivo kun facila scivolemeco.

"Nu, du viroj nigre vestitaj envenis," diris la kelnero, "du el tiuj alilandaj pastroj, kiuj nuntempe troviĝas ĉie. Ili mendis malkaran tagmanĝeton kaj unu pagis kaj eliris. La alia estis ĵus eliranta al li, kiam mi ekzamenis la monon kaj ektrovis, ke li pagis al mi pli ol trioble tro multe. 'Ho,' mi diris al la ulo kiu estis preskaŭ ekster la pordo, 'vi pagis tro multe.' 'Ho,' li diris, tre kviete, 'ĉu vere?' 'Jes,' mi diris kaj prenis la kalkulon por montri al li. Sed jen estis la miraĵo."

"Kion vi volas diri?" demandis lia pridemandanto.

"Mi povus ĵuri do je sep biblioj, ke mi skribis kvar ŝilingojn sur la kalkulon. Tamen tiam mi vidis, ke mi ja estis skribinta dek kvar ŝilingojn, tute klare."

"Nu?" kriis Valentin, malrapide moviĝante sed kun flamantaj okuloj, "Kaj poste?"

"La pastro ĉe la pordo, diris tute severe, 'Mi bedaŭras konfuzi viajn kalkulojn, tamen ĝi pagos por la fenestro.' 'Kiu fenestro?' mi

diris, 'Tiu, kiun mi estas romponta,' li diris kaj frakasis tiun tutan vitron per sia ombrelo."

Ĉiuj tri ekkrietis kaj la inspektoro mallaŭte diris, "Ĉu ni do sekvas eskapintajn frenezulojn?" La kelnero daŭrigis kvazaŭ li ĝuis la sensencan rakonton:

"Dum momento mi tiel konfuziĝis, ke mi povis nenion fari. La viro elpaŝis kaj aliĝis al sia amiko, kiu atendis lin ĉe la stratangulo. Tuj poste ili trairis straton Bullock tiel rapide, ke mi ne povis kapti ilin kvankam mi elkuris tra malantaŭa pordo."

"La strato Bullock," diris la detektivo kaj rapidegis kiel kuglo tra tiu strato, tiel rapide kiel la paro kiun li sekvis.

Ilia vojaĝo nun irigis ilin tra nudaj brikaj vojoj tute kiel tuneloj; tra stratoj kun malmultaj lumoj kaj eĉ kun malmultaj fenestroj; stratoj kiuj ŝajne estis konstruitaj el la sensignifaj malantaŭaĵoj de ĉio. Krepusko ĉiam kreskadis, kaj ne estis facile, eĉ al la Londonaj policanoj diveni ĝuste kien ili iras. La poliestro tamen opiniis, ke ili fine alvenos ien sur Hampstead Herbejo. Abrupte elŝvelanta kaj gazlumata fenestro tratranĉis la bluan krepuskon kiel serĉlumo kaj Valentin haltis dum momento antaŭ brila kaj triviala bombonbutiko. Post iometa hezito li eniris; li staris inter la okulfrapantaj koloroj de la sukeraĵoj kun tuta seriozeco kaj aĉetis dek tri ĉokoladojn cigarojn kun konsiderita zorgemeco. Evidente li preparis ian vojon al konversacio, tamen tion li ne bezonis. Akravizaĝa, mezaĝa fraŭlino en la butiko unue rigardis lian elegantecon kun nura aŭtomata scivolemeco; tamen kiam ŝi ekvidis, ke la pordo malantaŭ li estas plenigata per la blua uniformo de la poliestro, ŝiaj okuloj ŝajnis vekigi.

"Ho," ŝi diris, "se vi alvenis pri tiu pakaĵo, mi jam forsendis ĝin."

"Pakaĵo?" rediris Valentin; kaj estis lia vico montri scivolemon.

"Jes. Tiu, kiun la sinjoro postlasis, la sinjoro pastro."

”Je Dio!” diris Valentin, antaŭen kliniĝanta kun sia unua konfeso de avideco. ”Pro ĉielo, diru al mi ĝuste kio okazis.”

”Nu,” diris la virino iomete dube, ”la pastroj envenis antaŭ duonhora kaj aĉetis pipromentojn kaj iomete parolis kaj tiam foriris en la direkto de la herbejo. Tamen momenton poste unu el ili rekuris en la butikon kaj diris, ‘Ĉu mi postlasis pakaĵon?’ Mi do ĉie serĉis kaj ne povis tiun trovi; tiam li diris, ‘Ne gravas; sed se ĝi troviĝos, bonvolu poŝtsendi ĝin al ĉi tiu adreso’ kaj li postlasis la adreson kaj ŝilingon por mi. Kaj verdire, kvankam mi kredis, ke mi ĉien serĉis, mi trovis, ke li ja postlasis brunpaperan pakaĵon, kaj mi sendis ĝin kien li ordonis. Mi ne povas rememori la adreson nun, sed estis ie en Westminster. Sed ĉar ĝi ŝajnis esti tiom grava afero, mi kredis, ke la policanoj estas alvenintaj pri ĝi.”

”Tion ili ja faris,” diris Valentin abrupte. ”Ĉu la herbejo estas proksima?”

”Daŭrigu rekte, dek kvin minutojn,” diris la virino, ”kaj vi atingos la sendomajn kampojn.” Valentin elsaltis el la butiko kaj ekkuris. La aliaj detektivoj sekvis lin je nevolema troto.

La strato kiun ili trapasis estis tiom mallarĝa kaj malheligata per ombroj; ke kiam ili subite eliris sur la vakan herbejon kaj sub la vastan ĉielon, ili kun surprizo konstatis, ke la vespero estas ankoraŭ tiom luma kaj klara.

Perfekta kupolo pavverda oriĝis inter la nigraj arboj kaj la purpura malproksimo. La verdkoloro tiom mallumiĝis, ke ekbrilis unu aŭ du steloj, kiel kristalaj pintoj. La tuta restaĵo de taglumo kuŝis en ora brileco trans la rando de Hampstead kaj tiu populara kavaĵo kiun oni nomas ”la Valo de Saneco”. La libertempantoj, kiuj vagas en ĉi tiu regiono, ankoraŭ ne tute disiĝis; kelkaj paroj sidis kvazaŭ sen formo sur benkoj, kaj en la malproksimo ankoraŭ ekkriis knabino sur unu el la balanciloj. La ĉiela gloro profundiĝis kaj mallumi-

ĝis ĉirkaŭ la majesta banaleco de la homo; kaj starante sur la deklivo kaj transrigardante la valon, Valentin ekvidis tiun, kiun li serĉis.

Inter la nigraj kaj disiĝantaj aroj en tiu malproksimo estis unu aparte nigra, kiu ne disiĝis... aro kiu konsistis el du figuroj, pastre vestitaj. Kvankam ili aspektis tiel malgrandaj kiel insektoj, Valentin povis vidi, ke unu el ili estas multe pli malalta ol la alia. Kvankam la alia havis la kurbitajn ŝultrojn de studento kaj malelstarantan mienon, li povis vidi, ke la viro estas pli ol ses futojn alta. Li fermis la dentojn kaj antaŭenmarŝis svingante sian bastonon senpacience. Kiam li iome malgrandigis la interspacon kaj pligrandigis la du nigrajn figurojn kvazaŭ en vasta mikroskopo, li ekvidis ion alian; ion, kio mirigis lin kaj kion li iel atendis. Kiu ajn estu la alta pastro, povus esti nenia dubo pri kiu estas la malalta. Li estas lia amiko de la Harwich vagonaro, la stumpa pastreto de Essex, kiun li avertis pri liaj brunpaperaj pakaĵoj.

Nu, ĝis ĉi tio, ĉio estis sufiĉe klara kaj logika. Valentin eksciis tiun matenon, ke iu Pastro Brown el Essex, alportos al Londono arĝentan krucon kun safiroj, relikvujo grandvalora, por montri al iuj fremdaj pastroj ĉe la kongreso. Tiu estis sendube la "arĝentaĵo kun bluaj ŝtonoj" kaj pastro Brown estis sendube la stultulo en la trajno. Nu, ne estus rimarkinde, ke tio kion Valentin eltrovis, Flambeau ankaŭ eltrovis; Flameau ĉion eltrovis. Estus ankaŭ neniel mirinde, ke kiam Flambeau aŭdis pri safira kruco li provus forŝteli ĝin, tio estus la plej laŭnatura okazo el la tuta naturscienco. Kaj ankaŭ plencerte estus neniel mirinde, ke Flambeau plene superruzus stultan ŝafon simile al la viro kun la ombrelo kaj la pakaĵoj. Li estas tia homo kian oni povus allogi eĉ ĝis la Norda Poluso; ne estus surpriza afero se aktoro kiel Flambeau, vestita kiel alia pastro, allogus lin ĝis Hampstead Herbejo. Ĝis tie la krimo vidiĝis sufiĉe klare; kaj kvankam la detektivo sentis kompaton al la pastro pro lia senhelpeco, li

preskaŭ malestimis Flambeau ĉar li sin klinis al tia facile trompebla viktimo. Tamen kiam Valentin pripensis ĉion, kio dume okazis, ĉion kio kondukis lin al lia triumfo, li renversis sian tutan cerbaĵon por eltrovi eĉ la plej malgrandan racieron en la okazintaĵoj. Kiel rilatis la forŝtelo de blua kaj arĝenta kruco de Essex'a pastro, al supo ĵetita almure en restoracio? Kiel ĝi rilatis al nuksoj nomitaj kiel orangĝoj, aŭ al pagado kaj poste frakasado de fenestroj? Li estis veninta al la fino de sia ĉaso; sed li iel preterlasis ĝian mezon. Kiam li malsukcesis (kio malofte okazis), li kutime komprenis la postsignon sed maltrafis la krimulon. Sed ĉi tiuokaze li kaptis la krimulon kvankam li ankoraŭ ne povis kompreni la postsignon.

La du figuroj, kiujn ili sekvis, rampis kiel nigraj muŝoj trans la vasta verda konturo de monteto. Ili estis evidente absorbitaj en interparolado, kaj eble ne rimarkis kien ili iras, sed ili certe estis irantaj al la pli dezertaj kaj silentaj altejoj de la herbejo. Dum iliaj postsekvantoj pliproksimiĝis al ili, tiuj devis uzi la maldignajn pozojn de cervĉasantoj, kaŭri malantaŭ arboj kaj eĉ rampi sternitaj tere, tra la altkreska herbo. Per ĉi tiuj malgraciaj lertecoj la ĉasistoj eĉ alproksimiĝis la ĉasatojn sufiĉe por ekaŭdi la murmuradon de diskuto, sed nenia vorto aŭdiĝis krom la vorto "racio", kiu aŭdiĝis de tempo al tempo en alta kaj preskaŭ infana voĉo. Unufoje, en la abrupta deklivo kaj arbusta densejo, la detektivoj efektive perdis la du figurojn, kiujn ili sekvis. Ili ne retrovis la vojon dum dek angorplena minutoj kaj poste ĝi kondukis ilin ĉirkaŭ la supraĵo de ĝibŝultra monteto, kiu staris super amfiteatro de riĉkolora kaj dezerta sunsubira pejzaĝo. Sub arbo en ĉi tiu elstranta sed senhoma loko estis kaduka benko. Sur ĉi tiu benko sidis la du pastroj ankoraŭ serioze interparolantaj. La grandioza verdo kaj oro ankoraŭ briladis en la mallumiĝanta horizonto; sed la supra kupolo malrapide ŝanĝiĝis de pavverda ĝis pavblua koloro, kaj la steloj sin pli kaj pli malligis kiel

solidaj juveloj. Mute mansignante al siaj kunuloj Valentin povis rampi ĝis malantaŭ la granda multbranĉa arbo, kaj tie starante en morta silento li ekaŭdis la vortojn de la strangaj pastroj por la unua fojo.

Li aŭskultis dum minuto kaj duono kaj poste diabla dubo ektenis lin. Eble li estis forkondukinta la du anglajn policanojn al la dezertejoj de la nokta herbejo pro celo ne pli prudenta ol serĉi figojn sur ĝiaj kardoj. Ĉar la du pastroj parolis ĝuste kiel pastroj, pie, kun klero kaj malrapide, pri la plej aeraj enigmoj de teologio. La malgranda Essex'a pastro parolis pli simple, kun sia rondvizaĝo turnita al la kreskantaj steloj, la alia parolis kun la kapo mallevita, kvazaŭ li ne estas eĉ inda alrigardi ilin. Sed oni ne povus aŭdi pli senkulpan pastran interparoladon aŭ en blanka itala klostro aŭ en nigra hispana katedralo.

Li unue aŭdis la finon de frazo, kiun Pastro Brown diris... ". . . tion ili vere volis diri dum la Mezepoko kiam ili asertis, ke la ĉielo ne estas malvirtigebla."

La alta pastro klinis la malleviton kapon kaj diris,

"Ho jes, ĉi tiuj novaj senkreduloj apelacias al ia racieco; sed kiu povas alrigardi tiujn milionojn da mondoj kaj ne eksenti, ke eble ekzistas ankoraŭ pli de mirigaj universo super ni, kie racieco estas tute malracia?"

"Ne," diris la alia pastro, "racio estas ĉiam racia, eĉ en la lasta limbo, en la perdita limo de ĉio. Mi scias, ke oni akuzas la eklezion pri tio, ke ĝi malplivalorigas racion, sed fakte estas tute male. Sola sur la tero la eklezio taksas racion kiel vere superrega. Sola sur la tero la eklezio asertas, ke Dio mem estas ligata per racio."

La alia pastro levis sian severan vizaĝon al la brilanta bluaĵo kaj diris:

"Tamen kiu scias ĉu en tiu senlima universo... ?"

”Nur senlima laŭ materio,” diris la malgranda pastro, subite sin turnante en sia seĝo, ”ne tiom senlima, ke ĝi evitas la leĝojn de la vero.”

Valentin, malantaŭ sia arbo, mordadis siajn ungojn pro senvorta kolero. Li preskaŭ imagis, ke li aŭdas la mokridojn de la anglaj detektivoj, kiujn li tiom malproksimen venigis pro fantazia diveno nur por aŭskulti la metafizikan klaĉon de du mildaj maljunaj pastroj. Pro sia senpacienco li ne aŭdis la egale malsimplan respondo de la alta pastro, kaj kiam li denove ekaŭskultis, estis Pastro Brown kiu parolis denove:—

”Racieco kaj justeco regas la plej malproksiman kaj la plej solecan stelon. Ekrigardu tiujn stelojn. Ĉu ili ne aspektas kiel apartaj diamantoj kaj safiroj? Nu, vi imagu ian frenezulan botanion aŭ geologion, kia plaĉas al vi. Imagu al vi arbarojn diamantajn kun folio el brilaj kristaloj. Imagu, ke la luno estas blua lumo, aparta elefanta safiro. Sed ne imagu, ke la tuto de tiu furioza astronomio povas ŝanĝi je la malplej granda ero la raciecon kaj justecon de sinkonduto. Sur ebenaĵoj opalaj, sub krutaĵoj tranĉitaj el perlo vi ankoraŭ trovos avertilon, ‘Ne ŝtelu.’”

Valentin estis ĵus sinlevonta de sia nefleksebla kaj kaŭranta pozo kaj forramponta kiel eble plej senbrue, faligita per la sola granda malsaĝeco de sia kariero. Tamen io ĉe ĝuste la silento de la alta pastro haltigis lin ĝis ĉi tiu parolos. Kiam li fine ekparolis, li diris tute simple, la kapo klinita kaj manoj surgenue:

”Nu, mi opinias, ke aliaj mondoj eble pligrandiĝas super nian racion. La mistero de la ĉielo estas nemezurebla kaj mi mem povas nenion fari krom malsuprenklini la kapon.”

Tiam, la frunto ankoraŭ klinita kaj ne ŝanĝinte iel ajn sian pozon aŭ voĉon, li aldonis,

”Transdonu nun tiun safiran krucon. Ni estas solaj tie ĉi, kaj mi povus disŝiri vin kiel pajlan pupon.”

La tute neŝanĝita voĉo kaj maniero aldonis strangan perforto al tiu konsterna ŝanĝo de signifo. Sed la gvardanto de la sankta restaĵo ŝajnis apenaŭ turni la kapon. Ŝajnis, ke lia iomete stulta vizaĝo estas ankoraŭ turnita al la steloj. Eble li ne ekkomprenis. Aŭ eble li komprenis kaj sidas rigidigata de teruro.

”Jes,” diris la alta pastro, per la sama mallaŭta voĉo kaj kun la sama senmova maniero, ”jes, mi estas Flambeau.”

Tiam, post paŭzo li diris,

”Nu, venu; ĉu vi donos al mi tiun krucon?”

”Ne,” diris la alia kaj la unusilabo strange sonis. Flambeau subite forĵetis ĉiujn siajn pontifikajn pretendojn. La granda rabisto malantaŭen apogis sin sur sia benko kaj ridis mallaŭte kaj longe.

”Ne,” li kriis, ”vi ne donos ĝin al mi, vi fieriĉa prelato. Vi ne donos ĝin, vi fraŭla naivulo. Ĉu mi klarigu kial vi ne donos ĝin. Ĉar mi jam havas ĝin en mia brustpoŝo.”

La malgranda homo el Essex turnis al li en la krepusko vizaĝon ŝajne konfuzitan kaj diris kun timema ekscito,

”Ĉu—ĉu vi estas certa?”

Flambeau kriegis pro ĝojo,

”Vere, vi estas tiel amuza kiel triakta farso,” li kriis, ”Jes, vi napo, mi estas tute certa. Mi estis tiom prudenta fari duplikaton de la ĝusta pakaĵo kaj nun, mia amiko, vi havas la duplikaton kaj mi havas la juvelojn. Malnova ruzo, Pastro Brown—tre malnova ruzo.”

”Jes,” diris Pastro Brown kaj pasigis la fingrojn tra la hararo kun la sama konfuzita maniero. ”Jes, mi iam antaŭe priaŭdis ĝin.”

La krimkolosulo kliniĝis super la kampara pastreto kun ia subita intereso.

”Vi antaŭe priaŭdis ĝin?” li demandis, ”Kie vi estas priaŭdinta ĝin?”

”Nu, kompreneble mi devas ne diri lian nomon,” diris la malgranda homo simple. ”Li estis pentulo. Li vivadis prospere dum dudek jaroj, tute per duplikitaj brunpaperaj pakaĵoj. Kaj do vi vidas kiam mi komencis suspekti vin, mi tuj pensis pri tiu kompatindulo, kaj ties faradon.”

”Komencis suspekti min?” rediris la rabisto kun pli forta atento, ”ĉu vi havis tiom da saĝeco suspekti min nur ĉar mi kondukis vin al ĉi tiu dezerta regiono de la herbejo?”

”Ne, ne,” diris Brown, kvazaŭ bedaŭreme. ”Efektive, mi suspektis vin kiam ni unue renkontiĝis. Estis pro tiu ŝveletaĵo sur la maniko kie uloj kiaj vi portas la pintan braceleton.”

”Kiel, je Tartaro,” kriis Flambeau, ”vi iam priaŭdis la pintan braceleton?”

”Ho, mia ŝafereto,” diris Pastro Brown, kurbante la brovojn iel senesprime. ”Kiam mi estis subpastro en Hartlepool, estis tri el ili kun pintaj braceletoj. Do, ĉar mi suspektis vin de la komenco, vi komprenas, ke mi certigis, ke almenaŭ la kruco iru sendifekte. Do, fine mi vidis vin interŝanĝi la pakaĵojn. Tiam, kompreneble mi ankoraŭfoje interŝangis ilin. kaj poste mi postlasis la ĝustan.”

”Postlasis ĝin?” rediris Flambeau, kaj unuafoje lia voĉo enhavis ion krom triumfo.

”Nu, estis tiel ĉi,” diris la malgranda pastro, parolante same simple. ”Mi reiris al tiu sukeraĵbutiko kaj demandis ĉu mi postlasis pakaĵon kaj donis al ili adreson okaze ke ĝi troviĝos. Nu, mi sciis, ke tion mi ne faris, sed kiam mi denove foriris mi efektive postlasis ĝin. Do, anstataŭ kursekvi min kun tiu granvalora pakaĵo ili sendis ĝin rekte al amiko mia en Westminster.” Tiam li aldonis iomete malgaje, ”tion mi ankaŭ lernis de kompatindulo en Hartlepool.

Li tiel faris pri la mansaketoj, kiujn li ŝtelis ĉe stacidomoj, sed li estas en monaĥejo nuntempe. Ho, oni lernas, kompreneble,” li aldonis, denove frotante la kapon kun tia sama energia bedaŭresprimo. ”Ni ne povas eviti esti pastroj. Homoj venas kaj diras al ni ĉi tiajn aferojn.”

Flambeau elŝiris brunpaperan pakaĵon el sia interna poŝo kaj disŝiris ĝin. Ĝi enhavis nenion krom papero kaj plumbaj stangetoj. Li ekstaris kun giganta gesto kaj kriis:

”Mi ne kredas tion. Mi ne kredas, ke naiva kamparulo kiel vi povus sukcesi tiom fari. Mi kredas, ke vi ankoraŭ havas ĝin ĉe vi, kaj se vi ne cedos ĝin—nu ni estas tute solaj kaj mi forprenos ĝin perforte.”

”Ne,” diris Pastro Brown kaj ankaŭ ekstaris, ”vi ne forprenos ĝin perforte. Unue, ĉar mi vere ne havas ĝin nuntempe. Kaj due, ĉar ni ne estas solaj.”

Flambeau haltis sian antaŭenan paŝon.

”Malantaŭ tiu arbo,” diris Pastro Brown, fingromontrante, ”staras du fortaj policianoj kaj la plej eminenta detektivo nuntempe vivanta. Kiel ili venis ĉi tien, ĉu vi demandas? Nu, mi venigis ilin, kompreneble. Kiel mi tion faris? Mi klarigas tion ankaŭ se plaĉas al vi. Dio benu vin, ni devas scii dudek tiajn aferoj kiam ni laboras inter la krimemaj klasoj. Nu, mi ne estis certa, ke vi estas ŝtelisto, kaj estis neeble fari skandalon pri unu el niaj pastroj. Tial mi nur provis vin por eltrovi ĉu io devigos al vi vin malkaŝi. Iu ajn kutime faras scenon, se li trovas salon en sia kafo; se ne, li havas kaŭzon silenti. Mi interŝanĝis la salon kaj la sukeron kaj vi silentis. Iu ajn kutime malplaĉiĝas, se lia kalkulo estas trioble tro granda. Se tiu pagas li havas motivon por resti nerimarkita. Mi pligrandigis vian kalkulon kaj vi pagis.”

Ŝajnis, ke la mondo haltas kaj Flambeau estas saltegota kiel tig-

ro. Sed li estis tenata kvazaŭ per sorĉo, li estis miregata per scivolemeco plej forta.

”Nu,” daŭrigis Pastro Brown kun peza klareco, ”ĉar vi ne volis lasi postsignon al la policianoj, kompreneble iu devis tion fari. Ĉie ajn kien ni iris, mi penis ion fari, kio paroligos ĉiun pri ni dum la restaĵo de la tago. Mi ne faris grandan difekton—makulita muro, elverŝitaj pomoj, frakasita fenestro; sed mi savis la krucon, kiel la kruco estos ĉiam savata. Ĝi estas nun en Westminster. Mi iomete miris, ke vi ne haltigis ĝin per la Azena Fajfo.”

”Per kio?” demandis Flambeau.

”Mi ĝojas, ke vi neniam aŭdis pri tio,” diris la pastro grimacante. ”Ĝi estas aĉaĵo. Mi estas certa, ke vi estas tro bona homo esti Fajfisto. Mi mem ne povus nuligi ĝin eĉ per la ‘Makuloj’; miaj kruroj ne estas sufiĉe fortaj.”

”Kion subĉielan vi preparolas?” demandis la alia.

”Mi opiniis, ke vi ne konas la ‘Makulojn’,” diris Pastro Brown, plezure surprizigita, ”Do vi certe ankoraŭ ne tro erarvadis.”

”Je infero, kiel vi konas ĉiujn ĉi tiujn teruraĵojn?” kriis Flambeau.

Eta rideto aperis sur la ronda vizaĝo de lia pastra kontraŭanto. ”Ho, estante fraŭleca stultulo, supozeble,” li diris. ”Ĉu vi neniam ekpensis, ke viro kiu preskaŭ nenion faras krom aŭdi la realajn pekojn de aliaj ne estus tute sen scio pri homa malvirteco. Tamen fakte pro alia flanko de mia metio mi certigis, ke vi estas nenia pastro.”

”Kio?” demandis la ŝtelisto, la buŝo larĝe malfermita.

”Vi atakis la raciecon,” diris Pastro Brown, ”Tio estas malĝusta teologio.”

Kaj eĉ dum li sin turnis for por kolekti sian propraĵon, eliris la tri detektivoj el sub la krepuskaj arboj. Flambeau estis artisto kaj sportemulo. Li malantaŭen paŝis kaj faris graciplenan riverencon al Valentin.

”Ne al mi, mon ami,” diris Valentin, per klara voĉo, ”Ni ambaŭ faru riverencon al nia majstro.”

Kaj ili ambaŭ staris unu momenton senĉapele, dum la malalta Essex’a pastro palpebrume serĉis sian ombrelon.

LA SEKRETA ĜARDENO

Aristide Valentin, estro de la Pariza Polico, estis malfrua por sia vespermanĝo kaj kelkaj liaj gastoj jam komencis alveni antaŭ ol li. Ĉi tiujn tamen recertigis lia servisto Ivan, la maljunulo kun cikatro, kaj la vizaĝo preskaŭ tiel griza kiel liaj lipharoj, kiu ĉiam sidis ĉe tablo en la enirejo—enirejo kies muroj estis ĉiam kovrataj de armiloj. La domo de Valentin eble estis tiel stranga kaj konata kiel ĝia mastro. Ĝi estis malnova domo, kun altaj muroj kaj altkreskaj popoloj, preskaŭ superpendantaj la riveron Seine; sed la rimarkindaĵo kaj eble ankaŭ la polica valoro pri ĝia konstrumaniero estis ĉi tio: ne ekzistis ia ajn elirejo krom la antaŭa pordo, kiun gvardis Ivan kaj la armilaro. La ĝardeno estis granda kaj ellaborita, kaj estis multaj elirejoj kiuj kondukis el la domo en la ĝardenon. Sed ne estis elirejo el la ĝardeno en la eksteran mondon; ĝi estis tute ĉirkaŭata de muro, alta, glata kaj negrimpebla kun specialaj pintaĵoj sur ĝia supra rando; eble ne maltaŭga meditejo por viro, kiun mortigi cent krimuloj jam ĵuris.

Kiel Ivan klarigis bone al la invititoj, la gastiganto ĵus telefonis, ke li estas detenata dum dek minutoj. Fakte li estis faranta kelkajn finajn aranĝojn pri ekzekutoj kaj tiaj malfeliĉaĵoj; kaj kvankam ĉi tiuj devoj estis pro la naturo tute abomenaj al li, li tamen ĉiam efektivigis ilin precizece. Malkompata dum la persekutado de krimuloj, li estis tre kompata pri ilia punado. De kiam li superregis la francajn kaj grandmezure la eŭropajn policajn metodojn, lia potenca influo estis honorinde uzata por mildigi punojn kaj plipurigi malliberej-

ojn. Li estis unu el la grandaj francaj homamaj liberpensantoj, kies sola eraro estas, ke ilia kompatato estas eĉ pli severa ol la justeco.

Kiam Valentin alvenis li estis jam vestita en nigraj vestaĵoj kaj portanta la ruĝan rozeton—eleganta figuro, la nigra barbo jam grize striita. Li iris tuj tra sia domo al la lego-ĉambro, kiu estis elirejo en la ĝardenon. La alĝardena pordo estis malferma, kaj zorge enŝlosinte sian skatolegon en ĝian oficialan lokon, li staris momenton ĉe la pordo, rigardante al la ĝardeno. Klarbrila luno kontraŭbatalis la flugantajn ŝiritaĵojn kaj ĉifonojn de ŝtormo kaj Valentin rigardadis ĝin kun sopiremo kutima al sciencemaj homoj kiaj li. Eble tiaj homoj eksentas spiritan antaŭvidon pri la plej gravega problemo en siaj vivoj. Tiun okultan melankolion tamen li baldaŭ forpuŝus, ĉar li sciis, ke li estas malfrua kaj, ke liaj gastoj jam komencis alveni. Unu ekrigardo en la salonon dum li eniris ĝin, sufiĉis por montri al li, ke tamen la ĉefa invitito ankoraŭ ne alvenis. Li vidis ĉiujn aliajn subtenantojn de tiu malmultenombra festeno; li vidis Lordon Galloway, la angla ambasadoro—kolerema maljunulo kun la vizaĝo kiel ruĝbruna pomo, portanta la bluan rubandon de la Krurzona Ordeno. Li vidis Lordinon Galloway, maldika kaj fadensimila, la hararo arĝenta kaj la vizaĝo samtempe sentema kaj aristokrata. Li vidis ŝian filinon Fraŭlinon Margaret Graham, pala kaj beleta knabino kun elfa vizaĝo kaj hararo kuprakolora. Li vidis la Dukinon de Sankta Mikela Monto, nigro-okula kaj riĉaspekta kaj kun ŝi ŝiajn du filinojn, ankaŭ nigro-okulaj kaj riĉaspektaj. Li vidis D-ron Simon, tipe franca sciencisto kun okulvitroj, pinta bruna barbo kaj frunto striita de tiuj paralelaj sulkoj, kiuj estas la puno de malestima maniero, ĉar ili fariĝas per konstanta eklevo de la brovoj. Li vidis Pastron Brown el Cobhole en Essex, kiun li antaŭ nelonge renkontis en Anglujo. Li vidis, eble kun plia intereso ol iun ajn el la aliaj, altan viron en uniformo, kiu riverencis al la Galloway'oj sed ricevis nenian afablan

respondon, kiu nun antaŭen marŝis por saluti sian gastiganton. Li estis Komandanto O'Brien de la Franca Fremdula Legiono. Li estis maldika tamen iom fanfarona figuro, tute razita, la hararo nigra kaj la okuloj bluaj kaj, kiel decas ĉe oficiro de tiu regimento, famkonata pro siaj venkoplenaj malsukcesoj kaj sukcesplenaj sinmortigoj, li havis mienon samtempe viglegan kaj melankolian. Laŭ nasko li estis irlanda landsinjoro kaj dum sia juneco li konis la Galloway'ojn, Margaret Graham precipe. Li foriris de sia lando pro ŝuldoj, kaj li nun esprimis sian tutan liberecon de brita etiketo, fiere paŝante tien kaj tien ĉi vestita en alilanda uniformo, sabro kaj spronoj. Kiam li kliniĝis al la ambasadora familio, la Gelordaj Moŝtoj kliniĝis nevoleme kaj Fraŭlino Margaret rigardis for.

Pro kiaj ajn malnovaj kaŭzoj tiaj homoj interesiĝis unu al la alia, ilia eminenta gastiganto ne tre interesiĝis pri ili. Almenaŭ neniu el ili estis por li la elstaranta gasto de tiu vespero. Valentin aparte atendis viron eminentan tra la tuta mondo, kies amikecon li akiris dum siaj detektivaj rondiroj kaj triumfoj en Usono. Li atendis la alvenon de Julius K. Brayne, tiu multmilionulo kies kolosaj kaj eĉ subpremantaj donacoj al malgrandaj religioj elvokis tiom da facilaj mokridoj kaj tiom da pli facila seriozeco en la anglaj kaj usonaj ĵurnaloj. Neniu povus ĝuste certiĝi pri sinjoro Brayne, ĉu li estas ateisto aŭ mormono aŭ kristana sciencisto; tamen li estis ĉiam preta plenigi je mono ajnan intelektan vazon, kondiĉe, ke ĝi estu neprovita vaso. Unu el liaj flankokupoj estis atendi la alvenon de la Usona Shakespeare, okupo kiu postulis pli da pacienco ol fiŝkaptado. Li admiris Walt Whitman, tamen opiniis, ke Luke P. Tanner el Paris, Pa., estas ĉiel pli "progresema" ol Whitman. Io ajn, kiu ŝajnis kiel "progresema", plaĉis al li. Li opiniis, ke Valentin estas "progresema", tiel farante kontraŭ li grandan maljustaĵon.

La korpa ekapero de Julius K. Brayne en la ĉambron estis tiel

ekfrapa kiel atabluga sonorilo. Li havis ĉi tiun gravan econ, al kiu malmultaj el ni povas pretendi, ke lia ĉeesto estis tiel granda kiel lia foresto. Li estis grandegulo, tiom grasa kiom alta, vestita tute en vespera nigro, sen eĉ la brilo de ĉeneto aŭ ringo. Lia hararo estis blanka kaj malantaŭen kombita laŭ la germana maniero; lia vizaĝo estis ruĝa, furioza kaj keruba, kun nigreta barbeto sub la malsupra lipo, kiu donis al vizaĝo alie infaneca, teatran aŭ eĉ mefistofelan aspekton. Tamen ne dum longa tempo la gastaro nur rigardis tiun eminentan usonanon; lia malfrueco estis jam gastiga problemo kaj oni tuj sendis lin en la mangô-ĉambro kun la Lordino Galloway ĉe la brako.

Ĉiurilate la Galloway'oj estis sufiĉe afablaj kaj senĝenaj, krom rilate al unu detalo. Se Fraŭlino Margaret ne eniris vespermanĝi kun tiu aventuristo O'Brien, ŝia patro estus tute kontenta; kaj ŝi tion ne faris; ŝi dece eniris kun D-ro Simon. Tamen la maljuna lordo estis maltrankvila kaj preskaŭ malĝentila. Li estis sufiĉe diplomata dum la vespermanĝo sed kiam la cigaroj aperis kaj tri el la pli junaj viroj, Simon la kuracisto, Brown la pastro kaj la danĝereta O'Brien, la ekzilito en fremda uniformo . . . malaperis por interparoli kun la virinoj aŭ fumi en la vitroplantejo, tiam la angla diplomato fariĝis treege nediplomata. Dum ĉiu sesdeksekundaro trapikis lin la penso, ke eble tiu fripono O'Brien iel signalas al Margaret; kiamaniere, li ne provis imagi al si. Dum la kafotrinkado li restis sola kun la griza usonano, kiu fidis al ĉiuj religioj, kaj kun la griziĝanta franco, kiu kredis al neniuj. Ili interdisputu, sed nek unu nek la alia povis interesi lin. Post iom da tempo ĉi tiu "progresema" vorta interbatalo tiom tedis lin, ke li ankaŭ leviĝis por serĉi la salonon. Li perdiĝis dum ses aŭ dek minutoj en longaj koridoroj; fine li aŭdis la altan akran voĉon de la kuracisto kaj poste la mallaŭtan voĉon de la pastro, sekvata de ĉies ridado. Ili ankaŭ, li kun blasfemo ekpensis, kre-

deble disputas pri "scienco kaj religio" Sed tuj kiam li malfermis la pordon de la salono li rimarkis nur unu aferon—tion, kio ne estas tie. Li ekvidis, ke Komandanto O'Brien forestas kaj, ke Fraŭlino Margaret ankaŭ forestas.

Senpacience elirante el la salono kiel li eliris el la manĝo-ĉambro, li denove bruiris tra la koridoro. La ideo defendi sian filinon kontraŭ la irland-alĝeriana sentaŭgulo fariĝis la superreganta ideo de la menso, eĉ ĝis frenezeco. Eĉ dum li iris al la malantaŭa pordo de la domo, kie estis la lego-ĉambro de Valentin, li surpriziĝis renkontante sian filinon, kiu preterrapidis kun pala maldejna vizaĝo, kio estas la dua enigmo. Se ŝi ĵus revenis de O'Brien, kie do estas O'Brien? Se ŝi ne estis kun O'Brien, kun kiu ŝi estis? Kun ia senila kaj kolerega suspekto li palpade iris al la mallumaj malantaŭejoj kaj fine trovis servistan pordon, kiu kondukis lin en la ĝardenon. La luno per sia sabro jam traŝiris kaj forvolvis la ŝtorman restaĵon. La arĝenta lumo plenigis ĉiujn kvar angulojn de la ĝardeno. Alta figuro, blue vestita, transpaŝis la razenejon al la lego-ĉambra pordo; la ekbrileto de lunluma arĝento sur la vestobordero montris, ke tiu estas la Komandanto O'Brien.

Li malaperis tra la vitraj pordoj en la domon kaj lasis ĉe la lordo nepriskribeblan malbonhumoron, samtempe virulenta kaj neklara. La blu-arĝenta ĝardeno, kiel teatra sceno, ŝajne volis turmenti lin per tuta tiu tiraneca dolĉeco kontraŭ kiu lia mondeca aŭtoritato bataladis. La gracieco kaj longeco de la paŝoj de la Irlandano ekkolerigis lin kvazaŭ li estus rivalo anstataŭ patro; la lunlumo frenezigis lin. Li estis allogata kaj kaptata kvazaŭ sorĉe en trubaduran ĝardenon, en Watteau an felandon, kaj volante forpeli de si tiajn amecajn idiotecojn per interparolado, li energie ekiris sekvi sian kontraŭulon. Tion farante, li piedfrapis kontraŭ arbbranĉo aŭ ŝtono kuŝanta en la herbo; li malsupren rigardis agacite kaj poste kun

scivolemo. Tuj poste la lumo kaj la altaj popoloj malsuprenrigardis al tre malofta spektaklo, al maljuna angla diplomato kiu plenforte kuris, dume krieganta kaj muĝanta.

Liaj raŭkaj krioj venigis al la lego-ĉambra pordo palan vizaĝon kaj la brilantajn okulvitrojn kaj maltrankvilan frunton de D-ro Simon, kiu aŭdis la unuajn kompreneblajn vortojn de la altrangulo. Lordo Galloway estis krieganta, "Kadavro en la herbo . . . sanga kadavro." Videble O'Brien plene foriĝis el la menso.

"Ni devas tuj alvoki Valentin," diris la kuracisto, kiam la alia rakontis balbutante pri ĉio, kion li kuraĝis ekzameni. "Estas bonŝance, ke li ĉeestas," kaj eĉ dum li parolis la eminenta detektivo eniris la lego-ĉambron, alvenigita de la kriego. Estis preskaŭ amuze rimarki la karekterizan ŝanĝon de lia maniero; li unue alkuris pro la maltrankvilo de mastro kaj gastiganto, kiu timas, ke iu gasto aŭ servisto ekmalsanas. Kiam oni klarigis al li la sangan okazintaĵon, li tuj fariĝis vigla kaj aferema; ĉar ĉi tio, kiom ajn ĝi estas subita kaj terura, estis ila metio.

"Strange, sinjoroj," li diris dum ili rapidis en la ĝardenon, "ke mi postĉasis misterojn tra la tuta mondo kaj nun ĉi tiu sidiĝas en mian propran ĝardenon. Sed kie ĝi estas?" Ili transiris la razenejon malpli facile ĉar vualanta nebulo komencis leviĝi el la rivero; sed gvidataj de la frapita lordo ili trovis la kadavron en la altkreska herbo, kadavron de tre alta kaj larĝŝultra homo. Li kuŝis la vizaĝo altere, tiel, ke ili povis vidi nur, ke liaj larĝaj ŝultroj estas nigre vestitaj kaj ke lia granda kapo estas kalva, krom kelkaj tufetoj da bruna haro, kiuj alkroĉiĝis al la kranio kiel malseka maralgo. El sub lia makulita makzelo forrampis ruĝa serpento da sango.

"Certe estas," diris Simon per profunda kaj stranga voĉo, "ke li ne estis kunulo nia."

”Ekzameni lin, doktoro,” kriis Valentin akre, ”eble li ankoraŭ ne mortis.”

La kuracisto kliniĝis ĝis la kadavro. ”Li ne tute malvarmiĝis, tamen li ja estas senviva,” li respondis, ”Helpu min levi lin.”

Ili zorge levis lin iomete el la herbo, kaj ĉia dubo pri lia senviveco tuj malaperis en terura maniero. La kapo defalis. Ĝi estis tute detranĉita de la korpo; kiu ajn tranĉis la gorgon tranĉis ankaŭ la kolon. Eĉ Valentin estis iomete ŝokigata. ”Li nepre estis forta kiel gorilo,” li murmuris.

Kvankam li kutimis vidi tiajn anatomiajn teruraĵojn, ne estis sen ekstremo, ke D-ro Simon levis la kapon. Ĝi estis iomete hakita ĉirkaŭ la kolo kaj makzelo, sed la vizaĝo estis preskaŭ sendifekta. Estis peza, flava vizaĝo, samtempe enfalinta kaj ŝvelinta, kun alcipitra nazo kaj dikaj palpebroj, la vizaĝo de malbona roma imperiestro, eble ankaŭ de ĥina imperiestro. Ĉiu ŝajne rigardis ĝin tra la sensentaj okuloj de nesciado. Nenio plu estis rimarkebla, krom, ke dum ili levis la korpon ili vidis sube la blankan briladon de vespera ĉemizo kaj la ruĝan brilon de sango. Kiel D-ro Simon asertis, la viro ja ne estis unu el la invititoj. Tamen li estis kredeble peninta aliĝi, ĉar li alvenis taŭge vestita.

Valentin surgenuiĝis, kaj kun la manoj surtere ekzamenis kun sia plena metodeca atento la ĉirkaŭan herbon kaj teron; tion farante li estis helpata malpli lerte de la kuracisto kaj de la angla lordo je maniero tute fuŝa. Nenio rezultis de ilia rampado, krom kelkaj branĉetoj tre mallonge rompitaĵoj aŭ tranĉitaj, kiujn Valentin ekzamenis kaj tuj forĵetis.

”Branĉetoj,” li diris serioze, ”branĉetoj kaj fremdulo absolute nekonata kun detranĉita kapo; krome estas nenio sur ĉi tiu razenejo.”

Preskaŭ terure silentis, kaj poste akre ekkriis la nervtaŭzita Galloway.

”Kiu estas? Kiu estas apud la muro?”

Malalta figuro kun kapo idiote granda hezite alproksimiĝis ilin tra la lunluma nebulo. Dum unu momento ĝi aspektis kiel koboldo sed poste montriĝis la senofenda pastro, kiun ili lasis en la salono.

”Vere,” li diris milde, ”ne ekzistas elirejoj el ĉi tiu ĝardeno, ĉu vi scias?”

La nigraj brovoj de Valentin iomete senpacience sulkiĝis, laŭ principo kontraŭ la sutanon. Sed li estis multe tro justa homo, nei la trafecon de la vortoj, ”Vi estas prava,” li diris. ”Antaŭ ol ni eltrovos kiel lia morto okazis, mi eble devos eltrovi kiel lia ĉeesto ĉi tie okazis. Nu, aŭskultu sinjoroj, se estas eble sen malutilo al mia ofico kaj devo, ni ĉiuj konsentos, ke iuj eminentaj nomoj devus ne esti implikitaj en tiu afero. Estas sinjorinoj, sinjoroj kaj estas alilanda ambasadoro. Se mi nomus ĝin kiel krimon, ĝi devus esti esplorata kiel krimo. Tamen mi povas agi laŭ mia juĝo. Mi estas la poliestro; mi estas tiom publika, ke mi povas bone esti privata. Dio mia, mi senkulpigos ĉiun el miaj gastoj antaŭ ol mi alvokos miajn policianojn por elserĉi iun alian. Sinjoroj, je via honoro, neniu el vi eliru la domon ĝis morgaŭ tagmeze; estas litĉambroj por ĉiuj. Simon, mi kredas, ke vi scias kie trovi mian serviston Ivan, en la enireja ĉambro; li estas konfidenculo. Diru al li, ke alia servisto gvardu la pardon kaj li tuj venu ĉi tien. Lordo Galloway, vi estas sendube la plej taŭga el ni por informi la sinjorinojn pri kio okazis kaj eviti panikon. Ili ankaŭ devas resti. Pastro Brown kaj mi restos ĉi tie apud la kadavro.” Kiam en Valentin aŭdiĝis la estra voĉo, oni obeis lin kiel klarionon. D-ro Simon trairis la armilejon kaj trovis Ivan, la privatan detektivon de la publika detektivo. Galloway iris al la salono kaj

transdonis la teruran novaĵon sufiĉe takte, ke kiam la aro kunvenis denove la sinjorinoj estis jam maltrankviligitaj kaj jam trankviligitaj. Dume la fidela pastro kaj la fidela ateisto staris ĉe la kapo kaj piedoj de la korpo senmove en la lunlumo, kiel simbolaj statuoj de iliaj du filizofioj pri morto.

Ivan, la konfidato kun la cikatro kaj la lipharoj, eliris el la domo kiel kuglego kaj transkuris la razenejon al Valentin kiel hundo al sia mastro.

Lia plumbkolora vizaĝo estis vigla pro ekscito pri ĉi tiu hejma detektiva okazintaĵo kaj kun preskaŭ malagrabra avido li petis permeson de sia mastro, ekzameni la kadavran restaĵon.

"Jes, ekzameni se vi volas, Ivan," diris Valentin, "tamen rapidu. Ni devas eniri kaj esplori la tutan aferon en la domo."

Ivan levis la kapon, kaj poste preskaŭ defaligis ĝin.

"Kio," li elspasmis, "Estas . . . ne, ne estas, ne povas esti. Ĉu vi konas ĉi tiun viron, sinjoro?"

"Ne," diris Valentin indifere, "ni eniru."

Ili ambaŭ portis la kadavron, kuŝigis ĝin sur kanapon en la legoĉambro kaj poste ili ĉiuj iris en la salonon.

La detektivo sidiĝis ĉe skribtablo silente kaj eĉ hezite; sed lia okulo estis kiel la fera okulo de asiza juĝisto. Li skribis kelkajn notojn sur paperon antaŭ si kaj poste diris abruptaj vortoj. "Ĉu ĉiu ĉeestas?"

"Forestas sinjoro Brayne," diris la dukino de Sankta Mikela Monto, ĉirkaŭenrigardante.

"Ne," diris Lordo Galloway kun raŭka akra voĉo, "kaj ankaŭ sinjoro Neil O'Brien, mi kredas. Mi vidis tiun sinjoron marŝanta en la ĝardeno kiam la kadavro ankoraŭ estis varma."

"Ivan," diris la detektivo, "iru kaj venigu Komandanton O'Brien kaj sinjoron Brayne. S-ro Brayne, laŭ mia scio, estas en la manĝo-

ĉambro kaj finas la fumadon de cigaro; la Komandanto O'Brien mi kredas, estas tien kaj reen paŝanta en la vitra plantejo. Mi ne estas certa.”

La fidinda servisto malaperis el la ĉambro kaj antaŭ ol iu povis paroli aŭ ion fari Valentin daŭrigis kun neŝanĝita kaj kvazaŭ militista rapideco.

”Ĉiu scias, ke mortinto troviĝis en la ĝardeno, la kapo tute detranĉita de la korpo. D-ro Simon, vi ekzamenis ĝin. Ĉu vi opinias, ke granda forto estus bezonata tiel tranĉi la gorĝon? Aŭ eble nur tre akra tranĉilo?”

”Mi asertus, ke ne estus farebla per ja ajn tranĉilo,” diris la pala kuracisto.

”Ĉu vi havas ian koncepton,” daŭrigis Valentin, ”per kia ilo tio estus farebla?”

”Prikalkulinte modernajn eblecojn, mi ja ne povas diri,” diris la kuracisto, kurbigante la brovojn, ”trahaki kolon eĉ mallerte ne estas facile, kaj ĉi tiu kapo estas rekte kaj malfuŝe detranĉita. Estus farebla per batalhakilo aŭ per antikva ekzekutista hakilo aŭ per glavego.”

”Ho, Dio mia!” kriis la dukino, preskaŭ histerie, ”ne ekzistas iaj glavegoj aŭ bataliloj tie ĉi.”

Valentin estis ankoraŭ okupata pri la papero antaŭ li. ”Diru, nu,” li diris, ankoraŭ rapide skribante, ”ĉu tio estus farebla per longa franca kavaleria sabro?”

Mallaŭta frapeto aŭdiĝis ĉe la pordo, kiu pro ia neracia kialo koagulis ĉies sangon, kiel la frapado en Macbeth. Dum tiu glacia silento, prosperis al D-ro Simon diri ”Sablo . . . jes . . . per sabro eble... ”

”Dankon,” diris Valentin, ”Eniru, Ivan.”

La konfidinda Ivan malfermis la pordon kaj enkondukis Koman-

danton Neil O'Brien, kiun li fine estis trovinta denove paŝanta tien kaj tien ĉi en la ĝardeno.

La irlanda oficiro staris sur la sojlo kun senorda kaj spitema maniero. "Kion vi volas ĉe mi?" li kriis.

"Bonvolu sidiĝi," diris Valentin kun afabla kaj sentrema voĉo. "Kial vi ne portas vian sabron? Kie ĝi estas?"

"Mi lasis ĝin sur la biblioteka tablo," diris O'Brien kun plia irlanda akcento pro sia maltrankvila humoro. "Ĝi ĝenis min... ĝi fariĝis..."

"Ivan," diris Valentin, "bonvolu iri kaj alporti la sabron de la Komandanto el la biblioteko." Tiam, dum la servisto malaperis, Lordo Galloway asertas, ke li vidis vin eliranta el la ĝardeno antaŭ ol li ektrovis la kadavron. "Kion vi faris en la ĝardeno?"

La komandanto sin ĵetis senkonsidere en seĝon.

"Ho," li laŭte diris kun pura irlanda kartavo, "Admiris la lunon. Kunsentis naturon, knabo mia."

Pesebla silento profundigis kaj daŭris kaj ĉe ĝia fino aŭdiĝis denove tiu bagatela kaj terura frapeto. Ivan reaperis portante ŝtalan sensabran sabrington.

"Krome mi povis nenion trovi," li diris.

"Metu ĝin surtablen," diris Valentin, sen rigardi ĝin. Estis malhumana silento en la ĉambro, kiel tiu malhumana maro de silento kiu ĉirkaŭas ĵus kondamnitajn murdistojn. Jam antaŭ longe la malfortaj ekkrioj de la dukino malaŭdiĝis. La ŝvelinta malamo de Lordo Galloway estis satigita kaj eĉ sobrigita. La voĉo kiu ekparolis estis tute ne atendata.

"Eble mi povas klarigi," kriis Fraŭlino Margaret kun tiu klarsona tremanta voĉo per kiu kuraĝa virino enpublike parolas.

"Mi povas klarigi kion faris sinjoro O'Brien en la ĝardeno, ĉar li estas devigata silenti. Li petis, ke mi edziniĝu kun li. Mi rifuzis; mi

diris, ke pro miaj gepatroj mi povas doni al li nenion krom respekto. Pro tio li estis iomete kolera; ŝajne li ne tro estimis mian respekton. Mi scivolas,” ŝi aldonis kun iomete pala rideto, ”ĉu li nun iom ajn estimas ĝin. Ĉar nun mi montras ĝin al li. Mi ĵuras solene, ke li neniam faris ĉi tiun agon.”

Lordo Galloway moviĝadis ĝis sia filino kaj estis provanta timigi ŝin per voĉo, kiu laŭ lia kredo estas mallaŭta. ”Silentu... Manjo,” li diris per tondra frustrado. ”Kial vi ŝirmu ĉi tiun viron? Kie estas lia sabro? Kie lia malbenita kavaleria... ”

Li ĉesis paroli pro stranga rigardado kun kiu lia filino rigardis lin, rigardo kiu ja estis brila magneto por la tuta ĉeestantaro.

”Vi stultulo!” ŝi diris per mallaŭta voĉo sen ia ŝajnigo de pieco, ”Vi kredas, ke vi provas pruvi kion? Mi asertas, ke ĉu tiu viro estis senkulpa dum li estis kun mi. Sed se li ne estis senkulpa li estis ja kun mi. Se li murdis viron en la ĝardeno, kiu nepre vidis... kiu certe sciis? Ĉu vi tiom malamas Neil, ke vian propran filinon vi... ”

Lordino Galloway ekkriegis. La aliaj ĉiuj sidis tremante en si mem pro la tuŝo de tia tragedio kia jam antaŭe staris inter geamantoj. Ili vidis la fierajn palajn vizaĝojn de la skota aristokratino kaj de ŝia amanto la irlanda aventuristo, kiel antikvajn portretojn en maluma domo. La longdaŭra silento pleniĝis je senformaj historiaj memoroj pri murditaj edzoj kaj venenaj kromvirinoj.

Subite entrudis mezen de ĉi tiu malsana silento, senkulpa voĉo, dirante, ”Ĉu la cigaro do estis tre longa?”

La ŝanĝo estis tiom subita, ke oni devis ĉirkaŭenrigardi por eltrovi kiu parolis.

”Mi parolas pri—” diris Pastro Brown el la angulo de la ĉambro, ”Mi parolas pri tiu cigaro kies fumadon sinjoro Brayne ĵus finas. Ŝajnas esti tiom longa kiom marŝbastono.”

Malgraŭ la nerilateco de ĉi tiuj vortoj la vizaĝo de Valentin esprimis konsenton krom agacon, kiam li levis la kapon.

”Konsentite,” li abrupte diris, ”Ivan, vi iru denove por sinjoro Brayne kaj tuj venigu lin ĉi tien.”

Tuj kiam la ĉionfarulo fermis la pordon Valentin alparolis la knabinon kun tute nova seriozeco.

”Fraŭlino Margaret,” li diris, ”ni ĉiuj sentas, mi estas certa, kaj dankemecon kaj admiron pro via ago, ke vi superregis vian malpli indan dignecon kaj klarigis la konduton de la Komandanto. Sed tamen ekzistas manko. Mi kredas, ke Lordo Galloway renkontis vin dum vi iris de la lego-ĉambro al la salono, kaj ke nur kelkajn minutojn poste li trovis la ĝardenon kaj la Komandanton, kiu ankoraŭ marŝis tie.”

”Vi devas memori,” respondis Margaret, kun apenaŭ rimarkebla ironio en la voĉo, ”ke mi estis ĵus rifuzinta lin, tial ni povis apenaŭ reveni brakon en brako. Li estas sinjoreca... almenaŭ; kaj li restis iom da tempo en la ĝardeno... kaj tiel fariĝis akuzata pri murdo.”

”Dum tiuj kelkaj minutoj,” diris Valentin serioze, ”li vere povus...”

Denove ekaŭdiĝis la frapeto kaj Ivan entrudis sian cikattran vizaĝon.

”Pardonu, sinjoro,” li diris, ”sed sinjoro Brayne estas foririnta el la domo.”

”Foririnta,” kriis Valentin, kaj unuafoje stariĝis. ”Irinta. Forkurinta. Forvaporinta,” humorece respondis Ivan franclingve. ”Lia ĉapelo kaj surtuto estas ankaŭ malaperintaj, kaj mi rakontos ion pleje mirigan. Mi kuris eksteren por eltrovi iajn spurojn kaj mi ja trovis unu... tre grandan.”

”Kion vi volas diri?” demandis Valentin.

”Mi montros ĝin al vi,” diris la servisto kaj denove aperis kun

brilanta seninga kavaleria sabro, sange makulita ĉe la rando kaj pinto. Ĉiu en la ĉambro rigardadis ĝin kvazaŭ ĝi estas fulmaĵo; sed la sperta Ivan daŭrigis tute trankvile:

”Mi trovis ĉi tion,” li diris, ”forĵetita inter la arbustojn je kvindek paŝoj de ĉi tie sur la pariza vojo. Alivorte, mi trovis ĝin ĝuste tie, kien via respektinda sinjoro Brayne ĵetis ĝin dum li forkuris.”

Denove silentis, sed nun estis silento malsama ol antaŭe. Valentin prenis la sabron, ekzamenis ĝin, pensadis kun neŝajnigata atento kaj poste sin turnis al O’Brien montrante vizaĝon kiu esprimis plenan respekton. ”Komandanto,” li diris, ”Ni esperas, ke vi iam ajn aperigos ĉi tiun sabron, se la policanoj volos ekzameni ĝin. Dume,” li aldonis, reŝovante la ŝtalon en la sonorantan ingon, ”permesu, ke mi redonu al vi vian glavon.”

Pro la militista simboleco de la ago, la ĉeestantaro apenaŭ povis ne aplaŭdi.

Al Neil O’Brien, tiu gesto ja estis la komenco de nova vivo. Kiam li denove vagis en la misterplenan ĝardenon en la tagiĝaj koloroj, estis falinta de li la tragedia senefikeco de lia kutima maniero; li estis viro kun multaj kialoj por esti feliĉa. Lordo Galloway estis montrinta veran sinjorecon kaj estis petinta pardonon. Fraŭlino Margaret estis montrinta ion pli ol lordidinecon, almenaŭ virinecon, kaj eble estis doninta al li ion pli bonan ol bedaŭresprimon, dum ili vagis inter la malnovaj florbedoj antaŭ matenmanĝo. La tuta gastaro estis pli gaja kaj humana, ĉar kvankam ankoraŭ restis la enigmo pri la murdo, la peza suspektŝarĝo estis levita de ĉiu kaj estis forpelita al Parizo, fluganta post la stranga milionulo... viro, kiun ili apenaŭ konis. La diablo estis elpelita el la domo... estis sin elpelinta.

Tamen ankoraŭ restis la enigmo kaj kiam O’Brien sin ĵetis sur la benkon apud D-ro Simon, tiu vigla sciencemulo tuj daŭrigis la dis-

kutadon. Li ne multe da vortoj elĉerpis de O'Brien, kiu pripensis pli agrablajn aferojn.

"Mi ne povas diri, ke tio multe interesas min," diris la Irlanda-no malkaŝe, "precipe, ĉar ĉio jam vidiĝis sufiĉe klara. Ŝajnas, ke Brayne ial malamis ĉi tiun nekonatulon, allogis lin en la ĝardenon kaj mortigis lin per mia glavo. Poste li forkuris al la urbo, forĵetante la glavon survoje. Mi aŭdis de Ivan, ke la mortinto havis usonan dolaron en la poŝo, do li estis samlandano de Brayne, kaj tio ŝajne fiksas ĉion. Mi ne vidas iajn malfacilaĵojn pri la afero."

"Estas kvin kolosaj malfacilaĵoj," diris la kuracisto trankvile; "kiel altaj muroj unu interne de la alia. Ne miskompnu min. Mi ne dubas pri tio, ke Brayne faris tion; lia forflugo, mi kredas, pruvas tion. Sed kiel li ĝin faris? Unua malfacilaĵo: Kial viro murdus alian per granda peza sabro, konsiderite, ke li preskaŭ povus mortigi lin per poŝtranĉilo kaj poste remeti ĝin en sian poŝon? Dua malfacilaĵo: Kial estis neniam bruoj aŭ ekkrioj? Ĉu estas kutime ekvidi alian alkuranta kaj svinganta sabron kaj nenion diri? Tria malfacilaĵo: Servisto gvardis la antaŭan pordon dum la tuta vespero; eĉ rato ne povas eniri ie en la ĝardenon de Valentin. Kiel do la mortinto eniris en la ĝardenon? Kvara malfacilaĵo: Laŭ la samaj kondiĉoj, kiel Brayne eliris la ĝardeno?"

"Kaj la kvina?" demandis Neil, kies okuloj fikse rigardadis la anglan pastron, kiu malrapide alproksimiĝis laŭ la ĝardena vojeto.

"Kredeble tio estas nur malgravaĵo," diris la kuracisto, "sed mia opinio tre stranga; kiam mi unue ekvidis kiel la kapo estis tranĉita mi kredis, ke la murdinto donis pli ol unu frapegon. Tamen per ekzameno mi trovis multajn tranĉsignojn sur la tranĉita sekcio; alivorte oni frapis tie post la fortranĉo de la kapo. Ĉu Brayne tiom diable malamis sian kontraŭulon, ke li staris hakante ties korpon en la lunlumo?"

”Terure,” diris O’Brien kaj tremetis.

La malalta pastro, Brown, alvenis dum ili parolis kaj atendis kun karakteriza modesteco ĝis ili finis. Tiam li diris embarase.

”Nu, mi bedaŭras interrompi. Sed oni sendis min transdoni la novaĵon.”

”Novaĵon?” rediris Simon, kaj rigardadis kvazaŭ dolorplene tra siaj okulvitroj.

”Jes, mi tre bedaŭras,” diris Pastro Brown milde, ”okazis ankoraŭ unu murdo, vi sciu.”

Ambaŭ homoj sur la benko ekstaris, kaj lasis ĝin balanciĝanta.

”Kaj ion ankoraŭ pli stranga,” daŭrigis la pastro kun sia malbri-la okulo sur la rododendroj. ”Estas krimo de tiu sama naŭza speco; ankoraŭ unu dekapigo. Oni trovis la duan kapon elverŝanta sangon en la riveron, ĉe loko nun kelkajn paŝojn de tie ĉi, laŭ la alpaniza vojo kie Brayne forkuris; do, ili suspektas, ke. . . .”

”Granda ĉielo!” kriis O’Brien, ”ĉu Brayne estis monomaniulo?”

”Ekzistas usonaj vengadoj,” diris la pastro senpasie. Tuj poste li aldonis, ”Ili dezinas, ke vi iru al la biblioteka ĉambro por vidi ĝin.”

Komandanto O’Brien sekvis la aliajn al la enketo sentante en si mem ioman naŭzon. Kiel militisto li treege malamis ĉi tian kaŝitan buĉadon; kie do ĉesos ĉi tiu fantazia amputado? Unue unu kapo estas dehakata kaj poste alia; ĉi tiu okaze (li diris amarece al si mem) ne estas vere, ke du kapoj estas pli bonaj ol unu. Dum li trapasis la lego-ĉambron li preskaŭ ŝanĉeligis pro ŝoka koincido. Sur la tablo de Valentin kuŝis kolorita bildo de ankoraŭ tria sanganta kapo; kaj tio estis la kapo de Valentin mem. Per dua ekrigardo li konstatis, ke ĝi estas nur naciisma ĵurnalo nomita ”La Gilotino”, kiu montris ĉi-usemajne bildon de unu el siaj politikistaj kontraŭuloj kun la okuloj elstarantaj kaj la vizaĝo tordita, kvazaŭ ĵus ekzekutita; Valentin estis iomete eminenta kontraŭ-klerikismo. Tamen O’Brien estis

Irlandano kaj havis, eĉ pri siaj pekoj ian ĉastecon, kaj li ekkoleris kontraŭ tiu granda krueleco de la intelekto, kiu apartenas nur al la francoj. Li eksentis Parizon, kiel grandan estaĵon, de la groteskaĵoj sur la gotaj preĝejoj ĝis la maldelikataj karikaturaj en la ĵurnaloj. Li rememoris la kolosajn ŝercojn de la revolucio. Li ekvidis la urbon kiel aparta malbela energio, de la sanga skizo kuŝanta sur la tablo ĝis tie, kie super monto kaj arego da gargojloj, la granda diablo ri-dataĉas sur Notre-Dame.

La biblioteko estis longa, malalta kaj malluma ĉambro; kiom da lumo ĝi enhavis, penetris tra mallumigaj sunŝirmiloj kaj ankoraŭ havis iom da tagiĝa ruĝo. Valentin kaj lia servisto Ivan atendis ilin ĉe la pli alta flanko de longa kaj kliniĝa tablo, sur kiu kuŝis la homaj restaĵoj, ŝajne grandegaj en la krepuska lumo. La granda nigra figuro kaj flava vizaĝo de la viro trovita en la ĝardeno, kontraŭstaris ilin denove tiel same kiel antaŭe. La dua kapo, kiun oni eltiris tiun saman matenon el inter la riverherboj kuŝis malseke kaj gutante apud ĝi. La policanoj de Valentin estis ankoraŭ provantaj eltrovi la restaĵon de la dua kadavro, kiu supozeble estis ankoraŭ flosanta. Pastro Brown, kiu ŝajne neniel partoprenis la sentemecojn de O'Brien, alproksimiĝis al la dua kapo kaj ekzamenis ĝin kun sia palpebruma zorgo. Ĝi estis apenaŭ io ajn, krom skovelo el malseka, blanka haro, franĝita de arĝenta fajro en la ruga kaj horizonta tagiĝa lumo; la vizaĝo malbela, purpurigita kaj ŝajne krimula estis multe batita de ŝtonoj aŭ arboj dum ĝi floris tien kaj tien ĉi en la rivero.

”Bonan matenon, Komandanto O'Brien,” diris Valentin kun kvieteta afableco. ”Vi jam supozeble aŭdis pri la plej novaj buĉaj eksperimentoj de Brayne.”

Pastro Brown ankoraŭ kliniĝis super la blankhara kapo, kaj li diris, sen suprenrigardi:

”Mi supozas, ke estas certe, ke Brayne detranĉis ankaŭ ĉi tiun kapon.”

”Nu, estas prudente tian supozi,” diris Valentin, la manoj en la poŝoj, ”mortigita tiel same kiel la alia, trovita nur kelkajn paŝojn de la alia. Kaj hakita per tiu sama armilo, kiun ni scias, ke li forportis.”

”Jes, jes mi ja scias,” respondis Pastro Brown cedeme, ”tamen mi dubas, ĉu Brayne estus povinta detranĉi ĉi tiun kapon.”

”Kial ne?” demandis D-ro Simon kun racia rigardado.

”Nu, doktoro,” diris la pastro, palpebrume levante la okulojn, ”ĉu viro povas detranĉi sian propran kapon? Mi ne scias.”

O’Brien sentis sensencan universon disfalanta ĉrikaŭ li; la kura-cisto antaŭen saltis kun impulsa faremo kaj malantaŭen puŝis la malsekan blankan hararon.

”Ho, ne estas dubeble, ke estas Brayne,” diris la pastro kviete, ”Li havis tiun saman cikatron en la maldekstra orelo.”

La detektivo, kiu estis rigardanta la pastron per okuloj fiksaj kaj brilantaj, malfermis sian kunpremitan buŝon kaj diris akre, ”Ŝajne vi multe konis lin, Pastro Brown.”

”Vi pravas,” diris la malgranda viro simple. ”Mi kunestis kun li dum kelkaj semajnoj. Li pripensis aliĝon al nia eklezio.”

La stelo de fanatikulo eksaltis al la okuloj de Valentin; li paŝis al la pastro, la manoj kunpremitaj. ”Kaj eble,” li kriis kun velkiga rikano, ”eble li ankaŭ pripensis postlasi sian tutan monon por via eklezio.”

”Eble li intencis tion fari,” diris Brown flegme, ”povas esti.”

”Tiuokaze,” kriis Valentin kun terura rideto, ”vi eble multe scias pri li. Pri lia vivo, pri lia... .”

La Komandanto metis la manon sur la brakon de Valentin. ”Ĉesu

tian kalumnian sensencaĵon, Valentin,” li diris, ”se ne, eble ni havos sabrojn denove.”

Tamen Valentin sub la sentrema, humila rigardado de la pastro jam rekvietiĝis. ”Nu,” li diris abrupte, ”privatajn opiniojn ni forgesu. Vi, sinjoroj, estas ankoraŭ ligataj de via promeso resti tie ĉi; ĉiu plenumu ĝin por si mem... kaj unu devigu la alian. Ivan tie ĉi, diros al vi ion plu, se vi volos sciigi. Mi devas ion efektiviĝi kaj skribi al la instancoj. Ni ne plu povas kaŝi ĉi tion. Vi trovos min skribanta en la 1ego-ĉambro, se estos ankoraŭ pli da novaĵo.”

”Ĉu estas ankoraŭ novaĵo, Ivan?” demandis D-ro Simon dum la poliestro paŝis el la ĉambro.

”Nur unu detalo plu mi kredas, sinjoro,” diris Ivan sulkigante sian grizan maljunan vizaĝon. ”Sed tio ankaŭ estas iel grava. Pri tiu maljuna aĉulo kiun ni trovis en la ĝardeno,” kaj li indikis sen ŝajnigo de respekto la grandan nigran kadavron kun la flava kapo. ”Ni eltrovis kiu li estas.”

”Efektive!” kriis la mirigita kunacisto, ”kaj kiu estas li?”

”Ties nomo estis Arnold Becker,” diris la subdetektivo, ”kvankam li havis multajn alinomojn. Li estis ia vaganta fripono kaj ni scias, ke li estis iam en Usono; do tiel li fariĝis kontraŭulo de Brayne. Ni mem ne multe rilatis kun li ĉar li precipe laboris en Germanujo. Ni komuniĝis kompreneble kun la germana policaro. Tamen estas sufiĉe stranga afero; li havis ĝemelan fraton nomita Louis Becker kun kiu ni multe rilatis. Fakte ni devis gilotini lin hieraŭ. Nu, stranga afero, sinjoroj, sed kiam mi ekvidis tiun kunulon sternita sur la razenejo mi havis la plej fortan ŝokon el mia tuta vivo. Se mi ne estus vidinta Louis Becker’n gilotinata per miaj propraj okuloj, mi ĵurus, ke estas Louis Becker mem kuŝanta en la herbo. Tiam kompreneble mi rememoris pri lia ĝemela frato en Germanujo, kaj sekvante la spuron... ”

La klariganta Ivan ĉesis paroli, pro la sufiĉe bona kialo, ke neniu aŭskultis kion li diris. La Komandanto kaj la kuracisto ambaŭ rigardadis Pastron Brown, kiu ekstaris rigide kaj kunpremis la manojn plenforte sur siajn tempiojn, kiel homo kiu sentas subitan doloron.

”Ĉesu, ĉesu,” li kriis, ”Ĉesu paroli unu momenton, ĉar mi duone vidas. Ĉu Dio donos forton? Ĉu mia cerbo faros la salton ĉion vidi? Ĉielo helpu min. Jam mi bone elpensis. Mi povis iam parafrazi paĝon el Akvino. Ĉu mia kapo disfendiĝos... aŭ ĉu ekvidos. Mi duone komprenas, mi nun duone komprenas.”

Li kovris sian kapon per la manoj kaj staris en ia rigida turmento de pensado aŭ preĝado, dum la tri aliaj povis nenion fari krom rigardadi ĉi tiun plej novan montraĵon el ilia tumulta nokto.

Kiam la manoj de Pastro Brown defalis, montriĝis vizaĝo tute freŝa kaj serioza, kvazaŭ infana. Li peze suspiris kaj diris, ”Ni finu kaj elklarigu ĉi tion kiel eble plej baldaŭ. Jen ĉi tiel mi povos konvinki ĉiun pri la veno.” Li sin turnis al la kuracisto.

”D-ro Simon,” li diris, ”vi havas kleran kapon, mi aŭdis vin hodiaŭ matene faranta la kvin plej malfacilajn demandojn pri ĉi tiu afero. Nu, faru ilin denove kaj mi donos la respondojn.”

La okulvitroj de Simon defalis de lia nazo pro dubo kaj ekmiro, tamen li tuj respondis.

”La unua demando do estas, kial viro mortigus alian per fuŝa sabro kiam li povus mortigi lin per trikilo?”

”Oni ne povas senkapigi iun per trikilo,” diris Brown kviete, ”kaj por ĉi tiu murdo senkapigo estis absolute necesa.”

”Kial?” demandis O’Brien interesita.

”Kaj la dua demando?” demandis Pastro Brown.

”Kial do la viro ne ekkriis?” demandis la kuracisto, ”sabroj estas certe nekutimaj en ĝardenoj.”

”Branĉetoj,” diris la pastro malgaje kaj sin turnis al la fenestro kiu alrigardis la mortscenejon. ”Neniu rimarkis la signifon de tiuj branĉetoj. Kial ili kuŝu sur tiu razenejo (rigardu ĝin) tiom malproksime de ĉiu arbo? Ili ne estis derompitaj; ili estis detranĉitaj. La murdonto amuzis sian malamikon per kelkaj sabraj lertaĵoj, montrante kiel li povas tratanĉi branĉeton mezaere aŭ ion tian. Tiam, dum lia malamiko malsuprenkliniĝis por vidi la rezulton senbruan tranĉegon kaj la kapo falis.”

”Nu,” diris la kuracisto malrapide, ”tio estas sufiĉe kredebla. Sed la du venontaj demandoj silentigos iun ajn.”

La pastro ankoraŭ staris ĉe la fenestro kritikeme rigardante en la ĝardenon, kaj atendis.

”Vi scias kiel la ĝardeno estis tute ĉirkaŭita kaj apartigita kiel hermetika ĉambro de la ekstera mondo,” daŭrigis la kuracisto. ”Nu, kiel la fremdulo eniris la ĝardenon?”

Sen ĉirkaŭenturni la malgranda pastro respondis, ”Neniam estis ia ajn fremdulo en la ĝardeno.”

Silentis, kaj tiam subita kiukado de preskaŭ infana ridado forigis la ŝarĝon. La absurdeco de tio, kion Pastro Brown diris elvokis de Ivan nekaŝitan mokridon.

”Ho!” li kriis, ”ni ne entiris de la ĝardeno do grandan grasan kadavron kaj metis ĝin sur la kanapon hieraŭ vespere? Li ne eniris la ĝardenon, kompreneble.”

”Eniris la ĝardenon?” rediris Brown penseme, ”ne, ne tute.”

”Peston!” kriis Simon. ”Viro aŭ eniras aŭ ne eniras.”

”Ne necese,” diris la pastro kun apenaŭ rimarkebla rideto, ”Kiu demando sekvas, doktoro?”

”Mi kredas, ke vi malsanas,” akre diris D-ro Simon, ”tamen se plaĉos al vi mi faros la aliajn demandojn. Kiel Brayne eliris el la ĝardeno?”

”Li ne eliris el la ĝardeno,” diris la pastro ankoraŭ rigardante tra la fenestro.

”Ne eliris la ĝardenon?” eksplodis Simon.

”Ne tute,” diris Pastro Brown.

Simon svingis la pugnoj en furiozo de franca logiko. ”Viro aŭ eliris ĝardenon aŭ ne eliras ĝin,” li kriis.

”Ne ĉiam,” diris Pastro Brown.

D-ro Simon ekstaris senpacience. ”Mi ne havas sufiĉe da tempo por tiaj sensencaĵoj,” li kriis kolere. ”Se vi ne povas kompreni, ke viro aŭ estas ĉe unu flanko de muro aŭ ĉe la alia, mi ne plu ĝenos vin.”

”Doktoro,” diris la klerikulo tre milde, ”ni ĉiam tre amike interkonsentis. Se nur pro pasinta amikeco, restu, mi petas, kaj faru vian kvinan demandon al mi.”

La senpacienca Simon malleviĝis en apud-pordan seĝon kaj diris sen troaj vortoj, ”La kapo kaj ŝultroj estis strange hakitaj. Ŝajne tio estis farita postmorte.”

”Jes,” diris la senmova pastro. ”Tio estis farita por ke vi supozu ĝuste tiun simplan malveraĵon kiun vi ja supozis. Tio estis farita por ke vi supozu, kiel memevidente, ke la kapo apartenas al la korpo.”

La limo de la intelekto, kie kreiĝis ĉiuj monstroj, ekvivis terure en la gaela O’Brien. Li sentis la ĥaosan ĉeeston de ĉiuj ĉeval-viroj kaj fiŝ-virinoj, kiujn naskis la nenatura imago de homoj. Voĉo, pli antikva ol liaj praavoj, ŝajne ne diradis en lian orelon; ”Ne eniru en la montran ĝardenon kie kreskas la arbo kun duobla frukto. Gardu vin kontraŭ la malbenita ĝardeno kie mortis la viro kun du kapoj.” Tamen, dum ĉi tiuj hontindaj simbolaj formoj transpasis la antikvan spegulon de lia irlanda animo, lia francigita intelekto estis tute vigla kaj li observis la strangan pastron tiel atente kaj nekredeme kiel la aliaj.

Pastro Brown estis sin fine ĉirkaŭenturninta kaj staris ĉe la fenestro, la viazaĝo en mallumaj ombroj, sed eĉ en tiu ombro ili povis vidi, ke ĝi estas pala kiel cindroj. Tamen li parolis tute prudente, kvazaŭ ne ekzistas subĉiele iaj gaelaj animoj.

”Sinjoroj,” li diris, ”vi ne ektrovis la nekonatan korpon de Becker en la ĝardeno. Vi ne trovis ian nekonatan korpon en la ĝardeno. Spite de la raciismo de D-ro Simon, mi asertas ankoraŭ ke Becker nur parte ĉeestis. Rigardu ĉi tien (montrante la nigran grandecon de la mistera kadavro), vi neniam vidis tiun viron. Ĉu vi iam vidis ĉi tiun viron?”

Li rapide forrulis la kalvan flavan kapon de la nekonatulo kaj anstataŭis ĝin per la blankhara kapo apud ĝi, kaj tie, kompleta, unuigita, senduba, kuŝis Julius K. Brayne.

”La murdisto,” daŭrigis Brown mallaŭte, ”dehakis la kapon de sia malamiko kaj ĵetis la sabron for trans la muron. Sed tiu estis tro lerta por transĵeti nur la sabron. Li ĵetis la kapon ankaŭ trans la muron. Tiam necesis nur almeti alian kapon al la kadavro kaj (ĉar li postulis privatan enketon) vi ĉiuj imagis tute novan viron.”

”Almeti alian kapon?” diris O’Brien rigardegante, ”Kiun alian kapon? Kapoj ne kreskas sur ĝardenaj arboj, ĉu?”

”Ne,” diris Pastro Brown raŭke kaj alrigardante siajn botojn, ”estas nur unu loko kie ili kreskas. Ili kreskas en la gilotina korbo, apud kiu la Policestro Aristide Valentin staris unu horon antaŭ la murdo. Ho, miaj amikoj aŭskultu min ankoraŭ iomete antaŭ ol vi disŝiros min. Valentin estas honestulo, se honesteco konsistas el frenezeco pro porargumentebla ideo. Ĉu vi do neniam rimarkis en tiu malvarma griza okulo lia, ke li estas freneza? Li ion, ion ajn farus por venkobati tion, kion li nomas ‘la superstiĉon de la Kruco’. Li batalis por ĝi, kaj malsatiĝis por ĝi, kaj nun li murdis por ĝi. La frenezaj milionoj de Brayne estas ĝisnune disdonitaj inter tiom da

sektoj, ke ili apenaŭ ŝanĝis ion. Sed Valentin ekaŭdis flustradon, ke Brayne, kiel tiom multe da facilmensaj skeptikuloj, estas flosanta al ni; kaj tio estis tute malsama afero. Brayne enverŝus nutraĵon en la malriĉiĝintan kaj bataleman Eklezion de Francujo; li subtenus ses naciismajn ĵurnalojn simile al La Gilotino. La batalo estis jam ekvilibra kaj ĵus turniĝonta kaj la fanatikulo ekflamis pro la risko. Li decidis detrui la milionulon, kaj li faris tion kiel oni supozus, ke la plej eminenta detektivo farus sian solan krimon. Li forportis la dehakitan kapon de Becker je ia krimstuda preteksto kaj hejmen portis ĝin en sia oficiala skatolo. Li havis tiun lastan argumenton kun Brayne, kies finon Lordo Galloway ne aŭdis; ĝi malsukcesis; li elkondukis lin en la seneliran ĝardenon, parolis pri sabrolerteco, uzis branĉetojn kaj sabron por montri... kaj... .”

Ivan la Cikatra ekstaris, ”Vi frenezulo,” li kriegis; ”Vi iros nun al mia mastro, eĉ se mi tiros vin je... .”

”Nu, kompreneble mi estas nun tien irona,” diris Brown pezege, ”Mi devas peti konfeson kaj tiel plu.”

Pelante la malfeliĉan Brown antaŭ ili kiel oferaĵon aŭ kaptiton, ili kune enkuris en la subitan silenton de la lego-ĉambro de Valentin.

La fama detektivo sidis ĉe sia skribotablo, ŝajne tro okupata por aŭdi ilian tumultan entrudon. Ili hezitis momenton kaj tiam, io pri la aspekto de tiu rekta kaj eleganta dorso igis la kuraciston antaŭen kuri. Palpo kaj ekrigardeto montris al li, ke estas pilola skatoleteto ĉe la kubuto de Valentin, kaj ke Valentin estas senviva en sia seĝo; kaj sur la blinda vizaĝo de la sinmortiginto estis fiereco pli granda ol tiu de Katono.

LA STRANGAJ PIEDOJ

Se vi renkontus anon de tiu tre elita klubo, "La Dek Du Veraj Fiŝkaptistoj" eniranta la Vernon Hotelon por la ĉiujara kluba festeno, vi rimarkus, dum li demetas sian surtuton, ke lia frako estas verda, kaj ne nigra. Se (okaze ke vi havus sufiĉe da stelspita aŭdacco por alparoli tian homon) vi demandus al li la kialon, kredeble li respondus, ke li tion faras por ke oni ne erare kredu lin kelnero. Subpremite vi retirus vin. Sed vi lasus post vi misteron ankoraŭ ne solvitan kaj rakonton bone rakontindan.

Se (sekvante tian nekredeblan konjekton) vi renkontus iun mildan, laboreman kaj malgrandan pastron nomita Pastro Brown, kaj demandus al li, kion li opinias esti la plej elstaranta bonŝanco en lia vivo, li kredeble respondus, ke ĉio konsiderite, lia plej bona ŝanco okazis en la Vernon Hotelo, kie li malebligis krimon kaj eble savis animon, nur per aŭskultado al kelkaj piedfrapoj en koridoro. Li eble estus iomete fiera pri ĉi tiu senkonsidera kaj miriga ekdiveno sia, kaj li eble preparolus ĝin. Tamen, ĉar estas nemezureble malkredebla, ke vi iam sufiĉe levigōs en la sociala mondo por atingi al "La Dek Du Veraj Fiŝkaptistoj" aŭ, ke vi iam sufiĉe profundiĝōs inter la domaĉojn kaj krimulojn por atingi al Pastro Brown, mi timas, ke vi neniam aŭdos ĝin, se vi ne aŭdos ĝin de mi.

La Vernon Hotelo, en kiu la Dek Du Veraj Fiŝkaptistoj okazigis siajn ĉiujarajn festenojn, estis institucio kia nur povas ekzisti en oligarkia socio, kiu estas preskaŭ freneziginta pri ĝentila konduto. Ĝi estis tiu renversita estaĵo—"ekskluziva" komerca entrepreno. Tio

signifas, ke ĝi estis entrepreno kiu gajnas monon, forpelante homojn. Meze de plutokratio, komercistoj estas tiom ruzaj, ke ili fariĝas pli elektemaj ol siaj klientoj. Ili efektive kreas malfacilaĵojn, por ke iliaj riĉaj kaj lacaj klientoj elspezu monon kaj diplomatecon por venki ilin. Se ekzistus laŭmoda hotelo en Londono, eniro en kiun estus malpermesata al ĉiu, kiu ne estas almenaŭ ses futojn alta, la laŭmodanaj kiel ŝafaro farus arojn el sesfutuloj por manĝi en ĝi. Se ekzistus altpreza restoracio, kiu pro nura kaprico de la posedanto malfermiĝus nur ĵaŭdon posttagmeze, ĝi estus homplena ĉiujn ĵaŭdan posttagmezon. La Vernon Hotelo staris, kvazaŭ hazarde, ĉe angulo de placo en Belgravia. Ĝi estis malgranda hotelo; kaj tre maloportuna. Sed tiu sama maloportuneco estis konsiderata kiel muro, defendanta apartan klason. Unu apartan maloportunaĵon oni taksis esti de la pleja graveco; tio estis, ke nur preskaŭ dudek kvar homoj povis samtempe tie manĝi. La sola granda vespermanĝa tablo estis la famkonata terasa tablo, kiu staris subĉiele sur iu verando alrigardanta unu el la plej ravaj el la antikvaj ĝardenoj en Londono. Tiel okazis, ke eĉ la dudek kvar seĝoj ĉe ĉi tiu tablo estis ĝueblaj nur dum la varma vetero; kaj ĉi tiu fakto, dum ĝi plimalfaciligis la ĝuadon igis ĝin samtempe ankoraŭ pli dezirinda. La tiutempa posedanto de la hotelo estis judo nomita Lever, kaj li gajnis preskaŭ milionon el ĝi, plimalfaciligante la eniron. Kompreneble li kombinis kun ĉi tiu limigo pri la amplekso de sia entrepreno la plej zorgeman rafinitecon pri ĝia funkciado. La vinoj kaj kuirado estis vere tiel bonaj kiel ie ajn en Eŭropo, kaj la sinteno de la servistoj ĝuste respegulis la fiksitajn humoron de la plej altgradaj anglaj klasoj. La posedanto konis ĉiujn siajn kelnerojn kiel la fingrojn de sia mano; entute estis nur dek kvin. Estis multe pli facile fariĝi membro de Parlamento ol fariĝi kelnero en tiu hotelo. Ĉiu kelnero estis dresita ĝis terura silento kaj senbrueco, kvazaŭ li estus servisto de

grandsinjoro. Kaj efektive estis kutime almenaŭ unu kelnero por ĉiu vespermanĝanta sinjoro.

La klubo de La Dek Du Veraj Fiŝkaptistoj ne konsentus ie vespermanĝi krom en tia loko, ĉar ĝi postulis luksan privatecon kaj estus vere maltrankviligita de la nura ekpenso, ke alia klubo eĉ vespermanĝus en la sama konstruaĵo. Okaze de sia ĉiujara vespermanĝo la Fiŝkaptistoj kutimis elmontri ĉiujn siajn trezorojn, kvazaŭ ili estus en privata domo, precipe la famkonatan aron da tranĉiloj kaj forkoj por fiŝmanĝado, kiu estis kvazaŭ la insignoj de la asocio, estinte rave faritaj el arĝento al la formo de fiŝo, kaj ĉiu portis sur la tenilo unu grandan pezan perlon. Ĉi tiuj estis ĉiam elmontritaj por la fiŝservico kaj la fiŝservico estis ĉiam la plej grandioza el tiu grandioza manĝo. La asocio havis grandegan nombron da ceremonioj kaj moroj, tamen ĝi havis nenian historion kaj nenian celon; pro tio ĝi estis tiel tre aristokrata. Ne necesis esti speciala viro por fariĝi unu el la Dek Du Fiŝkaptistoj; krom se oni jam estus viro de iu speco oni neniam eĉ estus priaŭdinta ilin. Ĝi jam ekzistis dek du jarojn. Ĝia Prezidanto estis sinjoro Audley. Ĝia Vicprezidanto estis la Duko de Chester.

Se mi iel sukcesis esprimi la etoson de ĉi tiu terura hotelo, povas esti, ke la leganto sentas naturan miron pri kiel okazis, ke mi scias ion ajn pri ĝi, kaj eble eĉ konjektus pri la maniero per kiu tia ordinara homo kia mia amiko Pastro Brown sin trovis en tiu orumita kuirejo. Rilate al tio mia rakonto estas simpla, eĉ vulgara. Estas en ĉi tiu mondo tre antikva tumultemulo kaj demagogo, kiu eniras perforte en la plej aristokratajn rifuĝejojn, portante la terurigan informon, ke ĉiuj homoj estas fratoj; kaj kien ajn iris tiu egaliganto sur sia pala ĉevalo, estis la metio de Pastro Brown lin sekvi. Unu el la kelneroj, italo, estis frapita tiun posttagmezon de paraliza atako kaj lia juda mastro, milde mirigita de tia superstiĉo, estis permes-

inta, ke oni alvoku la plej proksiman papisman pastron. Tio, kion la kelnero konfesis al Pastro Brown ne estas nia afero, pro la bonega kialo, ke la klerikulo silentis pri ĝi al ĉiu; tamen tio ŝajne igis lin skribi noton aŭ deklaron por transdoni iun informon aŭ rebonigi iun maljustecon. Tial, Pastro Brown, kun milda impertineco, kian li tiel same montrus eĉ en Buckingham Palaco, petis, ke oni donu al li ĉambron kaj skribilojn. S-ro Lever estis disŝirata en si mem. Li estis bonkora viro kaj havis ankaŭ tiun malbonan imitaĵon de bonkoreco,—malamon al ĉia maloportunaĵo aŭ embarasiga sceno. Samtempe la ĉeesto de tiu fremdulo en lia hotelo estis kiel malpuraĵo sur io ĵus purigita. Neniam estis ia interlimo aŭ antaŭ-ĉambro en la Vernon Hotelo, neniuj atendante en la vestiblo, neniuj klientoj hazarde envenintaj. Estis dek kvin kelneroj. Estis dek du gastoj. Ektrovi novan gaston estus tiel miriga kiel ektrovi novan fraton matenaŭ te-manĝantan kun via propra familio. Plue, la aspekto de la pastro estis duagrada kaj liaj vestaĵoj per koto makulitaj; nura ekvido al li en la malproksimo eble kaŭzus krizon en la klubo. S-ro Lever fine elpensis planon por kaŝi la malhonoron, ĉar li ne povis tute forigi ĝin. Kiam vi eniras (kion vi neniam faros) la Vernon Hotelon, vi trapasas mallongan koridoron, ornamitan de kelkaj malbrilaj kvankam gravaj pentraĵoj, kaj tiam vi atingas la ĉefan vestiblon kaj ripozejon, je la dekstra flanko de kiu troviĝas koridoroj kondukantaj al la publikaj ĉambroj, kaj maldekstre koridoroj al la kuirejoj kaj servĉambroj de la hotelo. Tuj maldekstre estas la angulo de vitra kabineto kiu entrudas sin en la vestiblon—kvazaŭ domo en domo, kiel la antikva hotela bufedo, kiu eble iam tie staris.

En ĉi tiu kabineto sidis la reprezentanto de la posedanto (neniu en ĉi tiu ejo iam persone aperis, se li povis tion eviti) kaj iomete laŭ la koridoro al la servistaj ĉambroj troviĝis la sinjora vestejo, la lasta limo de la sinjora regno. Tamen inter la kabineto kaj la vestejo

estis malgranda privata ĉambro sen alia elirejo, iafoje uzita de la posedanto por delikataj aŭ gravaj aferoj, kiaj la pruntedono al duko mil funtojn aŭ la rifuzo pruntedoni al li ses pencojn. Estas signo de la grandioza toleremeco de sinjoro Lever, ke li permesis, ke ĉi tiu sanktejo estu profanata dum pli ol duonhoro de nura pastro skribanta sur paperfolion. La rakonto, kiun Pastro Brown skribis, estis kredeble pli bona rakonto ol ĉi tiu, tamen oni neniam scios ĝin. Mi povas nur diri, ke ĝi estis preskaŭ tiom longa, kaj, ke ĝiaj du aŭ tri lastaj paragrafoj estis la malpli ekscitaj kaj atentigaj.

Ĉar estis kiam li atingis ĉi tiujn, ke la pastro komencis iomete lasi erarvagi siajn pensojn kaj lasi vekigi sian bestan konscion, kiu estis kutime vigla. La horo de mallumiĝo kaj de vespermanĝo proksimiĝis; lia propra ĉambreto estis sen lampo kaj eble la kreskanta krepusko, kiel kelkfoje okazas, plivigliĝis la aŭdadon. Dum Pastro Brown skribis la finan kaj malpli gravan parton de sia dokumento, li ektrovis, ke li skribas laŭ la ritmo de ripetata brueto de ekstere, same kiel oni iafoje pensadas laŭ la ritmo de fervoja vagonaro. Kiam li konsciiĝis pri tio, li ektrovis tion, kio ĝi estis; nur la ordinara frapetado de piedoj pasantaj preter la pordo, kio en hotelo estas nenia nekutima afero. Tamen, li rigardadis la mallumiĝantan plafonon kaj aŭskultadis la sonon. Aŭskultinte reve dum kelkaj sekundoj, li ekstaris kaj atente aŭskultis, la kapo iomete flanken klinita. Tiam li denove sidiĝis kaj kovris la kapon per siaj manoj, nuntempe ne nur aŭskultanta sed ankaŭ pensanta.

Ekstere la piedfrapoj, je ia ajn aparta momento estis tiaj, kiajn oni atendus aŭdi en ia ajn hotelo; tamen entute ili enhavis ion strangan. Krome ne aŭdiĝis aliaj piedfrapoj. Ĝi estis ĉiam tre silenta domo, ĉar la kelkaj konataj gastoj iris tuj al siaj propraj ĉambroj kaj la bone dresitaj kelneroj estis instruitaj, ke ili estu preskaŭ nevideblaj ĝis ili estos bezonataj. Oni ne povus imagi lokon, kie oni povus

havi pli malgrandan kaŭzon por suspekti ion nekutiman. Tamen ĉi tiuj piedfrapoj estis tiel strangaj, ke oni ne povis certiĝi pri ili, ĉu ili estas kutimaj aŭ nekutimaj. Pastro Brown imitis ilin per fingro sur la tabla rando, kiel homo kiu provas lerni arion sur la fortepiano.

Unue ekaŭdiĝis longa fluo da rapidaj frapetoj, kiajn farus malpeza viro gajnanta marŝkonkurson. Ĉe iu loko ili ĉesis kaj fariĝis ia malrapida svinganta batado, enhavanta malpli ol kvarono de la paŝoj sed daŭranta proksimume tiom da tempo kiom antaŭe. Tuj kiam la fina eĥanta bato mallaŭtiĝis for, denove ekaŭdiĝis la kurado aŭ ondetado de malpezaj kurantaj piedoj kaj tiam denove la falbruo de la pli peza marŝado. Estis sendube la samaj du botoj, parte pro tio (kiel ĵus dirita), ke krome estis neniamaj sonoj en la domo, kaj parte pro tio, ke ili havis malgrandan tamen karakterizan knareton. Pastro Brown havis tian kapon, kia ne povas ne fari demandojn; kaj pro ĉi tiu ŝajne malgranda demando lia kapo preskaŭ disfendiĝis. Li estis vidinta homojn kurantaj por eksalti. Li estis vidinta homojn kurantaj por gliti. Sed pro kia subĉiela kialo kurus homo por marŝi? Aŭ alie, kial li marŝus por kuri? Tamen neniam alia priskribo sufiĉus por la groteskaj movoj de ĉi tiu paro da nevideblaj kruroj. La viro aŭ marŝis tre rapide tra la unua duono de la koridoro por marŝi tre malrapide tra la dua duono; aŭ li marŝis tre malrapide tra unu parto por ĝui la raven de rapida marŝado en la alia parto. Nek unu solvo nek la alia ŝajnis esti tro sagaca. Lia cerbo pli kaj pli mallumiĝis kiel ankaŭ lia ĉambro.

Tamen dum li komencis atente pensadi, ĝuste la mallumo mem de lia karcero ŝajne plivigliĝis liajn pensojn; li komencis vidi kvazaŭ en vizio la fantaziajn piedojn kapriolantaj laŭlonge de la koridoro en nenaturaj aŭ simbolaj pozoj. Ĉu estas pagana religia danco? Aŭ ĉu iu tute nova speco de scienca ekzerco? Pastro Brown komencis demandi al si mem pli precize kion la paŝoj sugestas. Pri la malra-

pida paŝado unue; certe ne estas la piedfrapoj de la posedanto. Viroj tiaj marŝas kun rapidaj paŝoj kiel anaso aŭ ili restas sidantaj. Ne povis esti iu ajn servisto aŭ komisiisto, atendanta ordonojn. Ne tiel sonis. Anoj de la pli malriĉaj gradoj (en oligarkio) kelkfoje ŝanceliĝas tien kaj tien ĉi kiam ili estas iomete ebriaj, sed kutime, kaj plej ofte en tiaj grandiozaj scenoj, ili staras aŭ sidas kun embarasitaj pozoj. Ne; tiu peza tamen pesaltema piedfrapado, kun ia senzorga emfazo, ne aparte bruema tamen ne ĝenata pri kiom da bruoj ĝi kaŭzas, apartenas al nur unu el la bestoj de ĉi tiu mondo. Estas grandsinjoro el okcidenta Eŭropo kaj kredeble unu tia, kia estas neniam laborinta por gajni siajn vivrimedojn.

Ĝuste kiam li atingis ĉi tiun solidan certecon, la frapado fariĝis pli rapida kaj kuris preter la pordo febre kiel rato. La aŭskultanto rimarkis, ke, kvankam ĉi tiu frapado estas multe pli rapida, tamen ĝi estas multe pli senbrua, preskaŭ kvazaŭ la viro iras piedpinte. Tamen tio ne estis kunligita en lia cerbo kun sekreteco, sed kun io alia—io kion li ne povis rememori.

Li estis furiozigitata de unu el tiuj duonrememoroj, kiuj devigas homon senti en si mem, ke li estas duonfreneza. Sendube li iam antaŭe aŭdis tiun strangan, rapidan marŝadon. Subite li ekstaris kun nova ideo kaj paŝis al la pordo. Lia ĉambro havis neniun elirejon en la koridoron, sed unuflanke estis pordo en la vitran kabineton kaj aliflanke en la vestejon. Li provis malfermi la pordon en la kabineton kaj trovis, ke ĝi estas ŝlosita. Li rigardis la fenestron, nun kvadrata panelo plena de purpuraj nuboj disfenditaj de sunsubira lumo, kaj momente li ekflaris malbonon kiel hundo ekflaras ratojn.

Lia racia fako (estu ĝi la pli saĝa aŭ ne) denove superregis lin. Li rememoris, ke la posedanto estas dirinta, ke li ŝlosos la pordon kaj, ke li revenos pli poste por ellasi lin. Li diris al si mem, ke dudek aĝoj, kiujn li ne prikalkulis, povas klarigi la strangajn bruojn ekstere; li

atentigis al si, ke ankoraŭ restas sufiĉe da lumo por fini sian propran laboron. Portinte sian paperon al la fenestro por kapti la finan ŝtorman vesperlumon, li agemece profundigis en la preskaŭ finitan kronikon. Li estis skribinta preskaŭ dudek minutojn, sin kurbigante pli kaj pli super sia papero en la mortanta lumo; tiam li subite ek-sidis rekte. Li estis denove ekaŭdinta la strangajn piedojn.

Ĉi foje ili havis trian strangecon. Antaŭ la nekonatulo marŝis malpeze kaj kun fulma rapideco, tamen li marŝis. Ĉi foje li kuris. Oni povis aŭdi la rapidegajn, mallaŭtajn, saltantajn piedojn alproksimiĝantaj laŭ la koridoro kiel la pied-kusenetoj de forkuranta kaj eksaltanta pantero. Kiu ajn estu venanta, li estas forta kaj aktiva viro, trankvila, tamen urĝe ekscitita. Tamen, kiam la bruo estis rapideginta ĝis la kabineto kiel ia fluŝtranta ventokirlo, ĝi subite fariĝis denove, la antaŭa, malrapida, swingiĝanta frapado.

Pastro Brown malsuprenĵetis sian paperon kaj sciante, ke la kabina pordo estas ŝlosita li tuj eniris la vestejon aliflanke. La servisto de ĉi tiu ejo portempe forestis, kredeble ĉar la solaj gastoj estis vespermanĝantaj, kaj ĉar lia ofico estis sinekuro. Palpirinte tra griza arbaro el surtutoj, li ektrovis, ke la malluma vestejo malfermiĝas al la hela koridoro tra ia servtablo aŭ duon-pordo, simile al plej multe el la tabuloj trans kiujn ni ĉiuj transdonas ombrelojn kaj ricevas biletojn. Estis lampo tuj super la duoncirkla arkaĵo de ĉi tiu aper-turo. Ĝi ne multe ĵetis lumon sur Pastron Brown mem, kiu nur aspektis kiel malhela konturo kontraŭ la malbrila sunsubira fenestro malantaŭ li. Tamen ĝi ĵetis kvazaŭ teatran lumon sur la viron, kiu staris ekster la vestejo en la koridoro.

Tiu estis eleganta viro, vestita en simpla vespervestaĵo; alta, sed kun mieno tia, ke li ŝajne ne okupas multe da spaco; oni sentis, ke li povus glitiri kiel ombro, kiam multaj malpligrandaj viroj estus elstarantaj aŭ obstrukcaj. La vizaĝo, tiam malantaŭenĵetita en la

lamplumon, estis nigreta kaj vivplena, la vizaĝo de alilandulo. Lia talio estis bona, lia konduto bonhumora kaj memfida; kritikemulo povus nur diri, ke lia nigra jako estas iomete neinda je lia talio kaj sinteno, kaj ĝi ŝveletis kaj dekurbetis je stranga maniero. Tuj kiam li ekvidis la nigran silueton de Brown kontraŭ la sunsubiro, li deĵetis peceton de papero kun ciferoj kaj laŭte diris kun bonhumora aŭtoritato: "Mi volas havi miajn ĉapelon kaj surtuton, se plaĉas al vi; mi ektrovis, ke mi devas tuj foriri."

Pastro Brown prenis la paperon senvorte kaj obeeme iris serĉi la surtuton; tio ne estis la unua servista laboro de lia vivo. Li alportis ĝin kaj kuŝigis ĝin sur la tabulon; dume la fremda sinjoro, kiu estis palpanta en sia veŝtpoŝo, diris ridante.

"Mi ne havas arĝenton; vi havu ĉi tion," kaj li deĵetis oran moneiron, kaj ekprenis sian surtuton.

La figuro de Pastro Brown restis tute malluma kaj senmova sed en tiu momento li perdis la kapon. Lia kapo estis ĉiam plej valora kiam li estis perdinta ĝin. En tiaj momentoj li adiciis du al du kaj la rezulto estis kvar milionoj. Ofte la katolika eklezio (kiu estas kunligata al prudenteco) ne aprobis tion. Ofte li mem ne aprobis tion. Tamen ĝi estis vera inspiro—grava dum maloftaj krizoj—kiam kiu ajn perdis sian kapon, tiu savas ĝin.

"Mi kredas, sinjoro," li diris ĝentile, "ke vi havas arĝenton en via poŝo."

La alta sinjoro rigardegis. "Diablo," li kriis, "se mi elektas doni al vi oron, kial vi plendu?"

"Ĉar arĝento estas foje pli valora ol oro," diris la pastro milde; "tio estas, kiam ĝi estas en granda kvanto."

La fremdulo rigardis lin strange. Tiam li rigardis ankoraŭ pli strange laŭ la koridoron al la ĉefa enirejo. Tiam li rigardis Brown denove, kaj tiam li rigardis tre atente la fenestron malantaŭ la kapo

de Brown, ankoraŭ kolorigata de la ŝtorma postlumo. Tiam li ŝajnis decidi. Li metis unu manon sur la tabulon kaj transsaltis tiel facile kiel akrobato kaj staris super la pastro, metante unu grandegan manon sur ties kolumon.

”Ne moviĝu,” li diris kun hakanta frustrado, ”Mi ne volas minaci vin sed—”

”Mi volas minaci vin,” diris Pastro Brown per voĉo kiel rulsonanta tamburo. ”Mi minacas vin de la vermo, kiu ne mortas kaj de la fajro, kiu ne estingiĝos.”

”Vi estas stranga speco de vesteja servisto,” diris la alia.

”Mi estas Pastro, Monsieur Flambeau,” diris Brown, ”kaj mi estas preta por aŭdi vian konfesion.”

La alia staris rigardegante dum kelkaj momentoj, kaj poste ŝanceliĝis malantaŭen en seĝon.

Ambaŭ unuaj servicoj de la vespermanĝo de La Dek Du Veraj Fiŝkaptistoj funkciis kun trankvila sukceso. Mi ne posedas kopion de la manĝkarto; se mi ja havus ĝin, ĝi signifus nenion al iu. Ĝi estis skribita en ia aparta franca lingvo uzata de kuiristoj sed tute nekomprenebla al francoj. Estis tradicio en la klubo, ke la antaŭmanĝaĵoj estu diversaj kaj multnombraj ĝis frenezeco. Ili estis konsiderataj kiel gravaj ĉar ili estis konfese senutilaj kromaĵoj, kiel la tuta vespermanĝo kaj la tuta klubo. Estis ankaŭ tradicio, ke la buljon-servico estu simpla kaj modesta—ia simpla kaj severa preparado por la venonta fiŝ-festeno. La interparolado estis de tiu stranga eta speco kiu regas la Britan Imperion, kiu regas ĝin sekrete sed kiu estus apenaŭ komprenebla al ordinara anglo eĉ se li povus subaŭskulti ĝin. Oni aludis ambaŭflanke al ministroj per iliaj baptonomoj

kun ia enuigita bonvolo. La Radikala estro do la Fiska Departamento, kiun supozeble la tuta Konservatisma partio malbenis pro liaj eltor-doĵ, estis laŭdata pro siaj malgrandaj poemoj aŭ pro sia lerteco sur la ĉaskampo. La Konservatisma estro, kiun supozeble ĉiuj Radikalanoj malamis kiel tiranon, estis pridiskutata, kaj entute laŭdata—kiel Radikalano. Ŝajnis iel, ke politikistoj estas tre gravaj. Tamen ĉio ajn pri ili ŝajnis esti grava, krom ilia politiko. S-ro Audley, la prezidanto, estis aminda maljuneta viro, kiu ankoraŭ portis altajn rigidajn kolumojn; li estis ia simbolo de tiu fantoma tamen fiksita socio. Li neniam ion faris—eĉ ne ion pekan. Li ne estis diboĉema; li ne estis eĉ aparte riĉa. Li nur estis viro do tia medio—kaj jen ĉio. Neniu partio povis ignori lin, kaj se li volus fariĝi unu el la minist-raro sendube li tio fariĝus. La Duko de Chester, la Vicprezidanto, estis juna kaj famiĝanta politikisto. Tio signifas, ke li estis afabla junulo, kun glata blonda hararo kaj lentuga vizaĝo, kun modera inteligenteco kaj grandegaj bienoj. Liaj publikaj aperoj estis ĉiam sukcesplenaj kaj lia principo estis sufiĉe simpla. Kiam li ekpensis ŝercon li eldiris ĝin kaj oni nomis lin klerega. Kiam li ne povis elpen-si ŝercon li diris, ke nun estas nenia tempo por bagateloj, kaj oni nomis lin kapabla. Malpublike, en klubo de sia propra klaso, li es-tis nur agrable malkaŝema kaj idioteta kiel lerneja knabo. S-ro Aud-ley, pro tio, ke li neniam intermiksiĝis en politiko, traktis ĝin pli serioze. Kelkfoje li eĉ embarasigis la ĉeestantaron per la sugesto, ke estas diferenco inter Radikalano kaj Konservatismano. Li mem es-tis Konservatismano, eĉ dum privata vivo. Li havis buklon el griza haro kiu kovris la malantaŭen parton de la kolumo, kiel iuj malmo-dernaj politikistoj, kaj vidata de malantaŭe li aspektis kiel la viro, kiun la Imperio bezonas. Vidata de antaŭe li aspektis kiel milda, sinindulgema fraŭlo kun loĝejo en la Hotelo Albany—kia li efekte estis.

Kiel jam dirite, estis dudek kvar seĝoj ĉe la terasa tablo kaj nur dek du klubanoj. Tial ili povis okupi la terason laŭ la plej luksa maniero, sidantaj ĉe la pli interna flanko de la tablo kun neniu kontraŭe kaj ĝuantaj plenan vidon de la ĝardeno, kies koloroj estis ankoraŭ brilaj kvankam la vespero alproksimiĝis iomete ŝtorme por la sezono. La Prezidanto sidis meze de la linio kaj la Vic-prezidanto ĉe ĝia dekstra fino. Kiam la dek du gastoj unue enmarŝis al iliaj seĝoj estis kutime (pro iu nekonata kialo), ke la dek kvin kelneroj ĉiuj staru laŭ la muro kiel militistaro prezentanta armilojn al la reĝo, dum la dika posedanto staris riverencante al la klubanoj kun elbrilanta surprizo kvazaŭ li neniam antaŭe priaŭdis ilin. Tamen antaŭ ol la unua ektinto de tranĉilo aŭ forko, malaperis ĉi tiu servistaro, nur unu aŭ du, kiuj necesis por kolekti kaj disdoni la tele-rojn glitis tien kaj tien ĉi en senviva silento. S-ro Lever estis kompreneble antaŭ longe malaperinta kun komplezplenaj konvulsioj. Diri, ke li iam vere aperis ankoraŭ unufoje estus troiga, eĉ malrespektega. Sed kiam la grava servico, la fiŝservico, estis enportata, estis—kiel mi esprimu tion?—vivanta ombro, projekcio de lia personeco, kiu montris, ke li ŝvebas apude. La sankta fiŝservico konsistis (de la vidpunkto de vulgularoj) el ia giganta pudingo, havanta proksimume la formon kaj grandecon de geedziĝa kuko, en kiu granda nombro da interesaj fiŝoj fine estis perdintaj la formojn donitajn al ili de Dio. La Dek Du Veraj Fiŝkaptistoj enmanigis siajn famajn fiŝmanĝilojn, kaj ekmanĝis ĝin serioze kvazaŭ ĉiu colo de la pudingo kostas tiom multe kiom la arĝenta forko per kiu ĝi estas manĝata. Eble ĝi ja tiom kostis—mi ne scias. Ĉi tiu servico estis traktata kun avida kaj englutanta silento, kaj estis nur kiam lia telero preskaŭ malpleniĝis, ke la juna duko laŭrite ekdiris, "Oni ne povas fari ĉi tion ie, krom tie ĉi."

"Nenie," diris sinjoro Audley kun profunda basa voĉo, sin tur-

nante al la parolinto kaj kelkfojojn balancante sian respektindan kapon, "Nenie, sendube, krom tie ĉi. Estas protestite al mi, ke ĉe la Café Anglais—"

Tie ĉi li estis interrompata kaj eĉ maltrankviligata pro la forporto de sia telero, sed li baldaŭ rekaptis la valoran fadenon de siaj pensoj. "Estas protestite al mi, ke ĉe la Café Anglais oni povas tiel same fari. Nenio tia, sinjoro," li diris kapskuante malkompate kiel mortpunanta juĝo. "Nenio tia."

"Trotaksata ejo," diris iu Kolonelo Pound, parolante (laŭ ŝajno de sia aspekto) por la unua fojo dum kelkaj monatoj.

"Ho, mi dubas," diris la Duko de Chester, kiu estis optimisto, "ĝi estas bonega en kelkaj rilatoj. Vi ne povus plibonigi ĝin. . . ."

Kelnero rapidis laŭlonge de la ĉambro kaj tiam ekhaltis senmove. Lia ekhalto estis tiom senbrua kiom lia marŝado, sed ĉiuj tiuj nedifinitaj kaj bonkoraj sinjoroj tiom kutimiĝis al la absoluta glateco de la nevidata mekanismo, kiu ĉirkaŭis kaj subtenis ilian vivadon, ke estis skuo kaj ŝoko kiam servisto faris ion neatenditan. Ili sentis tiel same kiel ni sentus se senvivaĵoj ekmalobeus nin—se seĝo forkurus de ni.

La kelnero staris kelkajn momentojn rigardante, dume profundigis sur ĉiu ĉetabla vizaĝo stranga honto, kiu tute estas produktaĵo de niaj tempoj. Ĝi estas kunmikso de moderna homaramismo kaj la terura moderna abismo inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Vera historia aristokrato ĵetus aĵojn al la kelnero, komence malplenajn botelojn kaj kredeble monon fine. Vera demokrato demandus al li, kun kamarada elparola klareco, kion je diablo li faras. Sed ĉi tiuj modernaj plutokratoj ne povis toleri la apudeston de malriĉulo aŭ kiel sklavo aŭ kiel amiko. La fakto, ke ĉio ne glate iras ĉe la servistoj, estis nure obtuza varma konfuzigaĵo. Ili ne volis esti kruelaj kaj ili timegis la neceson fariĝi kompataj. Ili volis, ke la afero, kio ajn ĝi

estu, nur finiĝu. Ĝi jam estis finiĝinta. La kelnero, starinte kelkajn sekundojn rigide kiel viro atakata de katalepsio, sin turnis kaj furi-oze elkuris el la ĉambro.

Kiam li aperis denove en la ĉambro, aŭ pli ĝuste en la elirejo, li estis kun alia kelnero al kiu li flustradis kaj gestadis kun sudana energio. Tiam la unua kelnero foriris, postlasante la duan kelneron, kaj revenis kun tria kelnero. Kiam kvara kelnero aliĝis al ĉi tiu urĝe kunvokita sinodo, sinjoro Audley konsideris, ke necesas interrompi la silenton pro takto. Li uzis laŭtan tuson anstataŭ prezidanta martelo, kaj diris "Bonegan laboron juna Moocher faras en Birmo. Nu, neniuj aliaj nacioj en la mondo povus—"

Kvina kelnero rapidegis al li kiel sago kaj estis flustranta en lian orelon. "Tre bedaŭras. Grava! La posedanto, ĉu vi permesos, ke li alparolu vin?"

La prezidanto sin turnis konfuzite kaj kun miregita rigardado vidis sinjoron Lever alproksimiĝanta per sia peziranta rapideco. La marŝmaniero de la bona posedanto estis efektive lia kutima marŝmaniero sed lia vizaĝo estis neniel kutima. Plej ofte ĝi havis bonhumoran kuprakoloron; sed nun ĝi estis naŭze flava.

"Vi pardonu min, sinjoro Audley," li diris kun astma senspireco. "Mi havas grandajn timojn. Viaj fiŝteleroj, ili estas forportitaj kune kun la tranĉiloj kaj forkoj."

"Jes, certe, mi tiel esperas," diris la prezidanto kun iom da kolero.

"Vi vidis lin, ĉu ne?" elspiregis la ekscitita hotelisto, "vi vidis la kelneron, kiu forportis ilin? Vi konas lin?"

"Konas la kelneron?" respondis sinjoro Audley indigne. "Kompreneble ne!"

S-ro Lever malfermis la manojn kun gesto dolorega. "Mi ne sendis lin," li diris. "Mi ne scias kiam aŭ kial li venis. Mi sendis mian kelneron por forporti la telerojn kaj li trovis ĉiujn jam for."

S-ro Audley ankoraŭ aspektis tro konfuzita por esti vere tia viro kian bezonas la Imperio; neniu el la ĉeestantaro povis ion diri krom la ligna viro—Kolonelo Pound, kiu ŝajne estis galvanizita ĝis nenatura viveco. Li rigide leviĝis el sia seĝo, lasante la aliajn ĉiuj sidantaj, enŝtraŭbis sian okulvitron en la okulon kaj ekparolis per raŭka flustro kvazaŭ li duone forgesis kiel paroli.

”Ĉu vi volas diri,” li flustris, ”ke iu ŝtelis nian arĝentan fiŝmanĝilon?”

La posedanto faris denove la geston kun eĉ plia senpoveco; kaj tuj ĉiu viro ĉetabla ekstaris.

”Ĉu viaj kelneroj ĉiuj ĉeestas?” demandis la kolonelo per sia mal-laŭta raŭka maniero.

”Jes, ili ĉiuj estas tie ĉi. Mi mem rimarkis tion,” kriis la juna duko, entrudante sian knaban vizaĝon en la plej internan rondon. ”Ĉiam mi nombras ilin kiam ni eniras; ili tiel strange aspektas starante laŭlonge de la muro.”

”Sed vi certe ne povus memori precize,” komencis sinjoro Audley kun peza hezitado.

”Mi memoras precize, mi asertas,” kriis la ekscitita duko. ”Neni- am estas pli ol dek kvin kelneroj en ĉi tiu hotelo kaj ne estis pli ol dek kvin hodiaŭ vespere, mi ĵuras; ne pli, ne malpli.”

La posedanto sin turnis al li, tremegante de ia surprizo. ”Vi diras—vi diras,” li balbutis, ”ke vi vidis ĉiujn miajn dek kvin kelne- rojn?”

”Kiel kutime,” jesis la duko, ”kial ne?”

”Nenial,” diris Lever per pli profundiganta voĉo, ”sed vi ne vidis ilin. Ĉar unu estas senviva supre.”

Dum momento ŝokiga silento plenigis tiun ĉambron. Eble (tiel supernatura estas la vorto morto) ĉiu el tiuj senokupaj viroj ekrigardis sian animon kaj vidis ĝin kiel malgrandan ŝrumpan pizon. Unu

el ili—la duko, mi kredas—eĉ diris kun la idiota komplezemo de riĉeco, "Ĉu ni povas iel helpi?"

"Li jam vidis pastron," diris la judo, ne sen emocio.

Tiam, kvazaŭ en ĵugtago ili ekkonstatis sian propran pozicion. Kelkajn strangajn sekundojn ili vere sentis, ke la dek-kvina kelnero povas esti la fantomo de la mortinto supre. Ili estis mutaj sub tiu ŝarĝo ĉar al ili fantomoj estis embarasaĵoj, kiel almozpetantoj. Sed la rememoro pri la arĝento disrompis la miraklan sorĉon; abrupte disrompis ĝin kaj kun brutala reakcio. La kolonelo forpuŝis sian seĝon kaj paŝis al la pordo.

"Se estis dek-kvina homo tie ĉi, amikoj," li diris, "tiu dek-kvina estas ŝtelisto. Tuj malsupren al la antaŭa kaj malantaŭa pordoj kaj ĉion ŝlosu; ni parolu poste. La dudek kvar perloj de la klubo estas ja retrovindaj."

Unue sinjoro Audley ŝajne hezitis, pro ĉu estus sinjorece tiel rapidi pri io; sed vidante la dukon malsuprenkuregi la ŝtuparon kun juneca energio li sekvis laŭ pli matura maniero.

Samtempe sesa kelnero enkuris en la ĉambron kaj asertis, ke li trovis la amason da fiŝteleroj sur la bufedo kun nenia postsigno de la arĝentaĵoj.

La aro de manĝintoj kaj servistoj, kiu senorde puŝis sin tra la koridoroj, apartiĝis en du grupojn. La Fiŝkaptistoj plej multe sekvis la posedanton al la antaŭa ĉambro por demandi novaĵon pri ia ajn elirinto. Kolonelo Pound kun la Prezidanto, Vic-prezidanto kaj kelkaj aliaj rapidis tra la koridoro kondukanta al la servistaj ejoj, kiel la plej facila elirejo. Tion farante ili pasis la malluman alkovon aŭ kavernon kiu estis la vestejo, kaj vidis malaltan, nigre vestitan figuron, supozeble servisto, kiu staris malantaŭe en ĝiaj ombroj.

"Hola, vi," ekkriis la duko. "Ĉu vi vidis iun preterpasi?"

La malalta figuro ne respondis al la demando sed nun diris. "Eble mi havas kion vi serĉas, sinjoroj."

Ili paŭzis, hezitante kaj mirante, dum li trankvile iris al la malantaŭa parto de la vestejo kaj revenis, ambaŭ manoj plenaj de brilanta arĝento, kiun li diskuŝigis sur la tabulon tiel trankvile kiel vendanto. Vidiĝis dekduo da strange faritaj tranĉiloj kaj forkoj.

"Vi—vi," komencis la kolonelo fine malekvilibrigita. Tiam li enrigardis en la malluman ĉambreton kaj vidis du aĵojn; unue, ke tiu malalta nigre vestita viro estas vestita kiel pastro; kaj due, ke la fenestro de la ĉambro malantaŭ tiu estas frakasita, kvazaŭ iu perforte trapasis.

"Valoraĵoj por lasi en vestejo, ĉu ne?" diris la pastro kun gaja trankvilo.

"Ĉu—Ĉu vi ŝtelis tiujn ĉi?" balbultis sinjoro Audley kun elstarantaj okuloj.

"Se jes," diris la klerikulo agrable, "mi almenaŭ redonas ilin."

"Sed vi ne ŝtelis ilin," diris Kolonelo Pound, ankoraŭ rigandante la frakasitan fenestron.

"Mi malkaŝe konfesas, ke ne," diris la alia bonhumore. Kaj li sidiĝis tute serioze sur skabelon.

"Sed vi scias kiu estas la ŝtelinto," diris la kolonelo.

"Mi ne scias ties veran nomon," diris la pastro kviete, "sed mi scias ion pri lia pugna forto kaj multe pri liaj spiritaĵoj malaficlaĵoj. Mi taksis tion korpe kiam li provis sufoki min kaj tion ĉi morale kiam li pentis."

"Ho, vere—pentis!" kriis la juna Chester kun ridado kiel koko.

Pastro Brown ekstaris kaj kunmetis la manojn surdorse.

"Strange, ĉu ne?" li diris, "ke ŝtelisto kaj fripono pentas, kiam tiom multaj kiuj estas riĉaj kaj sekuraj restas sensentaj kaj frivolaĵaj kaj sen frukto aŭ por Dio aŭ por homoj? Do, vi pardonu min, vi

invadas iomete mian sferon. Se vi dubas la penton esti vere fakto—jen viaj manĝiloj. Vi estas la Dek Du Veraj Fiŝkaptisoj, kaj jen viaj arĝentaj fiŝoj. Sed Li faris el mi kaptiston de homoj.”

”Ĉu vi kaptis ĉi tiun homon?” demandis la kolonelo sulkigante la brovojn.

Pastro Brown rekte rigardis en ties malridetantan vizaĝon. ”Jes,” li diris, ”mi kaptis lin per nevidita hoko kaj per nevidebla ŝnuro, kiu estas sufiĉe longa por lasi lin vagi ĝis la fino de la tero, kaj ankoraŭ tiam per ekspasmo de la fadeno revenigi lin.”

Longe silentis. La aliaj viroj ĉiuj forvagis por alporti la retrovitan arĝenton al siaj kunuloj, aŭ por konsiliĝi kun la posedanto pri la stranga stato de aferoj. Sed la severvizaĝa kolonelo ankoraŭ sidis oblikve sur la tabulo, svingante la longajn kaj maldikajn krurojn kaj mordante siajn nigretajn lipharojn.

Fine li diris kviete al la pastro. ”Tiu certe estis lertulo sed mi kredas, ke mi konas iun pli lertan.”

”Li ja estas lertulo,” respondis la alia, ”sed mi ne scias kiun alian vi priparolas.”

”Mi parolas pri vi,” diris la kolonelo kun mallonga rido. ”Mi ne volas malliberigi lin; ne ĝenu vin pri tio. Sed mi donus multajn arĝentajn forkojn por scii ĝuste kiel vi enmiksiĝis en ĉi tiun aferon kaj kiel vi prenis la aĵojn for de li. Mi opinias, ke vi estas la plej vigla diablo en la nuna ĉeestantaro.”

Ŝajne la malgaja rektparolo de la kolonelo plaĉis al Pastro Brown. ”Nu,” li diris ridetante, ”Mi devas ne diri al vi kiu li estas, aŭ lian propran historion, kompreneble; tamen estas nenia aparta kialo pro kiu mi ne povas rakonti al vi la nurajn eksteraĵojn, kiujn mi mem elserĉis.”

Li transsaltis la barilon kun neatendita agemeco kaj sidiĝis flanke de Kolonelo Pound, svingante siajn mallongajn krurojn kiel knabo

sur kradpordo. Li komencis la rakonton tiel facile kvazaŭ li estus rakontanta ĝin al bone konata amiko apud la kristnaska kameno.

”Vi komprenu, kolonelo,” li diris, ”mi estis ŝlosita en tiu malgranda ĉambro tie, ion skribante, kiam mi ekaŭdis piedojn en la koridoro dancantajn dancon tiel strangan kiel la danco de la morto. Unue rapidaj strangetaj sonoj, kiel viro kiu iras pro veto piedpinte; tiam aŭdiĝis malrapidaj, senzorgaj, knarantaj paŝoj, kiel de granda viro marŝanta tien kaj tien ĉi kun cigaro. Sed ili ambaŭ estis kaŭzataj de la samaj piedoj, tion mi ĵurus, kaj ili aŭdiĝis laŭvice; unue la ekkuro kaj poste la marŝado kaj tiam denove la ekkuro. Mi scivolis, unue senpripense kaj poste furioze, kial iu ludus tiujn du rolojn samtempe. Unu marŝsonon mi konis; tiu estis ĝuste kiel via, kolonelo. Ĝi estis la marŝado de bone nutrita sinjoro kiu atendas ion kaj marŝetas tien kaj tien ĉi ĉar li estas korpe vigla, pliĝuste ol pro tio ke li estas mense senpacienca. Mi sciis, ke mi konas tiun alian marŝadon ankaŭ, sed mi ne povis rememori kia ĝi estas. Kian savoĝan kreitaĵon mi renkontis dum miaj vojaĝoj, kiu tiel strange rapidis piedpinte? Tiam mi ekaŭdis de ie teleran tintegon kaj la respondo elstaris tiel klare kiel la preĝejo de Sankta Petro. Jen estis la marŝado de kelnero—korpo antaŭen klinita, okuloj rigardantaj teren, piedpintoj forpuŝantaj la plankon, baskoj kaj tuko flugantaj. Tiam mi pensadis plu dum minuto kaj duono. Kaj mi kredas, ke mi vidis kiamaniere la krimo efektiviĝos, kvazaŭ mi mem estus ĝin faronta.”

Kolonelo Pound rigardis lin atente, sed la mildaj grizaj okuloj de la parolanto rigardadis al la plafono kun preskaŭ sensignifa sopireco.

”Krimo,” li malrapide diris, ”estas kiel iu ajn alia artaĵo. Ne mienu tiel surprizita; krimoj estas neniel la solaj artaĵoj, kiuj venas el infera laborejo. Sed ĉiu artaĵo, dia aŭ diabla, portas unu necesan signon—mi volas diri, ke ĝia centraĵo devas esti simpla kiom ajn ĝia

plenumo estu malsimpla. Tiel ekzemple en Hamleto, la groteskeco de la tombfosisto, la floroj de la freneza knabino, la fantazia ornameco de Osrik, la paleco de la fantomo kaj la ridetaĉo de la kranio estas ĉiuj strangaĵoj ĉirkaŭantaj kiel implikita girlando unu ordinaran tragedian figuron—viron nigre vestitan. Nu, ĉi tiu ankaŭ,” li diris ridetante kaj leviĝante malrapide de sia seĝo, ”ĉi tiu ankaŭ estas la ordinara tragedio de viro nigre vestitia. Jes,” li daŭrigis, vidante la kolonelon iom mire suprenrigardi, ”ĉi tiu rakonto tute dependas de nigra vestaĵo. En ĉi tiu, kiel en Hamleto, estas la rokokaj elkreskaĵoj—viaj kunuloj, ni diru. Estas la mortinta kelnero, kiu ĉeestis kiam li ne povis ĉeesti. Estas la nevidita mano, kiu forviŝis la arĝentaĵojn de via tablo kaj malaperis kiel nevidita aero. Sed ĉiu lerta krimo fine staras sur unu tute simpla fakto—fakto kiu en si mem ne estas mistera. Per kaŝado pri ĝi, konduko de ĉies pensojn for de ĝi, tiel la mistero okazas. Ĉi tiu granda kaj subtila kaj (se ĉio laŭprograme okazus) profita krimo dependis de la simpla fakto, ke la frako de sinjoro estas tiel same kiel la frako de kelnero. La restaĵo estis nur aktorado, diable bona aktorado.”

”Tamen,” diris la kolonelo leviĝante kaj sulkigante la brovojn dum li rigardis siajn botojn, ”Mi ne estas certa, ke mi komprenas.”

”Kolonelo,” diris Pastro Brown, ”mi asertas, ke ĉi tiu arĥeangelo de aplombo, kiu ŝtelis viajn forkojn, tramarŝis ĉi tiun koridoron dudek fojojn en la lumego de ĉiuj lampoj, sub la rigardo de ĉies okuloj. Li ne sin kaŝis en mallumaj anguloj, kie suspektemo eble elserĉus lin. Li konstante movadis en la lumplenaj koridoroj, kaj kien ajn li iris, ŝajnis, ke li estas tie de rajto. Ne demandu kiel li aspektis; vi mem vidis lin ses aŭ sep fojojn hodiaŭ vespere. Vi atendis kun ĉiuj aliaj grandaj sinjoroj en la ripozejo tie, ĉe la alia fino de la koridoro, kaj pli malproksime estis la teraso. Kiam ajn li iris inter vin sinjorojn, li eniris kun la rapidega stilo de kelnero, la kapo

klinita, tuko kiel flago kaj piedoj kurantaj. Li kuregis sur la terason, faris ion pri la tablotuko kaj reen kuregis al la kabineto kaj la servistejoj. Sed kiam la vesteja komizo kaj la kelneroj vidis lin, li estis fariĝinta alia viro, en ĉiu colo de sia talio, en ĉiu instinkta gesto. Li paŝis inter la servistoj kun tia malatentema aplombo kian ili ĉiuj estis vidintaj ĉe siaj patronoj. Al ili estis nenia nova okazaĵo, ke granda sinjoro, unu el la manĝontoj, trapasis ĉiujn partojn de la domo kiel besto en la bestarejo; ili sciis nenion, kio estas pli karakteriza de mondumanaj ol la kutimo iri kien ajn ili volas. Kiam li estis grandioze enuigita de la trapaŝado tra tiu koridoro, li sin turnis kaj reen iris preter la kabineto; en la ombroj de la arkaĵo iom pli malproksime li estis ŝanĝita kvazaŭ de sorĉa frapo, kaj rapidis antaŭen ankoraŭ unufoje inter la Dek Du Fiŝkaptistojn, komplezega servisto. Kial la sinjoroj rimarku novan kelneron? Kial la kelneroj suspektu unuagradan sinjoron? Foje li faris la plej aplombajn ruzojn. En la privata ĉambro de la posedanto li verve petis sifonon da sodakvo, dirante, ke li havas soifon. Li bonhumore diris, ke li mem portos ĝin, kaj li tion faris; li portis ĝin rapide kaj senerare inter vin ĉiujn, kelnero kun memevidenta tasko. Kompreneble tio ne povis longe daŭri, sed necesis nur daŭrigi ĝin ĝis la fiŝservico.

”Lia plej granda malfacilaĵo venis kiam la kelneroj staris en vico; sed eĉ tiam prosperis al li sin apogi al la muro ĉe angulo tiel, ke dum la grava sekundo la kelneroj kredis, ke li estas sinjoro, kaj la sinjoroj, ke li estas kelnero. Ĉio cetera estis plej simpla. Se kelnero vidis lin for de la tablo, li vidis malenergian aristokraton. Nur necesis atendi ĝis du minutoj antaŭ la forporto de la fiŝservico, fariĝi rapida servisto kaj forporti ĝin per si mem. Li demetis la telerojn sur bufedon, puŝis la arĝenton en sian brustpoŝon, elŝveligante ĝin, kaj kuris kiel leporo (mi aŭdis lin alvenanta) ĝis la vestejo. Tie li fariĝis denove plutokrato—plutokrato kiu devas tuj foriri pro ia urĝaĵo.

Nur necesis doni la bileton al la vesteja servisto kaj eliri tiel elegante kiel li estis enirinta. Sed—sed okazis, ke mi estis la vesteja servisto.”

”Kiel vi traktis lin?” kriis la kolonelo kun nekutima atento. ”Kion vi diris al li?”

”Mi petas pardonon,” diris la pastro nemoveble, ”tie la rakonto finiĝas.”

”Kaj la interesa rakonto komenciĝas,” murmuris Pound. ”Mi kredas, ke mi elkomprenas lian profesian ruzon, tamen ŝajnas, ke mi ne komprenas vian.”

”Mi devas foriri,” diris Pastro Brown.

Ili kune marŝis laŭ la koridoro al la enirejo, kie ili vidis la freŝan lentugan vizaĝon de la Duko de Chester, kiu alproksimiĝis al ili elaste saltegante.

”Venu, Pound,” li kriis senspire, ”Mi serĉis vin ĉie. La vespermanĝo antaŭeniras bonege kaj maljuna Audley alparolos nin por soleni la savon de la forkoj. Ni volas iniciati ian novan ceremonion, kompreneble, por rememorigi la okazon. Do, ĉar vi reakiris la aĵojn, kion vi proponas?”

”Nu,” diris la kolonelo, rigardante lin kun sardonika aprobo, ”Mi proponas, ke de nun ni portu verdajn frakojn anstataŭ nigrajn. Oni neniam povas antaŭvidi kiaj eraroj eble okazos se oni tiel aspektas kiel kelnero.”

”Dio mia,” diris la juna viro, ”sinjoro neniam aspektas kiel kelnero.”

”Nek kelnero kiel sinjoro mi supozas,” diris Kolonelo Pound, kun tiu minacanta rideto sur sia vizaĝo. ”Via pastra moŝto, via amiko nepre estis tre lerta, ludante sinjorecan rolon.”

Pastro Brown butonumis sian ordinaran surtuton ĝis la kolumo, ĉar la nokto estis ŝtorma, kaj prenis sian ordinaran ombrelon el la ujo.

”Jes,” li diris, ”nepre estas malfacila tasko esti sinjoro; sed vere mi iafoje opinias, ke estis kelnero eble estas preskaŭ tiel severlabora.”

Kaj dirante ”Bonan nokton”, li puŝe malfermis la pezajn pordojn de tiu palaco de plezuroj. Malantaŭ li la oraj pordegoj fermiĝis kaj li rapidis tra la humidaj mallumaj stratoj por serĉi omnibuson.

LA FLUGANTAJ STELOJ

”La plej bela krimo, kiun mi iam faris,” Flambeau ofte diris dum sia tute morala maljuneco, ”ankaŭ estis, laŭ rimarkinda koincido, mia lasta. Ĝi estis farata je Kristnasko. Kiel artisto mi ĉiam penis provizi krimojn taŭgajn por la apartaj sezono aŭ pejzaĝoj en kiuj mi troviĝis, elektante tiun aŭ tiun ĉi terason aŭ ĝardenon por katastrofo kvazaŭ por statua grupo. Tiel bienposedantoj estu trompataj en longaj ĉambroj kverkpanelitaj, kontraste al Judoj, kiuj trovu sin subite senmonaj inter la lumoj kaj ŝirmiloj de la Café Riche. Tiel, en Anglujo, se mi dezirus malŝarĝi dekanon de liaj riĉaĵoj (kio ne estas tiel facila kiel vi opinias), mi volus enkadrigi lin, se mi klare esprimas min, inter la verdaj razenejoj kaj grizaj turoj de iu katedrala urbo. Simile en Francujo, kiam mi estis preninta monon de riĉa kaj malvirta kamparano (kio estas preskaŭ neebbla), plaĉis al mi igi ties indignan kapon elstari kontraŭ la griza linio de tonditaj poploj kaj tiuj grandiozaj ebenaĵoj de Galio super kiuj ŝvebas la potenca spirito de Millet.

”Mia lasta krimo nu, estis Kristnaska krimo, bonanima, komforta, angla, mezklasa krimo; krimo laŭ Charles Dickens. Mi faris ĝin en bona kaj malnova mezklasa domo apud Putney, domo kun kurbstrata veturigila vojo, domo flankata de ĉevalejo, domo kun la nomo sur la du eksteraj pordoj, domo kun araŭkario. Vi konas la specon. Mi vere opinias, ke mia imitaĵo de la stilo de Dickens estis lerta kaj literatura. Ŝajnas preskaŭ bedaŭrinde, ke la saman vesperon mi pentis.”

Flambeau tiam daŭrus rakonti la historion de interne; kaj eĉ tiel ĝi estis stranga. Vidata de ekstere ĝi estis tute nekomprenebla, kaj estas de ekstere ke la fremdulo devas ĝin studadi. De tiu ĉi vidpunkto oni povas diri, ke la dramo komenciĝis kiam la grandaj pordoj de la domo kun la ĉevalejo malfermiĝis al la ĝardeno enhavanta la araŭkarion, kaj elvenis juna knabino kun pano por la birdoj la posttagmezon de la tago de Sankta Stefano. Ŝi havis beletan vizaĝon, kun bravaj brunaj okuloj; pri ŝia talio tamen povis esti nenia konjekto, ĉar ŝi estis envolvita tiel per brunaj peltoj, ke estis malfacile diri kio estas hararo kaj kio pelto. Sen la alloga vizaĝo ŝi povus esti malgranda paŝetanta urso.

La vintra posttagmezo ruĝiĝis al vespero kaj jam rubena lumo verŝiĝis super la senflonaj bedoj, kvazaŭ plenigante ilin de la fantomoj de la mortintaj rozoj. Ĉe unu flanko de la domo staris la ĉevalejo kaj ĉe la alia flanko aleo aŭ klostro el laŭroj kondukis al la pli granda ĝardeno malantaŭe. La juna fraŭlino, disĵetinte panon por la birdoj (por la kvara aŭ kvina fojo tiun tagon, ĉar la hundo ĝin formanĝis) pasis kaŝete laŭ la laŭra vojeto kaj en la briletantan arbareton de ĉiamverdaĵoj malantaŭe. Tie ĉi ŝi eligis esprimon de surprizo veran aŭ laŭritan, kaj suprenrigardante al la alta ĝardenmuro super si, ekvidis sur ĝi fantazie forksidanta iomete fantazian figuron.

”Ho, ne saltu, sinjoro Crook,” ŝi kriis kun iom da timo, ”estas multe tro alte.”

La persono rajdante la ĝardenmuron kiel aera ĉevalo estis longa, angula junulo, kun nigra hararo hirta kiel broso, inteligentaj kaj eĉ eminentulaj trajtoj, sed flavpala kaj preskaŭ fremdula aspekto. Tiu ĉi montriĝis des pli klare ĉar li portis flamantan ruĝan kravaton, la sola vestero pri kiu li ŝajne iel zorgis. Eble ĝi estis simbolo. Li tute

ne atentis pni la timigita petego de la knabino sed saltis kiel akrido alteren ĉe ŝia flanko, kie liaj kruroj povus esti facile rompiĝintaj.

”Mi kredas, ke estis mia sorto fariĝi domrabisto,” li diris kviete, ”kaj mi ne dubas, ke tia mi estus se ne okazis, ke mi naskiĝis en tiu ĉarma domo tie. Mi ne komprenas kiel malutilus, malgraŭ ĉio.”

”Kiel vi kuraĝaĉas paroli tiel?” ŝi protestis.

”Nu,” diris la junulo, ”se oni naskiĝis ĉe la malĝusta flanko de la muro, mi ne komprenas, kiel estas malvirte transen grimpi.”

”Mi neniam scias kion vi estas dironta aŭ faronta,” ŝi diris.

”Ofte mi mem ne scias,” respondis sinjoro Crook; ”tamen nun mi estas ĉe la ĝusta flanko de la muro.”

”Kaj kiu estas la ĝusta flanko de la muro?” diris la fraŭlino ride-tante.

”Tiu flanko kie vi troviĝas,” diris la junulo nomita Crook.

Dum ili kune iris tra la laŭraj al la antaŭa ĝardeno aŭtomobila avertilo ekbruis tri fojojn, pli kaj pli alproksimiĝante, kaj aŭtomobilo de mirinda rapideco, granda eleganteco kaj palverda koloro alflugis al la ĉefa pordo kiel birdo, kaj tie staris pulsante.

”Alo, alo,” diris la junulo kun la ruĝa kravato, ”jen iu, kiu naskiĝis ĉe la ĝusta flanko, almenaŭ. Mi ne sciis, fraŭlino Adams, ke via Kristnaskopaĉjo estas tiel moderna kiel tiu ĉi.”

”Ho, estas mia baptopatro, Sir Leopold Fischer. Li ĉiam venas la tagon post Kristnasko.”

Tiam, post paŭzo, kiu vidigis iun mankon de entuziasmo, Ruby Adams aldonis:

”Li estas tre bonkora.”

John Crook, ĵurnalisto, jam aŭdis pri tiu eminenta financa magnato; kaj la kulpo ne estis lia se la financa magnato ankoraŭ ne aŭdis pri li; ĉar en iuj artikoloj en La Klariono aŭ La Nova Epoko Sir Leopold estis tre severe pritraktita. Li tamen nenion diris, kaj ob-

servis severe la malŝarĝadon de la aŭtomobilo, kiu estis iomete longdaŭra procedo. Granda neta ŝoforo verde vestita eliĝis el la antaŭa parto, kaj malgranda neta lakeo grize vestita eligis el la malantaŭa parto, kaj ambaŭ kune demetis Sir Leopold sur la peronon kaj komencis malkovri lin kiel iun tre zorge pakitan pakajon. Lan kovriroj sufiĉe multnombraj por stoki bazon, peltoj de ĉiuj bestoj de la arbaro, kaj koltukoj de ĉiuj koloroj de la ĉielarko, disvolviĝis unu post la alia ĝis kiam vidiĝis io simila la homan formon; la formo de amika sed alilandulo-aspekta maljuna sinjoro, kun griza kaposimila barbo kaj radianta rideto, kiu kunfrotis siajn grandajn peltgantojn.

Longe antaŭ ol tiu ĉi malkaŝado kompletiĝis la du grandaj por-
doj de la enirejo malfermiĝis en la mezo kaj Kolonelo Adams (pa-
tro de la peltkovrita fraŭlino) estis mem elirinta por eninviti sian
eminentan gaston. Li estis longa, sunbrunigita kaj tre silenta viro,
kio portis ruĝan fumĉapon kiel fezon, kiu donis al li la aspekton de
unu el la anglaj Sirdaroj aŭ Paŝaoj en Egiptujo. Kun li estis lia bo-
frato, ĵus alveninta de Kanado, grandkorpa, flav-barba, kaj iomete
tumultema juna sinjor-farmbienisto, nomita James Blount. Ankaŭ
kun tiu ĉi troviĝis la multe malpli impona figuro de la pastro de la
apuda roma preĝejo; ĉar la mortinta edzino de la kolonelo estis
katoliko kaj la infanoj, kiel estas kutime tiuokaze, estis edukitaj por
ŝin sekvi. Ĉio pri la pastro ŝajnis ordinara, eĉ lia nomo, kiu estis
Brown; la kolonelo tamen ĉiam trovis ion amikecan ĉe li kaj ofte
invitis lin al tiaj familiaj kunvenoj.

En la larĝa enirĉambro de la domo estis ja sufiĉe da spaco eĉ por
Sir Leopold kaj la depreno de ties kovriroj. La portiko kaj vestiblo
estis efektive nekutime grandaj proporcie la domon, kaj faris kva-
zaŭ grandan ĉambron kun la pordo ĉe unu fino kaj la malsupro de
la ŝtuparo ĉe la alia. Antaŭ la granda fajro de tiu ĉi ĉambro, super

kiu pendis la sabro de la kolonelo, la procedo kompletiĝis kaj la kunestantaron, inkluzive la seriozviĝan Crook, oni prezentis al Sir Leopold Fischer. Tiu respektiginda financisto tamen ŝajne ankoraŭ luktadis kun partoj de siaj belaj tajloritaj vestaĵoj kaj fine eltiris el tre intema baskpoŝo, nigran ovalan skatoleton, kiu, li radiante klarigis, estas lia kristnaska donaco al sia baptofilino. Kun neafekta fanfaronemo iome naiva li montris la ujon antaŭ ili ĉiuj; ĝi malfermiĝis per unu tuŝo kaj duone blindigis ilin. Estis tute kvazaŭ kristala fontano estis spruĉinta en iliajn okulojn. En nesto de oranĝa veluro kuŝis kiel tri ovoj, tri blankaj kaj brilegaj diamantoj, kiuj ŝajne ja ekbruligis ĉirkaŭ si la aeron. Fischer staris larĝe kaj bonvole ridetante kaj entrinkante profunde la miregon kaj ekstazon de la knabino, la severan admiron kaj dankojn de la kolonelo, la miron de la tuta aro.

”Mi nun remetiu ili, karulino mia,” diris Fischer, enŝovante la ujon denove en la baskon de sia frako. ”Mi devis bone gardi ilin venante tien ĉi. Ili estas la tri grandaj afrikaj diamantoj, nomitaj la ‘Flugantaj Steloj’ ĉar ili estas tiel ofte ŝtelitaj. Ĉiuj gravaj krimuloj estas sekvantaj la spuron; apenaŭ eĉ la kruduloj en la stratoj kaj hoteloj povus ne enmanigi ilin. Eble mi estus perdinta ilin survoje tien ĉi. Estis ja eble.”

”Tute laŭnature, mi dirus,” grumblis la viro kun la ruĝa kravato. ”Mi ne riproĉus ilin se ili estus efektive prenintaj ilin. Kiam ili petas panon kaj vi ne donas eĉ ŝtonon, mi opinias, ke estus permesate al ili mem preni la ŝtonon.”

”Mi ne permesos al vi tiel paroli,” kriis la knabino kun stranga ardeco. ”Vi tiel parolis nur de kiam vi fariĝis terura—kiel, kiel oni ĝin nomas. Vi scias kion mi volas diri. Kiel oni nomas viron kiu volas ĉirkaŭbraki la kamentubiston?”

”Sanktulo,” diris Pastro Brown.

”Mi kredas,” diris Sir Leopold, kun malestima rideto, ”ke Ruby volas diri Socialisto.”

”Radikalulo ne signifas homon kiu sin nutras per radikoj,” diris Crook iomete senpacience; ”kaj Konservatismano ne signifas homon kiu faras konservaĵojn. Nek, mi plene certigas al vi, signifas Socialisto homon kiu volas societe interamikiĝi kun la kamentubisto. Socialisto signifas homon, kiu deziras, ke ĉiuj kamentuboj estu trabalataj kaj ke ĉiuj kamentubistoj estu pro tio bone rekompencataj.”

”Kiu tamen ne permesus al vi,” enĵetis la pastro mallaŭte, ”posedi vian propran fulgon.”

Crook rigardis lin per okulo plena de intereso kaj eĉ respekto. ”Ĉu oni volas posedi fulgon?” li demandis.

”Estas eble,” respondis Brown kun spekulativemo brilanta en la okuloj. ”Mi aŭdis, ke ĝardenistoj uzas ĝin. Kaj iam mi ĝojigis ses infanojn je Kristnasko kiam ne alvenis la ĵonglisto, tute per fulgo—ekstere almetita.”

”Ho bonege!” kriis Ruby, ”Ho mi deziras, ke vi tion faru ankaŭ antaŭ la nuna ĉeestantaro.”

La tumultema kanadano, sinjoro Blount, estis aplaŭde levanta la voĉon kaj la miregita financisto la sian (kun iom da malaprobo) kiam eksonis frapo ĉe la duobla pordego. La pastro malfermis ĝin kaj vidigis denove la antaŭa ĝardeno, ĉiamverdaĵoj, araŭkario kaj ĉio, nuntempe kolektanta krepuskon kontraŭ grandioza purpura sunsubiro. La sceno tiel enkadrigita estis tiel kolorita kaj tiel kuri-oza, kiel la fono en teatraĵo, ke ili forgesis por momento la malgravan figuron staranta ĉe la pordo. Li aspektis kvazaŭ polvokovrita kaj portis malfreŝan surtuton, evidente ordinara mesaĝisto. ”Ĉu iu el vi sinjoro Blount?” li demandis kaj antaŭentenis leteron dubplene. S-ro Blount eksaltis, kaj ĉesigis la jesan krion. Malferme disŝirinte la

koverton, li ĝin tralegis kun videbla mirego; la vizaĝo iomete malheliĝis kaj tiam denove ridetis; li sin turnis al sia bofrato kaj gastiganto.

”Estas abomeninde esti tia ĝenulo, kolonelo,” li diris, kun la bona anima kolonia konveno; ”sed ĉu tro ĝenus vin se malnova konatulo mia vizitus min tie ĉi hodiaŭ vespere? Fakte estas Florian, tiu bone konata franca akrobato kaj komika aktoro; mi konis lin antaŭ kelkaj jaroj en la Okcidentaj Regionoj (li estis franca-kanadano denaske) kaj ŝajne li havas aferojn por diskuti kun mi, kiajn tamen mi apenaŭ povas diveni.”

”Kompreneble, kompreneble,” senzorge respondis la kolonelo. ”Karulo mia, iun ajn amiko via. Sendube li estos akirinda gasto.”

”Li nigrigos la vizaĝon, se tion vi volas diri,” kriis Blount ridante. ”Mi ne dubas, ke li nigrigos ankaŭ ĉies okulojn. Zorgas ne mi; mi ne estas tiel troĝentila. Mi ŝatas gajan pantomimon de la malnova speco, kie viro sidiĝas sur sian cilindran ĉapelon.”

”Ne sur mian, mi petas,” diris dignoplene Sir Leopold.

”Nu, nu,” facile respondis Crook, ”ni ne kverelu. Estas ŝercoj malpli indaj ol sidiĝi sur cilindron.”

Malŝato al la ruĝ-kravata junulo, naskita de liaj rabaj opinioj kaj videbla intimeco kun la beleta bapto-filino, igis al Fischer diri per sia plej sarkasma kaj juĝista maniero: ”Sendube vi jam eltrovis ion multe pli malinda ol sidiĝo sur cilindron. Kio ĝi estas, mi petas?”

”Lasi sidiĝi cilindro sur vin mem, ekzemple,” diris la Socialisto.

”Nu, nu, nu,” kriis la kanada farmbienisto kun sia barbara bonanimeco, ”ni ne malgajigu feliĉan vesperon. Mi diras, ke ni faru ion por la ĉeestantaro hodiaŭ vespere. Ne nigrigi vizaĝojn aŭ sidiĝi sur ĉapelojn, se tion vi ne ŝatas—sed ion tian. Kial ni ne aranĝu anglan pantomimon de la malnova speco—klaŭno, kolumbino kaj tiel plu. Unu mi vidis kiam mi lasis Anglujon je aĝo dek du, kaj ja de tiam

ĝi flamadis en mia cerbo kiel festfajro. Mi revenis al la malnova lando nur lastan jaron kaj eltrovis, ke ĝi estas jam formortinta. Nenio krom aĉaro da blekantaj feteatraĵoj. Mi deziras varmigitan fajrstangon kaj policanon ŝanĝitan al kolbasoj, kaj oni donas al mi principojn moralumantajn en la lunlumo, Bluajn Birdojn de Maeterlinck, aŭ ion similan. Blu-Barbon mi pli preferas, kaj lin mi plej forte ŝatas kiam li fariĝis la pantomimisto.”

”Mi tute subtenas ŝanĝi policananon al kolbasoj,” diris John Crook. ”Tio estas pli bona difino de Socialismo ol iuj antaŭ nelonge proponitaj. La kostumo tamen estus certe tro malfacila afero.”

”Tute ne,” kriis Blount, plene entuziasmigita. ”Arlekenaĵo estas plej facile farebla, pro du kialoj. Unue, oni povas kiom ajn improvizi; kaj due, ĉiuj objektoj estas domaĵoj—tabloj kaj tukpontiloj kaj tollavaj korboj kaj similaj.”

”Estas vene,” konfesis Crook, vigle balancante la kapon kaj marŝante tien kaj tien ĉi. ”Tamen mi timas, ke mi ne povos havigi mian polican uniformon. Lastatempe mi ne mortigis policanon.”

Blount penseme sulkigis la brovojn dum iom da tempo kaj tiam ekfrapis la femuron. ”Certe, ni povos!” li kriis. ”Jen mi havas la adreson de Florian kaj li konas ĉiun kostumiston en Londono. Mi telefonos al li, ke li kunportu polican kostumon kiam li venos.” Kaj li foriris saltante al la telefono.

”Ho, estas feliĉege, baptopatro,” kriis Ruby, preskaŭ dancante. ”Mi estos kolumbino kaj vi estu pantomimisto.”

La milionulo sin tenis rigide kun ia pagana seriozeco. ”Mi kredas, karulino mia,” li diris, ”ke vi devos eltrovi iun alian por pantomimisto.”

”Mi fariĝos pantomimisto, se vi deziras,” diris Kolonelo Adams, prenante al la buŝo cigaron, kaj parolante por la unua kaj la lasta fojo.

”Vi devas havi statuon,” kriis la kanadano dum li revenis de la telefono, radiante de ridetoj. ”Jen ĉiu havas rolon. S-ro Crook estos la klaŭno; li estas ĵurnalisto kaj scias ĉiujn plej malnovajn ŝercojn. Mi povos esti arlekeno, tio postulas nur longajn krurojn kaj multe da saltado tien kaj tien ĉi. Mia amiko Florian diras telefone, ke li alportos la polican kostumon; li alvestiĝos survoje. Ni povos ludi en tiu ĉi vestiblo, la aŭdantaro sidanta sur tiu larĝa ŝtuparo kontraŭe, unu vico super la alia. Tiuj pordegoj estu la fono, aŭ fermito aŭ malfermito. Fermito, vi vidas anglan dominternaĵon. Malfermito, lunluman ĝardenon. Ĉio iros laŭmagie.” Kaj ekprenante pecon da bilardkreto el la poŝo li transstrekis la plankon meze inter la pordegoj kaj la ŝtuparo, por indiki la pozicion de la planklumoj.

Kiel tia sensencaĵa regalo estis sufiĉe frue pretigita restas enigmo. Sed ili sin metis al ĝi kun tiu miksaĵo de malkonsideremo kaj laboremo kiu ĉiam vivas kiam juneco estas en domo; kaj juneco ja estis en tiu domo tiun nokton, kvankam ne ĉiuj eble rekonis la du vizaĝojn kaj korojn el kiuj ĝi flamis. Kiel okazas ĉiam, la improvizajoj fariĝis pli kaj pli tumultaj ĝuste pro la banalo de la burĝaj konvencioj el kiuj ĝi devis krei. La kolumbino aspektis rava, vestita per elstaranta jupo, kiu eksterordinare similis la grandan lampombrilon en la salono. La klaŭno kaj pantomimisto blankigis sin per faruno de la kuiristino, kaj ruĝigis sin per ŝminkaĵo de iu alia servistino, kiu restis (kiel ĉiuj veraj Kristanaj bonfarantoj) sennoma. La arlekeno jam vestita per arĝentpapero el cigarskatoloj, estis nur malfacile malhelpata diserigi la malnovajn Viktoriajn lustrojn, por ke li sin kovru de brilegantaj kristaloj. Efektive li tion ja estus farinta se Ruby ne estus eltrovinta iujn malnovajn gemvitrojn, kiujn ŝi estis portinta ĉe maskbalo kiel la Karoreĝino. Ŝia onklo James Blount efektive preskaŭ ne povis sin regi pro ekscitiĝo; li estis kiel juna knabo el lernejo. Li almetis senaverte paperan azenkapon sur

Pastron Brown. kiu ĝin portis pacience kaj eĉ eltrovis iun privatan manieron por movi la orelojn. Li eĉ provis alfiksi la paperan azen-voston al la baskoj de Sir Leopold Fischer. Tio ĉi tamen estis severe malaprobata. "Onklo estas tro idiota," kriis Ruby al Crook, kies ŝultrojn ŝi jam serioze ĉirkaŭis de kolbasĉeno. "Kial li estas tiel freneza?"

"Li estas arlekeno por via kolumbino," diris Crook. "Mi estas nur la klaŭno, kiu diras denove la malnovajn ŝercojn."

"Mi deziras, ke vi povu esti la arlekeno," ŝi diris, kaj lasis svingiĝantaj la kolbasojn.

Pastro Brown, kvankam li jam sciis ĉiujn detalojn faritajn malantaŭ la scenejo kaj eĉ estis elvokinta aplaŭdon pro sia transformigo de kapkuseno al pantomima bebo, antaŭeneris kaj sidiĝis inter la aŭskultantaro tute kun la serioza atendemeco de infano ĉe ĝia unua teatraĵprezento. La aŭskultantoj estis malmultnombraj geparencoj, unu aŭ du lokaj amikoj kaj la servistoj; Sir Leopold sidis en la plej antaŭa seĝo, lia larĝa kaj ankoraŭ peltkolumita figuro grandmezure barante la vidadon de la malgranda klerikulo malantaŭ li; estas tamen neniam decidite de artaj kleruloj ĉu la klerikulo multe perdis pro tio. La pantomimo estis tute ĥoasa, kvankam ne malestiminda; trakuris tra ĝi furiozo improvizada, kiu devenis precipe de Crook la klaŭno. Kutime li estis klera viro kaj tiun vesperon inspiris lin tumultema ĉioscio malsaĝeco pli saĝa ol la mondo, kia venas al junulo kiu estas ekvidinta dum momento iun vizaĝ-esprimon ĉe iu vizaĝo. Li estis supozeble la klaŭno sed ŝajne li vere estis preskaŭ ĉio krome, la verkisto (se verkisto estis), la sufloro, la scenpentrismo, la scenmovisto, kaj antaŭ ĉio ajn la orkestro. De tempo al tempo dum tiu monstra prezentado li sin ĵetis kontraŭ la fortepianon kaj elfrapis iun popularan arion egale sensencan kaj taŭgan.

La klimakso de tio ĉi, kiel de ĉio alia, estis la momento kiam la

du pordoj ĉe la malantaŭa parto de la scenejo ekmalfermiĝis, montrante la belan lunluman ĝardenon, sed montrante pli elstarante la famkonatan profesion gaston; la granda Florian, alivestita kiel policano. La klaŭno ĉe la fortepiano ludis la policestran rekanton el "La Piratoj de Penzance"; ĝi dronis tamen en la surdiga aplaŭdo, ĉar ĉiu gesto de la fama komika aktoro estis admirinda sed detenata mokado de la sinteno kaj maniero de policanoj. La arlekeno saltis sur lin kaj frapegis lin surkaske, la fortepianisto dumtempe ludanta "De kie ĉapelon vian akiris vi?"; li sin turnis kun admirinde ŝajniga mirego kaj tiam frapegis lin denove la arlekeno (la fortepianisto sugestante kelkajn taktarojn de "Kaj tiam ni plian ricevis"). Tiam la arlekeno kuregis rekte en la brakojn de la policano kaj falis planken sur lin meze de aplaŭda bruego. Estis tiam, ke la fremda aktoro prezentis tiun famkonatan imiton de mortinta viro, kies famo ankoraŭ daŭras en Putney. Estis preskaŭ neeble kredi, ke vivanta homo povus aspekti tiel malrigida. La atleta arlekeno svingis lin tien ĉi kiel sakon, aŭ tordis lin kaj levis lin kiel hindan klabon; dum la tuta tempo laŭ la plej frenezige ridindaj arioj de la fortepiano. Kiam la arlekeno peze levis la komikan policanon de la planko, la klaŭno ludis "Mi leviĝas post sonĝoj pri vi". Kiam li tiris lin sur sian dorson, "Mia pakaĵo surŝultre," kaj kiam fine la arlekeno lasis defali la policanon kun treege konvinkiga falfrapo, la frenezulo ĉe la instrumento elfrapis tintantan takton kun, kelkaj vortoj, kiuj estis, kiel oni ankoraŭ kredas, "Mi sendis leteron al amatino mia, sed survoje mi lasis ĝin fali."

Je tiu ĉi limo de mensa anarkio la vidado de Pastro Brown fariĝis tute barita; ĉar la magnato el la "City"[1] antaŭ li leviĝis plenalte kaj enŝovis la manojn sovaĝe en ĉiujn siajn poŝojn. Tiam li sidiĝis nerve ankoraŭ fuŝpalpante kaj tiam denove ekstaris. Dum momento ŝajnis vere kredeble, ke li estas transpaŝonta trans la planklumojn;

tiam li turnis bruligan rigardegon al la klaŭno ludanta la fortepiano; kaj tiam li rapidis silente el la ĉambro.

La pastro nur rigardadis kelkajn sekundojn plu la absurdan sed ne malelegantan dancon de la amatora arlekeno super lia bele senkonscia kontraŭulo. Kun vera kvankam kruda arto, la arlekeno dancis malrapide malantaŭen el la pordo en la ĝardenon, kiu estis plena je lunlumo kaj silento. La improvizita vestaĵo el arĝentpapero kaj gemvitroj, kiu tro briladis antaŭ la planklumoj, aspektis pli kaj pli magia kaj arĝenta dum ĝi dancis for sub hela lumo. La ĉeestantaro estis alproksimiĝanta kun aplaŭdado kiel kaskadego, kiam Brown estis abrupte tuŝata je la brako kaj estis petata per flustro, ke li eniru la legoĉambron de la kolonelo.

Li sekvis la alvokinton kun plifortiĝanta dubo, kiun ne forpelis la solena komikeco de la sceno en la lego-ĉambro. Tie sidis Kolonelo Adams, ankoraŭ senafekte vestita kiel pantomimisto, kun la tuberportanta barto balanciĝanta super la brovoj, sed kun kompatindaj okuloj sufiĉe malgajaj por reseriozigi Saturnalion. Sir Leopold Fischer sin apogis al la kameno ĝemegante kun la tuta graveco de paniko.

”Tio ĉi estas tre malagrabla afero, Pastro Brown,” diris Adams. ”La vero estas, ke tiuj diamantoj, kiujn ni ĉiuj vidis hodiaŭ posttagmeze, ŝajne estas malaperintaj el la malantaŭa poŝo de la jako de mia amiko. Kaj pro tio, ke vi—”

”Ke mi,” aldonis Pastro Brown kun larĝa rideto, ”sidis ĝuste malantaŭ li—”

”Nenio tia estos sugestata,” diris Kolonelo Adams kun malcedema ekrigardo al Fischer, kio iomete malkaŝis ke io ja estis sugestita. ”Mi petas nur, ke vi donu al mi la helpon, kiun ĉiu sinjoro povus doni.”

”Kio estos, malplenigi la poŝojn.” diris Pastro Brown kaj komen-

cis tion fari, vidigante sep ŝilingojn kaj ses pencojn, reiran vojaĝkarton, malgrandan arĝentan krucifikson, malgrandan brevieron, kaj pecon de ĉokolado.

La Kolonelo longe rigardis lin kaj tiam diris, "Ĉu vi scias, mi volus vidi pli la enhavon de via kapo ol de viaj poŝoj. Mia filino estas unu el viaj subtenantoj, mi scias; nu, ŝi antaŭ nelonge—" kaj li ĉesis.

"Ŝi antaŭ nelonge," ekkriis maljuna Fischer, "malfermis la pordojn de sia patra domo al kanajla Socialisto, kiu malkaŝe diras, ke li ŝtelus ion ajn de pli riĉa viro. Jen la fino! Jen tie ĉi la pli riĉa viro—kaj ne plu pli riĉa."

"Se vi deziras havi la internaĵon de mia kapo, tion vi povas," diris Brown iomete lace. "Kiom ĝi valoras vi povos kalkuli pli poste. Sed la unua aĵo kiun mi trovas en tiu neofte uzata poŝo estas tio ĉi: ke homoj, kiuj intencas ŝteli diamantojn ne parolas socialiste. Pli ofte," li aldonis modeste, "ili emas ĝin denunci."

La aliaj ambaŭ ekmoviĝis abrupte kaj la pastro daŭrigis; "Vi komprenu, ni konas tiujn homojn pli-malpli. La socialisto ne ŝtelus diamanton, kiel ankaŭ li ne ŝtelus piramidon. Ni devus tuj ekzameni la solan viron, kiun ni ne konas. La ulo aktorante policanon—Florian. Ĝuste kie li estas en tiu ĉi momento, mi scivolas."

La pantomimisto ekstaris rekte kaj paŝis el la ĉambro. Sekvis interludo, dum kiu rigardegis la milionulo la pastron kaj la pastro sian brevieron; tiam revenis la pantomimestro kaj diris kun klakanta seriozeco, "La policano ankoraŭ kuŝas sur la scenejo. La kurteno jam leviĝis kaj malleviĝis ses fojojn; li tie ankoraŭ kuŝas."

Pastro Brown lasis defali sian libron kaj staris rigardegante kun mieno de nigra mensa ruiniĝo Tre malrapide montriĝis denove en liaj grizaj okuloj lumo kaj tiam li faris respondon apenaŭ atenditan.

"Pardonon mi petas, kolonelo, sed kiam mortis via edzino?"

"Mia edzino" respondis la rigardeganta soldato, "ŝi mortis antaŭ

dek monatoj. Ŝia frato James alvenis ĝuste unu semajnon tro malfrue por ŝin vidi.”

La malgranda pastro eksaltis kiel trapafita kuniklo. ”Rapidu! Ni devas iri kaj ekzameni tiun policanon.”

Ili kuregis sur la nuntempe kurtenitan scenejon, sin puŝante malĝentile inter la kolombinon kaj klaŭnon (kiuj ŝajne tute kontente interflustradis), kaj Pastro Brown kurbiĝis super la sternita komika policano.

”Kloroformo,” li diris, leviĝante; ”Mi nur ĵus divenis tion.”

Estis surprizita silento kaj tiam diris la kolonelo malrapide, ”Bonvolu klarigi serioze kion ĉio signifas.”

Pastro Brown subite kriegis pro ridado, tiam ĉesis kaj nun luktadis kontraŭ ĝi dum la cetero de sia parolado. ”Sinjoroj,” li elspasmis, ”ne estas multe da tempo por parolado. Mi devas postkuri la krimulon. Sed tiu ĉi granda franca aktoro, kiu ludis la rolon de policano—tiu ĉi lerta kadavro kun kiu la arlekeno valsis kaj balanciĝis kaj kiun li ĵetis tien kaj tien ĉi—li estis—” Lia voĉo denove forlasis lin kaj li sin turnis por kuri.

”Li estis?” alvokis Fischer demandeme.

”Vera policano,” diris Pastro Brown kaj forkuris en la mallumon.

Troviĝis kavaĵoj kaj laŭboj ĉe la plej malproksima parto de tiu foli plena ĝardeno, en kiuj la laŭroj kaj aliaj senmortaj arbustoj sin montris kontraŭ ĉielo safira kaj luno arĝenta; eĉ dum tia mezvintro, varmaj koloroj estis tie kvazaŭ de la sudo. La verda gajeco de la sin svingantaj laŭroj, la forta purpura indigoto de la nokto, la luno kiel monstra kristalo, faras preskaŭ senrespondece romantikan bildon; kaj inter la plej altaj branĉoj de la ĝardenaj arboj grimpas stranga figuro, kiu aspektas ne tiom romantika kiom neebla. Li briletadas de la kapo ĝis la kalkanoj kvazaŭ vestita de dek milionoj da lunetoj; la vera luno respuguliĝas de li je ĉiu movo kaj bruligas de

li ĉiun colon. Sed li svingiĝas, elbrilanta kaj sukcesplena, de la malalta arbo en tiu ĉi ĝardeno al la alta dise kreskinta arbo en la alia, kaj nur haltas tie, ĉar ombro estas glitinta sub la pli malgrandan arbon kaj estas klare lin alvokinta.

”Nu, Flambeau,” diras la voĉo, ”vi vere aspektas kiel Fluganta Stelo; sed tio ĉiam signifas Falantan Stelon en la fino.”

La arĝenta briletanta figuro supre, ŝajne kurbiĝas antaŭen inter la laŭroj kaj, memfida pri forkuro, aŭskultas la malgrandan figuron malsupre.

”Vi neniam faris ion pli bone, Flambeau. Estis lerte veni de Kanado (per Pariza bileto supozeble) ĝuste unu semajnon post sinjorino Adams mortis, kiam neniu emus fari demandojn. Estis pli lerte, ek trovi la Flugantajn Stelojn kaj la precizan tagon kiam Fischer venos. Sed estas neniam lerteco, nur genieco, pri kio sekvis. Ŝteli la ŝtonajn estis, kiel mi supozas, bagatelo por vi. Vi povus tion fari per manlerteco laŭ cent aliaj manieroj krom per la ŝajnigo alfiksi pape-ran azenvoston al la jako de Fischer. Sed farante la ceteron vi vin eklipsis.”

La arĝenta figuro inter la verdaj folioj ŝajne hezitas kvazaŭ hipnotigita, kvankam restas malantaŭ li facila forkuro; li rigardegas la viron sube.

”Ho jes,” diras la viro sube, ”Mi ĉion scias pri tio. Mi scias, ke vi ne nur okazigis la pantomimon sed uzis ĝin por du celoj. Vi intencis forŝteli la ŝtonojn senbrue; venis novaĵo per kunkrimulo, ke vi estas jam suspektata kaj ke alvenas kapabla policoficiro por vin elserĉi tiun saman nokton. Ordinara ŝtelisto estus dankema pro la averto kaj forkurus; sed vi estas poeto. Vi jam havis la lertan ideon kaŝi la juvelojn inter la brilego de falsaj scenejaj juveloj. Nu, vi ekkomprenis, ke se la vestoj estos arlekenaj, la apero de policano estos tute en bona ordo. La inda oficiro eliris de la policejo en Putney

por vin eltrovi kaj marŝis en la plej strangan kaptilon iam metitan en la mondo. Kiam malfermiĝis la antaŭaj pordoj li marŝis rekte sur la scenejon de Knistnaska pantomimo, kie li povus esti piedbatata, klabata, senkonsciigata kaj drogata de la dancanta arlekeno, inter la ridegoj de ĉiuj plej respektindaj homoj de Putney. Ho, neniam vi faros ion pli bone. Kaj nun, cetere, vi povas redoni al mi tiujn diamantojn.”

La verda branĉo sur kiu svingiĝis la briletanta figuro, sursuris kvazaŭ de mirego; sed la voĉo daŭrigis:

”Mi deziras, ke vi redonu ilin, Flambeau, kaj mi deziras, ke vi forlasu tian ĉi metion. Restas ankoraŭ en vi juneco kaj honoro kaj humoro; ne imagu al vi, ke ili daŭros en tiu metio. Homoj povas elteni ian nivelon de boneco, sed neniu homo iam povis elteni sur unu nivelo de malboneco. Tiu vojo iras malsupren kaj malsupren. Viro bonanima drinkas kaj fariĝas kruela; malkaŝema viro mortigas kaj pri tio mensogas. Multaj viroj konitaj de mi komenciĝis kiel vi, kiel honestaj proskripciitoj, gajaj rabistoj de la riĉuloj kaj finiĝis piedbatitaj en la koton. Maurice Blum ekiris kiel anarkiisto de principo, patro de al malriĉuloj; li finiĝis grasa spionisto kaj denunciisto, kiun uzis ambaŭ partioj kaj malestimis. Harry Burke fondis sian movadon por libera mono, sufiĉe sincere; nuntempe li parazitias sur duone malsatigata fratino por senfinaj konjako kaj sodakvoj. Lordo Amber eniris la troliberan societatan mondon kun ia kavalireco; nuntempe li pagas ĉantaĝon al la plej malestimindaj vulturoj en Londono. Kapitano Barillon estis la granda sinjoro-rabisto antaŭ via tempo; li mortis en frenezulejo, kriegante pro timo de la ŝtelistperantoj kaj ricevistoj, kiuj lin estis perfidintaj kaj postĉasintaj ĝismorte. . . . Mi scias, ke la arbaroj ŝajnas tre liberaj malantaŭ vi, Flambeau; mi scias, ke ekbrile vi povus malaperi en ilin kiel simio. Sed iun tagon vi estos maljuna, griza simio, Flambeau. Vi sidas alte en

via libera arbaro, malvarma ĉe la koro kaj apud la morto, kaj la arb-pintoj estos tre nudaj.”

Ĉio restis silenta, kvazaŭ la malgranda viro malsupre tenis la alian en la arbo per iu longa nevidebla tenŝnuro; kaj li daŭrigis:

”Viaj malsuprenaj paŝoj jam komenciĝis. Vi antaŭe fanfaronis, ke vi neniam faras ion malnoblan, sed ĉi nokte vi faras ion malnoblan. Vi postlasas suspekton ĉe honesta knabo, kiu jam havas sufiĉon kontraŭ si; vi disigas lin de la virino, kiun li amas kaj kiu amas lin. Sed vi faros agojn pli malnoblajn ol tio antaŭ ol vi mortos.”

Tri brilantaj diamantoj falis de la arbo al la herbo. La malgranda viro kliniĝis por preni ilin kaj kiam li suprenrigardis denove la verda arba kaĝo estis forlasita de sia arĝenta birdo.

La redono de la gemoj (hazarde trovitaj de Pastro Brown—kia surprizo, ke li el ĉiu) finis la vesperon kun ridega triumfo; kaj Sir Leopold, je la plej alta nivelo de sia bonanimeco, eĉ diris al la pastro, ke, kvankam li mem havas pli ampleksajn opiniojn, li povas respekti tiujn kies kredo devigas al ili esti for-klostrataj kaj sen scio pri tiu ĉi mondo.

LA NEVIDEBLA VIRO

En la malvarma blua krepusko de du krutaj stratoj en la Londa kvartalo Camden Town, la butiko ĉe angulo, sukeraĵejo, brilis kiel la fajneto ĉe l'fino de cigaro. Eble oni devus pli ĝuste diri, kiel la fino de piroteknikaĵo, ĉar la lumo estis multkolora kaj iomete malsimpla, estante disrompita de multaj speguloj kaj saltanta sur multaj orumitaj kaj gajkoloraj kukoj kaj frandaĵoj. Antaŭ tiu ĉi fajra fenestro estis algluitaj la nazoj de multaj stratbubaĉoj, ĉar la ĉokoladoj estis ĉiuj envolvitaj en tiuj ruĝaj kaj oraj kaj verdaj metalaj koloroj, kiuj estas preskaŭ pli bonaj ol ĉokolado mem; kaj la grandega blanka edziĝkuko en la fenestro estis iel samtempe malproksima kaj kontentiga, ĝuste kvazaŭ la tuta Norda Poluso estus bona manĝaĵo. Tiaj ĉielarkaj incitoj povis nature kolektigi la junularon de la proksimeco ĝis la aĝo de dek aŭ dek du jaroj. Sed tiu ĉi angulo estis ankaŭ alloga por pli aĝaj junuloj; juna viro, de ne malpli ol dudek kvar jaroj, rigardegis en la saman butik-fenestron. Por li ankaŭ, la butikoj estis fajre ĉarma, sed tiu ĉi allogo estis ne tute klarebla per ĉokoladoj, kiujn tamen li tute ne malestimis.

Li estis longa, dika, ruĝhara junulo, kun decidema vizaĝo sed malvigla maniero. Li portis subbrake ebenan, grizan paperujon plenan je krajonkizoj, kiajn li estis vendintaj pli-malpli sukcese al eldonistoj post lia onklo (kiu estis admiralo) lin senheredigis pro socialismo, pro prelego donita de li kontraŭ tiu ekonomia teorio. Lia nomo estis John Turnbull Angus.

Enirante fine, li marŝis tra la sukeraĵvendejo en malantaŭan ĉam-

bron, kiu estis ia frandaĵ-restoracio, nun levante la ĉapelon al la juna fraŭlino, kiu tie servis lin. Ŝi estis nigreta, eleganta, vigla knabino vestita nigre, kun forta vizaĝkoloro kaj tre viglaj, nigraj okuloj; post la kutima intertempo ŝi lin sekvis en la internan ĉambron por ricevi lian mendon.

Lia mendo estis evidente mendo kutima. "Mi deziras, bonvolu," li diris precize, "unu duonpencan kuketon kaj malgrandan tason da nigra kafo." Kaj antaŭ ol la knabino povis sin forturni li aldonis, "Ankaŭ, mi deziras, ke vi edziniĝu kun mi."

La juna fraŭlino de la butikio subite rigidiĝis kaj diris, "Tiaj estas ŝercoj kiajn mi ne permesas."

La ruĝhara junulo levis grizajn okulojn de neatendita seriozo.

"Vere kaj vere," li diris, "estas serioze—tiel serioze kiel la duonpenca kuketo. Estas multekoste, kiel la kuketo; oni pagas por ĝi. Estas nedigestebla kiel la kuketo. Dolorigas."

La nigretulino estis neniam forpreninta de li siajn nigrajn okulojn, sed ŝajnis studadi lin kun preskaŭ tragedia precizeco. Ĉe l'fino de sia ekzameno ŝi ridetis kaj eksidis en seĝon.

"Ĉu vi ne opinias," rimarkis Angus distre, "ke estas iomete kru-
ele manĝi tiujn ĉi duonpencajn kuketojn? Kreskinte, ili eble fariĝus unupencaj kuketoj. Mi forlasos tiujn ĉi kruelegajn sportojn kiam ni estos geedzoj."

La nigretulino leviĝis el sia seĝo kaj marŝis al la fenestro evidente en stato de forta sed ne malsimpatia pensado. Kiam fine ŝi sin ekturnis denove kun mieno decidoplena, ŝi konfuziĝis ekvidante, ke la junulo jam zorge aranĝis sur la tablo diversajn objektojn el la butikfenestro. Inter tiuj ĉi estis piramido da helkoloritaj sukeraĵoj, kelkaj teleroj da sandviĉoj kaj la du karafoj enhavantaj tiun misteran portovinon kaj ŝereon kiuj estas la propraĵo de pastaĵkuiristoj. Mezen de tiu ĉi bonordigita aranĝaĵo li zorge demetis la grandegan

ŝarĝon de blanka sukerkovrita kuko, kiu estis la ĉefornamaĵo de l'fenestro.

"Kion ajn vi faras?" ŝi demandis.

"Devon, kara Laura mia," li komencis.

"Ho, pro Dio, haltu momenton," ŝi kriis, "kaj ne alparolu min tiel. Mi volas diri, kio estas ĉio tio?"

"Ceremonia festeno, fraŭlino Hope."

"Kaj kio estas tio?" ŝi demandis senpacience, indikante la sukermon-ton.

"Edziĝkuko, sinjorino Angus," li diris.

La knabino alpaŝis al tiu objekto, forprenis ĝin kun iom da klakado, kaj remetis ĝin en la butikfenestron; ŝi tiam revenis kaj, apoginte siajn elegantajn kubutojn al la tablo, rigardadis la junulon ne malfavore sed kun sufiĉe da agaco.

"Vi ne permesas al mi tempon por pripensi," ŝi diris.

"Mi ne estas tia stultulo," li respondis; "jen mia kristana humileco."

Ŝi ankoraŭ rigardadis lin; sed ŝi estis fariĝinta multe pli serioza malantaŭ la rideto.

"Sinjoro Angus," ŝi diris firme, "antaŭ ol estos unu minuto pli da tiu ĉi sensencaĵo mi devas klarigi al vi ion pri mi mem, kaj kiel eble plej mallonge."

"Plezurege," respondis Angus serioze. "Vi povas bone diri al mi ion pri mi mem ankaŭ, dum vi tion faras."

"Ho silentu kaj aŭskultu," ŝi diris. "Temas pri nenio pri kio mi hontas, kaj eĉ ne estas io pri kio mi estas aparte bedaŭrema. Sed kion vi dirus se estus io, kio ne estas mia afero, tamen estas por mi inkubo?"

"Tiaokaze," diris la viro serioze, "mi proponus ke vi reportu la kukon."

”Nu, antaŭ ol tio vi devas aŭskulti mian rakonton,” diris Laura persisteme. ”Komence, mi devas klarigi al vi, ke mia patro posedis la gastejon nomitan ‘La Ruĝa Fiŝo’, en Ludbury, kaj mi servis ĉe la trinktabulo.”

”Mi ofte scivolis,” li diris, ”kial troviĝas speco de Kristana etoso en tiu ĉi sola sukeraĵejo.”

”Ludbury estas dormema urbeto en la orientaj graflandoj, kaj la solaj homoj kiuj iam alvenis al ‘La Ruĝa Fiŝo’ estis komercaj vojaĝistoj de tempo al tempo, kaj la aliaj estis la plej teruraj homoj ie videblaj, sed vi iun neniam vidis. Mi volas diri, malgrandaj senokupuloj, vestitaj en malbonaj vestaĵoj kiuj estis tro bonaj por ili, kiuj posedis nur sufiĉe por vivi, kaj havis nenion por fari krom sin apogi al la trinktabulo kaj vetadi pri ĉevaloj. Eĉ tiuj ĉi mizeraj sentaŭguloj ne estis tre oftaj ĉe nia domo; estis tamen du, kiuj estis multe tro oftaj—ĉiel tro oftaĉaj. Ili ambaŭ vivadis per sia propra mono kaj ili estis tede senokupaj kaj tro-vestitaj. Tamen mi ankoraŭ iomete kompatis ilin, ĉar mi duone kredas, ke ili kaŝeniris en nian malplenan trinkejon ĉar ili ambaŭ havis malgrandan misformaĵon, tia kian iuj kamparanoj mokridas. Tamen ne estis ĝuste misformaĵo; pliĝuste ĝi estis strangeco. Unu el ili estis mirige mallonga viro, kiel nano aŭ almenaŭ kiel ĵokeo. Li estis tute ne ĵokea laŭ aspekto tamen; li havis sferan nigran kapon kaj bone tonditan barbon, helajn okulojn kiel birdaj; li tintadigis monon en la poŝoj; li tintadigis dikan oran ĉeneton; kaj li neniam aperis se ne vestita ĝuste tro sinjorece por esti sinjoro. Li tamen estis nenia stultulo, kvankam vana mallaboremulo; li estis strange lerta pri ĉiaj aferoj, kiaj ja neniam povus iel utili; speco de improvizita ĵonglado; kaŭzi ke dek kvin alumetoj ekbruligu unu la alian kiel vera piroteknikaĵo; tranĉi bananon aŭ ion alian kaj fari el ĝi dancpupon. Ties nomo estis Isido-

re Smythe; mi povas lin ankoraŭ vidi, kun lia nigreta vizaĝo, alvenanta al la tabulo kaj faranta saltantan kanguruon el kvin cigaroj.

”La alia ulo estis pli silentema kaj pli ordinara; sed iel li malkvietigis min multe pli ol kompatinda malgranda Smythe. Li estis tre alta kaj maldika kaj blonda; lia nazo estis longa kaj li eĉ ŝajnus belegra laŭ ia fantoma maniero; sed li terure strabis, pli ol iu ajn vidita aŭ priaŭdita de mi. Kiam li alrigardis vin rekte, vi ne sciis kie vi mem estas, kaj certe ne kion li rigardas. Mi imagas, ke tiu ĉi difektaĵo maldolĉigis iomete la kompatindan homon; ĉar dum Smythe estis ĉie preta prezenti siajn amuzaĵojn, James Welkin (tia estis la nomo de l’strabulo) neniam faris ion krom drinkadi en nia trinksalono, kaj entrepreni longegajn vagadojn sola en la ebenan, grizan kamparon tute ĉirkaŭe. Malgraŭ tio, mi kredas, ke Smythe ankaŭ estis sentema pri sia malgranda alteco, kvankam li elportis tion pli memfide. Kaj tiel okazis, ke mi estis vere perpleksita, kaj ankaŭ timigita kaj tre bedaŭrema kiam ili ambaŭ proponis al mi edziniĝon en la sama semajno.

”Nu, mi faris ion, kion mi poste opiniis kiel eble plej malsaĝa. Sed malgraŭ ĉio, tiuj ĉi nenormaluloj estis iel amikoj miaj; mi timegis ke ili ekpensus, ke mi rifuzis ilin pro la efektiva kialo, kiu estis ke ili estis ambaŭ tiel terure malbelaj. Do, mi kunmetis ian sensencaĵon ke mi neniam intencas edziniĝi kun iu ajn, kiu ne estas elhakinta por si mem vojon en la mondo. Mi diris, ke estas principo ĉe mi, ne vivadi per mono nure heredita kiel ilia. Du tagojn post ol mi estis tiel bonintence poralinta, komenciĝis la tuta malfeliĉo. Unue mi ekaŭdis, ke ili ambaŭ estas foririntaj por serĉi fortunon, kvazaŭ ili estus en ia idiota ferakonto.

”Nu, nek unu nek la alian mi vidis de tiu tago ĝis nun. Sed mi ricevis de la malgranda viro nomita Smythe, du leterojn, kaj vere ili estis iome ekscitigaj.”

”Ĉu iam vi priaŭdis la alian?” demandis Angus.

”Ne, li neniam skribis,” diris la knabino post mallonga hezito. ”La unua letero de Smythe nur klarigis, ke li estas komencinta la marŝadon al Londono kune kun Welkin; sed Welkin estis tia bona marŝanto, ke la malgranda viro forlasis lin kaj ripozis iomete flanke de l’vojo. Okazis, ke iu vojaĝanta cirko alprenis lin, kaj parte pro la fakto, ke li estis preskaŭ nano kaj parte pro tio ke li estis vere lerta kanajleto, li bone prosperis en la cirka afero kaj estis baldaŭ sendita al la Akvario, por prezenti kelkajn ĵonglaĵojn, kiujn mi forgesas. Tio estis lia unua letero. Lia dua estis multe pli maltrankviliga, kaj mi ĝin ricevis nur lastan semajnon.”

La viro nomita Angus malplenigis sian kaftason kaj rigardis ŝin per mildaj kaj paciencaj okuloj. Ŝia propra buŝo iomete tordiĝis pro rido dum ŝi daŭrigis, ”Mi supozas, ke vi estas vidinta sur la reklamtabuloj ĉion pri tiu ĉi ‘Smytha Silenta Servado?’ Se ne, vi estas nepre la sola persono, kiu ĝin ne vidis. Ho, mi ne multe scias pri tio, estas ia risortmekanisma eltrovaĵo por fari ĉiun mastrumadon permaŝine. Vi scias kia ĝi estas: ‘Enpremu Butonon—Servisto kiu Neniam Drinkas.’ ‘Turnu Anson—Servistinoj kiuj Neniam Flirtas.’ Vi nepre vidis la reklamojn. Nu, kiaj ajn tiaj maŝinoj estas, ili gajnas amasojn da mono; kaj ili ĝin gajnas ĉion por tiu diableto, kiun mi konis tie en Ludbury. Mi ne povas ne ĝoji, ke la kompatindulo bone prosperas; sed fakte mi timegas pro tio, ke li iu ajn minuton ekaperos kaj diros al mi ke li jam trahakis por si vojon en la mondo... kion li ja faris.”

”Kaj la alia viro?” rediris Angus kun ia obstina trankvileco.

Laura Hope subite ekstaris. ”Mia amiko,” ŝi diris, ”Mi kredas, ke vi estas sorĉisto. Jes, vi tute pravas. Mi ne estas vidinta eĉ linion de ties skribaĵo; mi ne havas ideon pli ol la mortintoj pri kie ajn li troviĝas. Sed estas pro li, ke mi timas. Estas li, kiu ĉirkaŭas mian tutan

vivon. Estas li, kiu duone frenezigis min; ĉar mi lin sentis, kie li ne povis esti, kaj mi aŭdis lian voĉon kiam li ne povis esti parolinta.”

”Nu karulino mia,” diris la junulo gaje, ”se li estus eĉ Satano mem, ĉio estas jam finita ĉe li, ĉar vi pridiris al iu. Oni freneziĝas sola, knabinjo. Sed kiam vi imagis, ke vi sentas kaj aŭdas nian strabantan amikon?”

”Mi aŭdis James Welkin ridi tiel klare kiel mi nun aŭdas vin paroli,” diris la knabino sobre. ”Neniu ĉeestis, ĉar mi estis staranta ĝuste ekster la butiko ĉe la angulo kaj mi povis trarigardi ambaŭ stratetojn samtempe. Mi estis forgesinta kiamaniere li ridis, kvankam lia ridado estis tiel stranga kiel lia strabo. Mi ne estis lin pripensinta dum preskaŭ jaro. Sed serioze, estas veraĵo, ke post kelkaj sekundoj alvenis la unua letero de lia rivalo.”

”Ĉu vi iam ajn paroligis aŭ fajfetigis la fantomon iel? ” iome interesita.

Laura subite ekremis, kaj tiam diris, per voĉo neŝancelita, ”Jes. Ĝus kiam mi finis la legadon de la dua letero de Isidore Smythe kiu anoncis lian sukceson, ĝuste tiam, mi aŭdis Welkin diri, ‘Tamen li ne posedos vin.’ Ĝi estis tute klara, kvazaŭ li estus en la ĉambro. Estas terure; mi kredas, ke mi estas nepre freneza.”

”Se vi vere estus freneza,” diris la junulo, ”vi kredus, ke vi estas tute cerbsana. Sed certe ŝajnas esti io iomete stranga pri tiu ĉi nevidita sinjoro. Du kapoj estas pli bonaj ol unu... mi indulgos vin pri aludoj al iuj ajn aliaj organoj... kaj vere, se vi permesus al mi, kiel fortika praktika viro, reporti la edziĝkukon el la fenestro. . . .”

Eĉ dum li parolis, okazis ŝtala krio en la strato ekstere, kaj malgranda aŭto veturigata je speco de diabla rapideco, sin pafis ĝis la enirejo de l’butiko kaj tie fiksiĝis. En la sama tempo malalta viro kun brilanta cilindro-ĉapelo staris piedbatante la plankon en la ekstera ĉambro.

Angus, kiu ĝisnune estis sinteninta kun ridema facileco pro cerb-higienaj motivoj, malkaŝis la streĉon de sia animo, paŝante abrupte el la interna ĉambro kaj kontraŭstarante la ĵusalveninton. Ekrigardo al li sufiĉis por subteni la duonfrenezan divenadon de viro amanta. Tiu ĉi tre eleganteta sed nana figuro, kun pinto el nigra barbharo, impertinente antaŭenŝovita, la lertaj malkvietaj okuloj, la netaj sed nervemaj fingroj, povis esti neniuj aliaj krom de la ĵus priskribita viro; Isidore Smythe, kiu faris pupojn el bananŝeloj kaj alumetujoj; Isidore Smythe, kiu faris milionojn per nedrinkemaj servistoj kaj neflirtemaj servistinoj metalaj. Dum unu momento ambaŭ viroj, komprenante instinkte la posedvolan mienon unu de la alia, rigardegis unu la alian kun tiu stranga malarda bonkoreco, kiu estas la vera animo de rivaleco.

Sinjoro Smythe tamen tute ne aludis al la vera kaŭzo de ilia mal-amikeco, sed diris simple kaj eksplode. "Ĉu fraŭlino Hope estas tion vidinta sur la fenestro-vitro?"

"Sur la fenestro?" rediris Angus rigardegante.

"Tempo ne sufiĉas por klarigi aliajn aferojn," mallonge diris la malaltulo. "Okazas tie ĉi ia sensencaĵo, kiu devas esti esplorata."

Li indikis per sia polurita bastono la fenestron ĵus malplenigita pro la edziĝaj preparadoj de sinjoro Angus; kaj tiu sinjoro estis mirigata, ekvidante algluitan sur la ekstera parto de la vitro, longan paperstrion, kiu certe ne estis tie kiam li trarigardis ĝin antaŭ iom da tempo. Sekvante la energiplenan Smythe eksteren sur la straton, li eltrovis, ke proksimume metro kaj duono da poŝtmarkpapero estas zorgoplene algluita al la ekstera vitro, kaj skribite sur ĝi per disvagantaj literoj estis: "Se vi edziniĝos kun Smythe, vi mortos."

"Laura," diris Angus, enŝovante la grandan ruĝan kapon en la butikon, "Vi ne estas freneza."

"Estas la skribaĵo de tiu fripono Welkin," diris Smythe malafa-

ble. "Mi ne vidis lin dum jaroj sed li konstante ĝenas min. Kvin foj-ojn en la lastaj du semajnoj li postlasigis ĉe mia apartamento mina-cajn leterojn, kaj mi eĉ ne povas eltrovi kiu postlasas ilin, kaj tute ne, se estas Welkin mem. La pordisto de la apartamenta domo ĵu-ras ke neniu suspektindaj personoj estas viditaj, kaj jen li estas al-gluinta borderon al la fenestro de publika butikoj, dum la personoj en la butikoj. . . ."

"Jes tute," diris Angus modeste, "dum la personoj en la butikoj temanĝis. Nu, sinjono, mi povas certigi al vi, ke mi estimas vian prudentecon tiel rekte pritrakti la aferon. Ni povos priparoli aliajn aferojn pli poste. La fripono ne povas esti jam malproksima, ĉar mi ĵuras, ke estis tie nenia papero kiam mi lastfoje iris al la fenestro, antaŭ dek aŭ dekkvin minutoj. Aliflanke, li estas tro malproksima por esti ĉasata, ĉar ni ne scias la direkton. Se vi sekvas mian kon-silon, Sinjoro Smythe, vi tuj transdonos tion ĉi al iu energiplena enketisto, privata prefere ol publika. Mi konas viron treege lertan, kiu havas oficejon kvin minutojn de tie ĉi per via aŭto. Lia nomo estas Flambeau, kaj kvankam lia juneco estis iomete tumulta tamen nun li estas rigide honesta viro kaj liaj kapablecoj valoras monon. Li loĝas en Lucknow Apartamentejo, Hampstead."

"Estas strange," diris la malgranda viro, kurbante la nigrajn bro-vojn. "Mi mem loĝas tie, en Himylaya Apartamentejo preter la ang-ulo. Eble vi ŝatus kuniri kun mi; mi povos iri al miaj ĉambroj por elsenĉi tiujn ĉi strangajn Welkin dokumentojn, dum vi rapidas kaj venigas vian amikon la detektivon."

"Vi estas tre afabla," diris Angus ĝentile, "Nu, ju pli baldaŭ ni agu, des pli bone."

Ambaŭ viroj, kun stranga speco de improvizita justeco, same formale adiaŭis la fraŭlinon kaj ambaŭ ensaltis en la rapidan aŭte-ton. Dum Smythe prenis la gvidilojn kaj ili ĉirkaŭiris la longan stra-

tangulon, Angus amuziĝis vidante gigantan reklamon pri "Smythe Silenta Servado", kun bildo de grandega senkapa fera pupo, portante kaserolon kun la noto, "Kuiristino Kiu neniam Koleretas."

"Mi uzas ilin en mia propra apartamento," diris la malgranda nigrabarbulo, ridante, "parte kiel reklamon kaj parte pro vera oportuneco. Honeste kaj malkaŝe, tiuj grandaj risortpupoj miaj efektive alportas karbon aŭ bordovinon aŭ hortabelon pli rapide ol iuj ajn vivantaj servistoj iam konataj de mi, se vi konas la premendan tuberon. Sed mi neniam neos, inter ni, ke tiaj servistoj donas maloportunojn ankaŭ."

"Efektive?" diris Angus; "ĉu estas io, kion ili ne povas fari?"

"Jes," respondis Smythe trankvile; "ili ne povas diri al mi, kiu postlasis tiujn minacajn leterojn ĉe mia apartamento."

Lia aŭto estis malgranda kaj rapida kiel li mem; efektive, kiel lia mastrumada servo, ĝi estis lia propra eltrovaĵo. Se li estis reklamema ĉarlatano, li estis tia, kia fidis al siaj propraj varoj. La koncepto pri io malgrandega kaj fluganta estis pli emfazata dum ili kurbiĝis laŭ longaj blankaj kurbovoj en la sen viva sed larĝa vespera taglumo. Baldaŭ la blankaj kurbaĵoj fariĝis pli abruptaj kaj pli kaptur-nigaj; ili estis sur suprenirantaj spiraloj, kiel oni diras en la modernaj religioj. Ĉar efektive ili estis grim pantaj angulon de Londono, kiu estas preskaŭ tiel kruta kiel Edinburgo, eĉ se ne tiel pitoreska. Teraso leviĝis super teraso kaj la aparta apartament-turo, kiun ili serĉis, superstaris ilin ĉiujn en preskaŭ egipta alteco, orumata de la horizontala sunsubiro. La ŝanĝo, dum ili ĉirkaŭiris la angulon kaj eniris la kresenton nomita Himilaya apartamentejo, estis tiel abrupta kiel la ekmalfermo de fenestro; ĉar ili trovis tiun apartamentan amason sidanta super Londono kvazaŭ super verda maro el ardezo. Kontraŭ la domegoj, aliflanke de la grua kresento, troviĝis arbusta enfermaĵo, pli simila al kruta heĝo aŭ digo ol al ĝardeno, kaj

iomete pli malsupre de tio estis strio da artefarita akvo, ia kanalo, kiel ĉirkaŭfosaĵo por tiu enlaŭbigita fortikejo. Dum la aŭto ĉirkaŭiris la kresenton ĝi pasis, ĉe unu angulo, la hazardan ĉaron de kaŝtanvendisto; kaj malproksime ĉe la alia fino de la kurbaĵo, Angus povis vidi malklaran bluan policanon malrapide marŝanta. Tiuj ĉi estis la solaj homaj figuroj en tiu alta antaŭurba soleco; sed li havis neracian senton, ke ili esprimas la senvortan poezion de Londono. Li sentis kvazaŭ ili estas la karakteroj de rakonto.

La malgranda aŭto ekalvenis ĝuste ĝis la ĝusta domo kiel kuglo, kaj elŝutis sian posedanton kiel bombon. Li estis tuj demandanta al altkreska pordisto en brilanta pasamento kaj al malalta portisto sen jako, ĉu iu aŭ io estas serĉinta lian apartamenton. Oni certigis al li, ke neniu kaj nenio estas pasinta tiujn ĉi oficistojn de kiam li lastafoje enketis; je kio li kaj la iomete konfuzita Angus estis suprenpafataj en la lifto kiel raketo, ĝis la plej supra etaĝo.

”Eniru do momenton,” diris la senspira Smythe. ”Mi deziras montri al vi tiujn Welkin leterojn. Tamen vi rapidu preter la angulo kaj alvenigu vian amikon.” Li enpremis tuberon kaŝitan en la muro kaj la pordo malfermiĝis per si mem.

Ĝi donis eniron al longa, spaca, antaŭĉambro, en kiu la solaj atentigaj detaloj, ordinare paroli, estis la vicoj de altaj duon-homaj mekanismaj figuroj kiuj staris ambaŭflanke kiel tajloraj modeloj. Kiel tajloraj modeloj ili ankaŭ estis senkapaj; kiel tajloraj modeloj ili havis belegan nenecesan ĝibemon ŝultre, kaj kolombo-brustan elstaraĵon torake; sed krom tio ili ne plimulte similis al homa figuro ol iu ajn aŭtomata maŝino en stacidomo, kiu havas proksimume homan altecon. Ili havis du grandajn hoksimihajn brakojn por la portado de pletoj; kaj ili estis pizvende koloritaj aŭ punce aŭ nigre por distinga oportuneco; ĉiel krome ili estis nun aŭtomataj maŝinoj kaj neniu estus ilin dufojojn rigardinta. Ĉi foje almenaŭ efektive

neniu tion faris. Ĉar inter la du vicoj de tiuj ĉi mastrumadaj figuraĵoj kuŝis io multe pli interesa ol la plejparto da mekanismoj en la tuta mondo. Tio estis blanka, ĉifonita peco da papero kun ruĝinka skribaĵo; la facilmovema inventisto estis ĝin ekpreninta preskaŭ tuj kiam la pordo malfermiĝis. Li transdonis ĝin al Angus senvorte. La ruĝa inko sur ĝi estis efektive apenaŭ sekiĝinta kaj la mesaĝo estis: "Se vi ŝin hodiaŭ vizitis, mi mortigos vin."

Estis mallonga silento kaj tiam diris Isidore Smythe tre kviete, "Ĉu vi deziras iom da viskio? Sentas al mi, ke mi ŝatus."

"Dankon; mi ŝatus iom da Flambeau," diris Angus malgaje. "Ŝajnas, ke tiu ĉi afero fariĝas pli kaj pli grava. Mi tuj iras venigi lin."

"Bone," diris la alia, kun admirinda gajeco. "Venigu lin kiel eble plej baldaŭ."

Sed dum Angus fermis malantaŭ si la pordon, li vidis Smythe enpremi butonon, kaj unu el la risortaj figuroj glitis de sia loko laŭ sulko en la planko, portante pleton kun sifono kaj karafo. Ŝajnis ja esti io iomete stranga pri la postlaso de la malgranda viro sola inter tiuj senvivaj servistoj, kiuj estis viviĝantaj dum la pordo fermiĝis.

Ses ŝtupojn sub la interŝtupara plataĵo de Smythe, la viro en la ĉemizo estis faranta ion per sitelo. Angus haltis por igi lin doni promeson, subtenatan de mono, ke li tie restos ĝis kiam li revenos kun la detektivo, kaj atentos pri iu ajn fremdulo, kiu supreniros la ŝtuparon. Rapideginte malsupren al la ĉefpordo, li tiam tiel same instigis la pordiston al vigeleco. De tiu li sciiĝis pri la plisimpliga fakto, ke malantaŭa pordo ne ekzistas. Eĉ tiam nekontenta li kaptis la vagadantan policanon kaj persvadis lin stari kontraŭ la enirejo kaj ĝin observadi; kaj fine paŭzis momento por aĉeti kaŝtanojn por unu penco, kaj por fari demandon pri la kredebla daŭro de la ĉeesto de la komercisto en la distrikto.

La kaŝtanvendisto, levante la kolumon de sia surtuto, diris ke

kredeble li baldaŭ formoviĝos, ĉar li kredas, ke post nelonge ekneĝos. Efektive la vespero estis fariĝanta griza kaj mordante malvarma, sed Angus, per la tuto de sia elokventeco, poste sukcesis fiksi la viron al lia posteno.

”Varmigu vin per viaj propraj kaŝtanoj,” li diris serioze. ”Formanĝu la tutan stokon; mi rekompencos vin. Mi donos al vi oran funton se vi restos tie ĉi ĝis mia reveno, kaj tiam diru al mi ĉu iu ajn, viro aŭ virino aŭ infano estas enirinta en tiun domon kie staras la pordisto.”

Li tiam energie marŝis for, kun lasta ekrigardo al la sieĝata turo.

”Almenaŭ mi estas ĉirkaŭinta tiun ĉambron,” li diris. ”Ne povas esti, ke ĉiuj kvar el ili estu kunuloj de sinjoro Welkin.”

Lucknow apartamentejo estis, tiel diri, sur pli malalta plataĵo de tiu monteto el domoj, de kiu oni povus nomi Himilaya apartamentejon la pinto. La duon-oficiala apartamento de Flambeau troviĝis sur teretaĝo kaj prezentis ĉiurilate evidentan kontraston al la usona maŝinaro kaj malvarma, hotel-simila lukso de la apartamento de la Silenta Servado. Flambeau, kiu estis amiko de Angus, lin akceptis en rokoka artisteca ĉambro malantaŭ sia oficejo, en kiu la ornamaĵoj estis sabroj, arkebuzoj, orientaj kuriozaĵoj, flakonoj da italaj vinoj, sovaĝaj kuirpotoj, pluma persa kato, kaj malgranda kvazaŭ polvokovrita Romkatolika pastro, kiu ŝajnis esti en loko tute malĝusta.

”Jen mia amiko Pastro Brown,” diris Flambeau. ”Mi ofte deziris ke vi lin renkontu. Bonega vetero tiu ĉi; iomete malvarma por sudanoj kiel mi.”

”Jes, mi opinias, ke restos bone,” diris Angus sidiĝante sur pure striitan orientan divanon.

”Ne,” diris la pastro kviete, ”Ĵus ekneĝis.”

Kaj efektive dum li parolis, la kelkunuaj flokoj, antaŭviditaj de la kaŝtanviro, komencis bloviĝi preter la malheliĝanta fenestro.

”Nu,” diris Angus peze. ”Mi timas, ke tiu ĉi estas negoca vizito, kaj eĉ pri afero iomete maltrankviliga. La fakto estas, Flambeau, ke je tute negranda distanco de via domo troviĝas viro, kiu multe bezonas vian helpon; li estas senĉese hantata kaj minacata de nevidebla malamiko... fripono, kiun neniu iam eĉ vidis.” Dum Angus daŭrigis rakonti la tutan historion pri Smythe kaj Welkin, komenĉante per la rakonto de Laura kaj poste la sia, la supernatura ridado ĉe la angulo de du malplenaj stratoj, la strangaj, klaraŭditaj vortoj parolitaj en malplena ĉambro, Flambeau fariĝis pli kaj pli vigle atentema kaj la malgranda pastro estis ŝajne tute ellasita, kiel meblo. Kiam li ĝisatingis la skribaĉkovritan poŝtmarkpaperon gluita al la fenestro, Flambeau leviĝis, ŝajne plenigante la tutan ĉambron per siaj vastaj ŝultroj.

”Se vi ne malkonsentas,” li diris, ”mi opinias, ke estus pli bone se vi rakontus la restaĵon al mi sur la plej mallonga vojo al ties domo. Ŝajnas al mi, ke ne restas tempo perdebla.”

”Volonte,” diris Angus ankaŭ leviĝante, ”sed li estas sufiĉe sekura portempe, ĉar mi alpostenigis kvar virojn por gardi la solan truon de la tunelo.”

Ili eliris en la straton, la malgranda pastro sekve marŝetanta kun la obeeco de malgranda hundo.

Li nur diris, kun gaja maniero, kiel iu deziranta interparoladon, ”Kiom rapide la neĝo dikiĝas sur la tero.”

Dum ili traserpentis la krutajn flankvojojn jam de neĝo pudritaj, Angus finis sian rakonton; kaj kiam ili atingis la kresenton kun la altstarantaj apartamentejoj, li havis sufiĉe da tempo por turni la atenton al la kvar gardantoj. La kaŝtanvendisto, kaj antaŭ kaj post la transdono de l'ormonero, obstine ĵuris, ke li estas observinta la

pardon kaj vidinta neniun vizitanton eniri. La policano emfazis eĉ pli Li diris ke li estas sperta pri ĉiaj friponoj, en cilindroj kaj en ĉifonoj; li ne estas tiel "verda", ke li atendus, ke suspektinduloj ŝajnu suspektindaj; li observis por iu ajn, kaj ĉielo lin helpu, montriĝis neniuj. Kaj kiam ĉiuj tri viroj kolektiĝis ĉirkaŭ la orumita pordisto, kiu ankoraŭ staris ridetanta, forkstarante en la pordego, la verdikto estis eĉ pli definitiva.

"Mi rajtas demandi al iu ajn, duko aŭ ruboportisto, kion li serĉas en tiu ĉi konstruaĵo," diris la afabla kaj orgalonita giganto, "kaj mi ĵuros, ke neniuj estas tie ĉi al kiu demandi, de kiam tiu ĉi sinjoro foriris."

La malgrava Pastro Brown, kiu staris malantaŭe, modeste rigardante la trotuaron, tiam kuraĝis diri humile, "Ĉu neniuj do supren kaj malsupreniris la ŝtuparon de kiam la neĝo komencis defali? Komencis dum ni estis ĉiuj ĉe Flambeau."

"Neniuj venis tien ĉi, sinjoro, vi povas fidi al mi," diris la oficialulo, kun larĝridetanta aŭtoritateco.

"Mi scivolas nu, kio estas tio?" diris la pastro, kaj rigardegis al la tero senesprime kiel fiŝo.

La aliaj ĉiuj ankaŭ malsupren rigardis; kaj Flambeau eligis furiozan ekkrieton kaj faris francan geston. Ĉar estis nedubeble vere, ke tute laŭ la mezo de l'enirejo gardata de la oralonita viro, efektive inter la arogantaj forkitaj kruroj de tiu koloso, kuris ŝnursimila desegno el grizaj piedsignoj, stampitaj sur la blanka neĝo.

"Dio," kriis Angus nevole, "la Nevidebla Viro."

Sen plua vorto li sin turnis kaj supren kuregis la ŝtuparon, kaj Flambeau sekvis; sed Pastro Brown ankoraŭ restis ĉirkaŭenrigardante sur la neĝkovrita strato, kvazaŭ li estus perdinta ĉiun interenson pri sia demando.

Flambeau estis videble en humoro por disbati la pardonon per sia

granda ŝultro; sed la skoto, kun pli da racio, sed malpli da intuicio, palpis sur la pordokadro ĝis li trovis la nevideblan butonon; kaj la pordo malrapide malfermiĝis.

Montriĝis esence sama densa internaĵo; la ĉambrego estis fariĝinta pli malluma, kvankam tie kaj tie ĉi ĝi estis trapikata de la lastaj puncaj sagoj de la sunsubiro kaj unu aŭ du el la senkapaj maŝinoj estis movitaj el siaj lokoj por tiu aŭ tiu ĉi celo, kaj ĉirkaŭstaris jen kaj jen en la krepuska ĉambro. La verdo kaj ruĝo de iliaj jakoj estis ĉie malheligitaj de la mallumo, kaj ilia simileco al homaj formoj iomete plifortiĝis ĝuste pro ilia senformeco. Sed en la mezo, inter ili ĉiuj, ĝuste kie kuŝis la papero kun la ruĝa inko, kuŝis io alia, tre simila al ruĝinko verŝita el sia botelo. Sed tio ne estis ruĝinko.

Kun franca kombino de racio kaj perforto Flambeau nur diris, "Murdo!" kaj sin puŝinte en la apartamenton, estis ĝin plene de planko ĝis plafono esplorinta post kvin minutoj. Sed se li atendis eltrovi kadavron, tion li certe ne faris. Isidore Smythe simple ne estis tie, aŭ mortinta aŭ vivanta. Post serĉado plej furioza ambaŭ viroj renkontiĝis en la ekstera vestiblo, la vizaĝoj malsekaj kaj okuloj rigardegantaj.

"Amiko mia," diris Flambeau parolante franclingve pro ekscitiĝo, "la murdanto ne estas nur nevidebla, sed li ankoraŭ nevidebligas la murditan."

Angus ĉirkaŭen rigardis al la malluma ĉambro plena je figuraĵoj, kaj en iu kelta angulo de lia skota animo ekiris tremeto. Unu el la homgrandaj pupoj staris ĝuste super la sangomakulo, alvokita eble de la mortigita viro tuj antaŭ ol li falis. Unu el la ŝultroaltaj hokoj, kiuj utilis al la estaĵo kiel brakoj, estis iomete levita, kaj subite Angus naŭze imagis, ke Smythe estas falĉita de sia propra fera infano. Materio estis ribelinta, kaj tiuj ĉi maŝinoj estis mortigintaj sian mastron. Sed eĉ se jes, kion ili estis farintaj al li?

”Lin manĝintaj?” diris en lian oreilon la inkubo; kaj li naŭziĝis dum unu momento pro la ideo de ŝiritaj, homaj restaĵoj sorbataj kaj premataj en tiun sencerban mekanismon.

Li reakiris sian mensan sanecon per emfaza peno kaj diris al Flambeau, ”Do, jen ĝi estas. La kompatinda viro vaporiĝis for kiel nuboj kaj postlasis ruĝan strekon sur la planko. La afero ne apartenas al tiu ĉi mondo.”

”Restas ankoraŭ io farenda,” diris Flambeau, ”ĉu apartenas al tiu ĉi mondo aŭ la alia, mi devas foriri kaj paroli kun mia amiko.”

Ili malsupreniris, preterpasante la viron kun la sitelo, kiu denove asertis, ke li preterlasis neniun ajn entrudanton, ĝis la pordisto kaj la ĉirkaŭŝvebanta kaŝtanviro, kiuj neflekseble reasertis sian propran observemecon. Sed kiam Angus ĉirkaŭenrigardis por sia kvara konfirmanto li tiun ne povis vidi kaj kriis kun iom da nervemeco, ”Kie estas la policano?”

”Mi petas pardonon,” diris Pastro Brown, ”tio estas mia kulpo. Mi lin ĵus sendis foren laŭ la vojo por esplori ion... kion mi kredis esplorinda.”

”Nu, ni bezonas ties baldaŭan revenon,” diris Angus abrupte, ”ĉar la mizerulo supre ne estas nur murdita, sed ankaŭ forviŝita.”

”Kiel?” demandis la pastro.

”Pastro,” diris Flambeau post paŭzo, ”efektive mi kredas, ke estas afero pli de via fako ol la mia. Neniu, amiko aŭ malamiko eniris la domon, sed Smythe estas foririnta, kvazaŭ ŝtelite de feoj. Se tio ne estas supernatura, mi... .”

Dum li parolis ĉiu estis haltigata pro nekutima vidaĵo; la granda blua policano alvenis kurante, ĉirkaŭ la angulo de l’kresento. Li tuj alproksimiĝis al Brown.

”Vi pravas, sinjoro,” li elspasmis, ”oni ĵus trovis la korpon de kompatinda sinjoro Smythe en la kanalo malsupre, tie.”

Angus kvazaŭ freneze metis la manon al la kapo, "Ĉu li malsuprenkuris kaj sin dronigis?" li demandis.

"Li neniam malsuprenvenis, mi ĵuras," diris la policano, "nek dronis, ĉar li mortis pro pikego super la koro."

"Vi tamen vidis neniun eniri?" diris Flambeau per serioza voĉo.

"Ni marŝu iom laŭ la vojo," diris la pastro.

Dum ili atingis la alian finon de l'kresento li abrupte diris, "Stulta mi! Mi forgesis demandi ion al la policano. Mi scivolas ĉu ili trovis helbrunan sakon."

"Kial helbruna sako?" demandis Angus mirigite.

"Ĉar se estis sako de alia koloro, la afero devos komenciĝi tute denove," diris Pastro Brown; "sed se estis helbruna sako, do la afero estas finita."

"Plaĉas al mi tion aŭdi," diris Angus kun varma ironio. "Ĉar kiel tuŝas min, ĝi ankoraŭ ne komenciĝis."

"Vi devas ĉion rakonti pri tio al ni," diris Flambeau kun stranga peza naiveco, kiel infano.

Senkonscie ili marŝis pli kaj pli rapide malsupren sur la longa voja etendaĵo ĉe la alia flanko de l'alta kresento, Pastro Brown vigle sed silente gvidanta. Fine li diris kun eĉ preskaŭ kortuŝa malprecizeco, "Nu, mi timas, ke vi opinios ĝin proza. Ni ĉiam komenciĝas ĉe la abstraktaĵoj, kaj tiun ĉi rakonton oni nenie alie povas komenci."

"Ĉu vi iam rimarkis tion ĉi... ke homoj neniam respondas al tio kion vi demandis? Ili respondas al tio, kion vi volas diri... aŭ kion siaopinie vi volas diri. Supozu, ke unu sinjorino diras al alia en kampara domo, 'Ĉu iu restadas ĉe vi?' la sinjorino ne respondas 'Jes, la servisto, tri lakeoj, la servistino kaj tiel plu,' kvankam eble la servistino estas en la ĉambro aŭ la servisto malantaŭ ŝia seĝo. Ŝi diras, 'Neniu restadas ĉe ni,' volante diri ke neniu de la speco, kiun

vi volas diri. Sed supozu, ke kuracisto faras enketon pri epidemio, kaj demandas, 'Kiu restadas en la domo? tiam rememoras la sinjorino la serviston, la servistinon kaj la aliajn. Tiel estas uzata ĉia lingvo; vi neniam ricevas laŭvortan respondon al demando, eĉ kiam vi ricevas veran respondon. Kiam tiuj kvar tute honestaj viroj diris, ke neniu viro eniris tiun apartamentaron, ili ne volis vere diri, ke neniu viro estas enirinta. Ili volis diri, ke neniu viro, kiun ili povis suspekti estis via viro. Viro efektive eniris en la domon kaj efektive eliris, sed ili neniam rimarkis lin.'

"Viro nevidebla?" enketis Angus levante siajn ruĝajn brovojn.

"Mense nevidebla viro," diris Pastro Brown.

Post unu aŭ du minutoj li daŭrigis per la sama modesta voĉo, kiel homo perpense serĉanta vojon. "Kompreneble vi ne povas pensi pri tia viro, ĝis vi efektive pensas pri li. Jen lia lerteco. Sed mi ekpensis pri li pro du aŭ tri aferetoj en la rakonto, kiun rakontis al ni sinjoro Angus. Unue, estis la fakto, ke tiu ĉi Welkin entreprenis longajn marŝadojn. Kaj tiam estis la vasta kvanto da poŝtmarkopapero sur la fenestro. Kaj tiam, plej grave, estis la du aferoj, kiujn la juna fraŭlino diris... aferoj, kiuj tute ne povis esti veraj. Ne ĉagreniĝu," li tuj aldonis, rimarkinte subitan ekmovon de la kapo de l'Skoto; "ŝi kredis, ke ili estas bone veraj, sed ili ja ne povis esti veraj. Persono ja ne povas esti tute sola en strato unu sekundon antaŭ ol ŝi ricevas leteron. Ŝi ja ne povas esti tute sola en strato kiam ŝi komencas legi leteron ĵus ricevitan. Devas troviĝi iu tre apude; tiu devas esti mense nevidebla."

"Kial devas esti iu apud ŝi?" demandis Angus.

"Ĉar," diris Pastro Brown, "krom mesaĝkolomboj, iu certe alportis al ŝi la leteron."

"Ĉu vi vere volas diri, ke Welkin portis la leterojn de sia rivalo al la amatino?"

”Jes,” diris la pastro. ”Welkin portis la leterojn de sia rivalo al lia amatino. Vidu do, li devis.”

”Ho, mi ne plu povas toleri ion plu da tio ĉi,” eksplodis Flambeau. ”Kiu estas tiu ĉi fripono? Kiel li aspektas? Kia estas la kutima kostumo de mense nevidebla viro?”

”Li estas vestita eĉ belege en ruĝo, bluo kaj oro,” respondis precize la pastro, senhezite, ”kaj en tiu ĉi okulfrapanta kaj eĉ spektakla kostumo li eniris en Himilayan Apartamentaron antaŭ ok homaj okuloj; li mortigis Smythe kun trankvila intenco, kaj malsupreniris denove en la straton portante la kadavron en siaj brakoj...”

”Via Pastra Moŝto,” kriis Angus haltinte, ”ĉu vi estas plene freneza, aŭ ĉu mi?”

”Vi ne estas freneza,” diris Brown, ”nur iomete neobservema. Ekzemple, vi ne rimarkis viron kia tia ĉi.”

Li faris tri paŝojn rapide antaŭen kaj metis la manon sur la ŝultron de ordinara preterpasanta leterportisto, kiu nerimarkite estis ilin pasinta sub la ombro de l’arboj.

”Ial neniu rimarkas poŝtistojn,” li diris penseme; ”sed ili havas pasiojn kiel aliaj homoj, kaj eĉ portas ampleksajn sakojn kie malgranda kadavro tute facile povas esti kaŝata.”

La poŝtisto, anstataŭ sin turni nature, estis ekkliniĝinta kaj falinta kontraŭ la ĝardena pasilaro. Li estis malgrasa, blonde barbata viro de tre ordinara aspekto, sed dum li montris super la ŝultro vizaĝon timoplenan, ĉiuj tri viroj estis trapikataj de demona strabo.

Flambeau reiris al siaj sabroj, siaj purpuraj tapiŝetoj kaj persa kato, havante multajn aferojn pritraktendaj. John Turnbull Angus reiris al la fraŭlino en la butikoj, kun kiu tre komforte vivadi sukcesas tiu malprudenta junulo. Sed Pastro Brown marŝis sur tiuj neĝkovritaj

montetoj sub la steloj multajn horojn kun murdinto, kaj kion ili diris unu al la alia neniam oni scios.

LA HONORO DE ISRAEL GOW

Ŝtorma vespero, olivkolora kaj arĝenta, falis dum Pastro Brown, solvita en griza skota plejdo, ĝisatingis la finon de griza skota valo kaj ekvidis la strangan kastelon Glengyle. Ĝi ŝtopis la finon de la valetoj aŭ kavejoj, kaj aspektis kiel la fino de la mondo. Leviĝante per krutaj tegmentoj kaj turpintoj el marverda ardezo, laŭ la stilo de la malnovaj franc-skotaj kasteloj, ĝi rememorigis al anglo la malbonaŭgurajn altĉapelojn de sorĉistinoj en ferakontoj; kaj la pinarboj, kiuj balanciĝis ĉirkaŭ la verdaj turetoj, ŝajnis kompare tiel nigraj kiel nenombreblaj korvaroj. Tiu ĉi sugestio de sonĝo, preskaŭ dormanta diableco, neniel estis nur imago elvokita pro la pejzaĝo. Ĉar efektive kuŝis sur la loko unu el tiuj nuboj de fiereco kaj frenezeco kaj mistera malĝojo, kiuj pli peze kuŝas sur la nobelaj familioj de Skotlando ol sur iuj aliaj hominfanoj. Ja Skotlando ricevis duoblan dozon de la veneno nomita heredeco; la sento pri sango ĉe la aristokratoj kaj fatalo ĉe la Kalvinistoj.

La pastro estis sin ŝirinta por unu tago de siaj aferoj en Glasgovo por renkonti sian amikon Flambeau, la amatoran detektivon, kiu estis ĉe Glengyle Kastelo kun alia pli oficiala oficiro, farante esploron pri la vivado kaj morto de la mortinta Lordo Glengyle. Tiu mistera persono estis la lasta reprezentanto de familio, kies braveco, frenezeco, kaj perfortema ruzeco, igis terura ilian nomon, eĉ inter la malbonfama nobelaro de la dekseca jarcento. Neniu estis pli profundigintaj en tiun labirintan ambicion, en tiun palacon el mensogoj, kiun oni konstruis ĉirkaŭ Mario, Reĝino de la Skotoj.

La rimo konata en la apuda kamparo senkaŝe atestis la motivon kaj rezulton de iliaj intrigadoj:

*"Kiel verda suk' por arbo somera
Estas ruĝa or' por Ogilvie fiera."*

Dum multaj jarcentoj troviĝis neniam laŭdebla lordo en Glengyle Kastelo; kaj kiam venis la Viktoria Epoko oni estus kredinta, ke ĉiuj ekscentrecoj estus jam elĉerpitaj. La lasta Glengyle'ano tamen plenumis sian triban tradicion, farante tion kio sole restis al li por fari; li malaperis. Mi ne volas diri, ke li iris for alilanden; oni diris, ke li ankoraŭ estas en la kastelo, se li estas ie ajn. Kvankam do lia nomo troviĝis en la granda ruĝa lordetato, kaj en la preĝeja registro, neniu lin iam vidis sub la suno.

Se iu lin vidis, tiu estis iu sola servisto, duone grumo, duone ĝardenisto. Li estis tiel surda, ke personoj praktikaj supozis, ke li estas muta; dum personoj pli penetremaj deklaris, ke li estas nur duone cerbsana. Osteca, ruĝhara laboristo, kun obstinaj mentono kaj makzelo, sed tute senesprimaj bluokuloj, li havis la nomon Israel Gow, kaj estis la unika silenta servisto de tiu forlasita bieno. Sed la energio per kiu li elfosis terpomojn kaj la reguleco kun kiu li malaperadis en la kuirejon, donis al homoj la impreson, ke li provizas manĝaĵojn por superulo, kaj, ke la stranga grafo ankoraŭ restas kaŝite en la kastelo. Se iu deziris plian pruvon, ke li tie estas, la servisto obstine asertis, ke li ne estas hejme. Iun matenon la vilaĝestro kaj la pastoro (la Glengyle'anoj estis presbiterianoj) estis alvokitaj al la kastelo. Tie ili konstatis, ke la ĝardenisto, grumo kaj kuiristo aldonis al siaj multnombraj metioj, tiun de funebraĵisto kaj najlis sian nobelan mastron en ĉerkon. Kun kiom multe aŭ kiom malmulte da plua enketo oni preterlasis tiun ĉi strangan fakton, ankoraŭ ne tre klare montriĝis; ĉar la afero ne estis laŭlege esplorata ĝis kiam Flambeau jam iris norden antaŭ du-tri tagoj. Tiam la kadavro de

Lordo Glengyle (se efektive estis kadavro) estis kuŝinta iom da tempo en la malgranda preĝejkorto sur la monteto.

Dum Pastro Brown pasis tra la malluma ĝardeno kaj venis en la ombron de la kastelo, la nuboj estis densaj kaj la tuta aero malseka kaj tondroplena. Kontraŭ la lasta verdora strio de la sunsubiro li vidis nigran homan silueton; viro kun kamentubosimila ĉapelo, kaj granda fosilo surŝultre. La kunmetaĵo strange sugestiis preĝejan tombofosiston; sed kiam Brown rememoris la surdan serviston, kiu elfosis terpomojn, li opiniis, ke tio estas sufiĉe normala. Li sciis iom pri skotaj kamparanoj; li konis la respektecon, kiu bone agnoskus la neceson porti "nigraĵojn" por oficiala enketo; li konis ankaŭ la sparemecon, kiu ne volus perdi pro tio eĉ unuhoran fosadon. Eĉ ties salteto kaj suspekto plena rigardego dum la pastro preterpasis, sufiĉe akordis kun la vicleco kaj ĵaluzo de tia tipo.

La granda pordo estis malfermata de Flambeau mem, kiu estis akompanata de malgrasega viro kun fergriza hararo kaj paperoj en la mano: Inspektoro Craven de Scotland Yard. La vestiblo estis plejparte nudigita kaj malplena; sed la palaj, rikanantaj vizaĝoj de unu du el la malbonaj Ogilvie'anoj rigardis malsupren el nigraj perukoj kaj nigriĝanta kanvaso.

Ilin sekvinte en internan ĉambron, Pastro Brown eltrovis, ke la kunliganoj estas jam sidiĝintaj ĉe longa kverkligna tablo, kies fino apud tiuj, estas kovrita de skribaĉpaperoj, flankitaj de viskio kaj cigaroj. Ĝia tuta longeco krome estis okupata de apartaj objektoj ordigitaj laŭ aroj; objektoj tiel neklarigeblaj kiel iuj ajn objektoj povus esti. Unu aspektis kiel malgranda amaso da disrompita vitro. Alia aspektis kiel alta amaso da bruna polvo. Tria ŝajnis esti ordinara ligna bastoneto.

"Ŝajne vi havas tie ĉi ian geologian muzeon," li diris sidiĝante kaj

ekskuante la kapon al la direkto de la bruna polvo kaj la kristalaj pecetoj.

”Ne geologia muzeo,” respondis Flambeau; ”Diru, ‘psikologia muzeo.’”

”Ho, pro amo al Dio,” kriis la polica detektivo ridante, ”ni ne komenciĝu per tiaj longaj vortoj.”

”Ĉu vi ne scias kion signifas psikologio?” demandis Flambeau kun amikeca surprizo. ”Psikologio signifas, esti perdinta la racion.”

”Ankoraŭ mi apenaŭ komprenas,” respondis la oficialulo.

”Nu,” diris Flambeau decideme, ”Mi volas diri, ke ni eltrovis nur unu fakton pri Lordo Glengyle. Li estis maniulo.”

La nigra silueto de Gow kun lia alta ĉapelo kaj fosilo pasis la fenestron, konturita malklare kontraŭ la krepuska ĉielo. Pastro Brown rigardadis ĝin pasive kaj respondis:

”Mi povas kompreni, ke nepre estis io stranga pri la viro, se ne, li ne vivus kvazaŭ sin enterigante . . . nek tiel rapidus sin enterigi mortinte. Sed kio igas vin kredi, ke temas pri frenezeco?”

”Nu,” diris Flambeau, ”aŭskultu do la liston de aferoj trovitaj de sinjoro Craven en la domo.”

”Ni devas alporti kandelon,” diris Craven subite. ”Ŝtormo alproksimiĝas kaj tro mallumas por legi.”

”Ĉu vi trovis kandelojn,” demandis Brown ridetante, ”inter viaj strangaĵoj?”

Flambeau levis seriozan vizaĝon kaj direktis siajn nigrajn okulojn al sia amiko.

”Tio ankaŭ estas stranga,” li diris. ”Dudek kvin kandeloj kaj ne eĉ postsigno de kandelingo.”

En la rapide mallumiĝanta ĉambro kaj rapide fortiĝanta vento Brown iris laŭllonge la tablon ĝis kie kuŝis fasko da vakskandeloj inter la aliaj diversaj elmontraĵoj. Dum li tion faris li kliniĝis hazarde

super la amason da ruĝ-bruna polvo; kaj abrupta terno krakis kontraŭ la silento.

”Ha!” li diris, ”flartabako.”

Li prenis unu el la kandeloj, ekbruligis ĝin zorge; revenis, kaj enŝovis ĝin en la buŝon de la viskibotelo. La senripoza nokta aero, blovante tra la kaduka fenestro, flirtigis la longan flamon kiel standardon. Kaj de ĉiu flanko de la kastelo ili povis aŭdi kilometrojn da nigra pinarbaro bolanta kiel nigra maro cirkaŭ roko.

”Mi legos la etaton,” komencis Craven serioze, prenante unu el la paperoj ”la etaton pri tio, kion ni trovis dismetita kaj ne prikларigita en la kastelo. Vi komprenu, ke la loko estis tute deŝirita kaj forlasita; sed unu du ĉambroj estis videble loĝataj laŭ simpla sed ne malpura maniero de iu; iu, kiu ne estis la servisto Gow. Jen la etato:

”Unua ero. Tre konsiderinda trezoro de gemoj, preskaŭ ĉiuj diamantoj, kaj ĉiuj nefiksitaj kaj sen ia ajn muntaĵo. Kompreneble oni atendus, ke la Ogilvie anoj havus familiajn juvelojn; sed tiaj gemoj estas preskaŭ ĉiam muntitaj en apartaj ornamaĵoj. Ŝajnas, ke la Ogilvie’anoj konservis siajn libere en la poŝoj, kiel monerojn.

”Dua ero. Multege da senuja flartabako, ne konservata en korno aŭ eĉ en saketo, sed kuŝanta po amasetoj sur la kamentabuloj, sur la bufedo, sur la piano, ĉie. Ŝajnas, ke la maljuna sinjoro ne volis sin ĝeni por levi kovrilon aŭ serĉi en skatoleto.

”Tria ero. Jen kaj jen en la domo strangaj amasetoj da malgrandegaj pecoj el metalo, kelkaj kiel ŝtalaj risortoj kaj kelkaj kiel mikroskopaj radoj. Tute kvazaŭ iu estus dismetinta ian meĥanikan ludilon.

”Kvara ero. La vakskandeloj, kiuj estas fiksitaj en la botelojn ĉar nenio alia troviĝis por teni ilin. Nu, mi deziras, ke vi rimarku kiom pli stranga ĉio tio ĉi estas, ol io ajn kion ni atendis. Por la centra

enigmo ni estis pretaj; ni ĉiuj konstatis de la unua ekrigardo, ke ne ĉio ĝuste fartis ĉe la lasta lordo. Ni venis tien ĉi por eltrovi ĉu li vere loĝis tie ĉi, ĉu li vere mortis tie ĉi, ĉu tiu ruĝhara timigulo, kiu intermiksiĝis kun ties enterigo intermiksiĝis ankaŭ kun ties morto. Sed supozu pri tio ĉi la plej malbonan, la plej aĉan aŭ melodraman solvon, laŭ via deziro. Hipotezu, ke la servisto efektive mortigis la mastron, aŭ hipotezu, ke la mastro efektive ne estas mortinta, aŭ hipotezu, ke la mastro estas alivestita kiel la servanto, aŭ hipotezu, ke la servisto estas enterigita anstataŭ la mastro; elpensu kian ajn Wilkie Collins-tragedion kiel plaĉas al vi, kaj ankoraŭ vi ne estus klariginta kandelon sen kandelingo, aŭ kial maljuneta sinjoro el bona familio kutimiĝis disŝuti flartabakon sur la pianon. La koraĵon de la afero ni povis bone imagi; nur la franĝoj estas misteraj. Per nenia granda streĉo de la imago povas kunligi la homa menso flartabakon kaj diamantojn kaj vakson kaj dismetitajn meĥanikaĵojn.”

”Mi kredas, ke mi vidas la interligon,” diris la pastro. ”Tiu ĉi Glengyle malamis eĉ freneze la Francan Revolucion. Li estis entuziasmulo pri l’ancien régime kaj li estis penanta plene travivi denove la familian vivon de la lastaj Bourbon’oj. Li havis flartabakon ĉar ĝi estis dekokjarcenta luksaĵo; vakskandelojn, ĉar ili estis dekokjarcentaj lumigiloj; la meĥanismaj pecoj da fero prezentas la seruristan kromokupon de Louis XVI; la diamantoj la diamantan kolĉenon de Marie Antoinette.”

Ambaŭ aliaj viroj rigardegis lin per rondaj okuloj. ”Kia tute kromordinara ideo!” kriis Flambeau. ”Ĉu vere vi kredas, ke tio estas la vero?”

”Mi estas certa, ke ne,” respondis Pastro Brown, ”sed vi diris, ke neniu povas kunligi flartabakon kun diamantoj kaj meĥanikaĵoj kaj kandeloj. Mi tuj klarigas tiun kunligon. La efektiva vero, mi estas certa, troviĝas multe pli profunde.”

Li paŭzis momenton kaj aŭskultis la ĝemadon de la vento ĉirkaŭ la turetoj. Tiam li diris, "La mortinta Lordo Glengyle estis ŝtelisto. Li vivis duan kaj pli sekretan vivon kiel ĉionriskanta domrabisto. Li ne havis kandelingojn ĉar li uzis nur tiujn ĉi mallonge tranĉitajn kandelojn en la malgranda lanterno, kiun li portis. La flartabakon li uzis, kiel la plej furiozaj francaj krimuloj uzis pipron: por ĝin subite ĵeti je densaj kvantoj al la vizaĝo de kaptinto aŭ persekutanto. Sed la fina pruvo troviĝas ĉe la kurioza koincido pri diamantoj kaj la ŝtalradoj. Ĉu tio ne klarigas ĉion al vi? Diamantoj kaj etaj ŝtalradoj estas la solaj iloj per kiuj oni povas eltranĉi vitran panelon."

Branĉo de rompita pinarbo vipiĝis forte pro la ventego kontraŭ la fenestro malantaŭ ili, kvazaŭ parodiante domrabiston, sed ili ne turniĝis. Iliaj okuloj estis gluataj al Pastro Brown.

"Diamantoj kaj etaj radoj," rediris Craven meditante. "Ĉu tio estas ĉio kio igas vin opinii tion la vera klarigo?"

"Mi ne opinias, ke tio estas la vera klarigo," respondis serene la pastro; "sed vi diris, ke neniu povas kunligi tiujn kvar aferojn. La vero kompreneble estas multe pli banala. Glengyle trovis, aŭ kredis, ke li estas trovinta juvelŝtonojn en sia bieno. Iu ruztrompis lin per tiuj nemuntitaj brilantoj, dirante, ke ili estas trovitaj en la kastelaj kavernoj. La etaj radoj estas iaj diamantpoluriloj. Li devis fari la aferon tre krude, helpate de kelkaj paŝtistoj aŭ kruduloj de tiuj ĉi montetoj. Flartabako estas la sola luksaĵo de tiaj skotaj paŝtistoj; ĝi estas la sola rimedo por subaĉeti ilin. Ili ne havis kandelingojn ĉar tiujn ili ne bezonis; ili tenis la kandelojn enmane dum ili esploris la kavernojn."

"Ĉu tio estas ĉio?" demandis Flambeau post longa paŭzo. "Ĉu ni do fine atingis la banalan veron?"

"Ho, ne," diris Pastro Brown.

Dum la vento formortis en la plej malproksimaj pinarbaroj kva-

zaŭ mokade kun longedaŭra ululo, daŭrigis Pastro Brown, lia vizaĝo tute senemocia:

”Mi nur proponis tion ĉar vi diris, ke oni ne povas kredinde kunligi flartabakon kun meĥanikaĵoj aŭ kandelojn kun briloŝtonoj. Dek falsaj filozofoj taŭgas por klarigi la universon; dek falsaj teorioj taŭgas por klarigi la Kastelon Glengyle. Sed ni postulas la veran klarigon pri la kastelo kaj la universo. Ĉu tamen ne estas aliaj montaraĵoj?”

Craven ridis kaj Flambeau leviĝis ridetante kaj iris laŭlonge la flankon de la longa tablo.

”Eroj kvin, ses, sep, ktp.,” li diris, ”estas ja pli diversaj ol informaj. Kurioza kolekto ne da grafit-kraĵonoj sed da grafito el grafit-kraĵonoj, Sensignifa bambua stango, la finaĵo iomete fendita. Povus esti la ilo de la krimo. Sed, ne estas iu ajn krimo. Krome, la solaj pliaj aferoj estas kelkaj antikvaj meslibroj kaj malgrandaj katolikaj bildoj, kiujn konservis la Ogilvie’anoj supozeble el la Mezepoko—ilia familia fiereco estas pli forta ol ilia Puritanismo. Ni aldonis ilin al la muzeo nur ĉar ili ŝajne estas strange tranĉetitaj kaj difektitaj.”

La fluganta tempesto ekstere pelis trans Glengyle’on teruran nubamason kaj mallumigis la longan ĉambron dum Pastro Brown prenis la malgrandajn ornomitajn paĝojn por ekzameni ilin. Antaŭ ol preterpasis la nigra blovaĵo li ekparolis, sed la voĉo estis kiel de viro tute nova.

”S-ro Craven,” li diris, parolante kiel viro dek jarojn pli juna, ”vi havas leĝan mandaton, ĉu ne, por supreniri kaj ekzameni tiun tombon? Ju pli senprokraste ni tion faras des pli bone; ni esploru tiun ĉi aferon ĝisfunde. Se mi estus vi, mi tuj ekirus.”

”Nun?” rediris la detektivo mirigite, ”kial nun?”

”Ĉar estas grave,” respondis Brown; ”tio ĉi ne estas disŝutita flartabako aŭ dismetitaj ŝtonetoj, kiuj povus troviĝi pro cent kaŭzoj.

Ekzistas nur unu sola kaŭzo, kial tio ĉi estas farita; kaj tiu kaŭzo devenas de la paradikoj de la mondo. Tiuj ĉi religiaj bildoj ne estas nur malpurigitaj aŭ ŝiritaj aŭ kovritaj de skribaĉo, kiun farus dum senokupeco aŭ pro bigoteco, infanoj aŭ Protestantoj. Tiujn ĉi oni tre zorge traktis—kaj tre strange. Ĉie kie aperas la granda ornamita nomo de Dio en la malnovaj manuskriptoj ĝi estas tre zorge forprenita. La sola alia aĵo forprenita estas la nimbo ĉirkaŭ la kapo de la Infana Jesuo. Tial mi diras, ni prenu nian mandaton kaj nian fosilon kaj nian hakilon kaj supreniru por disrompi tiun ĉerkon.”

”Kion vi volas diri?” demandis la Londona oficiro.

”Mi volas diri,” respondis la malgranda pastro, kaj lia voĉo ŝajnis iomete plifortiĝi en la uragana muĝado, ”mi volas diri, ke la potenca diablo de la universo eble sidas je la nuna momento sur la plej supra pinto de tiu ĉi kastelo, tiel granda kiel cent elefantoj kaj muĝegante kiel la Apokalipso. Nigra magio troviĝas ie profunde en tiu ĉi afero.”

”Nigra magio,” rediris Flambeau per voĉo mallaŭta, ĉar li estis viro tro klera por ne koni tiajn aferojn; ”sed kion povas signifi tiuj ĉi aliaj aferoj?”

”Ho, ion satanan, mi supozas,” respondis Brown senpacience. ”Kiel mi sciu? Kiel mi povas diveni ĉiujn iliajn malsuprajn labirintojn? Eble oni povas fari torturon el flartabako kaj bambuo. Eble frenezuloj avidas al vakso kaj ŝtalfajlaĵoj. Eble ekzistas freneziga drogo el grafit-kraĵonoj! Nia plej mallonga vojo al la mistero kondukas supren la monton al ia tombo.”

Liaj kunuloj apenaŭ sciis, ke lin ili obeis kaj sekvis, ĝis ekblovego de la nokta vento preskaŭ teren ĵetis ilin en la ĝardeno. Ili tamen estis lin obeintaj kiel aŭtomataĵoj; ĉar Craven trovis en sia mano hakilon, kaj la mandaton en sia poŝo; Flambeau portis la pezan fosi-

lon de la stranga ĝardenisto; Pastro Brown portis la orumitan libreton el kiu estis ŝirita la nomo de Dio.

La vojeto supren la monteton al la preĝejkorto estis kurba sed mallonga; nur pro la premo de la vento ĝi ŝajnis malfacila kaj longa. Tiom malproksimen kiom povis vidi la okulo, pli kaj pli malproksimen dum ili supreniris la deklivon, estis oceanoj preter oceanoj da pinoj, tiam ĉiuj klinitaj laŭ unu direkto pro la vento. Kaj tiu universala gesto ŝajnis tiel vana kiel ĝi estis vasta, tiel vana kiel kvazaŭ ĝi siblus ĉirkaŭ iu senhoma kaj sencela planedo. Tra la tuto de tiu senfina kreskaĵo el grizbluaj arbaroj kantadis, fajfe kaj alte, tiu antikva malĝojo kiu estas ĉe la koro de ĉiuj paganaj aĵoj. Oni povis imagi, ke la voĉoj el la infero de nepenetrebla foliaro, estas la krioj de perditaj kaj vagantaj pagandioj; dioj kiuj iris vagade en tiun neracian arbaron, kaj kiuj neniam retrovos la vojon al ĉielo. "Vi komprenu," diris Pastro Brown en mallaŭta sed facila tono, "Skotoj, antaŭ ol eĉ Skotlando ekzistis, estis kurioza aro. Efektive ili ankoraŭ estas kurioza aro. Sed en prahistoriaj tempoj mi imagas, ke ili vere adoris demonojn. Jen," li aldonis bonhumore, "tial ili prete alprenis la puritanan teologion kiam ĝi aperis."

"Amiko mia," diris Flambeau, sin turnante pro ia furiozeco, "kion signifas ĉiom da tiu flartabako?"

"Amiko mia," respondis Brown, egale serioze, "ĉiuj sinceraj religioj portas unu signon: materialismo. Satanismo, nu, estas religio tute sincera."

Ili estis venintaj supren ĝis la herba skalpo de la monteto, unu el la malmultaj kalvaj lokoj, kiuj staris el la krakeganta kaj muĝanta pinarbaro. Kaduka enfermaĵo, parte el ligno, parte el drato, klakadis en la ŝtormo, dirante al ili pri la limo de la tombejo. Kiam Inspektoro Craven ĝisatingis la angulon de la tombo, kaj Flambeau enŝovis sian fosilon, la pinto malsupren, kaj sin apogis al ĝi, ili am-

baŭ estis preskaŭ tiel ŝancelitaj kiel la tremanta ligno kaj drato. Ĉe la fino de la tombo kreskis grandaj altaj kardoj, grizaj kaj arĝentaj, velkintaj. Du-trifoje, kiam bulo da kardsemoj disbloviĝis pro la vento kaj preterflugis lin, Craven eksaltetis, kvazaŭ ĝi estus sago.

Flambeau enpelis la plataĵon de sia fosilo inter la siblantan herbon en la suban malsekan argilon. Tiam li ŝajnis halti kaj sin apogis al ĝi kvazaŭ al bastono.

"Daŭrigu," diris la pastro tre milde. "Ni nur provas elserĉi la veron. Pro kio vi timas?"

"Mi timas ĝin trovi," diris Flambeau.

La londona detektivo ekparolis subite per alta voĉo kiel kokkrio, kiun li intencis esti amikeca kaj gaja. "Mi scivolas, kial vere li tiel sin kaŝis. Pro io aĉa, mi supozas; ĉu li estis lepro?"

"Io pli malbona ol tio," diris Flambeau.

"Kaj kion vi imagas," demandis la alia, "kio estus pli malbona ol lepro?"

"Tion mi ne imagas," diris Flambeau.

Li fosadis dum kelkaj terurplenaj minutoj silente, kaj tiam diris per sufokita voĉo, "Mi timas, ke li ne havos la ĝustan formon."

"Nek tia estis tiu peco de papero, vi memoras," kviete diris Pastro Brown, "kaj eĉ tiun pecon de papero ni postvivis."

Flambeau daŭrigis fosadi per blinda energio. Sed la tempesto estis jam forpuŝinta la sufokigajn griznubojn, kiuj alkroĉiĝis al la montetoj kiel fumo, kaj jam malkaŝinta grizajn kampojn da malforta stelolumo, antaŭ ol li vidigis la formon de kruda ligna ĉerko, kaj iel ĝin klinis sur la herbon. Craven paŝis antaŭen kun sia hakilo; tufeto tuŝis lin kaj li detiriĝis. Tiam li ekstaris pli decideme kaj hakis kaj tordis per energio kia tiu de Flambeau, ĝis la kovrilo estas deŝirita, kaj la tuto da tio, kio tie troviĝis, kuŝis lumetanta sub la griza stellumo.

”Ostoj,” diris Craven; kaj poste aldonis, ”sed ja estas homo,” kvazaŭ tio estus io neatendita.

”Ĉu li... ,” demandis Flambeau per voĉo kiu strange leviĝis kaj malleviĝis, ”Ĉu li estas en ordo?”

”Ŝajnas, ke jes,” diris la oficiro raŭke, kliniĝante super la malklaran kaj polviĝantan skeleton en la skatolego. ”Atendu momenton.”

La kolosa figuro de Flambeau eligis ĝemegon. ”Kaj nun, kiam mi ĉion pripensas,” li kriis, ”kial, je diablo, kial ĉio ne estu en ordo ĉe li? Kio homon kaptas sur tiuj ĉi malvarmaj, malbenitaj montoj? Mi kredas, ke estas la nigra sensignifa ripetado; tiuj ĉi arbaroj kaj super ĉio la antikva teruro de senkonscienco. Estas kiel la inkubo de ateisto. Pinarboj kaj pinarboj kaj milionoj pli da pinarboj——”

”Dio!” kriis la viro apud la ĉerko, ”Sed li ne havas kapon.”

Dum la aliaj restis rigidaj, la pastro por la unua fojo eksaltis pro timigita koncerno.

”Ne kapon!” li ripetis. ”Ne kapon?” kvazaŭ li preskaŭ atendis ian alian mankon.

Duonfrenezaj vizioj pri senkapa infano naskita al Glengyle, pri senkapa junulo sin kaŝanta en la kastelo, pri senkapa viro trapaŝante tiujn antikvajn koridorojn aŭ tiun grandiozan ĝardenon, sin prezentis panorame al iliaj imagoj. Sed eĉ en tiu rigidiga momento la afero ne alkroĉiĝis al iliaj cerboj kaj ŝajne enhavis nenian raciecon. Ili staris aŭskultante la laŭtajn arbarojn kaj kriegantan ĉielon tute stulte, kiel ellacigitaj bestoj. Pensopovo ŝajnis io grandega, kio estis subite glitinta for de ilia tenado.

”Troviĝas tri senkapaj viroj,” diris Pastro Brown, ”starantaj ĉirkaŭ tiu ĉi malfermita tombo.”

La pala detektivo el Londono malfermis la buŝon por paroli, kaj ĝin lasis malfermita kiel kampara stultulo, dum longedaŭra venta

kriego disŝiris la ĉielon; tiam li rigardis la hakilon en siaj manoj, kvazaŭ ĝi ne apartenus al li, kaj lasis ĝin fali.

"Pastro," diris Flambeau per tiu infaneca kaj peza voĉo, kiun li tre malofte uzis, "kion ni faru?"

La respondo de lia amiko venis kun la tujeco de pafila eksplodo.

"Dormu!" kriis Pastro Brown. "Dormu! Ni ĝisatingis la finon de la vojo. Ĉu vi scias, kio estas dormado? Ĉu vi scias, ke ĉiu kiu dormas kredas al Dio? Ĝi estas sakramento; ĉar ĝi estas ago de fido, kaj ĝi estas nutraĵo. Kaj ni bezonas sakramenton, se nur naturan. Io estas falinta sur nin, kio falas tre malofte sur homojn; eble la plej malbona aĵo, kiu povas fali sur ilin."

La lipoj de Craven kuniĝis por diri, "Kion vi volas diri?"

La pastro estis turninta la vizaĝon al la kastelo dum li respondis: "Ni trovis la veron; kaj la vero havas nenian racian signifon."

Li malsupreniris la vojeton antaŭ ili per paŝoj longaj kaj senzorgaj, tre maloftaj ĉe li, kaj kiam ili atingis denove la kastelon, li sin ĵetis al dormo kun la simpleco de hundo.

Malgraŭ lia mistika laŭdo pri dormado, Pastro Brown leviĝis pli frue ol iu alia krom la silenta ĝardenisto; kaj fumis sian pipegon kaj observis tiun spertulon fari sian senvortan laboran en la legomĝardeno. Antaŭ tagiĝo la ŝancelanta ŝtormo estis finiĝinta per pelanta pluvado kaj la tago venis kun kurioza freŝeco. Ŝajne la ĝardenisto estis eĉ interparolinta, sed vidinte la detektivojn li malafable ŝovis sian fosilon en bedon, kaj dirante ion pri matenmanĝo movis sin for laŭ la linioj de brasikoj, kaj sin enfermis en la kuirejo.

"Valora viro, tiu," diris Pastro Brown. "Li prizorgas la terpomojn mirinde. Tamen," li aldonis, kun senpartia indulgo, "li havas mankojn; kiu el ni ne havas? Li ne tute rekte fosas tiun ĉi sulkon. Tie ekzemple," kaj li piedbatis subite sur unu lokon. "Mi vere dubas pri tiu terpomo."

”Kaj kial?” demandis Craven, amuzate pri la nova kromokupo de la malgranda viro.

”Mi dubas pri ĝi,” diris la alia, ”ĉar maljuna Gow mem dubis pri ĝi. Li enŝovis la fosilon orde en ĉiun lokon krom tiun ĉi. Nepre estas tie ĉi ege bona terpomo.”

Flambeau eltiris la fosilon kaj impulse pelis ĝin en la lokon. Li levis, sub ŝarĝo da grundo, ion, kio ne aspektis kiel terpomo, sed plimulte kiel monstra sfera agariko. Sed kun klinga klaketo ĝi frapis kontraŭ la fosilo, ĝi ruliĝis renverse kiel pilko kaj de malsupre ridetaĉis al ili.

”La Lordo Glengyle,” diris Brown malĝoje, kaj rigardis solide malsupren al la kranio.

Tiam post momenta meditado, li ekprenis la fosilon de Flambeau kaj dirante ”Ni devas ĝin kaŝi denove,” metis la kranion firme en la teron. Tiam li apogis sian malgrandan korpon kaj vastan kapon sur la grandan tenilon de la fosilo, kiu rigide elstaris en la tero, kaj liaj okuloj estis malplenaj, kaj lia frunto plena je sulkoj. ”Se oni nur povus koncepti,” li murmuris, ”la signifon de tiu ĉi lasta monstraĵo.” Kaj sin apogante al la granda tenilo, li kovris la frunton per la manoj, kiel homoj faras en preĝejoj.

Ĉiuj partoj de la ĉielo plilumiĝis ĝis bluo kaj arĝento; la birdoj klaketadis sur etaj ĝardenaj arboj; tiel laŭte ke ŝajnis, ke la arboj mem parolas. Sed la tri viroj estis sufiĉe silentaj.

”Nu, mi rezignas pri ĉio tio ĉi,” fine diris Flambeau tumulte. ”Mia cerbo kaj tiu ĉi mondo ne agordiĝas; jen ĉio. Flartabako, difektitaj preĝlibroj kaj la internaĵoj de muzikoskatoloj—kio—.”

Brown ekklinis malantaŭen la kapon, montrante sian perpleksitan brovon kaj frapis la tenilon de la fosilo kun netoleremo tute fremda al li. ”Ho, ne, ne, ne,” li kriis. ”Ĉio tio estas videbla kiel lancostango. Mi komprenis la flartabakon, la meĥanikaĵojn, k.t.p., ki-

am mi unue malfermis la okulojn hodiaŭ matene. Kaj intertempe mi estas ĉion eldiskutinta kun maljuna Gow, la ĝardenisto, kiu estas nek tiel surda nek tiel stulta, kiel li ŝajnigas. Ĉio pri la dismetitaj aĵoj estas en bona ordo. Mi eraris pri la ŝirita meslibro, ankaŭ; ne estas io malbona pri tio. Sed temas pri tiu ĉi lasta afero. Profani tombojn kaj forŝteli kapojn de mortintoj... nepre estas tio malbona. Ĉu ne nepre temas pri nigra sorĉado rilate al tio? Tio ne akordiĝas kun la tute simpla historio pri la flartabako kaj la kandeloj." Kaj denove paŝante tien kaj reen li fumadis malsere.

"Mia amiko," diris Flambeau kun severa humoro, "vi devas konsidereme pritrakti min, kaj memoru, ke mi iam estis krimulo. La supereco pri tiu stato estis, ke mi mem ĉiam konstruis la historion, kaj agis tiel rapide kiel plaĉis al mi. Tiu ĉi detektiva atendado tro streĉas mian francan senpaciencon. Mian tutan vivon, bone malbone, mi tuj efektivigis aferojn; mi ĉiam duelis la postan matenon; mi ĉiam pagis kalkulojn senprokraste; mi neniam eĉ prokrastis viziti dentiston . . ."

La pipo de Pastro Brown falis de lia buŝo kaj rompiĝis en tri pecojn sur la gruza vojeto. Li staris rulante la okulojn, perfekta bildo de idioto. "Je Dio, kia napo mi!" li ripetadis. "Je Dio, kia napo." Tiam iel malsobre li komencis ridi.

"La dentisto." li ripetis. "Ses horojn en spirita abismo kaj mi neniam pensis pri la dentisto! Tia simpla, tia bela kaj paca penso. Amikoj, ni pasigis nokton en infero; sed nun la suno estas leviĝinta, la birdoj kantas, kaj la hela figuro de dentisto konsolas la mondon."

"Mi ja ĉerpos iom da senco el tio ĉi," kriis Flambeau, paŝante antaŭen, "eĉ se mi devos uzi la turmentojn de la Inkvizicio."

Pastro Brown rezistis al kio ŝajne estis momenta inklino danci sur la jam sunlumata razenejo kaj kriis kortuŝe kiel infano, "Ho, lasu min esti malserioza iomete. Vi ne scias kiel mizera mi estis. Kaj nun

mi scias, ke estis en tiu ĉi afero neniuj ajn profunda peko. Nur iom da frenezeco eble... kaj kiu malŝatus tion?"

Li ekturis sin kaj alvizaĝis al ili tre serioze.

"Tiu ĉi ne estas rakonto pri krimo," li diris; "pli ĝuste ĝi estas rakonto pri stranga kaj malrekta honesteco. Ni traktas kun iu, eble la sola homo sub la suno, kiu ne prenis pli ol li rajtis. Estas studo pri la sovaĝa kaj vivanta logiko, kiu estis la religio de tiu ĉi raso.

"Tiu antikva loka rimo pri la anoj de Glengyle . . .

Kiel verda suk' por arbo somera

Estas ruĝa or' por Ogilvie fiero.

estis vera kaj laŭvorte kaj metafore. Ĝi ne nur signifis, ke la Glengyle'oj serĉis riĉecon; estis ankaŭ vere, ke ili efektive kolektis oron; ili posedis egan kolekton da ornamaĵoj kaj ujoj el tiu metalo. Ili estis efektive avaruloj kies manio estis tia. En la lumo de tiu fakto, konsideru ĉiujn aferojn, kiujn ni trovis en la kastelo. Diamantoj sen siaj oraj ringoj; kandeloj sen siaj oraj ingoj; flartabako sen la oraj skatoloj; krajon-grafito sen oraj krajonigoj; bastono sen sia ora supraĵo; horloĝo-radaro sen la oraj horloĝoj... aŭ pli ĝuste poŝhorloĝoj. Kaj, kvankam ŝajnas freneze, ĉar la nimboj kaj nomo de Dio en la antikvaj meslibroj estis el vera oro; ili ankaŭ estis forprenitaj."

La ĝardeno saĝe pliheliĝis; la herbo fariĝis pli gaja sub la fortiĝanta suno, dum la freneza vero estis rakontata. Flambeau ekbruligis cigaredon dum lia amiko daŭrigis.

"Estis forprenitaj," daŭrigis Pastro Brown; "estis forprenitaj... sed ne ŝtelitaj. Ŝtelistoj ne estus postlasintaj tiun ĉi misteron. Ŝtelistoj estus prenintaj la orajn skatoletojn, kun tabako kaj ĉio; la orajn krajonigojn, kun grafito kaj ĉio. Temas pri viro kun stranga konscienco, sed konscienco senduba. Mi trovis tiun manian moraliston hodiaŭ matene en la ĝardeno tie kaj mi aŭdis la tutan aferon.

"La mortinta Archibald Ogilvie similis al virta viro pli ol iu na-

skita en Glengyle. Sed lia amara virteco fariĝis misantropa; li malgaje meditis pri la malhonesteco de siaj praavoj, de tio li iel induktis la malhonestecon de ĉiuj homoj. Aparte li malfidis al filantropio aŭ libera donacado; kaj li ĵuris, ke se li povus trovi unu solan homon, kiu prenis precize tiom kiom li rajtis, tiu posedu la tutan oron de Glengyle. Eldoninte tiun ĉi defion al la homaro li ŝlisis sin for, tute ne atendente, ke ĝi ricevos respondon. Unu tagon tamen, iu surda kaj ŝajne stulta knabo el malproksima vilaĝo alportis al li prokrastitan telegramon; kaj Glengyle, kun sia ironia bonhumoro donis al li novan kvaronpencon. Almenaŭ li kredis tion fari, sed kiam li ekzamenis sian monon li trovis ankoraŭ tie la novan kvaronpencon, kaj forestis ora pundo. La eraro malfermis al li la perspektivojn de cinika konjektado. Ambaŭokaze la knabo malkaŝus la avidan avercon de sia speco. Li aŭ malaperus, ŝtelisto ŝtelante moneron; aŭ li rampus reen virtaĉe, snobo serĉanta rekompencan. Meze de la nokto, iu frapante ĉe la pordo levigis de lia lito lordon Glengyle—ĉar li loĝis sola, kaj li devis malfermi la pordon al la surda idioto. La idioto kunportis kun si, ne la oran pundon, sed precize dek naŭ ŝilingojn, dek unu pencojn kaj tri kvaronojn, kiel ŝanĝmonon.

”Tiam la stranga precizeco de tiu ĉi ago ektenis la imagon de la freneza lordo kiel fajro. Li ĵuris, ke li estas Diogeno, ke jam longe li serĉas honestan viron kaj, ke fine li estas tian trovinta. Li akceptis la precizan junulon en sian vastan, neglektitan domon kaj edukis lin esti lia sola servisto kaj—laŭ stranga maniero—lia heredonto. Kaj kion ajn tiu stranga kreitaĵo komprenas, li komprenis plene ambaŭ obsedojn de sia lorda mastro; unue, ke la litero de la leĝo estas antaŭ ĉio grava; kaj due, ke li mem havu la oron de Glengyle. Ĝis tio, ĉio estas simpla. Li forigis la tuton de la oro en la domo, kaj ne prenis eron, kiu ne estis ora; eĉ ne eron da flartabako. Li levis orfolion de sur antikva ornamita libro, tute kredante, ke li lasas la restaĵon

nedifektita. Ĉion tion mi komprenis; sed tiun ĉi aferon pri la kranio mi ne povis kompreni. Mi vere maltrankviliĝis pri tiu homa kapo enterigita inter la terpomoj. Ĝi suferigis min ... ĝis Flambeau diris la vorton.

”Estos bone. Li remetos la kranion en la tombon, kiam li estos preninta la oron el la dento.”

Kaj efektive, kiam Flambeau transiris la monteton tiun matenon, li vidis tiun strangan kreitaĵon, la justan avarulon, fosantan ĉe la profanita tombo, la plejdo ĉirkaŭ lia kolo flirtanta en la monta vento; la serioza cilindro surkape.

LA MALĜUSTA FORMO

Kelkaj el la grandaj vojoj, kiuj kondukas norden el Londono, etendiĝas malproksimen en la kamparon, kiel ia maldensa kaj interrompita fantomo de strato, kun larĝaj breĉoj inter la konstruaĵoj, sed tenante la linion. Jen troviĝas aro da butikoj, sekvata de ĉirkaŭbarita kampeto, eble kun ĉevaloj, fama gastejo, tiam eble legomĝardeno aŭ florkulturejo kaj jen granda privata domo, kaj poste plua kampo kaj denove gastejo, kaj tiel plu. Se iu marŝus laŭ unu el tiuj vojoj, li pasus domon, kiu kredeble kaptus lian okulon, kvankam li eble ne povus klarigi al si ĝian allogon. Ĝi estas longa, malalta domo, paralela laŭ la vojo, kolorigita plejparte blanke kaj helverde, kun verando kaj markezoj kaj portikoj ĉapelitaj per tiuj strangspecaj kupoloj kvazaŭ lignaj ombreloj, kiajn oni vidas sur iuj malmodernaj domoj. Efektive ĝi estas malmoderna domo, tre angla kaj tre antaŭurba, sed antaŭurba laŭ la maniero de la malnovaj riĉulaj domoj de Clapham. Tamen, malgraŭ tio, ŝajnas, ke la domo estas speciale konstruita por la varma vetero. Rigardante ĝiajn blankan koloraĵon kaj markezojn, oni ekpensas malprecize pri hindaj ventumiloj kaj eĉ pri palmoj. Mi ne povas sekvi tiun senton ĝis ĝia radiko; eble la konstruaĵo estas farita de anglo el Hindujo.

Ĉiu preterpasanto, mi diras, estus nepriskribeble logita de la domo; sentus, jen loko pri kiu oni povas ion rakonti. Kaj li pravus, kiel vi baldaŭ konstatos. Ĉar jen estas la rakonto... la rakonto pri la strangaj aferoj, kiuj vere okazis tie dum Pentekosto en la jaro 18—

Preterpasante la domon je la jaŭdo antaŭ Pentekosto, proksimume je la kvara kaj duono ptm. oni estus vidinta malfermiĝi la ĉefan pordon, kaj eliri Pastron Brown de la malgranda preĝejo de Sankta Mungo, fumante grandan pipon kaj akompanate de tre alta franca amiko sia, nomita Flambeau, kiu fumis tre malgrandan cigaredon. Tiuj ĉi personoj eble aŭ eble ne interesas la leganton sed estas la vero, ke ili ne estis la solaj interesaĵoj, kiuj montriĝis kiam malfermiĝis la ĉefpordo de la blanka kaj verda domo. Pri tiu ĉi domo estas pluaj strangaĵoj, kiuj devas esti priskribataj komence, ne nur por ke la leganto komprenu tiun ĉi tragedian rakonton sed ankaŭ por ke li sciu kion malkaŝis la malfermiĝo de la pordo.

La tuta domo estis konstruita en la formo de litero T sed temis pri T kun tre longa trabo kaj tre mallonga fosto. La longa trabo estis la fasado kiu flankis al la strato, kun la ĉefpordo en la mezo; ĝi havis du etaĝojn kaj enhavis preskaŭ ĉiujn el la gravaj ĉambroj. La mallonga fosto, kiu elstaris malantaŭe, tute kontraŭ la ĉefpordo, estis unuetaĝa kaj konsistis el du longaj ĉambroj, unu kondukanta al la alia. La unua el tiuj ĉi du ĉambroj estis la skriboĉambro en kiu la famkonata sinjoro Quinton verkis siajn fantaziajn orientajn poemojn kaj romanojn. La ĉambro pli malproksima estis vitra kulturrejo, plena de tropikaj floroj tute unike kaj pleskaŭ monstre belaj, kaj dum tiaj posttagmezoj radiantaj pro brilobela sunlumo. Tial kiam la ĉefpordo malfermiĝis, multaj preterpasantoj kutime haltis por rigardegi kaj spasmospiri; ĉar ili rigardis tra perspektivo de luksaj apartementoj al io, kio vere similis al la transformiĝa sceno en feteatraĵo: purpuraj nuboj kaj oraj sunoj kaj puncaj steloj, kiuj estis samtempe brulante brilegaj sed travideblaj kaj malproksimaj.

Leonard Quinton, la poeto, mem estis tre zorge aranĝinta tiun ĉi efekton; kaj estas dube ĉu li tiel bone esprimis sian personecon per iu ajn el siaj poemoj. Li estis viro, kiu trinkis kaj sin banis en

koloroj kiu satigis sian avidon al koloro neglektante formon. . . eĉ konvenajn formalaĵojn. Estis tio, kio tiel plene turnis lian geniecon al orienta arto kaj figurado; al tiuj konfuzigaj tapiŝoj aŭ blindigaj brodaĵoj, en kiuj ŝajne ĉiuj koloroj estas kunfalintaj en feliĉan ĥaoson, havantaj nenion por simboligi aŭ instrui. Li estis provinta, eble ne kun plene arta sukceso sed kun agnoskita imago kaj elpenso-povo, verki eposojn kaj amrakontojn respegulantajn la tumulton de perfortema kaj eĉ kruela koloro; rakontoj pri tropikaj ĉieloj el flamanta oro aŭ el sangoruĝa kupro; pri orientaj herooj, kiuj rajdis kun dek-du-tavolaj turbanoj sur elefantoj pentritaj purpure aŭ pavoverde; pri gigantaj gemoj, kiujn porti ne povis cent nigruloj, sed kiuj briladis per antikvaj kaj strangkoloraj fajroj.

Mallonge (por esprimi la aferon de pli ordinara vidpunkto), li multe pritraktis orientajn paradizojn, iomete pli malbonajn ol la plimulto da okcidentaj inferoj; orientajn monarkojn, kiujn eble ni nomus maniuloj; kaj orientajn gemojn, kiujn eble Bond Strata juvelisto, (okaze ke cent ŝanceliĝantaj nigruloj ilin portus en lian butikon) ne taksus kiel veraj. Quinton estis ja geniulo, eĉ se mense malsana geniulo; kaj eĉ lia malsaneco montriĝis plimulte en lia vivo ol en liaj verkoj. Temperamente li estis malforta kaj vespeca kaj lia korpsaneco multe suferis pro orientaj eksperimentoj kun opio. Lia edzino... belega, laborema kaj efektive tro-laboranta virino... malaprobis la opion sed malaprobis multe pli multe vivantan hindan ermiton en blankaj kaj flavaj roboj, kiun gastigi dum tutaj monataj insistis ŝia edzo, Vergilon por gvidi tra la paradizoj kaj inferoj de la Oriento lian spiriton.

Elpaŝis el tiu ĉi artista domo sur la peronon Pastro Brown kaj lia amiko; kaj laŭ indiko de iliaj vizaĝoj, elpaŝante ili perdis grandan ŝarĝon. Flambeau estis koninta Quinton dum senrespondecaj student-tagoj en Parizo, kaj dum la semajnfino ili rekonatiĝis; sed mal-

graŭ la nova kaj pli serioza evoluado de Flambeau, li ne tre glate rilatis kun la poeto. Sinsufoki per opio kaj skribi sur velenon voluptajn strofetojn, ne estis laŭ lia opinio taŭga maniero por sinjoro iri al la diablo. Dum ili ambaŭ paŭzis sur la sojlo, antaŭ ol promeni en la ĝardeno, la ĝardeno kradpordo estis abrupte kaj perforte malfermata, kaj junulo kun melonĉapelo sur la malantaŭa parto de la kapo, faletante kuregis supren la ŝtupojn pro sia rapidema fervoro. Li estis diboĉemaspekta juna viro kun belega ruĝa kravato tute disordigita, kvazaŭ li estus enlitiginta ĝin portante, kaj li ne ĉesis moveti kaj vipeti ĉion per unu el tiuj malgrandaj artikaj kanoj.

”Nu do,” li diris senspire, ”Mi volas vidi oĉjon Quinton. Mi devas lin vidi. Ĉu li estas for?”

”S-ro Quinton estas hejme, mi kredas,” diris Pastro Brown purigante sian pipon, ”sed mi ne scias ĉu vi povas lin vidi. La kuracisto estas nuntempe kun li.”

La junulo, kiu ŝajne ne estis tute sobra, ŝanceliĝis en la vestiblon; kaj je la sama momento eliris la kuracisto el la skriboĉambro de Quinton, fermante la pordon kaj komencante surtiri la gantojn.

”Vidi sinjoron Quinton?” diris la kuracisto kviete, ”Ne, mi timas, ke ne. Efektive vi devas ne vidi lin, pro iu ajn kaŭzo. Estas permesate al neniuj lin vidi; mi ĵus donis al li dormigaĵon.”

”Nu vidu do, amikĉjo,” diris la junulo kun la ruĝa kravato, provante dorlote kapti la kuraciston je la refaldo de lia surtuto. ”Vidu do, mi estas terure senmona. Mi asertas. Mi...”

”Ne utilas, sinjoro Atkinson,” diris la kuracisto igante lin malantaŭen paŝi; ”kiam vi povos ŝanĝi la sekvojn de drogo, mi ŝanĝos mian decidon,” kaj almetante la ĉapelon li elpaŝis en la sunlumon kun la du aliaj. Li estis taŭrokola, bonhumora vireto, kun malgranda liphararo, nepriskribeble ordinara, sed donanta impreson de kapableco.

La junulo kun la melonĉapelo, kiu ŝajne tute ne posedis taktan talenton por pritrakti personojn, krom la ĝenerala ideo ekteni iliajn vestaĵojn, staris ekster la pordo, mirigite kvazaŭ li estus korpe elĵetita, kaj silente observis la aliajn foriri kune tra la ĝardeno.

"Tio estis ja fortika mensogo, kion mi ĵus diris," diris la medicinulo ridante. "Fakte, kompatinda Quinton ne ricevos ĝis post preskaŭ duonhoru sian dormigaĵon. Sed certe mi ne lasos lin esti ĝenata de tiu aĉulo, kiu nun volas pruntepreni monon, kiun li ne repagus, eĉ se li povus. Jen friponaĉo, kvankam li estas frato de sinjorino Quinton, kaj ŝi estas tia bonulino kia iam spiris.

"Jes," diris Pastro Brown. "Ŝi estas bonulino."

"Tial do mi proponas restadi en la ĝardeno ĝis post ol li estos malaperinta for," daŭrigis la kunacisto, "kaj tiam mi eniros al Quinton kun la medikamento. Atkinson ne povos eniri ĉar mi ŝlosis la pordon."

"Tiuokaze, d-ro Harris," diris Flambeau, "ni povas bone promeni al la malantaŭa parto de la vitra plantejo. Troviĝas tie nenia enirejo, sed ĝi estas bone vidinda, eĉ de ekstere."

"Jes, kaj eble mi povos kaŝe videti mian pacienton," ridis la kuracisto, "ĉar li preferas kuŝi sur kanapo tute en la fundo de la plantejo inter ĉiuj tiuj puncfloroj; baldaŭ terurigus min. Sed kion vi faras?"

Pastro Brown estis haltinta unu momenton kaj preninta el la longa herbo, kie ĝi kuŝis preskaŭ tute kaŝita, strangan, malrektan orientan tranĉilon, mozaikita belege per kolorŝtonoj kaj metaloj.

"Kio estas tio ĉi?" demandis Pastro Brown, alrigardante ĝin kun iom da malŝato.

"Ho, al Quinton, mi supozas," diris d-ro Harris senzorge; "li havas ĉiajn hindajn bagatelaĵojn en la domo. Aŭ eble ĝi apartenas al tiu milda hindo lia, kiun li gardas kvazaŭ per tenŝnuro."

"Kiu hindo?" demandis Pastro Brown, ankoraŭ rigardegante la ponardon en sia mano.

"Ho, iu hinda ĵonglisto," diris la kuracisto frivole; "trompulo kompreneble."

"Ĉu vi kredas al magio?" demandis Pastro Brown ne suprenrigardante.

"Ho Dio! Magio?" diris la kuracisto.

"Ĝi estas tre bela," diris la pastro per mallaŭta, revema voĉo; "la koloroj estas tre belaj. Sed ĝi havas malĝustan formon."

"Por kio?" demandis Flambeau rigardegante.

"Por io ajn. Temas pri malĝusta formo abstrakte. Ĉu vi neniam sentas tion pri orienta arto? La koloroj estas ebriige belaj; sed la formoj estas hontindaj kaj malbonaj... intence hontindaj kaj malbonaj. Mi vidis pekajn aferojn en turka tapiŝo."

"Mon Dieu!" kriis Flambeau, ridante.

"Tio estas literoj kaj simboloj de lingvo kiun mi ne konas; sed mi scias, ke ili reprezentas malbonajn vortojn," daŭrigis la pastro, lia voĉo fariĝante pli kaj pli mallaŭta. "La linioj intence erarvagas... kiel serpentoj sin turnantaj por liberiĝi."

"Je Diablo, kion vi priparolas?" diris la kuracisto kun laŭta rido.

Responde Flambeau alparolis al li kviete. "La Pastro kelkfoje absorbiĝas en tia mistikula nubo," li diris; "sed mi bone avertos vin, ke mi rememoras neniam, kiam tio okazis, kaj malbono ne troviĝis tre apude."

"Ho, sensencaĵo tio," diris la sciencisto.

"Nu, rigardu ĝin do," kriis Pastro Brown, tenante la kurban tranĉilon per etendita brako, kvazaŭ ĝi estus briletanta serpento. "Ĉu vi ne vidas, ke ĝi havas malĝustan formon? Ĝi ne indikas, kiel lanco. Ĝi ne svingiras kiel falĉilo. Ĝi ne aspektas kiel batalilo. Ĝi aspektas kiel turmentilo."

”Nu, ĉar vi ĝin ŝajne ne ŝatas,” diris la bonhumora Harris, ”pli bone ĝi estu redonata al sia posedanto. Ĉu ni ankoraŭ ne alvenis al la fino de tiu ĉi malbenita plantejo? Tiu ĉi domo havas malĝustan formon, mi konsentas pri tio.”

”Vi ne komprenas,” diris Pastro Brown skuante la kapon. ”La formo de tiu ĉi domo estas kurioza... ĝi estas eĉ priridebla. Sed estas pri ĝi nenio malĝusta.”

Dum ili parolis, ili iris ĉirkaŭ la vitra kurbaĵo per kiu finiĝis la plantejo, kurbaĵo neinterrompita, ĉar troviĝis nek pordo nek fenestro, tra kiu eniri. La vitro tamen estis travidebla kaj la suno ankoraŭ estis brila kvankam ĵus komenciĝanta subiri; kaj ili povis vidi ne nur la torĉosimilajn floraĵojn interne, sed ankaŭ la malfortikan figuron de la poeto en brunvelura jako, malenergie sur la kanapo kuŝantan, ŝajne ekdormiĝintan super libro. Li estis pala malgrasega viro, kun maldensa, kaŝtankolora hararo kaj barba franĝo kiu estis la paradokso de lia vizaĝo, ĉar la barbo donis al li mienon malpli virecan. Tiuj ĉi trajtoj estis jam bone konataj de ĉiuj tri; sed eĉ se ne estus tiel, estas dube ĉu ĝuste tiam ili estus alrigardintaj al Quinton. Ili aj okuloj estis fiksataj al alia objekto.

Tute en ilia vojiro, tuj ekster la ronda finaĵo de la vitra konstruaĵo, staris alta viro, kies drapiraĵoj falis al la piedoj senmakule blanke, kaj kies nuda, bruna kranio, vizaĝo kaj kolo brilis en la sunsubira lumo kiel bela bronzo. Li alrigardis la dormanton tra la vitro, kaj li estis pli senmova ol monto.

”Kiu estas tiu?” kriis Pastro Brown, paŝante malantaŭen kun sibla enspiro.

”Ho, jen nur tiu hinda fripono,” grumblis Harris; ”sed mi ne scias kion li faras tie ĉi.”

”Ŝajnas kiel hipnotismo,” diris Flambeau mordante la nigrajn liphararojn.

"Kial vi nemedicinaj homoj ĉiam paroladas sensencaĵon pri hipnotismo?" kriis la kuracisto. "Multe pli similas al domrabado."

"Nu, ni alparolu lin do almenaŭ," diris Flambeau, kiu ĉiam estis preta por agado. Per unu longa paŝo li atingis la lokon kie staris la hindo. Kliniĝante de sia granda alteco, kiu superis eĉ tiun de la orientulo, li diris kun kvieta impertinenteco;

"Bonan vesperon, sinjoro. Ĉu ion vi deziras?"

Tute malrapide, kiel granda ŝipo turniĝante en havenon, turniĝis la granda flava vizaĝo kaj rigardis fine super sia blanka ŝultro. Ili miris vidante, ke la flavaj palpebroj estas tute kunsigelitaj kvazaŭ pro dormado. "Dankon," diris la vizaĝo bonstile anglalingve. "Mi deziras nenion." Tiam duone malfermante la palpebrojn, tiel vidiĝante fendeton da opaleca okuiglobo, li rediris, "Mi deziras nenion." Tiam li larĝe malfermis la okulojn kun teruriga rigardego kaj diris, "Mi deziras nenion!" kaj iris susure for en la rapide mallumiĝantan ĝardenon.

"Kristano estas pli modesta," murmuris Pastro Brown; "li deziras almenaŭ ion."

"Kion ajn li faris?" demandis Flambeau, sulkigante la nigrajn brovojn kaj mallaŭtigante la voĉon.

"Mi ŝatus paroli kun vi pli poste," diris Pastro Brown.

La sunlumo ankoraŭ estis realeca, sed estis la ruĝa lumo de vespero kaj la plejparto de la ĝardenaj arboj kaj arbustoj fariĝis kontraŭ ĝi pli kaj pli nigraj. Ili ĉirkaŭiris la finaĵon de la plantejo kaj marŝis silente laŭ la alia flanko por atingi la ĉefpordon. Dum ili iris, ili ŝajne vekis ion, kiel oni surprizas birdon, en la pli profunda angulo inter la skriboĉambro kaj la pli granda konstruaĵo; kaj denove ili vidis la blankroban fakiron elgliti el la ombro kaj kaŝiri al la ĉefpordo. Ili surpriziĝis tamen vidante, ke li ne estis sola. Ili sin trovis abrupte haltigataj kaj igataj forpeli sian konfuziĝon pro la apero de

sinjorino Quinton, kun ŝia peza ora hararo kaj kvadrata pala vizaĝo, alproksimiĝanta al ili el la krepusko. Ŝi mienis iomete severe tamen estis tute afabla.

”Bonan vesperon, d-ro Harris,” estis ĉio, kion ŝi diris.

”Bonan vesperon, sinjorino Quinton,” diris la malgranda kuracisto tutkore. ”Mi estas tuj dononta al via edzo lian dormigilon.”

”Jes,” ŝi diris per klara voĉo. ”Mi opinias, ke jam estas la tempo.” Kaj ŝi ridetis al ili kaj marŝis en la domon.

”Tro streĉata estas tiu virino,” diris Pastro Brown; ”jen tia virino plenumas siajn devojn dudek jarojn kaj tiam faras ion teruran.”

La malgranda kuracisto rigardis lin por la unua fojo kun intereso. ”Ĉu vi iam studis medicinon?” li demandis.

”Vi devas iom scii pri la korpo kaj krome ankaŭ pri la menso,” respondis la pastro; ”Ni devas iom scii pri la menso kaj krome pri la korpo.”

”Nu,” diris la kuracisto, ”mi iru doni al Quinton lian aĵon.”

Ili estis preterpasintaj la angulon de la antaŭa fasado kaj alproksimiĝis al la ĉefpordo. Dum ili eniris tra tio, ili vidis por la tria fojo la viron en la blanka robo. Li iris tiel rekte al la ĉefpordo, ke ŝajnis tute nekredeble, ke li ne estas ĵus veninta el la skriboĉambro kontraŭ ĝi. Ili sciis tamen, ke la pordo de la skriboĉambro estas ŝlosita.

Pastro Brown kaj Flambeau tamen konservis al si mem tiun ĉi strangan konfliktaĵon kaj d-ro Harris ne estis tia homo kia malŝparus sian pensopovon pensante pri neblaĵoj. Li lasis eliri la ĉie-estantan aziulon kaj tiam enpaŝis vigle en la vestiblon. Tie li trovis iun, kiun li jam forgesis. La vanta Atkinson ankoraŭ restadis senokupe vagante, zumante kaj puŝetante aferojn per sia tubera kano. La vizaĝo de la kuracisto montris spasmon de abomeno kaj decidemo

kaj li flustris rapide al sia kunulo: "Mi devos reŝlosi la pordon, alie eniros tiu ĉi rato. Sed mi elvenos post du minutoj."

Li rapide malŝlosis la pordon kaj ĝin ŝlosis denove post si, apenaŭ evitante kapantaŭan ekkuregon de la junulo kun la melona ĉapelo. La junulo sin ĵetis senpacience en seĝon. Flambeau ekzamenis iran anornamaĵon sur la muro; Pastro Brown kiu ŝajne estis iel menskonfuzita, malvigle rigardadis la pordon. Post proksimume kvar minutoj malfermiĝis denove la pordo. Ĉi foje Atkinson agis pli rapide. Li saltis antaŭen, malferme tenis la pordon por sekundo kaj kriis: "Ho, aŭskultu do Quinton, mi bezonas..."

Venis de la alia flanko de la skriboĉambro la klara voĉo de Quinton, duone oscedo, duone ekkrio de laceca ridado.

"Ho, mi scias kion vi bezonas. Prenu ĝin do, kaj lasu min en trankvilo. Mi verkas kanton pri pavoĵ."

Antaŭ ol fermiĝis la pordo, elvenis flugante tra la aperturo ora monero; kaj Atkinson antaŭen stumblante ĝin kaptis kun kromordinara lerteco.

"Do tio estas finita," diris la kuracisto, kaj sovaĝe ŝlosante la pordon, li kondukis ilin en la ĝardenon.

"Kompatinda Leonard povas nun ĝui iom da paco," li aldonis al Pastro Brown; "li estas en tie ŝlosata tute sola por unu du horoj."

"Jes," respondis la pastro, "kaj lia voĉo ŝajnis sufiĉe gaja kiam ni lasis lin." Tiam li rigardis serioze ĉirkaŭe al la ĝardeno kaj ekvidis la malprecizan figuron de Atkinson staranta kaj tintiganta la monejon en la poŝo, kaj pretere, en la purpura krepusko, la figuron de la hindo, sidanta tute vertikale sur herbkovrita deklivo la vizaĝo turnita al la subiranta suno. Tiam li diris abrupte, "Kie estas sinjorino Quinton?"

"Ŝi estas suprenirinta al sia ĉambro," diris la kuracisto. "Jen ŝia ombro sur la kovrilo."

Pastro Brown suprenrigardis kaj brovsulkiĝante ekzamenadis la nigran konturon en la gaslumita fenestro.

”Jes,” li diris, ”tio estas ŝia ombro,” kaj li faris unu du paŝojn kaj sin ĵetis sur benkon.

Flambeau eksidis ĉe flanko; sed la kuracisto estis unu el tiuj energiplenaj personoj, kiuj vivas nature sur la kruroj. Li marŝis for, fumante, en la krepuskon kaj ambaŭ amikoj estis lasataj kune.

”Patro mia,” diris Flambeau france, ”kio estas ĉe vi?”

Pastro Brown estis silenta dum duonminuto, kaj tiam li diris; ”Superstiĉo estas malreligia, sed estas io en la aero de tiu ĉi loko. Mi kredas, ke temas pri tiu hindo... almenaŭ parte.”

Li profundigis en silentadon kaj observis la malproksiman konturon de la hindo, kiu sidis ankoraŭ rigida kvazaŭ preĝante. Unuarigarde li ŝajnis senmova, sed dum Pastro Brown lin observadis li vidis, ke la viro svingiĝas, sed nur iomete kun ritma movado, kiel ankaŭ svingiĝis nur iomete la nigraj arbpintoj pro la venteto, kiu ŝtele vagadis laŭ la malhelaj ĝardenaj vojetoj kaj puŝetis la falintajn foliojn.

La pejzaĝo fariĝis rapide malluma, kvazaŭ pro ŝtormo, sed ili povis ankoraŭ vidadi ĉiujn figurojn en iliaj diversaj lokoj. Atkinson sin apogis al arbo kun vizaĝo senesprima; la edzino de Quinton ankoraŭ estis ĉe sia fenestro; la kuracisto estis promeninta foren ĉirkaŭ la plantejon; ili povis vidi ties cigaron kia vaglumo; kaj la fakiro ankoraŭ sidis rigide sen svingiĝante, dum supere la arboj komencis svingiĝi kaj preskaŭ muĝi. Ŝtormo estis nepre venonta.

”Kiam tiu hindo alparolis nin,” daŭrigis Brown kun babilada subvoĉo, ”mi vidis ian vizion, vizion pri li kaj la tuto de lia universo. Sed li diris nur la samajn vortojn tri fojojn. Kiam unuafoje li diris, ‘Mi deziras nenion’, ĝi signifis nur, ke li estas nepenetrebla, ke Azio ne malkaŝas siajn sekretojn. Tiam li diris denove, ‘Mi deziras neni-

on', kaj mi eksciis, ke tio signifas, ke li por si mem sufiĉas, kiel kosmo, ke li bezonas nenium Dion, nek konfesas ajnajn pekojn. Kaj kiam la trian fojon li diris, 'Mi deziras nenion', li ĝin diris kun flamantaj okuloj. Kaj mi eksciis, ke li volas diri laŭvorte kion li diris; ke nenio estas lia deziro kaj lia hejmo; ke li laciĝas avide al nenio kiel aliulo al vino; ke neniigo, la nura ekstermo de ĉio aŭ io..."

Falis du gutoj da pluvo; kaj ial Flambeau eksaltetis kaj ekrigardis supren, kvazaŭ li estus pikita de tio. Kaj la saman momenton la kuracisto, malproksime apud la plantejo, ekkuris en ilian direkton, kriante ion dum li kuris.

Dum li venis inter ilin kiel obuso, okazis, ke Atkinson promenis pli proksime al la antaŭa parto de la domo; kaj la kuracisto ektenis lin je la kolumo per konvulsia forto. "Fiago!" li kriis, "Kion vi faris al li, vi hundaĉo?"

La pastro estis rekte ekstarinta kaj havis la ŝtalan voĉon de komandanta oficiro.

"Ne baraktu," li kriis kviete; "ni sufiĉas por teni iun se ni deziras. Kio estas, doktoro?"

"Ĉio ne estas en bona ordo ĉe Quinton," diris la kuracisto tute pala. "Mi povis videti lin tra la vitro, kaj lia kuŝo timigas min. Almenaŭ ne tiel mi lasis lin."

"Ni eniru al li," diris Pastro Brown mallonge. "Ne necesas teni sinjoron Atkinson. Mi vidadis lin de kiam ni aŭdis la voĉon de Quinton."

"Mi restu tie ĉi por lin observi," rapide diris Flambeau. "Vi eniru kaj konstatu."

La kuracisto kaj la pastro flugrapidis al la pordo de la skriboĉambro, malŝlosis ĝin kaj falis en la ĉambron. Tion farante ili preskaŭ falis sur la grandan mahagonan tablon, en la mezo, kie kutime skribis la poeto; ĉar la loko estis lumigata nur de malgranda fajro, bru-

lanta por la malsanulo. En la mezo de tiu ĉi tablo troviĝis sola paperfolio, memevidente tie intence lasita. La kuracisto ektenis ĝin, rigardetis ĝin, transdonis ĝin al Pastro Brown, kaj kriante, "Bona Dio, rigardu tion!" sin ĵetis en la vitran ĉambron preteran, kie la teruraj tropikaj floroj ŝajne ankoraŭ tenis memoron de la sunsubiro.

Pastro Brown legis tri fojojn la vortojn antaŭ ol li demetis la paperon. La vortoj estis jenaj "Mi mortas propramane; sed mi mortas murдите." Tio estis en la tute neimitebla, eĉ nelegebla manskribo de Leonard Quinton.

Tiam Pastro Brown, ankoraŭ tenante la paperon en la mano, paŝis al la plantejo, sed nur trafis sian kuracistan amikon revenanta kun vizaĝo certiga kaj kolapsa. "Li faris tion," diris Harris.

Ili iris kune tra la grandiozan nenaturan belecon, kakta kaj azalea, kaj trovis Leonard Quinton, poeto kaj romantikisto, kun la kapo pendanta renverse de sur lia divano kaj liaj ruĝaj bukloj balaantaj la plankon. Lia maldekstra flanko estis trapikita de la stranga ponardo, kiun ili trovis en la ĝardeno kaj lia senforta mano ankoraŭ kuŝis sur ĝia tenilo.

Ekstere la ŝtormo estis alveninta per unu paŝo, kaj la ĝardeno kaj la vitra tegmento estis mallumigataj de pelanta pluvo. Pastro Brown ŝajne atentis pli pri la papero ol pri la kadavro; li ĝin tenis antaŭ la okuloj kaj ŝajnis provi ĝin legi en la krepusko. Tiam li tenis ĝin kontraŭ la malforta lumo kaj dum li tion faris, fulmo rigardegis al ili dum unu sekundo tiel blanke, ke la papero kontraste ŝajnis nur nigra.

Mallumo plena de tondrado sekvis, kaj post la tondrado, diris el la mallumo la voĉo de Pastro Brown; "Doktoro, tiu ĉi papero havas malĝustan formon."

"Kion vi volas diri?" demandis D-ro Harris, kun brovsulka rigardego.

"Ĝi ne estas kvadrata," respondis Brown. "Ĉi havas la angulon fortondita. Kion signifas tio?"

"Je Diablo, kiel mi sciu?" grumblis la kuracisto. "Ĉu pli bone ni movu tiun ĉi kompatindulon? Li estas tute senviva."

"Ne," respondis la pastro; "ni devas lin lasi kiel li estas kaj venigi la policanojn." Sed li ankoraŭ elezamenis la paperon.

Dum ili reiris tra la skriboĉambro li haltis ĉe la tablo kaj prenis malgrandan ungotondilon. "Ha," li diris, kun ia maŝarĝiĝo, "jen per tiu li ĝin faris. Sed malgraŭ..." Kaj li sulkgis la brovon.

"Ho, ĉesu ludaĉi kun tiu papereto," diris la kuracisto emfaze. "Estis kaprico lia. Da tiaj li havis centojn. Tiel li tranĉis ĉiom da sia papero," dum li montris amason da folietoj, ankoraŭ ne uzitaj, sur alia kaj malpli granda tablo. Pastro Brown alpaŝis al ĝi kaj levis folion. Ĝi havis la saman nesimetrian formon.

"Tute tiel," li diris. "Kaj tie ĉi mi vidas la angulojn, kiuj estas fortonditaj." Kaj kio indignigis lian kolegon, li komencis tiujn nombri.

"Tio estas en bona ondo," li diris kun pardonetema rideto. "Dudek tri folioj tonditaj, kaj dudek du anguloj fortonditaj. Kaj ĉar mi vidas, ke vi estas senpacienca, ni aliĝu al la aliaj."

"Kiu diros al lia edzino?" demandis d-ro Harris. "Ĉu vi supreniros nun por diri al ŝi, dum mi sendas serviston por la policanoj?"

"Kiel vi volas," diris Pastro Brown indifere. Kaj li eliris al la ĉefpordo.

Ankaŭ tie ĉi li trovis dramon, kvankam de pli groteska speco. Montriĝis nenio malpli grava ol lia granda amiko Flambeau en pozo dum longa tempo nekutima ĉe li, dume sur la vojeto antaŭ la ŝtuparo estis sternita, la botoj en la aero, la aminda Atkinson, la melona ĉapelo kaj kano ĵetitaj fluge en kontraŭajn direktojn laŭ la vo-

jeto. Atkinson estis fine tediĝinta pri la preskaŭ patra zorgado de Flambeau, kaj estis provinta lin perforte faligi, kio estis neniel facila ludo por ludi kun la Roi des Apaches, eĉ post la abdiko de tiu monarko.

Flambeau estis saltonta sur sian kontraŭulon por lin fiksi denove, kiam la pastro lin frapetis afable surŝultre.

”Repaciĝu kun sinjoro Atkinson, mia amiko,” li diris. ”Petu reciproke pardonon kaj diru ‘Bonan nokton’. Ni devas ne plu lin deteni.” Tiam, dum Atkinson iomete dube leviĝis kaj kolektis siajn ĉapelon kaj kanon kaj iris al la kradpordo, diris Pastro Brown per voĉo pli serioza; ”Kie estas tiu hindo?”

Ĉiuj tri (ĉar la kuracisto estis aliĝinta al ili) nevole turniĝis al la neklara herba deklivo inter la tumultaj arboj purpuraj pro krepusko, kie lastfoje ili vidis la brunan viron pendolanta dum siaj strangaj preĝoj. La hindo estis for.

”Malbenu lin,” kriis la kuracisto, furioze piedbatante. ”Nun mi scias, ke tion faris tiu nigrulaĉo.”

”Mi opiniis, ke vi ne kredas al magio,” diris Pastro Brown tute kviete.

”Efektive ne,” diris la kuracisto, turnante la okulojn. ”Mi nun scias, ke mi malamegis tiun flavan diablon kiam mi kredis, ke li estas trompa magiisto. Kaj des pli mi malamegos lin se mi konvinkiĝos, ke li estas vera magiisto.”

”Nu, lia eskapo estas nenio,” diris Flambeau. ”Ĉar ni estus povintaj nek pruvi nek fari ion kontraŭ li. Apenaŭ oni povas alvoki la lokan policanaron pro rakonto pri sinmortigo efektivigita per magiado aŭ memsugestiado.”

Dume Pastro Brown estis trovinta la vojon al la domo kaj iris por malkaŝi la novaĵon al la edzino de la mortinto.

Kiam li denove eliris li mienis iomete pale kaj tragedie, sed kio pasis inter ili dum tiu intervjuo neniam sciigis, eĉ kiam ĉio sciigis.

Flambeau, kiu parolis mallaŭte kun la kuracisto, surpriziĝis vidante aperi tiel baldaŭ sian amikon ĉe sia kubuto; sed Brown tute ne atentis kaj nun kondukis la kuraciston iomete foren. "Vi jam alvokis la policanojn, ĉu ne?" li demandis.

"Jes," respondis Harris. "Ili nepre alvenos post dek minutoj."

"Ĉu vi favoros min?" diris la pastro kviete. "La vero estas, ke mi faras kolekton de tiuj ĉi kuriozaj aferoj, kiuj ofte enhavas, kiel pri nia hinda amiko, detalojn kiuj apenaŭ povas estis pritraktataj en polica raporto. Nu, mi deziras, ke vi skribu raporton pri tiu ĉi afero por mia propra privata uzado. Via estas lerta metio," li diris alrigardante la kuraciston serioze kaj firme en la vizaĝon. "Kelkfoje mi kredas, ke vi konas iujn detalojn pri tiu ĉi afero, kiujn vi taksis kiel ne konvene mencioblaj. Mia estas konfidenca metio kiel via kaj mi pritraktos severe konfidence ion kion vi skribos por mi. Nur skribu la tuton."

La kuracisto, kiu dum la tuta tempo aŭskultis kun la kapo iomete klinita, alrigardis unu momenton la pastron rekte en la vizaĝon kaj diris, "Nu bone," kaj eniris en la skriboĉambron, fermante post si la pordon.

"Flambeau," diris Pastro Brown, "jen estas longa benko sub la verando kie ni povas fumi for de la pluvo. Vi estas la sola amiko mia en la mondo kaj mi deziras paroli kun vi. Aŭ, eble silenti kun vi."

Ili instalis sin komforte en la veranda seĝo; Pastro Brown, malgraŭ sia kutimo, akceptis bonan cigaron kaj fumis ĝin trankvile en silento dum klakis kaj siblis la pluvo sur la tegmento de la verando.

"Mia amiko," fine li diris, "temas pri tre stranga afero. Tre stranga afero."

”Tia mi kredas, ke ĝi certe estas,” diris Flambeau kun io kio tre similis al ekstremo.

”Vi nomas ĝin stranga kaj mi nomas ĝin stranga,” diris la alia, ”tamen ni ambaŭ volas esprimi tute malajn ideojn. Moderna menso ĉiam konfuziĝas inter du malsmaj ideoj; mistero, laŭ la senco de tio kio estas mirinda, kaj mistero laŭ la senco de tio kio estas malsimpla. Tio estas duono de la malfacileco pri mirakloj. Miraklo estas miriga; sed ĝi estas simpla. Ĝi estas simpla ĉar ĝi estas miraklo. Ĝi estas potenco venanta senpere de Dio (aŭ de la diablo), anstataŭ pere de naturo aŭ homaj volo. Nu, vi volas diri, ke tiu ĉi afero estas miriga, ĉar ĝi estas mirakla, ĉar ĝi estas sorĉado farita de fia fakiro. Komprenu do, ke mi ne asertas, ke ĝi ne estas spirita aŭ diabla. Nur ĉielo kaj infero scias per kiaj ĉirkaŭaj influaj eneris strangaj pekoj en la vivojn de homoj. Sed nun mia aserto estas jene; se ĝi estis pura sorĉado, kiel vi opinias, tiaokaze ĝi estas mirinda; sed ĝi ne estas mistera... tio estas, ĝi ne estas malsimpla. La eco de miraklo estas mistera, sed la maniero de ĝia plenumo estas simpla. Nu, la maniero de tiu ĉi afero estas la malo de simpleco.”

La ŝtormo kiu estis iomete malfortiĝinta, ŝajne komencis plifortiĝi, kaj venis pezaj movadoj kvazaŭ de malproksima tondrado. Pastro Brown lasis fali la cindron de sia cigaro kaj daŭrigis:

”Montriĝis pri tiu ĉi epizodo,” li diris, ”torda, malbela, malsimpla eco, kiu apartenas ne al la rektaj frapoj de ĉielo aŭ infero. Kiel oni konas la serpentuman postsignon de heliko, mi konas la serpentuman postsignon de homo.”

La blanka fulmo malfermis sian grandegan okulon kun unu sola palpebrumo, la ĉielo fermiĝis denove kaj la pastro daŭrigis:

”El la tuto de tiuj ĉi malrektaj aĵoj, la plej malrekta estis la formo de tiu paperfolio. Tio estis pli malrekta ol la ponardo, kiu mortigis lin.”

”Vi parolas pri la papero sur kiu Quinton konfesis sian sinmortigon,” diris Flambeau.

”Mi parolas pri la papero sur kiu Quinton skribis ‘Mi mortas propramane’,” respondis Pastro Brown. ”La formo de tiu papero, amiko mia, estis formo malĝusta; formo malĝusta se tion mi iam vidis en tiu ĉi malvirta mondo.”

”Ĝi havis nur angulon fortonditan,” diris Flambeau, ”kaj mi kredas, ke la tuto da ties papero estas tiel tondita.”

”Tre stranga maniero,” diris la alia, ”kaj tre malbona maniero, laŭ mia gusto kaj imago. Vidu do, Flambeau, ĉi tiu Quinton... Dio akceptu lian animon... estis eble kelkrilate hundaĉo, sed li vere estis artisto, per kraĵono tiel ankaŭ per plumo. Lia manskribaĵo, kvankam malfacile legebla, estis forta kaj bela. Mi ne povas pruvi kion mi asertas; nenion mi povas pruvi. Sed mi diras al vi, subtenata de mia plena konvinko, ke tute ne li estus povinta fortondi de paperfolio tian malinde avaran peceton. Se li estus volinta detranĉi paperon por iu bindada aŭ alĝustiga celo li estus farinta tute malsman ektranĉon per la tondiloj. Ĉu vi memoras la formon? Ĝi estis avaraĉa formo. Ĝi estis malĝusta formo. Kiel jene. Ĉu vi ne memoras?”

Kaj li svingis sian brulantan cigaron antaŭ si en la mallumo, skribante neregulajn kvadratojn tiel rapide, ke ŝajnis al Flambeau vere, ke li vidas ilin kiel fajrajn hieroglifojn sur la mallumo... hieroglifoj tiaj kiajn lia amiko priparolis, kiuj ne estas deĉifreblaj, sed bonan signifon ne povas havi.

”Tamen,” diris Flambeau, dum la pastro remetis denove la cigaron en la buŝon kaj malantaŭen kliniĝis rigardegante al la supraĵo. ”Supozu, ke iu alia efektive ŭzis la tondilon. Kiel iu alia fortondante pecojn de lia skribpapero, igus Quinton sinmortigi?”

Pastro Brown ankoraŭ kliniĝis malantaŭen, kaj rigardegis la su-

praĵon, sed li prenis la cigaron el sia buŝo kaj diris: "Efektive Quinton ne sinmortigis."

Flambeau rigardis lin. "Nu, malbenu ĉion." li kriis, "kial do li konfesis sinmortigon?"

La pastro antaŭen kliniĝis denove, kuŝigis la kubutojn sur la genuojn, rigardis la teron kaj diris per mallaŭta, klara voĉo; "Li neniam konfesis sinmortigon."

Flambeau demetis sian cigaron. "Vi volas diri," li diris, "ke la skribaĵo estis falsita?"

"Ne," diris Pastro Brown. "Quinton certe ĝin skribis."

"Jen tiel do," diris la agacita Flambeau; "Quinton skribis, 'Mi mortas propramane,' per la propra mano sur ordinaran folion."

"De malĝusta formo," diris kviete la pastro.

"Ho, la formo estu malbenata," kriis Flambeau. "Kiel temas pri la formo?"

"Trovigis dudek tri tranĉitaj foliaj," daŭrigis Brown neŝancelite, "kaj nur dudek du pecetoj fortranĉitaj. Tial unu el la pecetoj estis detruita, kredeble tiu de la skribhava folio. Ĉu tio sugestas ion al vi?"

Heliĝis la vizaĝo de Flambeau kaj li diris; "Estis io alia skribita de Quinton, iuj aliaj vortoj. 'Oni diros al vi, ke mi mortas propramane,' aŭ 'Ne kredu, ke...'"

"Pli varme, kiel diris la infanoj," diris lia amiko. "Sed la peco estis larĝa apenaŭ duoncolon; sufiĉe da spaco por unu vorto ne estis, des malpli por kvin. Ĉu vi povas pripensi ion, apenaŭ pli granda ol komo, kiun viro kun infero ĉe la koro devis forŝiri ĉar ĝi estis atesto kontraŭ li?"

"Mi povas pripensi nenion," fine diris Flambeau.

"Kion pri citiloj?" diris la pastro kaj ĵetis la cigaron malproksimen en la mallumon kia falanta stelo.

Ĉiuj vortoj forlasis la langon de la alia viro, kaj Pastro Brown diris, kiel iu revenanta al fundamentaĵoj;

”Leonard Quinton estis romanisto kaj estis verkanta romanon pri magio kaj hipnotismo. Li...”

Je tiu momento abrupte malfermiĝis malantaŭ ili la pordo, kaj elvenis la kuracisto, la ĉapelo surkape. Li transdonis en la manojn de la pastro longan koverton.

”Jen la dokumento, kiun vi deziris,” diris li. ”Kaj mi devas hejmeniri. Bonan nokton.”

”Bonan nokton,” diris Pastro Brown dum la kuracisto paŝis vigle al la kradpordo. Li estis lasinta malfermita la pordon, tiel, ke radio de gaslumo falis sur ilin. En tiu lumo malfermis Brown la koverton kaj legis la sekvantajn vortojn:

ESTIMATA PASTRO BROWN,—Vicisti Galilæe. Alie estu malbenitaj via okuloj, kiuj estas certe tre penetremaj. Ĉu estas eble, ke vere post ĉio, io troviĝas en tuta tiu sensencaĵo via?

”Mi estas viro, kiu de junaĝo kredis al naturo kaj ĉiuj naturaj funkcioj kaj instinktoj, ĉu homoj nomas tiujn moralaj aŭ malmoralaj. Longe antaŭ ol mi fariĝis kuracisto, kiam mi ankoraŭ estis lerneja bubo zorgante pri musoj kaj araneoj, mi kredis, ke estis bona besto estas la plej bona celo en la mondo. Sed nur nuntempe mi estis ŝancelita; mi estas kredinta al la Naturo; sed ŝajnas, ke la Naturo povas perfidi homon. Ĉu estas eble, ke troviĝas io en via sensencaĵo? Mi fariĝas vere mense malsana.

”Mi amis la edzinon de Quinton. Kio estis malbona pri tio? La naturo diris al mi, kaj la amo implusas la mondon. Mi ankaŭ pensis tute sincere, ke ŝi estos pli feliĉa, kun pura besto kiel mi, ol kun tiu turmentiga sensenculo. Kio estas malbona pri tio? Mi simple kalkulis la faktonj kiel scienculo. Ŝi estus pli feliĉa.

”Laŭ mia propra kredaro mi libere estus povinta mortigi Quin-

ton, kio estis la plej bona afero por ĉiu, eĉ li mem. Sed kiel sana besto mi tute ne intencis mortigi min. Mi decidis tial, ke tion mi neniam faros ĝis mi ekvidos okazon, kiu lasus min tute libera. Tion okazon mi ekvidis hodiaŭ matene.

”Entute mi eniris la skriboĉambron de Quinton tri fojojn hodiaŭ. La unuan fojon kiam mi eniris li volis preparoli nenion krom la strangege rakonto, nomita ‘La Malbeno de Sanktulo’, kiun li verkis, kiu rakontas kiel iu hinda ermito igis anglan kolonelon sinmortigi, senĉese pensante pri li. Li montris al mi la finajn tri foliojn kaj eĉ legis al mi la lastan paragrafon, kiu estis kiel jene: ‘La vinkinto de la Punĝab, nura flava skeleto, sed ankoraŭ giganta, iel sin levis sur la kubuto kaj spasme flustris en la orelon de sia nevo; ‘mi mortas propramane, sed mi mortas murдите.’” Tiel okazis per unu ŝanco el cent, ke tiuj fina vortoj estis skribitaj ĉe la komenco de nova folio. Mi eliris el la ĉambro kaj iris en la ĝardenon ebriigite de la terurige favora okazo.

”Ni promenis ĉirkaŭ la domo; kaj okazis du aferoj plu, kiuj estis favoraj al mi. Vi suspektis hindon kaj vi trovis ponardon, kiun plej kredeble uzus la hindu. Kaptante la okazon ĝin ŝovi en la poŝon mi reiris al la skriboĉambro de Quinton, ŝlisis la pordon, kaj donis al li la dormigaĵon. Li volis tute ne respondi al Atkinson, sed mi instigis al li laŭtvoki por kvietigi la junulon, ĉar mi bezonis nepran pruvon, ke Quinton vivis kiam mi por la dua fojo lasis la ĉambron. Miaj manoj estas sufiĉe lertaj kaj rapidoj kaj post minuto kaj duono mi estis farinta kion mi volis. Mi estis ŝutinta en la fajron la unuan parton de la romano de Quinton, kie ĝi brulis ĝis cindroj. Tiam mi ekvidis, ke la citiloj ja ne taŭgas, tial tiujn mi fortondis, kaj por ke ŝajnu pli kredeble, tiel tondis la tuton. Tiam mi eliris sciante, ke kuŝas sur la tablo la sinmortiga konfeso de Quinton, dum Quinton mem kuŝas vivante sed dormante en la pretera plantejo.

”La lasta ago estis sovaĝa; vi povas divini ĝin: mi ŝajnis estis vidinta Quinton senviva, kaj kuregis en ties ĉambrom. Mi haltigis vin per la papero kaj; estante lerta pri la manoj, mortigis Quinton dum vi legis lian sinmortigo-konfesion. Li duone dormis, estante sub la influo de la drogo, kaj mi metis lian propran manon al la tranĉilo kaj puŝis ĝin en lian korpon. La tranĉilo havis tian strangan formon, ke neniu krom operaciisto estus povinta taksi la direkton por trafi lian koron. Mi scivolas ĉu vi rimarkis tion.

”Kiam mi estis tion farinta, okazis eksterordinara afero. La Naturo forlasis min. Mi sentis min malsana. Mi sentis kvazaŭ mi estas farinta ion malbonan. Mi kredas, ke mia cerbo diskadukiĝas; mi sentas ian senesperan plezuron, pensante, ke mi pridiris la aferon al iu; ke mi ne devos resti sola kun ĝi, se mi edziĝos kaj havos infanojn. Kio estas ĉe mi? Freneziĝo... aŭ ĉu iu povas senti sinriproĉon, kiel en la poemoj de Byron. Skribi plu mi ne povas.

JAMES ERSKINE HARRIS.”

Pastro Brown zorge faldis la leteron kaj ĝin metis en sian brustpoŝon ĝuste kiam venis laŭta tintado de la sornorilo ĉe la kradpordo kaj brilis la malsekaj pluvoŝirmiloj de pluraj policanoj en la vojo ekstera.

LA PEKOJ DE LA PRINCO SARADINE

Kiam Flambeau prenis sian unumonatan libertempon for de sia oficejo en Westminster li pasigis ĝin en malgranda velboato, tiel malgranda, ke dum la plej granda parto de la tempo ĝi estis remboato. Plue, li pasigis ĝin en la malgrandaj riveroj de la orientaj graflandoj; riveroj tiel mallarĝaj, ke la boato aspektis kiel magia boato veturante surtere tra herbejoj kaj grenkampoj. Ĝi estis sufiĉe komforta por du personoj; restis nur sufiĉe da spaco por necesajoj kaj Flambeau estis provizinta ĝin je tiaj aĵoj, kiajn lia aparta filozofio postulis. Ŝajne tiuj ĉi necesajoj estis kvar, nome, skatoloj de salmo, se li volus manĝi; ŝargitaj revolveroj, se li volus batali; botelo da brando, supozeble por la okazo, se li svenos; kaj pastro, supozeble por la okazo, se li mortos. Kun tiuj ĉi malpezaj vojaĝaĵoj li rampis laŭ la malgrandaj Norfolkaj riveroj, intencante finfine atingi la lagojn, sed dume ĝuante la superpendantajn ĝardenojn kaj herbejojn, la spegulitajn domegojn aŭ vilaĝojn, malrapidante por kapti fiŝojn en la lagetoj kaj anguloj, kaj iom tenante la bordon.

Kiel vera filozofo, Flambeau en sia libertempo havis pretekston. Li havis ian duon-celon, kiun li konsideris ĝuste tiel serioze, ke ĝia sukceso estus la krono de la libertempo, sed ĝuste tiel malgrave, ke ĝia malsukceso ne igus ĝin vana. Antaŭ multaj jaroj, kiam li estis rabista reĝo kaj la plej famkonata persono en Parizo, li ofte ricevis senrespondecajn komunikaĵojn, aprobajn, malaprobajn, kaj eĉ amesprimantajn; sed iu el ili aparte iel restadis en lia memoro. Tio konsistis nur el vizitkarto en koverto portante anglan poŝtstampon.

Sur la malantaŭa parto de la karto estis france skribita per verda inko; "Se vi iam eksiĝos kaj fariĝos respektinda, venu min viziti. Mi volas renkonti vin, ĉar mi estas renkontinta ĉiujn aliajn eminentulojn de mia epoko. Tiu ruzo via, igi unu detektivo aresti alian estis la plej grandioza sceno el la tuta franca historio." Sur la antaŭa parto de la karto estis gravurita laŭ la formala maniero, "La Princo Saradine, Junka Domo, Junkinsulo, Norfolk."

Tiutempe li ne tro ĝenis sin pri la princo, krom elserĉi, ke li estis brilanta kaj laŭmoda ulo en Sud-Italujo. Dum lia juneco, onidire, li amforkuris kun altranga edzino; al lia societa mondo la petolaĵo estis apenaŭ miriga, ĝi tamen fiksiĝis en ĉies memoro pro alia tragedio; la laŭdira sinmortigo de la malhonorita edzo, kiu ŝajne sin ĵetis de krutaĵo en Sicilio. Poste, ioman tempon la princo loĝis en Vieno, sed liajn plej lastajn jarojn li ŝajne pasigis per senĉesa kaj senripoza veturado. Kiam tamen Flambeau, kiel la princo mem, forlasis eŭropan eminentecon kaj ekloĝis en Anglujo, venis en lian menson viziti senanonce tiun ĉi eminentan ekziliton en la Norfolkaj lagoj. Ĉu li trovos la lokon aŭ ne li tute ne sciis; kaj ĝi efektive estis sufiĉe malgranda kaj forgesita. Okazis tamen, ke li ĝin trovis multe pli frue ol li atendis.

Iun nokton ili estis aligintaj sian boaton sub rifo vualita de altkreskaj herboj kaj senkapigitaj arboj. Dormo, post forta remado, estis tre frue falinta sur ilin, kaj pro tio ankaŭ ili vekiĝis antaŭ ol lumo aperis. Parolante pli precize, ili vekiĝis antaŭ ol taglumo aperis; ĉar granda citrona luno estis nur ĵus subiranta en la densaĵo el altkreska herbo super iliaj kapoj, kaj la ĉielo estis brilanta purpurblue, nokteca sed hela. Ambaŭ viroj samtempe spertis rememoron pri infaneco, pri la kobolda aventurplena tempo kiam altkreskaj herbaĉoj kaŝas nin kiel arbaroj. Tiel starante kontraŭ la larĝa sveltanta luno, la lekantetoj ŝajnis vere esti gigantulaj lekantetoj, la

leontodoj gigantulaj leontodoj. Iel tio rememorigis ilin pri la bordo de infaneja tapeto. La malalta nivelo de la rivero sufiĉis por malle-vi ilin ĝis sub la radikoj de ĉiuj arbustoj kaj floroj kaj devigis ilin supren rigardadi al la herbo.

”Je l’dioj,” diris Flambeau, ”estas kvazaŭ esti en felando.”

Patro Brown eksidis rekte en la boato kaj faris krucsignon. Ties movo estis tiel abrupta, ke lia amiko demandis, milde mirigita, kio estas.

”La homoj, kiuj verkis la mezepokajn baladojn,” respondis la pastro, ”sciis plimulte pri feoj ol vi. Ne nur agrablajoj okazas en felando.”

”Ho sensencaĵo,” diris Flambeau. ”Nur agrablajoj povus okazi sub tia senkulpa luno. Mi proponas tuj antaŭeniri kaj konstati tion kio vere okazos. Ni eble mortos kaj putriĝos antaŭ ol iam denove ni vidos tian lunon aŭ tian humoron.”

”Bone,” diris Pastro Brown. ”Mi neniam diris, ke estas ĉiam kulpe eniri felandon. Mi nur diris, ke estas ĉiam danĝere.”

Ili sin puŝis malrapide kontraŭ la fluo de la lumiĝanta rivero; la radianta purpuro de la ĉielo kaj la pala oro de la luno fariĝis pli kaj pli malfortaj kaj malaperis en tiun larĝan senkoloran kosmon, kiu antaŭiras la kolorojn de la tagiĝo. Kiam la unuaj malfortaj strioj ruĝaj kaj oraj kaj grizaj fendis la horizonton de unu fino ĝis la alia, ili estis interrompataj de la nigra amaso de urbeto aŭ vilaĝo, kiu sidis sur la rivero proksime antaŭ ili. Kiam ili alvenis sub la superpendantaj tegmentrandoj kaj pontoj de tiu ĉi riverborda vilaĝeto, jam estis sufiĉe forta lumo, per kiu ĉio estis videbla. La domoj, kun iliaj longaj, malleviĝintaj kaj kliniĝaj tegmentoj ŝajnis iri por trinki ĉe la rivero, kiel kolosaj grizaj kaj ruĝaj bovoj. La larĝiĝanta kaj blankiĝanta tagiĝo estis jam fariĝinta la vera laborinstiganta taglumo antaŭ ol ili ekvidis ajnan vivantan kreitaĵon sur la kajoj kaj

pontoj de tiu silenta urbo. Fine ili vidis tre serenajn kaj prosperajn viron sen jakoj kaj nudbrakoj, kun vizaĝo tiel ronda kiel la ĵus subirinta luno, kaj kun radioj el ruĝaj barbharoj sub lia malsupra arko, kiu apogis sin al fosto super la malrapida tajdo. Pro impulso neklarigebla, Flambeau leviĝis ĝis sia pleja alteco en la svingiĝanta boato kaj laŭtkriis al la viro, demandante ĉu li konas Junkinsulon aŭ Junkan Domon. La rideto de la prospera viro fariĝis iomete pli larĝa kaj li nur etendis la brakojn kaj elmontris laŭlonge de la rivero ĝian pliproksiman kurbon. Flambeau antaŭeniris sen plua parolado.

La boato ĉirkaŭiris multajn herbajn angulojn kaj sekvis multajn tiajn junkkovritajn kaj silentajn etendaĵojn de l'rivero; sed antaŭ ol la serĉado estis fariĝinta teda ili ŝvebis ĉirkaŭ aparte abruptan angulon kaj eniris la silenton de ia laguno aŭ lageto, kies ekvido tuj haltigis ilin. Ĉar meze de tiu ĉi pli larĝa etendaĵo de akvo, ĉiuflanke bordita de junkoj, kuŝis longa malalta insuleto, laŭ kies bordo estis longa malalta domo aŭ bangalo konstruita el bambuo aŭ iu forta tropika kano. La vertikalaj bambuaj stangoj el kiuj konsistis la muroj estis pal-flavaj, la kliniĝaj vergoj el kiuj la tegmento estis farita, estis pli malpale ruĝaj aŭ brunaj; krome la domo estis aĵo de ripetado kaj unutoneco. La frumatena venteto susurigis la akvoherbojn ĉirkaŭ la insulo kaj kantis en la stranga riphava domo kvazaŭ en giganta ŝalmaro.

"Je Georgo," kriis Flambeau, "jen ĝi, tamen. Jen tie ĉi estas Junkinsulo, se iam tia ekzistis. Tie ĉi estas Junka Doma, se ĝi ie estas. Mi kredas, ke tiu dikulo kun la vangharoj estis feo."

"Eble," diris Pastro Brown nepartie. "Se tia li estis, li estis malbona feo."

Tamen eĉ dum li parolis la impulsema Flambeau estis alterigintan sian boaton inter la klakantaj junkoj, kaj ili staris sur la longa stranga insuleto, apud la kurioza kaj silenta domo.

La domo staris tiel ke ĝia malantaŭa parto alrigardis al la rivero kaj la sola alteriĝejo; la ĉefa enirejo troviĝis ĉe la alia flanko kaj alrigardis laŭlonge la longan insulan ĝardenon. La vizitantoj tial alproksimiĝis ĝin per mallarĝa vojeto ĉirkaŭanta preskaŭ tri flankojn de la domo, sub la malaltaj tegmentrandoj. Tra tri malsamaj fenestroj, ĉe tri malsamaj flankoj, ili enrigardis al la sama longa, bone lumita ĉambro, panelita per pala ligno, kun granda nombro da speguloj kaj aranĝita kvazaŭ por eleganta tagmanĝo. La antaŭa pordo, kiam ili fine atingis ĝin, havis ambaŭflanke turkis-bluan kreskaŭjon. Ĝi estis malfermata de ĉeflakeo de la pli malgaja speco—longa, maldika, griza kaj malverva kiu—murmuris, ke la Princo Saradine estas nuntempe for, oni atendas tamen lian alvenon en iu ajn horo; la domo estas preta por li kaj liaj gastoj. Elmonro de la karto kun la verdinka skribaĉo elvokis signon de vivo sur la pergamena vizaĝo de tiu ĉi malgaja servisto, kaj estis kun iu tremema ĝentileco, ke li proponis, ke la fremduloj restu. "Lia Moŝto eble alvenos nun iun ajn minuton" li diris, "kaj havus ĉagrenon se li ĵus preterlasus sinjoron kiun li invitis. Oni ordonis, ke ni havu ĉiam preta iom da malvarma tagmangaĵo por li kaj liaj amikoj kaj mi estas certa, ke li dezirus, ke ĝi estu prezentata."

Instigite de scivolemeco al tiu ĉi negrava aventuro Flambeau bonvole konsentis kaj sekvis la maljunulon, kiu lin ceremonie enkondukis en la longan, pale panelitan ĉambron. Pri ĝi estis nenio tre rimarkinda, krom la iomete nekutima alternado de multaj larĝaj fenestroj inter multaj larĝaj malaltaj oblongoj el spegul-vitro, kiuj donis al ĝi strangan aspekton de lumeco kaj sensubstanteco. Estis kvazaŭ tagmanĝi subĉiele. Unu aŭ du bildoj de neelstaranta speco pendis en la anguloj, unu granda griza fotografiaĵo de tre juna viro en uniformo, alia ruĝkreta skizo de du longharaj knaboj. Responde al demando de Flambeau, ĉu la persono kun la militista aspek-

to estas la princo, la servisto abrupte diris, ke ne; tio estas la pli juna frato de l'princo, Kapitano Stefano Saradine. Kaj sekve de tio la majunulo ŝajne subite perdis ĉiun deziron por plua interpapulado.

Post ol la tagmanĝo estis finiĝinta per kafo kaj likvoroj el la plej bonaj, oni konatigis al la gastoj la ĝardenon, la lego-ĉambron kaj la domintendantinon—nigreta, belega sinjorino, de nenia malgranda majesteco, kaj iel simila al plutona Madono. Montriĝis, ke ŝi kaj la servisto estas la solaj restantoj el la originala fremdula servistaro de l'princo; la aliaj servistoj estis ĉiuj novaj kaj estis kolektitaj en Norfolk de la intendantino. Ĉi ties nomo esti sinjorino Anthony; ŝi tamen parolis per iomete itala akcentado kaj Flambeau ne dubis, ke Anthony estas Norfolkka formo de iu pli latinida nomo. S-ro Paŭlo, la servisto, ankaŭ havis apenaŭ rimarkeblan fremdulan mienon; laŭ lingvo kaj edukado tamen li estis angla, kiel multaj el la plej rafinitaj servistoj de la kosmopolita nobelaro.

Beleta kaj unika, la loko havis tamen strangan luman malgajecon. Horoj forpasis en ĝi kiel tagoj. La longaj bone fenestritaj ĉambroj estis plenaj je taglumo, tamen senviva taglumo. Kaj tra ĉiuj alia bruoj, la sono de parolado, la tintado de glasoj aŭ la preterpasantaj piedoj de servistoj, ili povus aŭdadi de ĉiuj flankoj de la domo la melankolian bruon de la rivero.

”Ni prenis malĝustan vojon kaj estas venintaj al malĝusta loko,” diris Pastro Brown, rigardante tra la fenestro al la griz-verdaj kareksoj kaj la arĝenta fluo. ”Ne gravas; oni ofte povas fari bonagon, estante la taŭga persono ĉe la malĝusta loko.” Pastro Brown, kvankam kutime silenta estis aparte sentema vireto, kaj dum tiuj malmultaj sed senfinaj horoj li senkonscie absorbiĝis pli profunde en la sekretojn de Junkdomo ol sia profesia amiko. Li posedis tiun lerton de simpatia silento kiu estas tiel necesa por babilado; kaj dirante apenaŭ unu vorton li kredeble eltiris el siaj novaj konatuloj ĉion, kion ili

iel dirus. La servisto estis laŭnature nebabilema. Li montris mala-fablan kaj preskaŭ bestan amon al sia mastro; kiun, li asertis, oni tre malbone pritraktis. La elstaranta kulpulo ŝajne estis la frato de Lia Moŝto, kies nura nomo plilongigis la malgrasajn vangojn de la maljunulo kaj rikane sulkigis lian papagan nazon. Kapitano Stefano estis sentaŭgulo ŝajne, kaj estis forpreninta de sia bonvola frato centojn kaj milojn da pundoj; igis lin forflugi de la laŭmoda vivo kaj pasigi liajn tagojn en tiu ĉi trankvila azilo. Tio estis ĉio, kion Paŭlo la servisto intencis diri, kaj Paŭlo videble estis partiulo.

La itala intendantino estis iomete pli informema, estante, Brown imagis, iomete malpli kontenta. Tio, kion ŝi diris pri sia mastro, estis iomete acida kvankam ne sen iom de timo. Flambeau kaj lia amiko staris en la spekugla ĉambro ekzamenante la ruĝan skizon de la du knaboj, kiam enrapidegis la intendantino pro iu mastruma komisio. Estis propra karakterizo de tiu ĉi brilanta, de vitro panelita ĉambro, ke iu ajn ĝin enirante fariĝis respegulata en kvar aŭ kvin speguloj samtempe; kaj Pastro Brown sin ne turninte, haltis meze de frazo de prifamila kritiko. Flambeau tamen, kies vizaĝo estis apud la bildo, estis jam laŭtvoĉe dirante, "La fratoj Saradine, supozeble. Ili ambaŭ aspektas sufiĉe senkulpaj. Estus malfacile diri kiu estas la bona frato kaj kiu la malbona." Tiam, kanstatinte la ĉeeston de la sinjorino, li ŝanĝis la interparoladon al iu banalaĵo kaj eliris promeni en la ĝardenon. Pastro Brown tamen ankoraŭ fikse rigardadis la ruĝkretan skizon; kaj sinjorino Anthony ankoraŭ fikse rigardadis Pastron Brown.

Ŝi havis grandajn kaj tragediplenajn brunokulojn kaj ŝia oliva vizaĝo malhele ardis de iu stranga kaj dolora scivoleco—kiel de iu kiu dubas pri la identeco aŭ intenco de fremdulo. Ĉu la vestaĵoj kaj religio de la malgranda pastro tuŝis iujn sudajn memorojn pri konfesado, aŭ ĉu ŝi imagis, ke li scias pli ol li efektive sciis, ŝi diris al li

per mallaŭta voĉo, kvazaŭ al kunulo de la sama komploto, "Li estas prava pri io, via amiko. Li asertas, ke estus malfacile distingi inter la bona kaj la malbona frato. Ho, ja estus malfacile, estus ege malfacile elekti la bonan."

"Mi vin ne komprenas," diris Pastro Brown kaj komencis formoviĝi.

La virino faris unu paŝon al li kun malheliĝantaj brovoj kaj ia sovaĝa kliniĝo, kiel bovo mallevanta siajn kornojn.

"Ne eĉ unu estas bona," ŝi siblis. "Estis sufiĉe da malbono ĉe la kapitano por preni tiom da mono, sed mi kredas, ke ne estis multe da bono ĉe la princo kiu donis ĝin. Ne estas nur la kapitano kiu havas kulpojn."

Fariĝis lumo sur la forturnita vizaĝo de la pastro kaj lia buŝo formis silente la vorton "ĉantaĝo". Eĉ dum li tion faris la virino turnis sian blankan vizaĝon abrupte super sian ŝultron kaj preskaŭ falis. La pordo estis senbrue malfermita kaj la pala Paŭlo staris kiel fantomo en la elirejo. Per la stranga artifiko de la reflektantaj muroj ŝajnis kvazaŭ kvin Paŭloj estas envenintaj tra kvin pordoj samtempe.

"Lia Moŝto," li diris, "estas ĵus alveninta."

En la sama momento la figuro de viro estis preterpasinta ekster la unua fenestro, transirante la sunluman vitraĵon kiel lumigitan scenejon. Unu momenton poste li pasis ĉe la dua fenestro kaj la multnombraj speguloj repentris en la sekvantaj kadroj la saman aglosimilan profilon kaj marŝantan figuron. Li estis rekta kaj vigla, sed lia hararo estis blanka kaj lia vizaĝkoloro de stranga ebura flavo. Li havis tian mallongan kurbitan romanon nazon kia estas plej ofte akompanata de longaj, maldikaj vangoj kaj mentono, tiuj ĉi tamen estis kaŝataj iomete de lipharoj kaj vanghararo. La lipharoj estis multe pli nigraj ol la barbo, kaj la efekto estis iomete teatra. Li

estis vestita laŭ la sama danda stilo, portante blankan cilindron, orkideon butontrue, flavan veŝton kaj flavajn gantojn, kiujn li svingis kaj batis dum li marŝis. Kiam li estis ĉirkaŭirinta ĝis la ĉefa pordo ili aŭdis la rigidan Paŭlon ĝin malfermanta kaj aŭdis la ĵusalveninton gaje diranta, "Nu vi vidas, mi estas alveninta." La rigida sinjoro Paŭlo kliniĝis kaj respondis laŭ sia neaŭdebla maniero; dum kelkaj minutoj ilian interparoladon oni ne povis aŭdi. Tiam diris la servisto, "Ĉio estas je via dispono," kaj la gant-svinganta Princo Saradine gaje eniris la ĉambron por saluti ilin. Ankoraŭ unufoje ili vidis tiun fantoman vidaĵon—kvin princojn enirantaj ĉambron kun kvin pordoj.

La princo metis la blankan ĉapelon kaj flavajn gantojn sur la tablon kaj tute kore manpremis.

"Tre ĝojas vin vidi tie ĉi, sinjoro Flambeau," li diris. "Bone vin konas de reputo, se tio ne estas maldiskreta diro."

"Tute ne," respondis Flambeau ridetante. "Mi ne estas ofendiĝema. Treege malmultaj reputacioj fariĝas el senmakula virteco."

La princo ĵetis al li viglan rigardon por konstati ĉu la rediro havas celon ĉe li; poste li ankaŭ ridis kaj indikis seĝojn por ĉiuj, si mem inkluzive.

"Agrabla loko tiu ĉi, mi opinias," li diris apartece. "Ne estas multe da distraĵoj, mi timas; la fiŝkaptado tamen estas vere bona."

La pastro, kiu estis rigardanta lin kun la serioza rigardego de bebo, estis hantata de iu imaga bildo, kiu evitis precizigon. Li rigardis la grizan, zorge frizitan hararon, flavblankan vizaĝon kaj sveltan, iomete dandan talion. Tiuj ĉi ne estis nenaturaj, kvankam eble iomete troelstarantaj, kiel la vestaĵaro de figuro malantaŭ la scenej-lumoj. La sennoma intereso troviĝis ĉe io alia, ĉe la linioj mem de la vizaĝo; Brown estis turmentata de duon-rememoro, ke li vidis ĝin ie antaŭe. La viro ŝajnis esti iu alivestita malnova amiko lia. Subite

li rememoris la spegulojn kaj diris al si, ke lia imago estas ia psikologia sekvo de tiu multnombriĝo de homaj maskoj.

Princo Saradine disdonis siajn societajn atentojn inter siaj gastoj kun granda gajeco kaj takto. Trovinte, ke la detektivo havas sportajn inkliojn kaj deziras plenumi sian libertempon, li gvidis Flambeau kaj la boaton de Flambeau al la plej bona loko por fiŝkaptado, kaj estis reveninta per sia propra kanoto post dudek minutoj por kuniĝi kun Pastro Brown en la lego-ĉambro kaj sintremi egale afable en la pli filozofaj plezuroj de la pastro. Li ŝajne sciis multe kaj pri fiŝkaptado kaj pri libroj, kvankam el tiuj ĉi ne la plej edifajn; li scipovis paroli kvin aŭ ses lingvojn, tamen en ĉiu precipe la slangon. Evidente li estis loĝinta en diversaj urboj kaj inter la diversaĉaj homspecoj, ĉar kelkaj el liaj plej ridigaj rakontoj estis pri aĉaj vetludejoj kaj opifumejoj, aŭstraliaj rabistoj aŭ italaj banditoj. Pastro Brown sciis, ke la iame famkonata Saradine estis pasiginta siajn lastajn kelkjarojn per preskaŭ senĉesa vojaĝado; li tamen ne estis diveninta, ke la vojaĝoj estis tiel hontindaj aŭ tiel amuzaj.

Efektive, malgraŭ la tuto de sia monda digno, Princo Saradine disradiis al tiaj impresiĝemaj observantoj kia la pastro, iun etoson maltrankvilan kaj eĉ malfidindecan. Lia vizaĝo estis eleganta, la okuloj tamen tiuj de sovaĝa besto; li havis nervemajn kutimetojn, kiel viro ŝancelita de drinkado aŭ de drogoj, kaj li nek estris nek pretendis estri la dommastrumadon. Tio entute estis la afero de la du malnovaj servistoj, precipe Paŭlo, kiu videble estis la centra apogilo de la domo. S-ro Paŭlo efektive ne estis vera servisto, pliĝuste li estis ia intendanto aŭ eĉ ĉambelano; li vespermanĝis sola, sed kun preskaŭ tiom de soleneco kiom sia mastro; li estis timata de ĉiuj servistoj; kaj li konsiliĝis kun la princo dece—iomete kvazaŭ li estus la princa notario. La malgaja intendantino estis kompare nura ombro; efektive ŝi ŝajne sin fortiris kaj servis nur la ĉefserviston, kaj

Brown aŭdis neniujn plu da tiuj vulkanaj flustroj, kiuj duone diris al li pri la pli juna frato, kiu ĉantaĝis la pliaĝan. Ĉu la princo vere estas rabata de la forestanta kapitano, li ne povis certiĝi; estis tamen io nefirma kaj kaŝema pri Saradine kio igis tion neniel nekredebla.

Kiam ili denove eniris la longan ĉambregon kun la fenestroj kaj la speguloj, la flava vespero komencis fali super la akvoj kaj salikaj bordoj; kaj botaŭro sonoris en la malproksimo kiel koboldo sur sia elfa tamburo. Tiu sama stranga sento pri iu malgaja malbona felando denove transiris la menson de la pastro kiel griza nubeto. "Ke Flambeau estu reveninta," li murmuris.

"Ĉu vi kredas al Sorto?" demandis subite la sentrankvila princo.

"Ne," respondis lia gasto. "Mi kredas al la Tago de Sorto."

La Princo sin turnis de la fenestro kaj rigardegis lin strange, kun vizaĝo en la ombroj kontraŭ la sunsubiro. "Kion vi volas diri?"

"Mi volas diri, ke tie ĉi ni estas ĉe la malĝusta flanko de la tapeto," respondis Pastro Brown. "La okazoj, kiuj tie ĉi okazas ŝajne nenion signifas; ili signifas ion ie alie. Ie alie la puno alvenos sur la veran pekinton. Tie ĉi ĝi ofte ŝajne falas sur la malĝustan personon."

La princo eligis neklarigeblan bruon kiel besto; en lia ombrita vizaĝo strange ekbrilis la okuloj. Nova kaj sagaca penso eksplodis silente en la menso de la alia. Ĉu estas alia signifo en la miksaĵo de sprito kaj abrupto kiu troviĝis ĉe Saradine? Ĉu la princo—ĉu li estas tute cerbsana? Li estis rediranta, "La malĝustan personon—la malĝustan personon" pli multajn fojojn ol estas nature en societa interparolado.

Tiam malfrue Pastro Brown konstatis duan veraĵon. En la speguloj antaŭ li, li povis vidi la silentan pordon malfermita, kaj la silentan sinjoron Paŭlon staranta en ĝia kadro kun lia kutima pala senemocieco.

"Mi opiniis, ke estus pli bone tuj anonci," li diris, kun la sama

rigida respekto de malnova familia notario, "ke boato remata de ses viroj estas ĵus alveninta al la kajo, kaj sinjoro sidas en malantaŭa parto."

"Boato!" rediris la princo; "sinjoro?" kaj li stariĝis.

Estis timiga silento punktata nur de la stranga bruoj de la birdoj en la karekso; kaj tiam, antaŭ ol iu povis paroli denove, nova vizaĝo kaj figuro pasis profile ĉirkaŭ la tri sunlumaj fenestroj, kiel pasis la princo antaŭ unu aŭ du horoj. Tamen krom la koincido, ke ambaŭ vizaĝoj estis aglosimilaj, ili estis neniel kompareblaj. Anstataŭ la nova blanka cilindro de Saradine vidiĝis nigra de malmoderna aŭ alilanda formo; sub ĝi estis juna kaj tre serioza vizaĝo, razita, blua sub la firma mentono kaj portanta malfortan sugeston de juna Napoleono. La kunligiĝo estis helpata de io antikva kaj stranga pri la tuta kostumo, kvazaŭ de viro kiu estas neniam sin ĝenininta ŝanĝi la modojn de siaj patroj. Li portis malfreŝan bluan frakon, ruĝan kaj soldataspektan veŝton, kaj specon de krude teksita blanka pantalono kutima ĉe la fruaj Viktorianoj, hodiaŭ tamen strange neakorda. El tiu ĉi aro de malnovaj vestaĵoj elstaris lia oliva vizaĝo, strange juna kaj monstre sincera.

"Diablo!" diris la princo kaj almetante sian blankan cilindron li mem iris al la pordo, malfermĵetante ĝin al la sunsubira ĝardeno.

Jam la ĵusalveninto kaj aliaj sekvantoj estis sin ordigintaj kiel malgranda sceneja armeo sur la razenejo. La ses remistoj estis trentaj la boaton el la akvo sur la bordon kaj gvardis ĝin preskaŭ minace, tenante siajn remilojn vertikale kiel lancoj. Ili estis nigretaj viroj kaj kelkaj el ili portis orelingojn. Sed unu el ili staris antaŭe apud la oliv-vizaĝa junulo kun la ruĝa veŝto, kaj kunhavis grandan nigran valizon de nekutima formo.

"Via nomo," diris la junulo, "estas Saradine?"

Saradine jesis iomete malatente.

La novulo havis senbrilajn, hundsimilajn brunajn okulojn, tiel malsimilaj kiel eble al la ĉiam viglaj kaj brilantaj grizokuloj de la princo. Sed denove Pastro Brown estis turmentata de la penso, ke li estas ie vidinta kopion de la vizaĝo; kaj denove li memoris la ripetadojn de la vitre panelita ĉambro kaj klarigis al si la koincidon per tio. "Malbenon sur tiun ĉi kristalan palacon," li murmuris. "Oni ĉion vidas tro multajn fojojn. Estas kiel sonĝo."

"Se vi estas Princo Saradine," diris la junulo, "mi povas diri al vi ke mia nomo estas Antonelli."

"Antonelli," rediris la princo malvigle. "Mi iel rememoras tiun nomon."

"Permesu al mi min prezenti," diris la juna Italo.

Per la maldekstra mano li ĝentile demetis sian malmodernan cilindron; per la dekstra mano li tiel krake frapis la vangon de Princo Saradine, ke la blanka cilindro ruliĝis malsupren la ŝtuparon kaj unu el la bluaj florujoj balanciĝis sur sia soklo.

La princo, kia ajn ulo li estis, evidente ne estis malkuraĝulo; li sin ĵetis al la gorĝo de sia malamiko kaj malantaŭen puŝis lin preskaŭ ĝis la herbo. Sed lia malamiko sin eltiris kun strange maltaŭga mieno de rapidema ĝentileco.

"Estas bone," li diris, spiregante, kaj hezitante en la angla lingvo. "Mi estas insultinta. Mi kvitigos min. Marko, malfermu la valizon."

La viro ĉe lia flanko kun la orelingoj kaj la granda nigra valizo tiam malŝlosis ĝin. Li elprenis el ĝi du longajn italajn rapirojn, kun belaj ŝtalaj teniloj kaj klingoj, kiujn li starigis vertikale, la pintoj malsupre en la herbon. La stranga junulo staranta alvizaĝante la enirejon kun sia flava kaj venĝema vizaĝo, la du glavoj starantaj el la razenejo kiel du krucoj en enterigejo, la vico da ordigitaj remistoj malantaŭe, donis strangan impreson, kvazaŭ ĝi estus iu barbara

juĝejo. Ĉio krome tamen estis neŝanĝita, tiel subita estis la interrompo. La sunsubira oro ankoraŭ brilis sur la razenejo, kaj la bo-
taŭro ankoraŭ profunde sonadis, kvazaŭ anoncante iun malgran-
dan tamen teruran sorton.

”Princo Saradine,” diris la viro nomita Antonelli, ”kiam mi estis infano en la lulilo vi mortigis mian patron kaj forŝtelis mian patri-
non; mia patro estis la pli bonŝanca. Vi ne honeste mortigis lin kiel mi vin estas tuj mortigonta. Vi kaj mia malvirta patrino veturigis lin al soleca krutejo en Sicilio, malsuprenĵetis lin kaj foriris laŭ via pro-
pra vojo. Mi povus vin imiti se mi tiel elektus, sed imiti vin estus tro abomene. Mi vin sekvis ĉien tra la tuta mondo kaj vi ĉiam forkuris de mi. Tie ĉi tamen estas la fino de la mondo—kaj de vi. Nun mi kaptis vin kaj mi donas al vi la okazon, kiun vi neniam donis al mia patro. Elektu unu el tiuj glavoj.”

Princo Saradine, kun sulkigitaj brovoj, ŝajne hezitis unu momen-
ton, sed liaj oreloj ankoraŭ zumadis pro la frapo kaj li antaŭen saltis kaj ekprenis unu el la teniloj. Pastro Brown ankaŭ estis antaŭen saltinta, provante pacigi la kverelon; sed baldaŭ li ekkonis, ke lia persona ĉeesto nur plimalbonigis la aferon. Saradine estis franca framasono kaj feroca ateisto kaj pastro influis lin laŭ la regulo de maleco. Kaj pri la alia viro, nek pastro nek laikulo iel influis lin. Tiu ĉi junulo kun la Bonaparta vizaĝo kaj brunaj okuloj estis iu multe pli severa ol puritano—pagano. Li estis simpla mortiganto el la pra-
tempoj de la mondo; viro de la ŝtonepoko—viro el ŝtono.

Unu espero restis, alvoki la domloĝantojn, kaj pastro Brown reen kuris al la domo. Li eltrovis tamen, ke la subservistoj ĉiuj forestas libertempe de la insulo laŭ la ordonoj de la aŭtokrato Paŭlo kaj, ke nur la malgaja sinjorino Anthony paŝadas maltrankvile tra la longaj ĉambroj. Sed tuj kiam ŝi montris al li sian terurplenan vizaĝon, li solvis unu el la enigmoj de la domo spegula. La malhelaj brunokuloj

de Antonelli estis la malhelaj brunokuloj de sinjorino Anthony; kaj tuj li komprenis duonon de la historio.

”Via filo estas ekstere,” li diris ne malŝparante vortojn; ”aŭ li aŭ la princo estas mortigota. Kie estas sinjoro Paŭlo?”

”Li estas ĉe la kajo,” diris la virino malforte. ”Li signalas alvoki—alvoki helpon.”

”S-ino Anthony,” diris Pastro Brown serioze, ”ne estas tempo por bagateloj. Mia amiko havas sian boaton ie laŭ la rivero, fiŝkaptante. La boato de via filo estas gvardata de la viroj de via filo. Restas nur tiu ĉi kanoto; kion faras sinjoro Paŭlo per ĝi?”

”Santa Maria! Mi ne scias,” ŝi diris, kaj svenis sian tutan longecon sur la plankon.

Pastro Brown levis ŝin sur kanapon, ĵetis sur ŝin kruĉon da akvo, kriis por helpo kaj tiam kuregis malsupren al la kajo de la malgranda insulo. Sed la kanoto estis jam en la mezo de la rivero kaj maljuna Paŭlo estis remanta ĝin tir-puŝe per energio nekredebla ĉe iu de lia aĝo.

”Mi savos mian mastron!” li kriis, la okuloj freneze brilegantaj. ”Eĉ nun mi savos lin!”

Pastro Brown povis nenion fari krom rigardi la boaton dum ĝi batalis kontraŭ la fluo kaj preĝi, ke la maljunulo veku sufiĉe frue la urbeton.

”Duelo estas sufiĉe malbona,” li murmuris, frotante sian malglatan polvkolonan hararon, ”sed estas io malĝusta pri tiu ĉi duelo, eĉ kiel duelo. Tion mi nepre sentas. Sed kio ĝi povas esti?”

Dum li tie staris rigardegante la akvon, tremantan spegulon de sunsubiro, li aŭdis de la alia flanko de la insula ĝardeno malfortan sed tuj koneblan sonon—la malvarman tintadon de ŝtalo frapata. Li forturnis la kapon.

For sur la plej malproksima kabo aŭ promontoro de la longa in-

suleto, sur strio de herbo preter la lasta rozvico, la duelantoj estis jam krucigintaj glavojn. La vespero super ili estis kupolo de virga oro, kaj malgraŭ ke malproksime ili troviĝis, ĉiu detalo estis klare videbla. Ili estis demetintaj la jakojn sed la flava veŝto kaj blanka hararo de Saradine, la ruĝa veŝto kaj blanka pantalono de Antonelli briladis en la horizontaliĝanta lumo kiel la koloroj de du dancantaj pupoj. Ambaŭ glavoj fajreradis de la pintoj ĝis la butonoj kiel du diamantaj pingloj. Estis io terura pri kiel la du figuroj ŝajnis tiel malgrandaj kaj tiel gajaj. Ili aspektis kiel du papilioj provantaj per pinglo trapiki unu la alian al korko.

Pastro Brown kuris kiel eble plej rapide, liaj mallongaj kruroj kvazaŭ rado. Sed kiam li alvenis al la bataalkampo li eltrovis ke li estas kaj tro frua kaj tro malfrua—tro malfrua por ĉesigi la bataladon, sub la ombro de severaj Sicilianoj, sinapogantaj al siaj remiloj, kaj tro frua por eltrovi ian katastrofan sekvon.

La du viroj aparte taŭge kontraŭstaris unu la alian, la princo utiligante sian lertecon kun ia cinika memfido, la Siciliano la sian kun mortigvola zorgo. Malmultaj pli bonaj skermkonkursoj povas esti iam viditaj en homplena areno ol tiu, kiu tintadis kaj fajreradis sur tiu forgesita insulo en la junkbordita rivero. La kapturna batalo tiel longe ekvilibris ke espero komencis vivi denove en la protestanta pastro; laŭ normala probableco Paŭlo devus tre baldaŭ reveni kun la policanoj. Estus bone se eĉ Flambeau revenus de sia fiŝkaptado, ĉar Flambeau, rilate al fonteco valoris kvar aliajn virojn. Tamen estis nenia signo de Flambeau, kaj kio estis multe pli stranga, nenia signo de Paŭlo aŭ la policanoj. Nenia alia floso aŭ lignaĵo restis per kiu flosi; en tiu perdita insulo en tiu vasta sennoma lageto, ili estis tiel izolitaj kiel sun roko en la Pacifiko.

Jam dum li tiel pensis la tintado de la rapiroj rapidiĝis ĝis klakado, la brakoj de la princo ĵetiĝis supren kaj la pinto elkuris de inter

liaj skapoloj. Li defalis per granda kirla movo, kvazaŭ duono de cikiosalto. La glavo forflugis de lia mano kiel falanta stelo kaj falis en la malproksiman riveron. Kaj li mem malleviĝis tiel peze kaj tertremige, ke per sia korpo li rompis grandan rozarbuston kaj levis al la ĉielo nubon da ruĝa polvo—kiel la fumo de iu pagana oferaĵo. La Siciliano estis farinta sango-oferon al la spirito de sia patro.

Tuj la pastro estis surgenue apud la kadavro; sed nun por konстати, ke ĝi estas ja kadavro. Dum li ankoraŭ faris kelkajn finajn senesperajn provojn li ekaŭdis por la unua fojo voĉojn de la rivero kaj vidis la policboaton rapidi al la kajo kun la policestroj kaj aliaj gravuloj, la ekscitita Paŭlo inkluzive. La malgranda pastro leviĝis kun videble dubplena grimaco.

”Nu, kial je ĉielo,” li murmuris, ”kial je ĉielo ili ne antaŭe venis?”

Post ĉirkaŭ sep minutoj la insulo estis invadita de urbanoj, kaj tiuj ĉi estis prenintaj la venkintan duelinton, laŭrite rememorigante al li, ke io ajn kion li diros, estos uzata kontraŭ li.

”Mi diros nenion,” diris la monomaniulo, kun miriga kaj pacoplenna vizaĝo. ”Mi neniam diros ion plu. Mi estas tre feliĉa kaj mi deziras nur esti pendigata.”

Tiam li fermis la buŝon dum oni forkondukis lin, kaj estas stranga sed certa veraĵo, ke li neniam denove malfermis ĝin sur tiu ĉi tero, krom por diri ”Kulpa” en la juĝejo.

Pastro Brown estis rigardeginta la subite homplenigitan ĝardenon, la areston de la viro de sango, la forporton de la kadavro post ol la kuracisto ekzamenis ĝin, iomete kiel oni alrigardas la disiĝon de iu malbela songo; li estis senmova kiel viro dum inkubo. Li donis siajn nomon kaj adreson kiel atestanto, rifuzis tamen la proponon reiri per boato kaj restis sola en la insula ĝardeno, rigardegante la rompitan rozujon kaj la tutan verdan teatron de tiu rapida kaj neklarigebla tragedio. La lumo formortis laŭ la rivero; nebulo leviĝis

en la marĉaj bordoj; kelkaj malfruigitaj birdoj intermite transen flugetadis.

Fiksita obstine en lia subkonscia menso (kiu estis aparte vigla) estis neesprimebla certeco, ke restas io ankoraŭ ne klarigita. Tiu ĉi ideo, kiu estis kun li la tutan tagon ne estis entute klarigebla per lia imago pri "spegul-lando". Iel li estis vidinta ne la veran historion, sed iun ludon aŭ dramon spektaklon. Homoj tamen sin ne pendigas aŭ trapikas de rapiroj nur pro ŝarado.

Dum li sidis sur la kajaj ŝtupoj meditante li konsciiĝis pri alta, malhela strio de velo alproksimiĝanta silente laŭ la brilanta rivero kaj ekstaris kun ekfluo da sentoj tiom forta ke li preskaŭ ekploris.

"Flambeau," li kriis kaj manpremis sian amikon per du manoj fojon post fojo, kiu kaŭzis al tiu sportemulo grandan miron, dum li alteriĝis kun siaj fiŝkaptiloj. "Flambeau," li diris, "vi do ne estas mortigita?"

"Mortigita!" rediris la fiŝkaptinto forte mirigita. "Kaj kial mi estu mortigita?"

"Ho, ĉar preskaŭ ĉiu krome jam estas," diris lia kunulo iomete senpripense. "Saradine fariĝis murdita kaj Antonelli volas esti pendigata, kaj lia patrino estas sveninta kaj mi mem ne bone scias ĉu mi estas en tiu ĉi mondo aŭ en la venonta. Sed dank'al Dio vi estas en la sama." Kaj li prenis la brakon de la konfuzita Flambeau.

Dum ili turniĝis for de la kajo ili alvenis sub la tegmentrandoj de la malalta bambua domo kaj enrigardis tra la fenestroj kiel ili faris je sia unua alveno. Ili ekvidis lamplumitan internaĵon bone atentigan. La tablo en la longa manĝĉambro estis jam preparita por vespermanĝo kiam la detruonto de Saradine falis kiel fulmo sur la insulon. Kaj la vespermanĝo estis antaŭeniranta. S-ino Anthony sidis iomete malgaje ĉe la fundo de l'tablo, dum troviĝis ĉe la ĉefloko S-ino Paŭlo la major-domo, manĝante kaj trinkante el la plej bonaj

pladoj; la bluetaj nebulitaj okuloj strange elstarantaj el la vizaĝo, la malgrasega fizionomio nepenetrebla, tamen neniel sen signo de kontenteco.

Kun gesto de forta senpacienco Flambeau klakigis la fenestron, perforte malfermis ĝin kaj enpuŝis en la lamplumitan ĉambron indignan kapon.

”Do!” li kriis. ”Mi komprenas, ke vi eble bezonas manĝaĵojn, sed ja ŝteli la vespermanĝon de via mastro dum li kuŝas murdita en la ĝardeno—”

”Mi jam ŝtelis multajn aĵojn dum longa kaj feliĉa vivo,” respondis la stranga maljunulo serene; ”tiu ĉi vespermanĝo estas unu el la malmultaj aĵoj kiujn mi ne ŝtelis. Okazas ke tiu ĉi vespermanĝo kaj tiu ĉi domo apartenas al mi.”

Penso frapis Flambeau. ”Vi volas diri,” li komencis, ”ke la testamento de Princo Saradine—”

”Mi estas Princo Saradine,” diris la maljunulo, maĉante salitan migdalon.

Pastro Brown, kiu rigardis la birdojn ekstere, eksaltis kvazaŭ pafita, kaj enŝovis ĉe la fenestro palan vizagon napsimilan.

”Vi estas kio?” li rediris per akra voĉo.

”Paŭlo, Princo Saradine, à vos ordres,” diris la respektinda persono ĝentile, levante glason da ŝereo. ”Mi loĝas tie ĉi tre trankvile estante ulo kun hejmaj inklinoj; kaj pro modesteco mi estas nomata Paŭlo, por min distingi de mia malfeliĉa frato sinjoro Stephen. Li mortis, laŭ tio kion mi aŭdis, antaŭ nelonge en la ĝardeno. Kompreneble ne estas mia kulpo se liaj malamikoj sekvis lin al tiu ĉi loko. La kialo por tio estas la bedaŭrinda malrekteco de lia vivo. Li ne estis homo de hejmaj inklinoj.”

Li fariĝis silenta kaj daŭrigis rigardadi la kontraŭan muron super la klinita kaj malgaja kapo de la virino. Ili klare vidis la familian sim-

ilecon kiu obsedis ilin ĉe la mortinto. Tiam liaj ŝultroj komencis leviĝi kaj tremi iomete, kvazaŭ li sufokiĝus, la vizaĝo tamen ne sanĝiĝis.

”Dio mia!” kriis Flambeau post paŭzo, ”li ridas!”

”Venu,” diris Pastro Brown, kiu estis tute pala. ”Venu for de tiu ĉi diabla domo. Ni eniru ankoraŭ unu fojon honestan boaton.”

Nokto estis falinta sur junkojn kaj riveron kiam ili forpuŝis sin de la insulo kaj flosadis kun la fluo en la mallumo, sin varmigante de du grandaj cigaroj, kiuj lumis kiel puncaj ŝiplanternoj. Pastro Brown elprenis la cigaron el sia buso kaj diris:

”Mi supozas, ke nun vi povas diveni la tutan aferon? Finfine estas primitiva rakonto. Viro havis du malamikojn. Li estis saĝulo. Kaj tial li eltrovis, ke du malamikoj estas pli bonaj ol nur unu.”

”Tion mi ne elkomprenas,” respondis Flambeau.

”Ho, estas vere tre simpla,” aldonis lia amiko. ”Simpla, sed senkulpa, certe ne. La Saradine’oj estis ambaŭ friponoj, sed la princo, la pli aĝa, estas tia fripono kia grimpas al la supro, kaj la pli juna, la kapitano, estis fripono de tiu speco kiu nur fundeniĝas. Tiu ĉi aĉa oficiro, de monpetanto fariĝis ĉantaĝanto, kaj iun malfeliĉan tagon lia mano falis sur lian fraton la princon. Memevidente ne estis pro negrava afero, ĉar Princo Paŭlo Saradine estis nekaŝe diboĉema kaj rilate al la nuraj pekoj de societo havis nenian reputacion por perdi. Efektive estis afero de mortpuno kaj Stephen efektive tenis la ŝnuregon ĉirkaŭ la kolo de sia frato. Li estis iel eltrovinta la veraĵon pri la Sicilia afero kaj povis pruvi, ke Paul estas murdinta la maljunulon Antonelli sur la montoj. La kapitano enrastis grandkvante dum dek jaroj la silentigmonon, ĝis kiam eĉ la belega ricaĵo de la princo komencis fariĝi iomete bagatela.

”Princo Saradine tamen portis alian ŝarĝon krom lia sangsuĉanta frato. Li sciis, ke la filo de Antonelli, nura infano kiam okazis la

murdo, estas edukita al sovaĝa sicilia lojaleco kaj vivas nur por venĝi sian patron, ne per la pendigilo (ĉar mankis al li la laŭleĝa pruvo kian havis Stephen) sed per la antikvaj metodoj de vendeto. La knabo estis fariĝinta sperta pri armiloj ĝis mortiga precizeco, kaj proksimume kiam li fariĝis suface aĝa por uzi ilin Princo Saradine komencis, laŭ kion diris la societaj ĵurnaloj, vojaĝadi. Fakte li komencis forkuri por sin savi, pasante de unu loko al alia kiel postĉasata krimulo; sekvata tamen de unu senkompata viro. Tia estis la pozicio de Princo Paŭlo kaj ja neniel komforta. Ju pli da mono li elspzis por eviti Antonelli des malpli li havis por silentigi Stephen. Ju pli multe li donis por silentigi Stephen des malpli grandan oportunon li havis por fine eviti Antonelli. Tiam li sin montris granda homo—homo genio kia Napoleon.

”Anstataŭ kontraŭstari siajn du malamikojn, li subite sin cedis al ili ambaŭ. Li ĉesis, kiel japana luktisto, kaj liaj malamikoj senfortiĝis antaŭ li. Li ĉesigis la kuradon tra la mondo, li donis sian adreson al juna Antonelli; kaj tiam li fordonis ĉion al sia frato. Li sendis al Stephen sufiĉe da mono por belaj vestaĵoj kaj facila vojaĝo, kun leteroj dirante proksimume tion ĉi: ‘Jen ĉio, kio restas la mia. Vi elsuĉis min. Mi ankoraŭ havas dometon en Norfolk, kun servistoj kaj kelo kaj se vi ion plu deziras de mi, tion vi devas preni. Venu do, ekposedi ĝin se vi volas kaj mi tie loĝos trankvile kiel via amiko, aŭ intendanto aŭ io ajn.’ Li sciis, ke la Siciliano estas neniam vidinta la fratojn Saradine, krom eble perbilde; li sciis, ke ili ambaŭ estas iomete similaj, ambaŭ havante grizajn pintajn barbojn. Tiam li razis sian propran vizaĝon kaj atendis. La kaptilo bone funkciis. La malfeliĉa kapitano en siaj novaj vestaĵoj eniris la domon kiel princo kaj marŝis sur la sabron de la Siciliano.

”Estas unu maltrafo, kaj ĝi estas al la honoro de homa naturo. Malbonaj spiritoj kia Saradine ofte eraras, neniam atendante la vir-

tojn de la homaro. Li supozis, ke la frapo de la Italo, kiam ĝi alvenos, estos kaŝita, perforta kaj sennoma, kiel ankaŭ la frapo kiun ĝi venĝos; ke la viktimo estos trapikata dum la nokto, aŭ pafata de malantaŭ heĝo kaj tial mortos senvorte. Estis malbona momento por Princo Paul kiam la kavalireco de Antonelli proponis formalan duelon kun ĉiuj ĝiaj klarigoj. Estis tiam, ke mi trovis lin forŝovanta la boaton kun terurplenaj okuloj. Li estis forkurante nudakape, en nekovrita boato antaŭ ol Antonelli povus sciigi pri kiu li estas.

”Sed kiom ajn ekscitita, li ne estis senespera. Li konis la aventuriston kaj li konis la fanatikulon. Estis tute verŝajne ke Stephen, la aventuristo, silentos, pro sia nura aktora plezuro ludi rolon, sia deziro alkroĉigi al sia nova komforta loĝejo, sia fripona fido al bonsorto, kaj sia bonega skermado. Estis certe, ke Antonelli la fanatikulo, silentos kaj fariĝos mortpunata ne rakontinte prifamiliajn aferojn. Paŭlo pasigis la tempon sur la rivero ĝis li sciis, ke la batalo estas finiĝinta. Tiam li alvokis la tutan urbon, venigis la policanojn, vidis siajn du malamikojn forportataj por ĉiam, kaj sidiĝis ridetante al vespermanĝo.”

”Ridante! Dio helpu nin!” diris Flambeau kun forta ekstremo. ”Ĉu ili ĉerpas tiajn ideojn de Satano?”

”Li ĉerpis tiun ideon de vi,” respondis la pastro.

”Je Dio, ne!” enĵetis Flambeau. ”De mi? Kion vi volas diri?”

La pastro prenis la vizitkarton el sia poŝo kaj tenis ĝin apud la malforta lumo de sia cigaro; ĝi surhavis verdinkan skribaĵaĉon.

”Ĉu vi ne memoras ties unuan inviton al vi?” li demandis, ”kaj la komplimenton pri via krima aventuro? ‘Tiu ruzo via,’ li skribis, ‘kaŭzi unu detektivon aresti alian.’ Li nur imitis vian ruzon. Kun malamiko ĉiuflanke, li facile forglitis kaj lasis ilin kolizii kaj mortigi unu la alian.”

Flambeau ŝiris la karton de Princo Saradine el la manoj de la pastro kaj sovaĝe disŝiris ĝin ĝis malgrandaj pecoj.

”Jen la fino de tiu fiulo,” li diris dum li disŝetis la pecojn sur la mallumajn kaj malaperantajn ondojn de la rivereto; ”sed mi kredas, ke tio venenos la fiŝojn.”

La lasta brileto de blanka kartaĵo kaj verda inko dronis kaj malheliĝis; malforta kaj tremanta koloro kvazaŭ de tagiĝo ŝanĝis la ĉielon kaj la luno malantaŭ la herboj fariĝis pli pala. Ili flosadis silente.

”Patro,” diris Flambeau subite, ”Ĉu vi kredas ke ĉio tio estis sonĝo?”

La pastro balancis la kapon aŭ nee aŭ agnostike, sed restis silenta. Odoro de kratago kaj fruktarbejoj alŝvebis al ili tra la mallumo, dirante al ili, ke la vento vekiĝas; proksiman momenton ĝi balancis ilian boateton kaj ŝveligis ilian velon kaj veturigis ilin antaŭen laŭ la serpentanta rivero al pli feliĉaj lokoj kaj al la hejmoj de senofendaj homoj.

LA MARTELO DE DIO

La malgranda vilaĝo Bohun Beacon staris sur monteto tiel kru-
ta, ke la alta turpinto de ĝia preĝejo ŝajnis nur kiel la pinto de
malgranda monto. Iomete malsupre de la preĝejo staris la forĝejo,
kutime ruĝigita de fajro, kie ĉiam videblis martelegoj kaj feraj pe-
coj, senorde disĵetitaj. Apude, trans la krucejo de du krude pavime-
tia vojetoj troviĝis la "Blua Apro", la sola gastejo en la loko. Iun griz-
arĝentan tagiĝon en tiu ĉi strato sur la vojkrucejo renkontiĝis kaj in-
terparolis du fratoj; unu el ili tiam komencis sian tagon sed la alia
estis nur finanta la sian.

La Honorinda Sinjoro Pastro Wilfred Bohun, tre pia viro, estis
iranta al ia severa tagiĝa preĝado aŭ meditado. La Honorinda Ko-
lonelo Norman Bohun, ties pli aĝa frato, estis neniel pia, kaj li si-
dis sur benko antaŭ la "Blua Apro", trinkante ion kion filozofema
observanto povus nomi aŭ la lasta glaso de mardo aŭ la unua de
merkredo. Tio tamen entute ne ĝenis la kolonelon.

La Bohunanoj estis unu el tiuj tre maloftaj familioj, kiuj vere de-
venas de la mezepoko; ilia standardo efektive estis en Palestino.
Tamen estus granda eraro supozi, ke tiaj familioj staras iel ajn alte
en la rangoj de kavalireco tradicio. Krom malriĉuloj, malmultaj kon-
servas tradiciojn. Altranguoj ne vivadas laŭ tradicioj sed laŭ manieroj.
Sed kiel pli ol unu el la veraj antikvaj familioj dum la du lastaj jar-
centoj, ili estis pli kaj pli kadukiĝintaj, kaj fine fariĝis nur ebriemuloj
kaj modsekvantaj degeneruloj, tiel ke oni eĉ flustris pri frenezeco.
Certe estis io apenaŭ homa en la kvazaŭ lupa plezurpersekutado de
la kolonelo kaj lia neŝancebla decido, neniam hejmeniri antaŭ

frua mateno, kio enhavis iom de la terura klareco de sendormeco. Li estis alta, simila al belaspekta besto, maljuneta kun la hararo ankoraŭ mirige flava. Krom la bluaj okuloj li ŝajnis nur blonda kaj kiel leono, sed tiuj estis tiel profundigintaj en la kapon, ke ŝajne ili estis nigraj. Ili estis ankaŭ tre proksimaj unu al la alia. Li havis longajn flavajn lipharojn; ĉe ĉiu flanko estis sulko, de la nazo ĝis la makzeloj, tiel ke la vizaĝo ŝajnis ĉiam rikani... Super la vespervestaĵoj li portis strangan flavan surtuton kaj surkape eksterordinaran larĝrandan helverdajn kaskon, memevidente ia hazarde akiritaj orientaĵoj. Li fieris portadi tiajn neakordajn vestaĵojn... fieris pro la fakto, ke li ĉiam donis al ili akordan aspekton.

Lia frato, la pastro, ankaŭ havis flavan hararon kaj la elegantecon, sed li estis butonumita ĝis la mentono en nigraj vestaĵoj, la vizaĝo estis senhara, klera kaj iomete nerva. Ŝajne li vivis nur pro religio; estis tamen kelkaj kiuj asertis (precipe la forĝisto, kiu estis presbiteriano), ke tio montras, ke li amas la gotan arkitekturon pli ol Dion, kaj ke liaj kvazaŭ fantomaj vizitadoj al la preĝejo estas nenio krom alia, pli pura speco de la preskaŭ malsana soifo al beleco, kiu turmentadas lian fraton ĝis frenezeco pri vino kaj virinoj. Tiu akuzo estis duba, sed lia pieco estis eksterduba. Efektive la akuzo estis precipe malklera miskompreno pri lia amo al soleco kaj malkaŝa preĝado, kaj devenis de la fakto, ke oni ofte lin trovis preĝanta, ne apud la altaro sed en strangaj lokoj en la preĝejo, ofte en la kriptoj aŭ galerioj, eĉ en la turo. Li estis nunmomente enironta en la preĝejon, tra la forĝkorto, sed li haltis kaj sulkigetis la frunton vidante la kavernajn okulojn de sia frato tien alrigardantaj. Pri la hipotezo, ke la kolonelo interesas sin pri la preĝejo, lia frato ne malŝparis konjektojn. Restis nur la forĝejo, kaj kvankam la forĝisto estis puritano kaj neniel de liaj kunuloj, tamen Wilfred Bohun estis efektive ion skandalan priaŭdinta pri bela kaj iomete famkonate edzino.

Suspekteme li rigardetis preter la kabanon al la kolonelo, kiu ridante leviĝis por paroli kun li.

”Bonan matenon, Wilfred,” li diris; ”kiel bona landsinjoro mi sendorme prizorgas mian popolon. Mi nun iras viziti la forĝiston.” Wilfred rigardis teren kaj diris, ”La forĝisto ne estas hejme. Li estas en Greenford.” ”Tion mi ja scias,” respondis la alia ridante silente, ”tial mi proponas lin viziti.”

”Norman,” diris la pastro, la okuloj fikse rigardantaj ŝtoneton sur la vojo, ”ĉu vi iam ektimas pri fulmaĵo?”

”Kion vi volas diri,” demandis la kolonelo, ”ĉu via ŝatokupo estas veterstudado?”

”Mi volas diri,” respondis Wilfred, la okuloj ankoraŭ mallevitaj, ”ĉu vi iam pripensis, ke Dio mem frapus vin kiam vi estas sur la strato?”

”Mi petas pardonon,” diris la kolonelo, ”evidente via ŝatokupo estas folkloro.”

”Mi ja scias, ke la via estas blasfemado,” ekrediris la piulo, vundite en la sola vivanta parto de sia animo. ”Tamen, se vi ne timas al Dio vi havas bonan kaŭzon timi al homoj.”

La pli aĝa komplezeme levis la brovojn, ”Timi al homoj?” li diris.

”La forĝisto estas la plej granda kaj forta viro en la limo de sesdek kilometroj de tie ĉi,” diris la pastro severe, ”efektive mi scias, ke vi estas nenia timemulo aŭ malfortulo, sed li povus ĵeti vin trans la muron.” Tio, estante vera, tuj frapis lin kaj lia vizaĝo malheliĝis kaj fariĝis minaca. Dum unu momento li staris peze, rikanante. Sed tre baldaŭ Kolonelo Bohun akiris denove sian propran kruelan bonhumorecon kaj ekridis, montrante sub la flavaj lipharoj du kvazaŭ hundajn dentojn, ”Tiuokaze, mia kara Wilfred,” li diris tute senzorge, ”estas saĝoplena ideo, ke la lasta Bohunano estu parte vestita en

armaĵo.” Kaj li demetis la strangan rondan verdkovritan ĉapelon, montrante, ke ĝi enhavas ŝtalan internaĵon. Wilfred efektive tuj rekonis ĝin kiel malpeza japana aŭ ĥina kasko, deprenita de trofeo en la malnova familia salonego ”Ĝi estis la unua ĉapelo kiu venis al miaj manoj,” facile diris la frato kiel klarigo, ”ĉiam la plej proksima ĉapelo... kaj la plej proksima virino.”

”La forĝisto forestas en Greenford,” diris Wilfred trankvile, ”je kioma horo li revenos estas dube.”

Tion dirinte li sin turnis, la kapo klinita, kaj eniris en la preĝejon, sin kruccsignante kvazaŭ li volis forpeli de si malbonan spiriton. Li deziris forgesi tiun maldelikatecon en la malvarma duonlumo de siaj gotaj peristiloj; tamen tiun matenon estis destinite, ke liaj piaj praktikoj estu ĉiam interrompataj per malgrandaj surprizoj. Kiam li eniris la preĝejon, kutime malplena je tia horo, genuiĝanta figuro rapide leviĝis kaj venis al la hela taglumo de la pordego. Kiam la paroĥestro ekvidis ĝin li haltis pro surprizo. Ĉar la frumatena preĝanto estis neniu krom la vilaĝa idioto, nevo de l’forĝisto, kiu nek povis nek volis zorgi pri la preĝejo aŭ pri io ajn. Oni ĉiam nomis lin ”Freneza Joĉjo”, ŝajne li havis nenian alian nomon; li estis nigreta, forta, malrekte sintenanta knabo, kun peza blanka vizaĝo, nigra hararo kaj la buŝo ĉiam malfermita. Kiam li preterpasis la pastron lia idiota vizaĝo montris neniun signon pri tio, kion li pripensas aŭ estas farinta. Antaŭe oni neniam rimarkis, ke li preĝas. Kiajn preĝojn li nun preĝis? Eksterordinarajn preĝojn sendube.

Wilfred Bohun staris kvazaŭ gluita al la tero sufiĉe longe por vidi la idioton eliri en la sunlumon kaj eĉ vidi sian diboĉeman fraton alvoki lin ŝerce. Fine li vidis la kolonelon ĵetanta pencojn al la malfermita buŝo de Joĉjo, ŝajne celanta ĝin trafi. Tiu ĉi sunlumita malbela bildo de la stulteco kaj krueleco de la mondo fine irigis la asketon al lia preĝado por serĉi purigon kaj novajn pensojn. Li sup-

reniris ĝis preĝbenko en la galerio kaj surgenuiĝis sub kolorvitra fenestro kiun li aparte amis ĉar ĝi ĉiam povis trankviligi lian animon; blua fenestro kun anĝelo kiu portis liliojn. Tie li komencis malpli pensadi pri sia malbona frato, paŝanta ekstere kiel malgrasa leono kun lia terura malsato. Pli kaj pli li profundigis en tiujn malvarmajn kaj dolĉajn kolorojn... arĝentaj floroj kaj safira ĉielo.

Tie ĉi post duonhoro, Gibbs, la vilaĝa ŝuisto, kiun oni sendis por elserĉi lin kiel eble plej baldaŭ, lin trovis. Li rapide leviĝis, ĉar li sciis, ke certe nenia malgrava afero povus irigi lin al tia loko. Kiel multaj vilaĝaj ŝuistoj li estis ateisto kaj lia apero en la preĝejo estis eĉ pli eksterordinara ol tiu de Frenza Joĉjo. Estis mateno de teologiaj enigmoj.

"Kio estas?" demandis Wilfred Bohun iomete formale sed premante sian ĉapelon per mano tremanta.

La ateisto parolis per tia voĉo, kia venanta de li estis mirige respektoplena kaj eĉ raŭke kompatema.

"Vi devas senkulpigi min, sinjoro," li diris raŭke kaj flustre, "sed mi kredis, ke ne estus dece ne tuj sciigi al vi. Mi timas, ke io terura okazis, sinjoro. Mi timas, ke via frato... ."

Wilfred kunpremis la malfortajn manojn. "Kion aĉan li nun faris?" li ekkriis pro nevola kolero.

"Nu, sinjoro," tuŝis la ŝuisto, "mi timas, ke li faris nenion ajn kaj faros ja nenion. Mi timas, ke ĉe li ĉio estas jam finita. Vi vere devas malsupreniri, sinjoro."

La vikario sekvis la ŝuiston malsupren laŭ la mallonga torda ŝtuparo, kiu kondukis ilin al enirejo iomete pli alta ol la strato. Bohun tuj ekvidis la tragedion, tie sube, kvazaŭ sur mapo. En la forĝkorto staris kvin aŭ ses viroj, plejparte nigre vestitaj, unu kiel poliestro. Jen estis la kuracisto, la presbiteria pastoro kaj la pastro de la katolika preĝejo, al kiu aliĝis la edzino de la forĝisto. La sacerdoto

parolis kun ŝi, efektive tre rapide kaj mallaŭte, dum ŝi, belaspekta virino kun ruĝ-ora hararo sidante sur benko, blinde ploregis kaj ĝemis. Inter ĉi tiuj grupoj kaj apud la plej granda amaso de martelegoj kuŝis frake vestita viro, sternita kun vizaĝo al la tero. De sia alta vidpunkto Wilfred rekonis ĉian detalon de ties vestaĵo kaj aspekto, eĉ la Bohunajn ringojn sur la fingroj; sed la kranio ŝajnis nur kiel terura verŝitaĵo, simile al nigra kaj sanga stelo.

Wilfred Bohun momenton rigardis kaj malsuprenkuris al la korto. La kuracisto, kiu estis la familia kuracisto de la Bohunanoj, salutis lin, sed li ŝajne apenaŭ rimarkis tiun. Li povis nenion fari krom balbuti, "Mia frato mortis. Kion signifas? Kio estas tiu ĉi terura mistero?" Sekvis malfeliĉa silento kaj poste la ŝuisto, la plej granda parolemulo el la ĉeestantoj, respondis: "Sufiĉe da teruro, sinjoro," li diris, "sed ne multe da mistero."

"Kion vi volas diri?" demandis Wilfred, la vizaĝo tute pala.

"Estas sufiĉe klare," respondis Gibbs. "Estas nur unu viro en la limo de sesdek kilometroj, kiu tiel povus frapi, kaj tiu estas la viro kiu havis la plej fortan motivon tion fari."

"Ni devas ne antaŭjuĝi iun," interrompis la kuracisto, alta kaj nigre barbata viro, iomete nerve; "Sed kiel kuracisto mi povas subteni kion sinjoro Gibbs diris pri la forto de la frapo, estis nekredbla frapo. S-ro Gibbs asertis, ke nur unu homo el la tuta regiono povus tion fari. Mi mem dirus, ke neniu povus tion fari."

Ektremo superstiĉa trapasis tra la malgrasa korpo de la vikario. "Mi povas apenaŭ kompreni," li diris.

"S-ro Bohun," diris la kuracisto mallaŭte, "Metaforoj ja mankas al mi. Ne estas sufiĉe, diri ke la kranio estis frakasita en pecojn kiel ovŝelo. Pecoj da ostoj estas pelitaj en la teron kaj la korpon kiel kuglojn en kotan muron. Estis la mano de giganto."

Dum unu momento li silentis, rigardante malafable tra la okul-

vitroj, poste li aldonis, "La afero havas unu avantaĝon... plejmultaj homoj estas tuj senkulpigataj. Se vi aŭ mi aŭ iu ajn normale farita viro en la lando estus akuzata pri tiu ĉi krimo, oni malkondamnis lin kiel oni malkondamnis infaneton akuzitan pri la forŝtelo de la Nelson Monumento."

"Ankaŭ mi tiel opinias," obstine rediris la ŝuisto, "estas nur unu viro kiu povus fari tion kaj tiu estas la viro kiu volus fari tion. Kie estas Simeon Barnes la forĝisto?"

"Li estas for en Greenford," balbutis la vikario.

"Pli kredeble li estas en Francujo," murmuris la ŝuisto.

"Ne; li estas nek en Greenford nek en Francujo," diris mallaŭta kaj senkolora voĉo, kiu venis de la malgranda katolika pastro, ĵus aliĝinta al la grupo. "Je tiu ĉi momento fakte li alproksimiĝas laŭ la vojo."

La malgranda pastro ne ŝajnis esti interesa viro, havante mallongan brunhararon kaj rondan malviglan vizaĝon. Tamen se li estus eĉ tiel belaspekta kiel Apolono neniu alrigardus lin en tiu momento. Ĉiu sin turnis kaj fikse rigardadis la vojeton kiu serpentumis trans la malproksiman ebenaĵon kaj laŭ kiu marŝis la forĝisto Simeon, per siaj grandegaj paŝoj, kun martelo surŝultre. Li estis osteca kaj grandega viro, la okuloj profundaj, malhelaj kaj malafablaj kaj sur la mentono li havis nigretan barbon. Li marŝis kaj mallaŭte parolis kun du aliaj viroj; kvankam li neniam ŝajnis aparte gaja, tiam tamen li aspektis almenaŭ sen ia ajn ĝeno.

"Je Dio," kriis la ateista ŝuisto, "jen la martelo per kiu li faris ĝin."

"Ne," diris la poliestro, prudentaspekta viro kun sablokoloraj lipharoj, parolante por la unua fojo. "La martelo per kiu li faris ĝin estas tie apud la preĝeja muro. Ni tuŝis nek ĝin nek la kadavron."

Ĉiu ĉirkaŭenrigardetis kaj la malgranda pastro transiris kaj mal-suprenrigardis al la ilo, silente kie ĝi kuŝis. Ĝi estis unu el la plej

malpezaj marteloj kaj ĝi ne estus trafinta la okulon se ne troviĝis sur ĝia fera rando sango kaj flavaj haroj.

Post iom da silento la malgranda pastro parolis ne suprenrigardante, kaj estis en lia malakra voĉo nova sono. "S-ro Gibbs estis apenaŭ prava," li diris, "kiam li asertis, ke estas neniu mistero. Almenaŭ estas la mistero pri kial tia granda viro provus fari tian grandan frapon per tia malgranda martelo."

"Ne prizorgu tion," ekkriis Gibbs febre, "Kion ni devas fari pri Simeon Barnes?"

"Ne ĝenu vin pri li," trankvile respondis la pastro. "Li venos tien ĉi per si mem. Mi konas la du virojn kiuj marŝas kun li. Ili estas bonuloj de Greenford kaj ili alvenas tien ĉi por pritrakti ion pri la presbiteria preĝejo."

Eĉ dum li parolis la alta forĝisto alvenis svinge marŝante ĉirkaŭ la angulo de la preĝejo kaj paŝis en sian propran korton. Tiam li tie staris senmove kaj la martelo defalis el liaj manoj. La poliestro, kiu ĉiam konservis neagiteblan decon tuj alproksimiĝis al li.

"Mi ne demandas al vi," li diris, "ĉu vi scias ion pri kio okazis tie ĉi. Ne estas devige al vi diri. Mi esperas, ke vi ne scias kaj ke tion vi povos pruvi. Tamen mi devas formale aresti vin en la nomo de la Reĝo, pro la murdo de Kolonelo Bohun."

"Vi ne estas devigata iom diri," kriis la ŝuisto, kun oficialema ekscitiĝo. "Oni devas pruvi ĉion. Oni ankoraŭ ne pruvis, ke temas efektive pri Kolonelo Bohun, la kapo estas tiel frakasita."

"Tio ne trafas," diris la kuracisto mallaŭte al la pastro. "Tio devenas el la detektivaj rakontoj. Mi estis la kuracisto de la Kolonelo kaj mi konis ties korpon pli bone ol li mem. La unua fingro estis tiel longa kiel la dua. Estas la kolonelo sendube."

Li rigardetis la sencerbigitan korpon kuŝanta surtere kaj la feraj okuloj de l'forĝisto sekvis lian rigardon kaj ankaŭ restis tie.

”Ĉu Kolonelo Bohun mortis?” diris la forĝisto tre kviete, ”Do, li estas kondamnita.”

”Ne diru ion. Ho, ne diru ion,” kriis la ateista ŝuisto, ĉirkaŭdancante pro ekstazo de admiro al la angla leĝsistemo. Ĉar neniu estas tiel leĝemulo kiel bona sekularisto... .

La forĝisto sin turnis al li, montrante super la ŝultro majestan vizaĝon de fanatikulo.

”Vi malfideluloj povas bone gliti tien kaj tien ĉi kiel vulpoj ĉar la leĝoj de la mondo estas favoraj al vi,” li diris, ”sed Dio prizorgas Siajn proprajn infanojn kvazaŭ en Sia poŝo, kiel hodiaŭ vi vidos.”

Tiam li indikis la Kolonelon kaj diris, ”Kiam mortis tiu ĉi hundo en siaj pekoj?”

”Moderigu viajn vortojn,” diris la kuracisto.

”Moderigu la vortojn de l’biblio, kaj mi moderigos la miajn. Kiam li mortis?”

”Mi vidis lin vivanta hodiaŭ je la sesa,” balbutis Wilfred Bohun.

”Dio estas bona,” diris la forĝisto. ”S-ro poliestro, mi volonte konsentas esti arestata. Estas vi mem kiu eble malkonsentos aresti min. Mi ne malkonsentas eliri el la juĝejo senmakule. Sed eble vi ne ŝatos eliri el ĝi kun malbona malhelpo al via kariero.”

La fortika poliestro por la unua fojo rigardis la forĝiston vivecokule; tiel ankaŭ faris ĉiu, krom la malalta stranga pastro, kiu ankoraŭ rigardadis malsupren al la malgranda martelo per kiu okazis la terura frapo.

”Staras ekster tiu ĉi laborejo du viroj,” daŭrigis la forĝisto kun pezega klareco, ”bonaj komercistoj el Greenford, kiujn vi ĉiuj konas, kiuj ĵuros, ke ili vidadis min de antaŭ noktomezo ĝis tagiĝo kaj dum longa tempo poste en la Komitatejo de nia Reviviga Misio, kiu kunsidis la tutan nokten ĉar ni tiel amase savas animojn. En Greenford estas eĉ dudek homoj kiuj povus ĵuri pri mia ĉeesto dum tiu tuta

tempo. Se mi estus pagano, mi lasus vin iri al via ruiniĝo, sinjoro poliestro. Kiel Kristano tamen mi sentas, ke mi devas doni al vi eliron kaj demandas, ĉu vi preferas aŭdi mian alibion nun aŭ en la juĝejo.”

La poliestro por la unua fojo ŝajnis maltrankvila kaj li diris, “Kompreneble plaĉus al mi tuj senkulpigi vin.”

La forĝisto eliris el sia propra korto per longaj kaj facilaj paŝoj kiel antaŭe kaj reiris al siaj du amikoj el Greenford, kiuj efektive estis amikoj de preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj. Ĉiu el ili diris kelkajn vortojn, kiujn neniu eĉ pripensis malkredi. Kiam ili finiĝis la senkulpeco de Simeon elstaris tiel fortike kiel la granda preĝejo supre.

Frapis la grupon unu el tiuj silentoj, kiuj estas pli strangaj kaj pli netolereblaj ol ia ajn parolo. Senzorge, nur por fari interparoladon la vikario diris al la katolika pastro.

“Ŝajne vi tre interesiĝas pri tiu martelo, Pastro Brown.”

“Jes, tre,” diris Pastro Brown; “kial ĝi estas tia malgranda martelo?”

La kuracisto senhezite sin turnis al li.

“Je Sankta Georgo! Vi estas prava,” li ekkriis, “Kiu ajn uzus tian malgrandan martelon kiam dek pli grandaj marteloj apudkuŝas?”

Tiam li mallaŭtigis la voĉon kaj flustris en la orelon de la vikario, “Nur tia homo kia ne povus levi pezan martelon. Ne estas afero de forteco aŭ kuraĝo de la seksoj. Nur gravas la levpovo de l’ŝultroj. Maltimema virino povus mortigi dek personojn per malpeza martelo sen troa ĝeno. Ŝi ne povus mortigi eĉ blapson per peza martelo.”

Wilfred Bohun rigardadis lin fikse, kvazaŭ hipnotizite de teruro, dum Pastro Brown atente aŭskultis, la kapo iomete klinita, kaj vere interese. La kuracisto daŭrigis pli sible emfazante:

“Kial tiuj ĉi idiotoj ĉiam supozas, ke la sola persono kiu malŝa-

tas la amanton de edzino, estas ŝia edzo? Naŭ fojojn el dek, kiu pli malŝatas la edzinamanton, estas la edzino mem. Kiu scias kian insulton aŭ perfidon li eble faris al ŝi? Rigardu tien.”

Li faris gesteton al la ruĝhara virino sidanta sur la benko. Fine ŝi levis la kapon kaj la larmoj estis sekiĝantaj sur sia belega vizaĝo. Sed ŝiaj okuloj fikse rigardadis la kadavron kun elektra brileco kiu vidiĝis iom da idioteco.

S-ro Pastro Bohun faris malfortan geston kvazaŭ li volis forpusi ĉian deziron sciiĝi; sed Pastro Brown, forbrosante de sur sia maniko kelkajn cindrojn blovintajn el la forĝfajro ekparolis kvazaŭ ne interese.

”Vi estas simila al multaj kuracistoj,” li diris; ”Via mensa scienco estas certe sugestoplena. Estas via fizika scienco, kiu estas tute malprava. Mi konsentas pri tio, ke la virino dezirus mortigi la amanton, pli ol sia edzo. Mi ankaŭ konsentas, ke virino emus enmanigi malgrandan martelon anstataŭ grandan. Sed la malfacilaĵo estas la fizika malebleco. Neniu virino el la tuta mondo povus tiel ebenigi viran kranion.” Post paŭzo li aldonis pensante; ”Ĉi tiuj viroj ankoraŭ ne tute komprenas la aferon. La mortinto efektive portis feran kasikon kaj la frapo disfrakasis ĝin kiel rompita vitro. Rigardu do tiun virinon. Rigardu ŝiajn brakojn.”

Silento denove ektenis ilin kaj poste la kuracisto iomete malbonhumore diris; ”Nu, eble mi malpravas; ekzistas faktoj kontraŭ ĉio ajn. Tamen mj ankoraŭ tenas la ĉefan detalon. Neniu, krom idioto, elektus tiun malpezan martelon se li povus uzi pli pezan martelon.”

Tio dirita Wilfred Bohun levis la delikatajn kaj tremantajn manojn al la kapo kaj ŝajne ektenis sian nemultan hararon. Post sekundo ili malleviĝis kaj li kriis; ”Tiun vorton mi serĉis; vi diris la vorton.”

Li daŭrigis, venkante sian maltrankvilecon; ”La vortoj, kiujn vi

elparolis estis tiuj ĉi, ‘Neniu, krom idioto, elektus la malpezan martelon.’”

”Jes,” diris la kuracisto. ”Nu, kion?”

”Nu,” diris la paroĥestro, ”efektive neniu krom idioto faris tion.” La aliaj fikse rigardis lin, la okuloj tute kaptitaj kaj altenitaj. Li daŭrigis kun febra kaj kvazaŭ virina malkvieto.

”Mi estas pastro,” li diris ebrie, ”kaj pastro devas ne elverŝigi sangon. M... Mi volas diri, ke li devas ne sendi iun al la eŝafodo. Kaj mi dankdonas al Dio, ĉar mi nun klare vidas la krimulon... ĉar li estas krimulo, kiun oni ne povas sendi al la eŝafodo.”

”Vi ne denuncos lin?” demandis la kuracisto.

”Oni ne pendigus lin eĉ se mi denuncus lin,” respondis Wilfred, kun strange felika rideto. Kiam mi eniris en la preĝejon hodiaŭ matene, mi tie trovis frenezulon preĝanta... tiu kompatinda Joĉjo, kiu dum sia tuta vivo estas freneza. Dio mem scias kiel li preĝis; sed ĉe tiaj strangaj homoj, ne estas nekredeble supozati, ke iliaj preĝoj estas tute renversitaj. Estas kredeble, ke frenezulo preĝus antaŭ ol mortigi iun. Mi lastfoje vidis kompatindan Joĉjon kun mia frato. Mia frato mokis lin.”

”Je Dio!” kriis la kuracisto, ”fine estas kompreneble. Tamen kiel vi povas klarigi... .”

Sinjoro Pastro Bohun estis preskaŭ tremanta de ekscito pro sia ekvido al la vero. ”Ĉu vi ne povas kompreni? Ĉu vi ne povas kompreni?” li kriis febre; ”Tiu estas la sola teorio, kiu klarigas ambaŭ strangajn aferojn, kiu donas la respondon por ambaŭ enigmoj. La du enigmoj estas la malgranda martelo kaj la granda frapo. La forĝisto povus doni la grandan frapon, sed li ne elektus la malgrandan martelon. Lia edzino elektus la malgrandan martelon, sed ŝi ne povus fari la fortan frapon. La frenezulo tamen povus ambaŭ fari. Pri la malgranda martelo... nu, li estas freneza kaj emus ekpreni ion ajn.

Kaj pri la granda frapo... ĉu vi neniam aŭdis, sinjoro kuracisto, ke maniulo en sia paroksismo povas havi dekviran fortecon?"

La kuracisto profunde enspiris kaj poste diris, "Je Dio, mi kredas, ke vi jam malkaŝis la veron."

Pastro Brown fikse rigardis la parolinton tiom longe kaj senmove, kiom montris, ke liaj larĝaj kaj grizaj okuloj similaj al bovokuloj, ne estas tiel nerimarkindaj kiel lia vizaĝo. Kiam silentis li diris aparte respektplene; "S-ro Bohun, la via estas la sola teorio, ĝis nun proponita, kiu ŝajnas esti ĉiel tute prava kaj kiu estas esence tute neatakebla. Tial mi opinias, ke mi devas sciigi al vi, laŭ mia certa scio, ke ĝi ne estas la vera teorio." Tiel dirinte la malgranda maljunulo marŝis for kaj ankoraŭ unufoje rigardis la martelon.

"Ŝajne li scias pli multe ol li devus scii pri la afero," plendeme la kuracisto flustris al Wilfred. "Tiuj papaj pastroj estas ruzaĉaj."

"Ne, ne," diris Bohun, kun ia sovaĝa laceco, "Estis la frenezulo, estis la frenezulo."

Ambaŭ pastroj kaj la kuracisto iris iomete for de la pli oficiala grupo, kiu enhavis la policestron kaj la viron, kiun li kaptis. Nun disiĝintaj, ili ekaŭdis la voĉojn de la aliaj. La pastro levis okulojn kaj poste mallevis ilin aŭdante la forĝiston diri laŭte:

"Espereble mi konvinkis vin, sinjoro Policestro. Mi estas fortulo, kiel vi mem diris, sed mi ne povus ĵeti mian martelon de Greenford ĝis tie ĉi, tute ne. Mia martelo ne havas flugilojn, per kiuj ĝi povus alveni flugante duonkilometron super heĝoj kaj kampoj."

La policestro ridis amikece kaj diris:

"Ne, miaopinie ni povas senkulpigi vin, tamen jen unu el la plej strangaj koincidoj, kiujn mi iam renkontis. Mi ne povas ion fari krom peti vin, ke vi donu al ni helpon eltrovi viron tiel fortan kaj tiel grandan kiel vi mem. Je Sankta Georgo, vi eble utilis se nur por lin teni. Mi scivolas ĉu vi mem povas fari konjekton pri la kulpulo?"

”Mi povas diveni tion,” diris la pala forĝisto, ”sed ne estis viro.” Tiam vidinte ĉies timoplenajn okulojn turniĝi al lia edzino sur la benko, li metis pezan manon sur ŝian ŝultron kaj diris.

”Nek virino estis.”

”Kion vl volas diri?” gaje demandis la poliestro. ”Vi ne kredas, ke bovinoj uzas martelojn, ĉu?”

”Mi kredas, ke nenio karna prenis tiun martelon,” diris la forĝisto per voĉo sufokita; ”mi kredas, ke neniu vivanta ĉeestis la mortigon de tiu homo.”

”Ĉu vi volas diri, Barnes,” eksonis la akra voĉo de la ŝuisto, ”ke la martelo per si mem suprensaltis kaj bategis lin?”

”Ho, vi sinjoroj povas rigardadi kaj mokrideti,” kriis Simeon; ”vi pastroj kiuj diras dimanĉe al ni per kia silento la Sinjoro frapis Sanĥaribon. Mi kredas, ke Tiu, Kiu nevideble trapasas ĉiun domon defendis hodiaŭ la honoron de la mia, kaj mortfrapis la malpuriganton ĉe ĝia pordo. Mi kredas, ke la forto de tiu frapo estis la forto per kiu tertremoj okazas, kaj nenia malpli granda forto.”

Wilfred diris per voĉo tute ne priskribebla; ”Mi mem konsilis al Norman, ke li sin gardu kontraŭ la fulmofajro.”

”Tiu povo estas ekster mia fako,” diris la poliestro ridetante.

”Vi ne estas ekster la Lia,” respondis la forĝisto; ”kaj gardu vin mem pri tio,” kaj turnante larĝan dorson al ili, li reiris en sian domon.

Pastro Brown forkondukis la skuitan Wilfred, kaj kiel ĉiam, montris amikecan kaj komplezeman manieron. ”Foriru ni de tiu ĉi terura loko, sinjoro Bohun,” li diris. ”Ĉu mi povas eniri en vian preĝejon? Oni diris al mi, ke ĝi estas unu el la plej malnovaj preĝejoj en Anglujo. Mi iomete interesiĝas, efektive,” li aldonis kun komika grimaco, ”pri antikvaj anglaj preĝejoj.”

Wilfred Bohun ne ridetis, ĉar spritaĵoj neniam ŝajnis lin tuŝi. Ta-

men li kun iom da entuziasmo kapklinis, deziregante klarigi al iu ajn pli simpatia ol la presbiteriana forĝisto aŭ la ateista ŝuisto, la gotajn belaĵojn.

”Kun plezuro,” li diris; ”ni eniru ĉe tiu ĉi flanko.” Kaj li enkondukis lin tra la flankenirejo je la kapo de la ŝtuparo. Pastro Brown komencis supreniri la ŝtuparon por lin sekvi, kiam li sentis manon sur la ŝultro kaj sin turnis vidante la malpalan kaj maldikan figuron de la kuracisto, la vizaĝo ankoraŭ pli malpala pro suspektemo.

”Sinjoro,” diris la kuracisto akre, ”ŝajne vi scias kelkajn sekretojn pri tiu ĉi malbenita afero. Ĉu mi povas demandi al vi, ĉu vi intencas konservi ilin por vi mem?”

”Nu, sinjoro doktoro,” respondis la pastro agrable ridetante, ”ekzistas unu grava kialo por iu de mia metio resti silenta pri aferoj kiujn li ne certe scias. Tiu kialo estas, ke li devas ĉiam silenti pri ili, kiam li ne havas ian ajn dubon pri ilia vereco. Tamen, se vi opinias, ke mi estis neĝentile malparolema al vi aŭ al iu, mi daŭrigos ĝis mia kutima limo. Mi donos al vi du signifoplenajn sugestetojn.”

”Mi aŭskultas, sinjoro,” li diris malgaje.

”Unue,” trankvile diris Pastro Brown, ”estas afero de via fako. Estas afero de fizika scienco. La forĝisto malpravas, ne kiam li asertas, ke estis dia frapo, sed kiam li asertas, ke ĝi okazis per miraklo. Ne temas pri iu miraklo, doktoro, krom kiom la homoj mem estas mirakloj, kun strangaj kaj pekaj kvankam duone heroaj koroj. La potenco kiu frakasis tiun kranion estas potenco bone konata inter scienculoj... unu el la plej multe diskutitaj naturleĝoj.”

La kuracisto, kiu rigardis lin atente sulkigante la brovojn, nur diris; ”Kaj la alia sugesteto?”

”Jen la alia sugesteto,” diris la pastro. ”Ĉu vi memoras, ke la forĝisto, kvankam li kredas al mirakloj, tamen parolis moke pri la fera-

konta nebleco de tio, ke lia martelo povus preni flugilojn kaj flugi kilometron trans kampojn?”

”Jes,” respondis la kuracisto, ”tion mi memoras.”

”Nu,” aldonis Pastro Brown, larĝe ridetante, ”tiu ferakonto estas pli vera ol io ajn kion oni estas hodiaŭ dirinta.” Kaj tion dirinte li malrapide grimpis la ŝtuparon, sekvante la vikarion.

Sinjoro Pastro Bohun, kiu atendis lin senpacience kaj kun pala vizaĝo, kvazaŭ la prokrasto lin estus malkvietiginta, tuj kondukis Brown al sia plej preferata loko en la preĝejo; tien en la galerio, pli proksime al la ĉizita supraĵo, kaj lumigata de la mirinda anĝela fenestro. La latina pastro esploris kaj admiris senescepte ĉiun detalon, la tutan tempon gaje sed mallaŭte parolanta. Kiam dum la esplorado li trovis la flankenirejon kaj tordan ŝtuparon per kiu Wilfred malsuprenkuris kaj trovis sian mortigitan fraton, Pastro Brown ne malsupren sed supren kuris, kun kvazaŭ simia facileco kaj lia klaraŭdebla voĉo venis de ekstera balkono supre.

”Venu tien ĉi, sinjoro Bohun,” li vokis. ”La aero resanigos vin.”

Bohun lin sekvinte, eliris sur ian ŝtonan balkonon ekster la konstruaĵo, de kie li povis vidi la senliman ebenaĵon en kies mezo staris ilia monteto. Ĝi estis arbkovrita ĝis la purpura horizonto kaj punktita de vilaĝoj kaj bienoj. Klare kaj kvadrato sub ili sed tute malgrande vidiĝis la forĝkorto, kie ankoraŭ staris la poliestro skribante en kajereton, kaj la kadavro ankoraŭ kuŝis tie kiel ekpremita muŝo.

”Povus esti mapo de la tero, ĉu ne?” diris Pastro Brown.

”Jes,” diris Bohun, tre serioze, kaj kapklinis.

Ĉirkaŭ ili kaj sube la linioj de la gota konstruaĵo plunĝis en la malplenaĵon kun la kapturiga rapideco de sinmortigo. Troviĝas en la konstrumaniero de l’mezepoko iu Titana energio, kiu de ĉiuj vidpunktoj ŝajnas ĉiam forkuregi, kiel la fortika dorso de furioza ĉeva-

lo. Tiu ĉi preĝejo estis skulptita el antikvaj kaj silentaj ŝtonoj, barbitaj de fungoj kaj makulitaj de birdnestoj. Kiam ili ĝin vidis de malsupre, ĝi saltis kiel fontano al la steloj, kaj nun vidate de supre ĝi sin verŝis kiel kaskado en la silentan abismon. Ĉar tiuj ĉi du viroj sur la turo estis solaj kun la plej teruriga aspekto de gota arkitekturo; la monstra mallongigo kaj malproporcio, la kapturnigaj perspektivoj, la ekvido de grandaj aferoj malgrandigitaj, kaj malgrandaj aferoj grandigitaj, la mezepoka renversado de ŝtonoj. Ŝtonaj ĉizitaĵoj, grandegitaj pro proksimeco, vidiĝis sur fono el kampoj kaj farmbienoj, malgrandegitaj pro malproksimeco. Skulptita birdo aŭ besto ĉe angulo ŝajnis kiel giganta drako paŝante aŭ flugante tie malsupre, detruante herbejojn kaj vilaĝojn... . La tuta atmosfero estis kapturniga kaj danĝera, kvazaŭi homoj estus subtenataj en la aero inter la turbirantaj flugiloj de kolosaj genioj; kaj la tuto de tiu antikva preĝejo, tiel alta kaj riĉa kiel katedralo, ŝajne sidis sur la sunluma kamparo kiel peza pluvnubo.

"Mi opinias, ke stari en tiuj ĉi altejoj estas iom danĝere, eĉ por preĝi," diris Pastro Brown. "Altaĵoj estas faritaj por ke oni alrigardu al ili, ne por ke oni povu derigardi de ili."

"Ĉu vi volas diri, ke oni emus fali malsupren," demandis Wilfred.

"Mi volas dir ke la animo povus fali, eĉ se la korpo ne falus," la alia pastro diris.

"Rigardu do tiun forĝiston, ekzemple," daŭrigis Pastro Brown per kvieta voĉo; "bonulo li estas sed ne Kristano... malcedema, tiraneca, malpardonema. Nu, homoj kiuj preĝis sur montoj kaj krucejoj faris lian skotan religion kaj ili kutimiĝis derigardi sur la mondon, pli ol alrigardi al la ĉielo. Humileco estas la patrino de gigantoj. Oni vidas grandajn aĵojn de la valo, sed nur malgrandajn de la pinto."

"Sed li... li ne faris tion," diris Bohun tremante.

”Ne,” diris la alia per stranga voĉo, ”ni scias, ke li ne faris tion.”

Post unu momento li daŭrigis elrigardante trans la ebenaĵon per palgrizaj okuloj. ”Mi konis iun,” li diris, ”kiu komence adoris antaŭ la altaro kun aliaj homoj, sed li poste amis preĝadi en la altaj kaj solecaj lokoj, en anguloj kaj niĉoj de la turo. Kaj unu fojon, en tia kapturniga loko, kie ŝajnis, ke la tuta mondo turniĝas sub li kiel rado, lia menso ankaŭ turniĝis kaj li imagis, ke li estas Dio. Tiel, kvankam li estis bona viro li faris grandan krimon.”

La vizaĝo de Wilfred estis turnita for, sed liaj delikataj manoj, premantaj la ŝtonan parapeton, bluiĝis kaj blankiĝis.

”Li kredis, ke estas al li, juĝi la mondon kaj frapi la pekinton. Neniam li estus tiel pensinta, se li estus genuanta sur la tero kun la aliaj homoj. Sed li vidis ĉiujn kiel insektojn. Li vidis iun aparte, kiu arogante paŝis sub li kaj estis videbla pro helverda ĉapelo... kiel venena insekto.”

Frugilegoj grakis ĉirkaŭ la anguloj de la turo; sed aŭdiĝis neniu alia sono ĝis daŭrigis Pastro Brown.

”Tio ankaŭ tentis lin, ke li havis en la mano unu el la plej teruraj naturaj potencoj... la graviton, tiu furioza kaj akceliga potenco, per kiu ĉio de la tero, kiam ĝi fariĝas libera tuj reen flugas al ĝia koro. Se mi deĵetus ŝtonon de tiu ĉi parapedo, ĝi estus kiel kuglo kiam ĝi trafus lin. Se mi faligus martelon... eĉ malgrandan martelon,...”

Wilfred Bohun levis kruron super la parapeton kaj Pastro Brown tuj ektenis lin per la kolumo.

”Ne iru tra tiu pordo,” diris li tute milde, ”tiu pordo kondukas al infero.”

Bohun ŝanceliĝis reen ĝis la muro kaj rigardegis lin per terurplenaj okuloj.

”Kiel vi tiom scias?” li kriis, ”ĉu vi estas diablo?”

”Mi estas homo,” serioze respondis Pastro Brown, ”kaj tial mi havas ĉiajn diablojn en la koro. Aŭskultu min,” li diris post mal-longa paŭzo. ”Mi scias kion vi faris almenaŭ mi povas diveni la plej gravan parton. Kiam vi foriris de via frato, ektenis vin nemaljusta kolerego, tiel, ke vi eĉ prenis malgrandan martelon, duonintencante mortigi lin kun la malpureco sur liaj lipoj. Naŭzite, vi anstataŭe kaŝis ĝin sub via butonumita surtuto kaj rapidis en la preĝejon. Furioze vi preĝis en multaj lokoj, sub la anĝelfenestro sur la supra balkono, kaj sur balkono eĉ pli alta de kie vi povis vidi la ĥinan ĉapelon de la kolonelo, kiel la dorso de verda rampanta skarabo. Tiam io en via animo rompiĝis kaj vi faligis la fulmofajron de Dio.”

Wilfred alkape levis malfortan manon kaj demandis mallaŭte.

”Kiel vi sciis, ke la kasko ŝajnis kiel verda skarabo?”

”Ho, tio,” diris la alia kun rideto, ”tio estis ordinara sagaco. Do, aŭskultu plu. Mi diras, ke mi tiom scias, sed neniu krome ekscios ĝin. La estonto estas al vi, mi ne faros ion plu; mi sigelos tion per la konfesosigelo. Se vi demandas, kial, estas multaj kialoj, sed nun unu tuŝas vin. Mi lasas la aferon al vi, ĉar vi ankoraŭ ne tre eraris, kiel murdintoj eraras. Vi ne provis kulpigi la forĝiston, kiam estus facile; nek lian edzinon, kiam ankaŭ tio estus facila. Vi provis kulpigi la idioton ĉar vi sciis, ke li ne povas suferi. Tio estus unu el tiuj lumradioj, kiujn trovi ĉe murdintoj estas mia metio. Kaj nun malsupreniru en la vilaĝon kaj marŝu sur via propra vojo, libere kiel la vento, ĉar pri tio mi jam diris mian finan vorton.”

Tute silente ili malsupreniris per la torda ŝtuparo kaj eliris en la sunlumon apud la forĝejo. Wilfred Bohun zorge malfermis la lignan kradpordon de la korto kaj alirinte al la policestro li diris:

”Mi volas min cedi: mi mortigis mian fraton.”

LA OKULO DE APOLONO

Tiu neordinara, fuma briletado, samtempe malklara kaj travidebla, kiu estas la stranga sekreto de la Rivero Tamizo, pli kaj pli heliĝis de sia grizeco ĝis brileco dum la suno leviĝis al la zenito super Westminster, kaj du viroj transiris Westminster Ponton. Unu el ili estis tre alta kaj la alia tre malalta; oni povus fantazie kompari ilin kun la aroganta horloĝturo de la parlamentejo kaj la humilaj ĝibŝultroj de la abatejo, ĉar la malaltulo estis vestita kiel pastro. La oficiala priskribo pri la altulo estis Monsieur Hercule Flambeau, privata detektivo, kaj li iris al sia nova oficejo en ĵus konstruita ĉambraro kontraŭ la enirejo de la abatejo. La oficiala priskribo de la malaltulo estis Pastro J. Brown de la preĝejo de S. Francisko Ksaviero en Camberwell, kaj li venis de mortlito en Camberwell por vidi la novan oficejon de sia amiko. La konstruaĵo estis usonaspekta pro sia grandega alteco, kaj usona ankaŭ pro la oleumita malsimpleco de sia telefona kaj lifta maŝinaro. Tamen ĝi estis apenaŭ kompleta kaj ankoraŭ ne enhavis la tutan oficistaron; nur tri luantoj loĝis tie; la oficejo super tiu de Flambeau estis okupata, tiu sub ĝi ankaŭ; la du supraj kaj la tri malsupraj etaĝoj estis tute sen loĝantoj. Tamen de la unua ekrigardo al la nova ĉambrarturo io multe pli rimarkinda estis videbla. Krom kelkaj trabaraj restaĵoj la sola elstarajo troviĝis ekster la oficejo super tiu de Flambeau. Ĝi estis grandega ora figuraĵo de homa okulo ĉirkaŭita de oraj radioj kaj kaŝanta du aŭ tri fenestrojn.

”Ho, kio estas tio?” demandis Pastro Brown kaj haltis.

”Nur nova religio,” respondis Flambeau ridante, ”unu el tiuj novaj religioj kiuj pardonas pekojn, dirante ke vi neniam faris ilin. Simile al Kristana Scienco mi opinias. Fakte, iu kiu nomas sin Kalon (mi ne scias lian veran nomon sed ĝi ne povas esti Kalon), luis la ĉambrojn super miaj. Estas du skribmaŝinistinoj sub mi kaj ĉi tiu entuziasma ĉarlatano supre. Li nomas sin la Nova Sacerdoto de Apolono, kaj li adoras la sunon.”

”Li gardu sin,” diris Pastro Brown. ”La suno estis la plej kruela el ĉiuj dioj. Tamen kion signifas tiu grandega okulo?”

”Laŭ mia kompreno estas ilia teorio, ke iu povus toleri kaj travivi ĉion ajn se la menso estus tute firma,” respondis Flambeau. ”Iliaj du ĉefaj simboloj estas la suno kaj la malfermita okulo, ĉar ili asertas, ke se homo estus vere sana li povus rigardi fikse eĉ la sunon.”

”Se homo estus vere sana,” diris Pastro Brown, ”li ne sin ĝenus rigardi ĝin.”

”Tiom do mi scias pri la nova religio,” daŭrigis Flambeau. ”Ĝi asertas ankaŭ kompreneble, ke ĝi povas venki ĉiujn fizikajn malsanojn.”

”Ĉu ĝi povas venki la solan spiritan malsanon?” demandis Pastro Brown kun serioza scivolemeco.

”Kaj kio estas la sola spirita malsano?” demandis Flambeau ridante.

”Ho, kredi, ke oni tute bonsanas,” diris lia amiko.

Flambeau pli interesiĝis pri la modesta oficejeto sub la sia, ol pri la flamanta templo supre. Li estis klarpensema sudano, kiu neniel povis imagi sin krom kiel katoliko aŭ ateisto; kaj novaj religioj, feliĉigaj aŭ malĝojaj, ne allogis lin. La homaro tamen ĉiam allogis lin, precipe kiam ĝi estis belaspekta; plie, la malsupraj fraŭlinoj havis proprajn karakterizojn. Du fratinoj prizorgis la oficejon; ambaŭ estis maldikaj kaj nigretaj kaj unu el ili estis alta kaj impresa. Tiu

havis avidan kaj hokforman vizaĝon simile al la precize difinita rando de ia batalilo. Ŝi ŝajnis trahaki vojon tra la vivo. Ŝi havis okulojn mirige brilajn, sed estis la brileco de ŝtalo pli ol la brileco de diamantoj; kaj ŝia maldika figuro estis iomete tro nefleksebla por havi sveltecon. Ŝia pli juna fratino estis kiel ŝia mallongigita ombro, iomete pli griza, pli pala kaj pli senimpona. Ili ambaŭ portis oficejtaŭgajn nigrajn kostumojn kun etaj viraj manumoj kaj kolumoj. Estas miloj da tiaj laboremaj virinoj en la Londonaj oficejoj, sed ĉi tiuj estis interesaj pro ilia vera, pli ol ilia ŝajna stato.

Ĉar Pauline Stacey, la pli aĝa, estis fakte heredotino de blazono kaj duono de graflando, ankaŭ de granda riĉeco; antaŭ ol ia malvarma furiozeco (kian nur la moderna virino havas) aligis ŝin al tio, kio ŝia opinie estas pli malmola kaj pli nobela vivmaniero, ŝi pasigis sian junecon en kasteloj kaj ĝardenoj. Efektive ŝi ne cedis sian monon; en tio estus romaneca aŭ monaĥa malzorgeco tute fremda al ŝia superrega utilismo. Ŝi diris ĉiam, ke ŝi tenas siajn riĉaĵojn por almeti ilin al praktikaj sociaj aferoj. Per parto de ĝi ŝi starigis modelan skribmaŝinejon, iom ŝi disdonis al diversaj asocioj kaj movadoj por la antaŭenigo de socia laborado inter virinoj. Kiom Joan, ŝia fratino kaj kunlaboranto, partoprenis en ĉi tiu iomete proza idealismo neniu povis certiĝi. Tamen ŝi sekvis sian estrinon kun hundfidela amo, kiu iel estis pli alloga, kun ĝia eta tragediemo, ol la malcedema kaj viveca energio de ŝia pli aĝa fratino. Pauline Stacey havis neniun emon al tragedio; oni diris ke ŝi neas ĝian ekziston.

Ŝia nefleksebla rapideco kaj malvarma malpacienco tre amuzis al Flambeau kiam por la unua fojo li eniris la ĉambraron. Li estis atendanta ekster la lifto en la enirejo la knabon, kiu kutime kondukis fremdulojn al la diversaj etaĝoj. Sed tiu ĉi brilokula falkino tute rifuzis toleri oficialan malrapidecon. Akre ŝi diris, ke ŝi ĉion scias pri la lifto kaj, ke ŝi ne dependas de knaboj... nek de viroj. Kvankam ŝiaj

ĉambroj troviĝis en la tria etaĝo, tamen dum la kelksekunda supreniro, prosperis al ŝi senhezite klarigi al Flambeau multajn el ŝiaj fundamentaj opinioj; mallonge tiuj signifis, ke ŝi estas moderna laborantino kaj ke ŝi amas modernajn maŝinojn. Ŝiaj helnigraj okuloj ekbrilis pro abstrakta kolero kontraŭ tiuj, kiuj kontraŭparolas la maŝinsciencon kaj kiuj petas la revenon de romantiko. Ŝia opinie, ĉiu devas scipovi manregi maŝinojn, kiel ŝi manregas la lifton. Ŝajne ŝi preskaŭ malkonsentis kiam Flambeau malfermis por ŝi la liftopordon, kaj tiu sinjoro supreniris al siaj propraj ĉambroj ridetante pro iomete miksitaj sentoj pri la memoro de tia brilanta sendependeco.

Ŝi havis temperamenton iel abruptan kaj agemecan; la gestoj de ŝiaj delikataj kaj elegantaj manoj estis subitaj kaj eĉ detruvolaj. Iam Flambeau eniris en ŝian ĉambron por pritrakti kelkajn aferojn pri maŝinskribado kaj eltrovis, ke ŝi ĵus ĵetis la okulvitrojn de sia fratino en la mezon de la ĉambro kaj piedpremas ilin. Ŝi estis jam en la rapidoj de etika riproĉparolado pri la "naŭzaj medicinaj ideoj" kaj la malsana sindono al malforteco, kiun tiaj helpiloj signifas. Ŝi defiis sian fratinton enporti ankoraŭ unufoje tian artefaritan malsanan senutilaĵon en la oficejon. Ŝi demandis, ĉi ŝi portu lignajn kruojn aŭ perukon aŭ vitrajn okulojn; kaj dum ŝi parolis ŝiaj okuloj ekflamis kiel la terura kristalo.

Flambeau, tute konfuzite pro tiu ĉi fanatikeco, ne povis ne demandi al fraŭlino Pauline (kun sia franca logiko), kial okulvitroj estas signo de malforteco pli ol liftoj, kaj kial, se la scienco povas helpi al ni pri la unu klopodo, ĝi ne povas helpi al ni ankaŭ pri la alia.

"Tio estas tute malsama," fiere diris Pauline Stacey, "Baterioj kaj aŭtoj kaj tiaj aferoj estas signoj de homa fortenco... jes, sinjoro Flambeau, kaj de virina fortenco ankaŭ. Ni ludos nian rolon je tiuj ĉi ma-

ŝinoj kiuj venkas spacon kaj tempon. Tio estas altcela kaj grandioza... tio estas vera scienco. Sed tiuj ĉi aĉaj subteniloj kaj plastroj, kiujn la kuracistoj vendas... nu, ili nur estas la signoj de ĉarlataneco. Kuracistoj algluas krurojn kaj brakojn kvazaŭ ni estas kripluloj kaj malsanaj servutuloj de nia naskiĝo. Sed mi de mia naskiĝo estas libera, sinjoro Flambeau! Homoj bezonas tiujn aĵojn ĉar ili estis edukitaj en timo, anstataŭ en forto kaj kuraĝo, same kiel stultaj vartistinoj konsilas al infanoj ne rigardadi la sunon, tial ili ne povas rigardadi ĝin senpalpebrume. Kial, inter la steloj estu nur unu stelo, kiun ni ne povas vidi? La suno ne estas mia superreganto kaj mi malfermos miajn okulojn kaj rigardados ĝin kiam ajn mi volos.”

”Viaj okuloj,” diris Flambeau, fremdstile kliniĝante, ”superbrilus eĉ la sunon.” Plaĉis al li komplimenti ĉi tiun strangan, neflekseblan belulinon, parte pro tio ke tion fari iomete malekvilibrigis ŝin. Tamen dum li supreniris al sia etaĝo li profunde enspiris kaj ekfajfis al si dirante: ”Do, tiu ĉarlatano supre kun la ora okulo kaptis ŝin.” Ĉar, kvankam li ne multe sciis pri la nova religio de Kalon, li jam aŭdis pri lia aparta ideo de sunrigardo.

Baldaŭ li trovis, ke la spirita kunligo inter la du etaĝoj estas forta kaj plifortiĝanta. Tiu homo, kiu sin nomis Kalon estis belega kreito, inda laŭ fizika vidpunkto esti la pontifiko de Apolono. Li estis preskaŭ tiel alta kiel Flambeau, kaj multe pli belaspekta ol li, kun orkolora barbo, fortaj bluaj okuloj, kaj hararego malantaŭen kombita kiel leonhararo. Lia staturo estis tiu de la Neitzsche’a blonda besto, sed lia besta beleco estis pliigita, heligita kaj moligita per vera intelekto kaj spiriteco. Se li aspektis kiel unu el la famaj saksaj reĝoj, li aspektis kiel unu el tiuj reĝoj kiuj ankaŭ estis sanktuloj, kaj tio estis spite al la Londona neakordeco de liaj ĉirkaŭaĵoj; la fakto ke li havis mezetaĝan oficejon en Viktoria Strato; ke lia skribisto (nerimarkinda junulo portanta manumojn kaj kolumojn) sidis en la ek-

stera ĉambro, inter li kaj la koridoro; ke lia nomo estis sur latunafişo, kaj orumita emblemo de lia kredo pendis super la strato kiel okulistreklaĵo. La tuto de ĉi tiu vulgareco ne povis depreni de la homo nomita Kalon la potencan subpremon kaj inspiremon kiu venis de lia animo kaj korpo. Ĉio dirite, kiam en la ĉeesto de ĉi tiu ĉarlatano oni sentis esti en la ĉeesto de eminentulo. Eĉ vestita en la toljako kiun li portis kiel laborvestaĵo en la oficejo, li estis ensorĉa kaj timiga figuro; kaj kiam li surmetis la blankajn robojn kaj la oran diademon, en kiuj li ĉiutage salutis la sunon, li jam tiom belege aspektis, ke la mokridoj de la preterpasantoj formortis sur iliaj lipoj. Trifojojn ĉiutage eliris la moderna sunadoranto sur sian balkoneton en la ĉeesto de ĉiuj Westminsteranoj, por deklami ian litanion al sia brila dio: je tagiĝo, je sunsubiro kaj je la tagmeza eksonego ĉiutage. Kaj dum la tagmeza eksonego ankoraŭ tremetis de la parlamentaj kaj preĝejaj turoj, Pastro Brown, la amiko de Flambeau, unue suprenrigardis kaj ekvidis la blankan sacerdoton de Apolono.

Flambeau jam vidis sufiĉfoje ĉi tiujn ĉiutagajn sunsalutadojn, kaj li tuj rapidis en la enirejon de la alta konstruaĵo, sen sin turni por certigi ĉu lia amiko sekvos. Sed Pastro Brown, aŭ de profesia interesiĝo pri ritoj aŭ de forta individua interesiĝo pri malsagaĵoj, haltis kaj suprenrigardis la balkonon de la sunadoranto, same kiel li haltus por suprenrigardi pulĉinelon. La profeto Kalon jam estis staranta en siaj roboj arĝentblankaj kun la manoj suprenlevitaj, kaj la sono de lia stranga voĉo aŭdiĝis ĉie en la okupata strato, elparolante lian sunlitanion. Ĝian mezon li jam atingis: liaj okuloj fikse rigardis la flamantan diskon. Estas dube ĉu li vidis ion aŭ iun sur ĉi tiu tero; estas tute certe, ke li ne rimarkis duonkreskintan, rondvizaĝan pastron, kiu en la malsupra homamaso palpebrumante rigardis lin. Eble tio estis la plej miriga malsamaĵo inter ĉi tiuj du tre malsamaj

homoj. Pastro Brown ne povis ion rigardi senpalpebrume; sed la sacerdoto de Apolono povis rigardadi eĉ la tagmezajn sunon sen ia ajn palpebra ekstremito.

”Ho, suno,” kriis la profeto. ”Ho, stelo kiu estas tro granda esti inter la steloj. Ho, fontano kiu silente fluadas en tiun sekretejon kiun ni nomas la spacon. Blanka patro de ĉiuj senlacaj kreitaĵoj, helaj flamoj, helaj floroj, kaj helaj montsuproj. Patro, kiu estas pli senkulpa ol iu el ĉiaj plej senkulpaj kaj kvietaj infanoj; prapureco, en kies paco... .”

Ekbruo, kvazaŭ kurega kaj krakega, kiel la bruo de renversita raketo estis trahakata per akra kaj senĉesa ekkriado. Kvin homoj enkuris la pordon de la ĉambraro dum tri elkuris, kaj dum unu sekundo ĉiu surdigis la alian. La sento de iu tute subita teruro ŝajnis dum momento plenigi duonon de la strato je malbona novaĵo... malbona novaĵo, kiu estis des pli malbona ĉar neniu sciis kio estas. Du homoj restis senmove post la tumulto ekbruo; la bela apolona sacerdoto sur la balkono tie supre, kaj sub li la malbela sacerdoto de Kristo.

Fine aperis en la pordo la altkreska figuro kaj titana energio de Flambeau, kaj superregis la amason. Kiel sireno laŭtege parolante li ordonis al iu venigi ĥirurgon, kaj dum li reiris en la malhelan kaj hompleniĝantan enirejon lia amiko Pastro Brown maltrude sekvis lin. Eĉ dum li trapuŝis sin tra la amaso li povis ankoraŭ aŭdi la belegan melodion kaj unutonecon de la sunsacerdoto ankoraŭ alvokanta la feliĉan dion, kiu estas la amiko de fontanoj kaj floroj.

Pastro Brown ektrovis Flambeau kaj seskelkajn aliajn ĉirkaŭstarantaj la enfermitan spacon en kiu kutime la lifto malsuprenvenis. Sed la lifto ne estis veninta. Io alia estis veninta; io kiu devus esti veninta per lifto. Dum la pasintaj kvar minutoj Flambeau estis rigardinta ĝin sternita tere; li vidis la elcerbitan kaj elsangadantan

korpon de tiu bela virino kiu neis la ekzistadon de tragedio. Neni-
am li dubis, ke estas Pauline Stacey; kaj kvankam li venigis kuracis-
ton li ne dubis, ke ŝi jam mortis.

Li ne povis memori certe ĉu li ŝatis ŝin aŭ malŝatis ŝin; estis tiom
por ŝati kaj tiom por malŝati. Sed al li ŝi estis persono, kaj la neto-
lerebla patoso de detaloj kaj kutimo pikvundegis lin per ĉiuj ponar-
detoj de amikperdo. Li memoris ŝian beletan vizaĝon kaj stultajn
paroladojn kun subita, sekreta klareco, kiu estas la mortamareco.
En unu momento, kiel fulmo el la blua ĉielo, kiel fulmo-fajro de
nenie veninta, tiu bela kaj spitema korpo estis deĵetita tra la mal-
fermita liftputo al morto ĉe ĝia fundo. Ĉu estis sinmortigo? Ĉe tia
aroganta optimisto tio ŝajnis nebla. Ĉu estis murdo? Sed kiu estas
en ĉi tiu preskaŭ senloĝanta ĉambraro kiu volus iun murdi? Per
ekfluo da raŭkaj vortoj kiujn li intencis fari fortaj sed kiuj subite
malfortiĝis, li demandis, kie estas tiu viro Kalon. Voĉo, laŭkutime
peza, mallaŭta kaj profundsona certigis al li, ke Kalon forestis dum
la pasintaj dek kvin minutoj tie supre sur sia balkono, adorante sian
dion. Kiam Flambeau ekaŭdis la voĉon kaj sentis la manon de Pas-
tro Brown, li turnis sian nigretan vizaĝon kaj abrupte diris,

”Se li estis supre dum la tuta tempo, kiu do faris tion?”

”Eble,” diris la alia, ”ni povus supreniri kaj eltrovi. Ni havas du-
onhoron antaŭ ol la policianoj agos.”

Lasinte la korpon de la mortigita heredotino, Flambeau supren-
rapidis ĝis la skrubmaŝinejo, tie ektrovis neniun kaj tuj daŭrigis ĝis
sia oficejo. Enirinte ĝin, li tuj iris returne al sia amiko, kun vizaĝo
ŝanĝiĝinta kaj pala.

”Ŝia fratino,” li diris kun neagrable seriozeco, ”ŝia fratino ŝajne
eliris promeni.”

Pastro Brown kapjesis. ”Aŭ povas esti, ke ŝi supreniris al la ofi-
cejo de tiu sunulo,” li diris. ”Se mi estus vi, mi certiĝus pri tio, kaj

poste ni priparolu la tutan aferon en via oficejo. Ne,” li aldonis subite, kvazaŭ li memoris ion, ”ĉu mi iam venkos mian stultecon? Kompreneble, en ilia oficejo malsupre.”

Flambeau rigardis: tamen li sekvis la malgrandan pastron malsupren ĝis la malplena ĉambraro de la Stacey’oj, kie tiu nepenetrebla pastro prenis grandan ruĝlede remburlitan seĝon kaj sidiĝis en la enirejo, de kie li povis vidi la ŝtuparon kaj plataĵojn... kaj atendis. Sed li ne tre longe atendis. Ĉirkaŭ kvar minutoj poste tri homoj malsuprenvenis la ŝtuparon, similaj nur pro ilia soleneco. La unua estis Joan Stacey, fratino de la mortintino... videble ŝi estis supre en la portempa templo de Apolono; la dua estis la sacerdoto de Apolono mem, sian litanion fininte majeste malsupreniranta la larĝan ŝtuparon en tuta grandiozeco... iel, pro siaj blankaj roboj, barbo kaj dividita hararo, li aspektis kiel Kristo elirante la Pretorejon en la pentraĵo de Doré; la tria estis Flambeau kun brovoj malhelaj kaj iomete konfuzite.

Fraŭlino Joan Stacey, nigreta, la vizaĝo malgrasa kaj la hararo trofrue griziĝinta, rekte marŝis al sia skribtablo kaj ordigis siajn paperojn kun agemeca gesto. Ĉi tiu nura ekfaro tuj recerbsanigis ĉiun. Se fraŭlino Joan Stacey estis krimulino ŝi estis aplomba krimulino. Pastro Brown rigardis ŝin dum iom da tempo kun strangeta rideto kaj poste ankoraŭ rigardante ŝin alparolis alian.

”Profeto,” li diris ŝajne alparolante al Kalon, ”mi volas, ke vi diru al mi multon pri via religio.”

”Fierigas min tion fari,” diris Kalon klinante sian ankoraŭ kronitan kapon, ”sed mi ne estas certa, ĉu vi komprenos.”

”Nu, estas ĉi tiel,” diris Pastro Brown en sia nekaŝema dubplena maniero: ”Oni instruas nin, ke se homo havas malbonajn fundamentajn principojn, la kulpo pri tio devas esti parte al li mem. Tamen, malgraŭ tio, ni povas iome diferencigi homon, kiu insultas

sian tute klaran konskiencon, de homo kiu havas konskiencon pli aŭ malpli per sofismo malklarigitan. Nu, ĉu vi vere kredas, ke murdi iun estas iel kulpe?”

”Ĉu tio estas akuzajo?” demandis Kalon tre trankvile.

”Ne,” respondis Pastro Brown egale trankvile kiel li, ”estas parolado por la akuzito,”

En la longa kaj ektimiga silento de la ĉambro leviĝis malrapide la apolona profeto; kaj vere estis kvazaŭ la suno leviĝis. Li plenigis la ĉambron per sia lumo kaj vivo tiel, ke oni sentis, ke li egale facile povus plenigi la ebenaĵon ĉirkaŭ Salisbury. Lia robita figuro ŝajne drapiris la tutan ĉambron per klasikaj vestaĵoj; lia epopea gesto ŝajne etendigis ĝin al pli grandiozaj perspektivoj, ĝis la malgranda nigra figuro de la moderna pastro ŝajnis esti difekto kaj entrudaĵo, ronda nigra makulo sur la Helasa brileco.

”Ho, Kajafaso, fine ni renkontiĝas,” diris la profeto. ”Via eklezio kaj la mia estas la solaj realaĵoj sur ĉi tiu tero. Mi adoras la sunon, kaj vi la malheliĝon de la suno; vi estas la pastro de la mortanta, mi de la vivanta Dio. Via nuna suspekta kaj kalumnia laboro estas inda je via uniformo kaj kredo. Via tuta eklezio estas nenio, krom nigra polico; vi estas nur detektivoj kaj spionoj, provantaj deŝiri de homoj kulpkonfesojn, aŭ per perfido aŭ per torturo. Vi konvinkas homojn de krimoj, mi volus konvinki ilin de senkulpeco. Vi konvinkas ilin de malvirteco, mi volus konvinki ilin de virteco.

”Leganto de la libroj de malboneco, ankoraŭ unu vorto antaŭ ol mi por ĉiam forblovos viajn senbazajn inkubojn. Ne eĉ malklare, vi povus kompreni kiom malmulte mi ĝenas min pri tio, ĉu vi povos kondamni min aŭ ne. Tiuj aĵoj, kiujn vi nomas hontiĝo kaj terura pendigo, ne estas al mi pli teruraj, ol la monstro el infana ludlibro estas al plenkreskulo. Vi diris, ke vi parolas pro la akuzito. Tiom malmulte mi estimas ĉi tiun nebullandan vivon, ke mi aldonas la

prosekutparoladon kontraŭ la akuzito. Estas nur unu ero el ĉi tiu afero, kiu estas asertbla kontraŭ mi, kaj tion mi mem diros. Ŝi kiu mortis estis mia amantino kaj mia edzino, ne kiel viaj ladaĵ preĝetoj nomas kiel laŭleĝa, sed laŭ pli pura kaj pli severa leĝo ol vi iam ekkomprenos. Ŝi kaj mi kunmarŝis en malsama mondo ol la via, kaj ni trairis kristalajn palacojn dum vi laboriradis tra brikaĵ tuneloj kaj koridoroj. Nu, mi scias, ke policanoj, teologiaj kaj aliaj, konstante opinias, ke kie estas estinta amo, baldaŭ nepre ekvenos malamo; do, vi jam aŭdis la unuan prosekuteron. Tamen la dua estas pli grava; mi ne kondutos min ŝpare. Estas vere, ne nur ke Pauline amis min, sed ankaŭ estas vere, ke hodiaŭ... hodiaŭ matene, antaŭ ol ŝi mortis, skribis ŝi ĉe tiu tablo testamenton, laŭ kiu, mi kaj mia nova eklezio ricevos duonmilionon da funtoj. Venu, kie estas la katenoj? Ĉu vi opinias, ke ĝenas min, kiujn malsaĝaĵojn vi faros pri mi? Punservuto ŝajnos al mi nur kvazaŭ mi atendus ŝin sur laŭvoja stacio. Per eŝafodo mi iros al ŝi kiel per rapidega ĉaro.”

Li parolis kun la cerbskuiga aŭtoritato de oratoro, kaj Flambeau kaj Joan Stacey rigardis lin kun mirega admiro. La vizaĝo de Pastro Brown ŝajnis esprimi nenion krom ekstrema afliktiĝo. Li planken rigardadis, unu dolorplena sulketo sur la frunto. La sunprofeto facile apogis sin al la kameno kaj daŭrigis:

”Per malmultaj vortoj mi prezentis al vi la tutan cirkonstancaron, efektive la solan cirkonstancaron, kontraŭ mi. Per ankoraŭ pli malmultaj vortoj mi tute forblovos ĝin, tiel ke eĉ unu postsigneto ne restos. Ĉu mi faris ĉi tiun krimon? Pauline Stacey defalis de ĉi tiu etaĝo je kvin minutoj post tagmezo. Cent homoj atestos en juĝejo, ke mi elstaris sur la balkono de miaj propraj ĉambroj iom antaŭ la tagmeza eksonaro, kaj dum la posta kvaronhoro... la kutiman periodon de mia publika preĝado. Mia skribisto (respektinda junulo de Clapham, neniel kunligita al miaj aferoj) ĵurus, ke li sidis en mia

ekstera oficejo dum la tuta mateno, kaj ke nenia komunikaĵo trapasis. Li ĵurus, ke mi alvenis dek minutojn antaŭ la dekdua... dek minutojn antaŭ ol eĉ flustro pri la tragedio... kaj, ke mi ne forestis la oficejon aŭ la balkonon dum la tuta tempo. Neniu iam havis tian kompletan alibion. Mi povus ĉeestordoni duonon de la Westminsteranoj atesti tion pri mi. Mi kredas, ke vi devas remeti la kateĵojn.”

”Tamen, finfine por ke restu nenia postsigno de ĉi tiu stulta suspekto, mi diros al vi ĉion, kion vi volas scii. Mi kredas, ke mi ja scias kiel mia malfeliĉa amikino renkontis sian morton. Vi povos, se vi tiel volus, kulpigi min pri tio, aŭ almenaŭ mian fidon kaj filozofion; sed vi certe ne povus malliberigi min. Estas bone konate inter ĉiuj lernantoj de la pli altaj veraĵoj, ke laŭ historio iuj adeptoj kaj iluminati atingis la eblecon de leviĝo, tio estas, de sin levi sensubtenaĵe, spite de gravito. Tio estas nur ero el tiu ĝenerala venkado de materio, kiu estas la ĉefaĵo de nia okulta saĝeco. Kompatinda Pauline estis impulsema kaj ambicia. Verdire, mi opinias, ke ŝi kredis, ke ŝi estas pli lerta en la misteroj ol ŝi fakte estis; kaj ŝi ofte diris al mi, dum ni kune en la lifto malsupreniris, ke, se oni havus sufiĉe fortan volon, oni povus malsuprenŝvebi kiel plumo sendanĝere. Mi solene kredas, ke en ia ekstazo de noblaj pensoj, ŝi provis efektivigi la miraklon. Ŝia volo aŭ fido forlasis ŝin en la krizmomento, kaj la pli malalta materia leĝo terure venĝis sin sur ŝi. Tio, sinjoroj, estas la tuto, tre malĝoja, kaj via opinie tre aroganta kaj peka, sed certe ne estas krima, aŭ iel rilatas al mi. Laŭ la stenografmaniero de la policaj juĝejoj oni devas nomi ĝin sinmortigo. Mi mem ĉiam rigardos ĝin kiel heroa malsukcesaĵo en la scienca antaŭenmarŝado, kaj la malrapida suprenrampado al la ĉielo.”

Por la unua fojo Flambeau vidis Pastron Brown venkita. Li ankoraŭ sidis rigardante teren kvazaŭ hontigita, kun la brovo dolor-

plena kaj sulkigita. Estis neeble eviti la sentojn, kiujn la flugilaj vortoj de la profeto ventumis, ke jen malbonhumora, laŭprofesia homsuspektanto, venkita per pli fiera kaj pli pura spirito de natura hibereco kaj sano. Fine li ekdiris, palpebrumante, kvazaŭ korpe afliktita: "Nu, sinjoro, se estas tiel, vi devas nenion fari, krom preni la testamentan paperon, pri kiu vi parolis, kaj foriri. Mi scivolus kie la kompatinda fraŭlino lasis ĝin."

"Ĝi estas tie, sur ŝia skribtablo, apud la pordo, mi kredas," diris Kalon, kun tiu fortika senkulpa maniero, kiu ŝajne tute malkondamnis lin. "Ŝi diris al mi, ke ŝi nepre skribos ĝin hodiaŭ matene, kaj fakte mi vidis ŝin, ĝin skribanta dum mi supreniris al mia ĉambro en la lifto."

"Ĉu tiam ŝia pordo estis malfermita," demandis la pastro, rigardante angulon de la mato.

"Jes," diris Kalon trankvile.

"Ha, de tiam, ĝi ĉiam estis malfermita," respondis la alia kaj daŭrigis sian silentan studadon de la mato.

"Estas papero ĉi tie," diris la timiga fraŭlino Joan, per iomete strangtona voĉo. Ŝi estis transirinta al la skribtablo de sia fratino kaj mantenis grandan paĝon de blua papero. Ŝi estis maldoĉe ridetanta je maniero netaŭga al tia sceno aŭ okazaĵo, kaj Flambeau rigardis ŝin kun malheliĝanta brovo.

La profeto Kalon deturnis sin de la papero, kun tiu reĝa nekonscieco kiu dum la tuta tempo subtenis lin. Sed Flambeau prenis ĝin el la fraŭlina mano kaj tralegis ĝin kun pleja mirego. Ĝi ja komencis laŭ la kutima testamenta maniero, sed post la vortoj "Mi donas kaj testamentas ĉion, kion mi je morto posedos" la skribo abrupte finiĝis, poste estis nun grataĵoj kaj nenia signo de heredonta nomo. Miregante, Flambeau transdonis ĉi tiun tratanĉitan testamenton al

sia pastra amiko, kiu ekrigardis ĝin kaj silente donis ĝin al la sunsacerdoto.

Sekundon poste tiu pontifiko, portanta siajn grandiozajn vestaĵojn, transiris la ĉambron per du grandegaj paŝoj kaj kiel turo superstaris Joan, liaj bluaj okuloj elstarantaj de la kapo.

”Kiajn firuzojn vi faris?” li ekkriis. ”Ĉi tiu ne estas ĉio, kion Pauline skribis.”

Ili miregis kiam ili aŭdis lin parolanta per tute nova voĉo kiu enhavis iun usonan akrecon; lia pompeca kaj bonstila angla parolmaniero estis tute defalinta de li kiel mantelo.

”Krome estas nenio sur la skribtablo,” diris Joan, kaj kontraŭstaris lin, malbone ridetante.

Subite li ekparolis blafeme en katarakto da nekredemaj vortoj. Ili ŝoka estis en la defalo de lia masko, estis kvazaŭ oni vidas homon kies vera vizaĝo defalas.

”Rigardu ĉi tion,” li kriis usonstile, kiam li de blafemado senspiriĝis, ”eble mi estas aventuristo, sed mi divenas, ke vi estas murdistino. Jes, sinjoroj, ĉi tie vi havas la kialon de la morto, kaj sen ia ajn levigo. La kompatinda knabino skribas testamenton, favoran al mi, kaj ŝia malbenita fratino venas, batalas por ekteni la plumon, tiras ŝin al la liftputo kaj deĵetas ŝin antaŭ ol ŝi povas fini ĝin. Je diablo! Ŝajnas, ke post ĉio ni bezonas katenojn.”

”Kiel vi vere diras,” respondis Joan, kun malbela trankvileco, ”via skribisto estas tre respektinda junulo, kiu scias kia estas ĵuro; kaj li ĵurus en ĉiu ĵuĝejo ajn, ke mi estis supre en via oficejo pritaktanta ian skribaĵon de kvin minutoj antaŭ mia fratino defalis, ĝis kvin minutoj poste. Sinjoro Flambeau diros al vi, ke li trovis min tie.”

Estis silento.

”Do,” kriis Flambeau, ”Pauline estis sola, kiam ŝi defalis, kaj temas pri sinmortigo.”

”Ŝi estis sola kiam ŝi falis,” diris Pastro Brown, ”sed tio ne estis sinmortigo.”

”Kiel do ŝi mortis?” Flambean demandis senpacience.

”Oni murdis ŝin.”

”Sed ŝi estis tute sola,” malkonsentis la detektivo.

”Oni murdis ŝin kiam ŝi estis tute sola,” respondis la pastro.

La aliaj ĉiuj rigardis lin, sed li restis kiel antaŭe, sidanta malkuraĝigata kun sulko sur la ronda brovo kaj kun ŝajno de nepersona honto kaj malĝojo; lia voĉo estis malemfaza kaj malfeliĉa.

”Mi volas scii,” Kalon kriis kun blafemo, ”kiam la policanoj alvenos por forpreni ĉi tiun sangan kaj malvirtan fratinon. Ŝi mortigis sian propran karnon kaj sangon; ŝi forrabis de mi duonmilionon, kiu estis tiel sankte la mia, kiel...”

”Nu, nu, profeto,” interĵetis Flambeau, kun ia rikano, ”rememoru, ke ĉi tiu tero estas nur nebullando.”

La sacerdoto de la suno klopodis regrimpi sur sian piedestalon.

”Ne estas nur la mono,” li kriis, ”kvankam tiu sufiĉus starigi la movadon tra la tuta mondo. Estas ankaŭ la volo de mia amantino. Al Pauline ĉio el ĉi tio estis sankta. En la okuloj de Pauline... .”

Subite Pastro Brown rekte ekstaris, tiel, ke lia seĝo falis teren malantaŭ li. Li estis mortpala, tamen liaj okuloj brilegis.

”Tio ĝi estas,” li ekkriis per klara voĉo. ”Tiel vi devas komenci. En la okuloj de Pauline... .”

La alta profeto malantaŭenkuris de la malgranda pastro en preskaŭ freneza konfuziĝo. ”Kion signifas? Kiel vi kuraĝas?” li kriadis.

”En la okuloj de Pauline,” rediris Pastro Brown, la liaj ankoraŭ pli brilegantaj. ”Daŭrigu... je l’ dia nomo... daŭrigu. La plej abomena krimo, kiun diabloj iam instigis, post konfeso malpeziĝas; kaj mi petegas ke vi konfesu. Darŭigu, daŭrigu... En la okuloj de Pauline.”

”Liberigu min, vi diablo,” tondris Kalon luktante kiel giganto en katenoj.

”Ĉu mi kaptu lin?” demandis Flambeau, saltinte al la elirejo, ĉar Kalon estis jam malferminta la pordon.

”Ne, lasu lin preterpasi,” diris Pastro Brown kun stranga profunda ekĝemo, kiu ŝajne devenis el la profundejoj de la universo, ”lasu Kain preterpasi, ĉar li apartenas al Dio,”

Ekfalis longa silento en la ĉambro post lia eliro. Tio estis al la malkvietema animo de Flambeau longega dolorego pridemanda. Fraŭlino Joan Stacey treege trankvile ordigis la paperojn sur sia tablo.

”Patro,” fine diris Flambeau, ”estas mia devo, ne nur mia scivolemeco—estas mia devo, se eble, elserĉi, kiu faris la krimon.”

”Kiun krimon?” demandis Pastro Brown.

”Kompreneble tiun, kiun ni pritraktas,” respondis lia senpacienca amiko.

”Ni pritraktas du krimojn,” diris Brown, ”krimoj de tute malsama graveco—kaj krimoj faritaj de tute malsamaj krimuloj.”

Fraŭlino Joan Stacey, kiu jam kolektis kaj enmetis siajn paperojn en la tirkeston, ŝlōsis ĝin. Pastro Brown daŭrigis, rimankante ŝin tiom malmulte kiom ŝi rimarkis lin.

”La du krimojn,” li diris, ”oni faris pro la sama malforteco de la sama persono, dum luktado akiri ŝian monon. La farinto de la pli grava krimo trovis, ke la pli malgrava krimo malhelpas lin; la farinto de la malgrava krimo akiris la monon.”

”Ho, ne daŭrigu kiel preleganto,” ĝemis Flambeau, ”parolu per malmultaj vortoj.”

”Mi povas elparoli ĝin per unu vorto,” respondis lia amiko.

Fraŭlino Joan Stacey, rigardante sin en speguleto kun nigra sulgigo, surmetis kaj fiksas per pinglo sian nigran oficejtaŭgan ĉapelon;

kaj dum la interparolado daŭris, prenis sian mansaketon kaj ombrelon je ne rapidigita maniero, kaj eliris la ĉambron.

”La vero estas en unu vorto; kaj en unu mallonga vorto,” diris Pastro Brown. ”Pauline Stacey estis blinda.”

”Blinda!” ripetis Flambeau, kaj leviĝis malrapide ĝis sia pleja alteco.

”Blindeco estis en la sango de ŝia familio,” Brown daŭrigis. ”Ŝia fratino estus elportinta okulvitrojn se Pauline estus permesinta tion al ŝi; sed estis ŝia aparta filozofio aŭ kaprico, ke oni devas ne helpi tiajn malsanojn per sincedo al ili. Ŝi ne volis konfesi, ke la nubo ekzistas; aŭ ŝi volis disigi ĝin per volforteco. Tiel ŝiaj okuloj pli malsaniĝadis pro longa penado vidi; tamen la plej malbona penado estis venonta. Ĝi alvenis kun la kara profetulo, aŭ kiel ajn li sin nomas, kiu instruis al ŝi rigardadi la flamantan sunon nudokule. Li nomis tion ‘akcepti Apolonon’. Ha! se ĉi tiuj novaj idolservantoj nun fariĝus kiel la antikvaj idolservantoj, ili estus iom pli saĝaj. La antikvaj idolanoj sciis, ke nura nuda naturadorado nepre havos sian kruelan flankon. Ili sciis, ke la okulo de Apolono povas velkigi kaj blindigi.”

Estis paŭzo kaj la pastro daŭrigis per milda kaj eĉ tremanta voĉo. ”Ĉu tiu diablo intence blindigis ŝin aŭ ne, estas nenia dubo pri tio, ke li intence mortigis ŝin pere de ŝia blindeco. La nura simpleco de la krimo estas naŭziga. Vi scias, ke li kaj ŝi supren kaj malsupreniradis per tiuj liftoj sen oficiala helpo; vi ankaŭ scias kiel facile kaj senbrue la liftoj glitas. Kalon irigis la lifton ĝis ŝia plataĵo kaj tra la malfermita pordo, vidis ŝin skribantan en sia malrapida, senvidanta maniero, la testamenton, kiun ŝi promesis doni al li. Li ĝoje alvokis ŝin, dirante, ke li alvenigis la lifton por ŝi, kaj ke ŝi eliru kiam ŝi estos preta. Tiam li enpremis la elektran butonon kaj suprenglitis senbrue ĝis sia propra etaĝo, trapaŝis sian oficejon kaj sendanĝere

estis preĝanta antaŭ la homplena strato kiam la kompatinda knabino, sian laboron fininte, goje elkuris kien amanto kaj lifto estas pretaj akcepti ŝin, kaj antaŭenpaŝis—

”Ĉesu!” ekkriis Flambeau.

”Li akirus duonmilionon da funtoj per la enpremo de tiu butono,” daŭrigis la malgranda pastro, kun tiu senkolora voĉo, per kiu li preparolis tiajn teruraĵojn. ”Tamen tiu fuŝis—fuŝis ĉar estis alia persono kiu ankaŭ sciis pri la blindeco de kompatinda Pauline. Pri tio estis io, kion mi kredas, neniu rimarkis; kvankam la testamento estis nefinita kaj sen subskribo, la alia fraŭlino Stacey kaj iu servistino ŝia jam subskribis ĝin kiel atestantoj. Joan unue subskribis, dirante kun tipa virina malestimo al laŭleĝeco, ke Pauline povas fini ĝin poste. Tiel, Joan volis, ke ŝia fratino subskribu la testamenton sen veraj atestantoj. Kial? Mi pripensis la blindecon kaj ŝajnis al mi kiel certe, ke ŝi deziris, ke Pauline subskribu ĝin en soleco, ĉar ŝi deziris, ke Pauline tute ne subskribu ĝin.

”Homoj kiel la Stacey’oj ĉiam uzas fontplumojn; sed estis aparte nature al Pauline tiel fari. Per kutimo kaj pro ŝia forta volo kaj memoro ŝi povis tiel bone skribi kvazaŭ ŝi vidus; tamen ŝi ne povis scii kiam la plumo bezonas esti trempata en la inkujon. Tial ŝia fratino zorge plenigis ŝiajn fontplumojn, krom ĉi tiun fontplumon; ĉi tiun la fratino zorge ne plenigis; la restaĵo de la inko sufiĉis skribi kelkajn liniojn kaj poste tute ĉesis. Kaj la profeto perdis kvin cent mil funtojn, kaj sen avantaĝo faris unu el la plej lertaj kaj kruelaj murdoj, kiuj iam okazis.”

Flambeau iris al la malfermita pordo kaj aŭdis la oficialajn policanojn suprenvenantajn la ŝtuparon. Li sin turnis kaj diris: ”Vi ja devis diable atente sekvi ĉion por kulpigi Kalon dum nur dek minutoj.”

Pastro Brown ekstremetis.

”Ho! lin,” li diris, ”Ne, mi devis atente pripensi por eltrovi la aferon de Fraŭlino Joan kaj la fontplumo. Tamen mi jam sciis, ke Kalon estas la krimulo antaŭ ol mi eĉ eniris la konstruaĵon.”

”Vi ja ŝercas!” ekkriis Flambeau.

”Tute ne,” respondis la pastro. ”Mi asertas, ke mi sciis, ke li faris ĝin antaŭ ol mi eĉ sciis kion li faris.”

”Sed kiel?”

”Ĉi tiuj paganaj stoikuloj,” pripense diris Pastro Brown, ”ĉiam malsukcesas pro sia forteco. Ekvenis krakego kaj ekkrio en la straton kaj la apolona pastro ne ekstremis nek ĉirkaŭenrigardis. Mi ne sciis kio ĝi estis. Tamen mi sciis, ke li atendis ĝin.”

LA SIGNO DE LA ROMPITA GLAVO

La mil brakoj de la arbaro estis grizaj kaj ĝiaj milionoj da fingroj estis arĝentaj. En ĉielo malhela kaj verdblua kiel ardezo la steloj malvarmige briladis kiel frakasita glacio. La tuto de tiu dense arb-kovrita kaj preskaŭ senhoma kamparo estis rigida pro fortega kaj fendanta frosto. La nigraj kavaĵoj inter la arbtrunkoj aspektis kiel nekalkulebla malvarmeco. La kvadrata ŝtona turo de la preĝejo aspektis norda eĉ ĝis paganeco, kvazaŭ ĝi estus barbara turo inter la marrokoj de Islando. Estis stranga speco de nokto por esplori preĝejan korton. Tamen aliflanke, eble ĝi estis esplorinda.

Ĝi abrupte leviĝis el la cindraĵoj dezertejoj de la arbaro kiel ia ĝibo aŭ ŝultro el verda razeno kiu aspektis grize en la lunlumo. La tomboj plejmulte kliniĝis sur la flanko de la monteto kaj la vojeto, kiu alkondukis al la preĝejo, estis tiel kruta kiel ŝtuparo. Sur la supraĵo de la monteto, elstarante sur la sola ebenaĵo, staris la monumento pro kiu la loko estis famkonata. Ĝi strange kontrastis kontraŭ la sentrajtaj tomboj cirkaŭe, ĉar ĝi estis la faraĵo de unu el la plej grandaj skulptistoj el moderna Eŭropo; sed ties renomo tuj forgesiĝis pro la renomo de la viro kies figuraĵon li estis farinta. Tuŝata de la arĝentaj radietoj de stellumo montriĝis la pezega metala figuro de kuŝanta militisto, kies fortaj manoj estis kunpremitaj en senĉesa adorado, kies granda kapo kuŝis sur pafilego. Tiu grandaĝa vizaĝo portis barbon aŭ pli ĝuste vangharojn laŭ la malnova serioza modo. La uniformo, kvankam esprimita per la malmultaj linioj de simpleco, estis la uniformo de moderna militado. Ĉe ties dekstra flanko kuŝis glavo kies pinto estis forrompita; maldekstre kuŝis Biblio. So-

mere, dum la brilaj posttagmezoj, alvenis tien veturiloj plenaj je usonanoj kaj kulturitaj antaŭurbanoj por vidi la tombon; sed ĉe tiam ili sentis, ke la vasta arbarloko kun ĝia sola ĝiba kupolo el preĝejo kaj preĝeja korto estas loko strange muta kaj forlasita. En ĉi tiu frosta mallumo de mezvintro oni kredus, ke li estus lasita sola kun la steloj. Tamen en la silento de tiuj rigidaj arbaroj kradpordo knaris, kaj du malklaraj figuroj nigre vestitaj suprengrimpis la vojeton al la tombo.

Tiel malforta estis tiu glacia stellumo, ke oni neniel povus vidi, kiaj viroj ili estas, escepte ke kvankam ili ambaŭ estas nigre vestitaj, unu estas treege granda kaj la alia (eble de kontrasto) preskaŭ mirige malgranda. Ili supreniris al la granda tombo de la historia militisto kaj staris dum kelkaj minutoj ĝin rigardegante. Ekzistis nenia homa, eble nenia vivanta kreitaĵo en larĝa cirklo ĉirkaŭ ili; kaj malsana imago kredeble scivolus ĉu ili mem estas homaj. Al ĉiu ajn la komenco de ilia interparolado aŭdiĝus strange. Post la unua silento la mallonga viro diris al la alia;

”Kie saĝulo kaŝas ŝtoneton?”

Kaj la alta viro respondis mallaŭte. ”Sur la marbordo.”

La malalta viro kapjesis kaj post kelksekunda silento diris: ”Kie saĝulo kaŝas folion?”

Kaj la alia respondis, ”En la arbaro.”

Silentis ankoraŭ unufoje kaj tiam la altulo daŭrigis, ”Ĉu vi volas diri, ke kiam saĝulo devas kaŝi diamanton okazis, ke li kaŝis ĝin inter falsaj diamantoj?”

”Ne, ne,” diris la malalta homo ridante, ”ni forgesu forpasintajn aferojn.”

Li frapis la teron per siaj malvarmaj piedoj unu du momentojn kaj tiam diris, ”Mi tute ne pripensas tion sed ion alian; ion iomete strangan. Ekbruligu do alumeton, mi petas.”

La granda viro fuŝpalpadis en sia poŝo, kaj baldaŭ gratado kaj ekflamo origis la tutan glatan flankon de la monumento. Nigre enĉizitaj sur ĝi estis la bone konataj vortoj, kiujn tiom multe da usanoj respektige legis, "SANKTA al la Ĉiama Memoro de Generalo Sir Arthur St. Clare, Heroo kaj Martiro kiu Ĉiam Venkobatis Siajn Malamikojn kaj Ĉiam Indulgis Ilin kaj estis Fine de Ili Perfideme Mortigita. La Eternulo al Kiu li Fidis kaj Rekompencu kaj Venĝu lin."

La alumeto brulvundis la fingrojn de la altulo, nigriĝis, kaj defalis. Li estis ekbruligonta alian, sed lia malalta kunulo haltigis lin. "Tio ne necesas, Flambeau, amiko mia, mi vidis kion mi volis. Aŭ pli ĝuste mi ne vidis, kion mi ne volis vidi. Kaj nun ni devas marŝi du kilometrojn laŭ la vojo al la plej proksima gastejo, kaj mi provos rakonti al vi ĉion pri tio. Ĉar Dio scias, ke oni bezonas bieron kaj fajron kiam oni kuraĝas rakonti tian historion."

Ili malsupreniris la krutan vojeton, ili klinkis denove la rustitan kradpordon, kaj foriris kun frapantaj sonoraj paŝoj laŭ la glacia arbara vojo. Ili jam iris kvarcent metrojn antaŭ ol la pli malgranda viro denove parolis. Li diris, "Jes; saĝulo kaŝas ŝtoneton sur la marbordo. Sed kion li faras se marbordo ne ekzistas? Ĉu vi ion scias pri la granda afero St. Clare?"

"Nenion mi scias pri anglaj generaloj, Pastro Brown," respondis la altulo ridante, "tamen iomete pri anglaj policanoj. Mi nur scias, ke vi irigis min multajn kilometrojn al ĉiuj ties sanktejoj, kiu ajn li estu. Oni kredus, ke li estas enterigita en ses malsamaj lokoj. Mi vidis memoroĵon al Generalo St. Clare en Westminster Abatejo. Mi vidis surĉevalan statuon de General St. Clare sur la Tamizbordo. Mi vidis medalionon de General St. Clare en la strato kie li naskiĝis, kaj alian en la strato kie li loĝis; kaj nun vi irigas min nokte al lia ĉerko en vilaĝa preĝeja korto. Lia grandioza personeco fariĝas al mi

iomete teda, precipe ĉar mi tute ne scias kiu li estis. Kion vi elserĉas en ĉi tiuj kriptoj kaj figuraĵoj?”

”Mi serĉas nur unu vorton,” diris Pastro Brown. ”Vorton, kiu ne estas trovebla.”

”Nu,” demandis Flambeau, ”ĉu vi intencas rakonti ion pri tio al mi?”

”Mi devas disigi ĝin en du partojn,” respondis la pastro. ”Unue tio, kion ĉiu scias; kaj poste tio, kion mi scias. Tio do, kion ĉiu scias estas mallonga kaj sufiĉe klara. Ĝi estas ankaŭ tute malprava.”

”Bone,” diris gaje la altulo nomita Flambeau. ”Ni komencu kun la malĝusta parto. Ni komencu ĉe tio, kion ĉiu scias, kio ne estas vera.”

”Se tio ne estas mensoga ĝi estas almenaŭ tre nesufiĉa,” daŭrigis Brown; ”ĉar fakte la publiko scias nur tion ĉi; la publiko scias, ke Arthur St. Clare estis eminenta kaj sukcesa angla generalo. Ĝi scias, ke post glorplenaj tamen zorgaj kampanjoj kaj en Hindujo kaj en Afriko, li estris la kampanjon kontraŭ Brazilo kiam la fama brazila patrioto Olivier eldonis sian ultimaton. Ĝi scias, ke tiuokaze St. Clare, kun tre malgranda militistaro atakas Olivieron, kiu havis multajn virojn, kaj post heroa kontraŭstaro estis kaptita. Kaj ĝi ankaŭ scias, ke post ol li estis kaptita oni trovis St. Clare pendanta de la plej proksima arbo, okazaĵo kiu ŝokis la tutan civilizitan mondon. Li estis trovita tie pendolante kun sia disrompita glavo ĉirkaŭ la kolo, post la reiro de la brazilanoj.”

”Kaj tiu popola hystoria estas malvera,” sugestis Flambeau.

”Ne,” diris lia amiko kviete, ”kiom oni scias estas tute vera; ĝi ne estas tamen la tuta vero.”

”Mi opinias, ke tiom sufiĉas,” diris Flambeau; ”tamen se la popola rakonto estas vera, kie la mistero?”

Ili estis jam pasintaj multajn centojn da grizaj kaj fantomaj ar-

baj antaŭ ol la malalta pastro respondis. Tiam li mordetadis pripen-
se la fingrojn kaj diris: "La mistero do estas psikologia mistero, aŭ
pli ĝuste ĝi estas la mistero de du psikologiaj. En tiu brazila afero
du el la plej eminentaj viroj el moderna historio agis tute kontraŭe
al siaj karakteroj. Ne forgesu, ke Olivier kaj St. Clare estis herooj—
la malnova speco sendube; estis kiel la batalo inter Hektoro kaj
Aĥilo. Kiel do vi opinius pri afero en kiu Aĥilo estas timema kaj
Hektoro perfidema?"

"Daŭrigu," diris la altulo senpacience dum la alia ankoraŭ unu-
foje mordetis la fingrojn.

Sir Arthur St. Clare estis militisto de la malmoderna religia spe-
co—la speco kiu savis nin dum la Hinda Ribelo," daŭrigis Brown.
"Li ĉiam taksis devon pli alte ol paradon; kaj malgraŭ sia persona
kuraĝo li estis tre zorgema komandanto kaj indignis pro ajna nene-
cesa malŝparo de soldatoj. Tamen dum tiu ĉi lasta batalo li provis
ion, kio montriĝus absurda eĉ al infano. Ne necesas esti strategi-
isto por konstati, ke tio estus frenezeco; tiel same kiel por eviti ko-
lizion kun omnibuso ne necesas esti strategiisto. Jen do unu miste-
ro; kia fariĝis la kapo de angla generalo? La dua enigmo estas, kia
fariĝis la koro de la brazila generalo? Prezidanton Olivier oni povus
nomi aŭ viziemulo aŭ ĝenaĵo; tamen eĉ la malamikoj konfesis, ke
li estas grandanima eĉ ĝis mezepoka kavalireco. Preskaŭ duonon el
la kaptitoj kiujn li iam kaptis, li liberigis aŭ eĉ ŝarĝis de bonaĵoj.
Homoj kiuj faris kontraŭ li malbonagojn foriris kortuŝite de lia sim-
pleco kaj bonkoreco. Je infero, kial li tiel diable sin venĝus nur unu
fojon dum sia tuta vivo, kaj tiam pro la sola aparta bato, kiu tute ne
povus vundi lin? Nu, jen la enigmo. Unu el la plej saĝaj homoj el la
mondo agis kiel idioto pro neniu kialo. Unu el la plej bonaj homoj
el la mondo agis kiel diablo pro neniu kialo. Jen ĉio; vi mem elpensu
tion, amiko mia."

”Ne, ne,” diris la alia kun spirekblovo. ”Vi daŭrigu kaj vi nepre rakontu ĉion al mi.”

”Nu,” daŭrigis Pastro Brown, ”Diri, ke la popola ideo estas ĝuste tia kian mi rakontis, ne estas honeste sen la aldono de kelkaj aferoj kiuj poste okazis. Mi ne povas aserti, ke ili iel ĵetas novan lumon sur la aferon, ĉar neniu povas kompreni ilin. Ili tamen ĵetis novan specon de mallumo; ili etendas la mallumon en aliaj direktoj. Unue estis ĉi tio. Fariĝis kverelo inter la familia kuracisto de la St. Clare’oj kaj la familio, kaj li komencis eldoni skandalajn artikolojn en kiuj li asertis, ke la ĵus mortinta generalo estis religia frenezulo; tamen de la rakonto mem ŝajnas, ke tio ne multe signifas pli ol, ke li estis religiema viro. La onidiroj tamen formortis. Kompreneble ĉiu sciis, ke St. Clare montris kelkajn el la strangaĵoj de puritana pieco. La dua okazintaĵo estis multe pli atentiga. En la malbonŝanca kaj ne subtenita regimento, kiu faris tiun malprudentan provon ĉe la Nigra Rivero, estis iu Kapitano Keith, kiu tiutempe estis fianĉo de la filino de St. Clare, kaj kiu poste fariĝis ŝia edzo. Li estis unu el la kaptitoj de Olivier kaj ŝajnas, ke li, tiel same kiel la aliaj, ĉiuj escepte de la Generalo, estis bonege traktata kaj senprokraste liberigata. Ĉirkaŭ dudek jaroj poste, ĉi tiu viro, tiam Leŭtenant-Kolonelo Keith, eldonis mallongan aŭtobiografion sub la titolo, ‘Brita Oficiro en Birmo kaj Brazilo.’ Kie la leganto atente serĉas ian priskribon pri la mistero de la ruiniĝo de St. Clare, troviĝas ĉi tiuj vortoj. ‘Ĉie en ĉi tiu libro krom tie ĉi, mi priskribis aferojn ĝuste kiel ili okazis, subtenante la malmmodernan opinion, ke la gloro de Anglujo estas sufiĉe aĝa por defendi sin mem. Mi nur faros escepton de tiu regulo rilate al la afero de la venkobato apud la Nigra Rivero; kaj miaj kialoj kvankam privataj tamen estas honestaj kaj devigantaj. Mi aldonos tamen pro justeco al la memoro de du eminentaj viroj tion ĉi. Generalon St. Clare oni akuzis de malkapableco rilate al tiu afero; mi

povas atesti almenaŭ, ke ĉi tiu ago, se ĝi estus ĝuste komprenata, montriĝus kiel unu el la plej lertaj kaj sagacaj el lia kariero. Prezidanto Olivier estas tiel same akuzita de sovaĝa maljusteco. Mi opinias, ke mi ŝuldas al la honoro de malnova malamiko aserton, ke li agis tiaokaze kun eĉ pli ol kutima bonkoreco. Esprimante la aferon populare, mi povas certigi al miaj samlandanoj, ke St. Clare estis tute ne tiel malsaĝa kaj Olivier tute ne tiel kruelega kiel ŝajnis. Mi diros nenion plu; kaj neniuj subĉiela rekompenco povas instigi al mi aldoni al tio eĉ unu vorton”

Larĝa frostita luno kiel brilanta neĝbulo komencis sin montri tra la antaŭ ili branĉeta implikaĵo kaj pere de ĝia lumo la rakontanto povis rememorigi al si la detalojn el la teksto de Kapitano Keith de folieto de presita papero. Dum li ĝin faldis kaj remetis ĝin en sian poŝon, Flambeau elĵetis la manon kun franca gesto.

”Atendu. Atendu momente,” li kriis ekscitite. ”Mi kredas, ke mi povas diveni ĉion per la unua provo.”

Li paŝadis antaŭen forte spirante, la nigra kapo kaj bova kolo antaŭenpuŝitaj kiel viro gajnanta marŝkonkurson. La malalta pastro amuzita kaj interesita spertis iom da ĝeno kuretadi flanke de li. Antaŭ kaj apud ili la vojeto tra la arboj iomete plilarĝiĝis dekstren kaj maldekstren kaj malsupreniris trans helan lunluman valon ĝis kie ĝi denove malaperis kiel kuniklo en la muron de alia arbareto. La enirejo en la pli malproksiman arbareton aspektis malgrande kaj ronde kiel la nigra truo de malproksima fervoja tunelo. Ĝi tamen estis ne pli malproksime ol cent paŝoj kaj oscedis kiel kaverno antaŭ ol Flambeau denove ekparolis.

”Mi estas diveninta,” li fine kriis manfrapante sian femuron per grandega mano, ”kvarminutan pensadon kaj mi mem rakontos al vi vian rakonton entute.”

”Bone,” jesis lia amiko, ”vi rakontu ĝin do.”

Flambeau levis la kapon sed mallaŭtigis la voĉon, "Generalo Arthur St. Clare," li diris, "naskiĝis en familion en kiu frenezeco estis hereda; kaj lia celo estis tion kaŝi al lia filino kaj eĉ se eble al lia estonta bofilo. Prave malprave li opiniis, ke la fina freneziĝo estas baldaŭ venonta, kaj decidis sin mortigi. Ordinara sinmortigo tamen nur disproklamus kion li timegis.

"Dum la milito pliproksimiĝis, la nuboj en lia cerbo fariĝis pli kaj pli mallumaj; kaj fine dum unu momento plene freneza, li oferis sian publikan devon al sia privata devo. Li kuregis senkonsiderinte en la batalon, esperante, ke li estos trafata de la unua kuglo. Kiam li konstatis, ke li atingis nenion krom kaptadon kaj malhonoron, eksplodis en lia cerbo la sigelita bombo kaj li rompis sian propran glavon kaj sin pendigis."

Li fikse rigardis la antaŭ si grizan arbaran fasadon kun ĝia sola nigra breĉo kiel nigra tomba buŝo en kiun la vojeto kondukis ilin. Eble io minacanta pri la vojo tiel subite englutita, plifortigis lian klaran vizion de la tragedio, ĉar li ekstremetis.

"Teruriga historio," li diris.

"Teruriga historio," ripetis la pastro la kapo klinita, "tamen ne la vera historio."

Tiam li malantaŭen ekmovis la kapon pro iu senespera kaj kriis, "Ho, se ĝi nur estus tiel."

La alta Flambeau sin turnis kaj rigardis lin.

"Via estas honesta historio," kriis Pastro Brown profunde emociita. "Pura, dolĉa historio, tiel blanka kiel tiu luno. Frenezeco kaj malespero estas sufiĉe senkulpaj. Ekzistas aferoj pli malbonaj, Flambeau."

Flambeau ekrigardis senespere al la luno ĵus alvokita; kaj de kie li staris unu sola nigra branĉo kurbita vidiĝis trans ĝi, ĝuste kiel diabla korno.

”Patro—patro,” kriis Flambeau kun franca gesto kaj eĉ pli rapide antaŭen paŝante, ”ĉu vi volas diri, ke ĝi estis pli malbona ol tio?”

”Pli malbona ol tio,” diris la pastro kiel malgaja eĥo, kaj ili iris denove en la nigrajn klostrojn de la arbejo, kiu kuris tiam preter ili, kvazaŭ malluma teksaĵo el trunkoj en la malhelaj koridoroj de stranga songo.

Ili estis baldaŭ en la plej kaŝitaj intestoj de la arbaro kaj palpadis apude kaj ĉirkaŭ si la kreskaĵojn, kiujn ili ne povis vidi. Tiam la pastro denove diris.

”Kie saĝulo kaŝas folion. En la arbaro. Sed kion li faras se arbaro ne ekzistas?”

”Do, do,” kriis Flambeau agacite, ”kion li faras?”

”Li kreskigas arbaron por kaŝi ĝin,” diris la pastro kun voĉo revema. ”Terura peko.”

”Atendu do,” kriis lia amiko senpacience, ĉar la malluma arbaro kaj mallumaj diroj iomete agacis lin, ”cu vi rakontos ĉi tion al mi aŭ ne? Kiajn aliajn postsignojn vi havas por esplori?”

”Restas ankoraŭ tri atestaĵoj,” diris la alia, ”tion mi elfosis el kaŝitaj anguloj tie kaj tie ĉi; mi rakontos laŭ la logika prefere ol laŭ la kronologia ordo. Unue kompreneble nia scio pri la okazo kaj rezulto de la batalo devenas el la depeŝoj de Olivier mem, kiuj estas sufiĉe klaraj. Li estis enfosita kun du aŭ tri regimentoj sur la supra parto de la krutaĵoj kiuj superstaras la Nigran Riveron, ĉe la alia bordo de kiu troviĝas malpli alta kaj marĉa tero. Ankoraŭ pli malproksime estas facilaj montetoj sur kiuj estis la unua angla antaŭposteno, subtenata de aliaj, kiuj estis tamen iom malantaŭ ĝi. Entute la angla militistaro estis la pli multnombra; tamen ĉi tiu regimento estis sufiĉe malproksime de sia bazo por devigi al Olivier konsideri la projekton transiri la riveron kaj disigi ĝin de la granda armeo. Je sunsubiro tamen li estis decidinta tenadi sian propran pozicion, kiu

estis aparte forta. Sekvantan matenon je la tagiĝo li estis frapata de miro vidante, ke ĉi tiu vaganta areto da angloj, tute ne subtenata de malantaŭe, estas sin ĵetinta trans la riveron, duono per ponto dekstre kaj la alia duono per pli supra transvadejo, kaj amasiĝas sub li sur la marĉa bordo.

”Ke tiom malmultaj provus ataki kontraŭ tia pozicio estis sufiĉe nekredible, sed Olivier rimarkis ion eĉ pli eksterordinaran. Ĉar anstataŭ provi ekkapti pli firman teron, ĉi tiu freneza regimento, metinte malantaŭen per unu furioza kurego la riveron, faris nenion plu kaj estis tie algluita en la koto kiel muŝaro en melaso... . Ne necesas diri, ke la brazilanoj disŝiris per pafilegoj grandajn breĉojn en iliaj vicoj, kaj ili povis respondi nur per kuraga, kvankam ĉiam malfortiĝanta, fusila pafado. Malgraŭ tio ili neniam disiĝis, kaj la abrupta historio de Olivier finiĝas per tributo de granda admiro al la mistera kuraĝo de tiuj frenezuloj. ‘Niaj vicoj tiam fine antaŭeniris,’ skribis Olivier, ‘kaj pelis ilin en la riveron; mi kaptis Generalon St. Clare mem kaj plurajn aliajn oficirojn. Kaj la kolonelo kaj la majoro falis dum la batalo. Mi ne povas ne diri, ke en la tuta historio pli kuraĝa spektaklo ol la fina kontraŭstaro de tiu ĉi eksterordinara regimento malofte povas esti vidita; vunditaj oficiroj prenantaj la fusilojn de mortintaj soldatoj, kaj la generalo mem nin kontraŭstaranta surĉevale, la kapo malkovrita kaj la glavo rompita.’ Rilate al kio poste okazis Olivier estas tiel silenta kiel Kapitano Keith.”

”Do,” grumblis Flambeau, ”la sekvantan atestaĵon pritraktu.”

”Iom da tempo necesis por eltrovi la venontan atestaĵon,” diris Pastro Brown, ”por rakonti ĝin tamen necesas ne longa tempo. Mi fine eltrovis en almozula domo forkaŝita en la Lincoln’aj marĉlandoj maljunan soldaton, kiu ne nur estis vundita ĉe la Nigra Rivero, sed fakte surgenuiĝis flanke de la regimenta kolonelo kiam li mortis. Ĉi tiu estis iu Kolonelo Clancy, granda bovsimila irlandano, kaj ŝaj-

nas, ke li mortis tiom pro kolerego kiom pro kugloj. Li almenaŭ ne respondecis por tiu absurda invado; ĝi devis esti ordonita al li de la generalo mem. Liaj lastaj edifaj vortoj estis ĉi tiuj, 'kaj jen iras la damnita azenaĉo kun la pinto de sia glavo forrompita. Ke tia nur estu lia kapo.' Vi rimarku, ke ŝajne ĉiu observis tiun ĉi detalon pri la rompita glavo, plej multaj tamen estimas ĝin pli respekte ol la mortinta Kolonelo Clancy. Kaj nun la tria atestajo."

Ilia vojeto trans la arbaro komencis supreniri kaj la parolanto iomete paŭzis por kapti spiron antaŭ ol li daŭrigis. Tiam li komencis denove kun tiu sama aferema voĉo.

"Antaŭ nur unu du monatoj iu brazila oficiro, kiu estis kverelinta kun Olivier kaj forlasinta sian landon, mortis en Anglujo. Li estis bone konata kaj tie ĉi kaj en Eŭropo, hispano nomita Espado; mi mem konis lin, flavvizaĝa maljuna dando kun hokforma nazo. Pro diversaj privataj kaŭzoj mi ricevis permeson tralegi la dokumentojn kiujn li postlasis; li estis katoliko kompreneble, kaj mi estis kun li antaŭ ol li mortis. Estis nenio lia kio plilumigas iun ajn angulon de la malluma afero St. Clare, krom kelkseso da ordinaraj kajeroj enhavantaj la taglibron de iu angla soldato. Mi povas nur diveni, ke ĝi estis trovita de la brazilanoj ĉe unu el la militmortintoj. Almenaŭ ĝi ĉesas abrupte je la antaŭbatala nokto.

"Tamen la priskribo de la lasta tago el la vivo de tiu kompatindulo certe estas leginda. Mi havas ĝin ĉi tie; tamen estas tro mallume por legi ĝin kaj mi donas al vi resumon. La unua parto estas plena je ŝercoj, evidente rakontitaj inter la soldatoj, pri iu nomita La Vulturo. Ne ŝajnas, ke ĉi tiu persono, kiu ajn li estu, estis unu el ili mem, eĉ ne ke li estis anglo; kaj oni ne priparolas lin ĝuste kiel malamikon. Pli ĝuste ŝajnas, ke li estis ia loka peristo kaj nebatalanto; eble gvidisto aŭ ĵurnalisto. Kelkfoje li estas kun maljuna Kolonelo Clancy, sed plejofte li vidiĝas parolante kun la majoro. Efektive la

majoro iomete elstaras en la historio de tiu ĉi soldato; maldika nigra viro ŝajne, nomita Murray—nordirlandano kaj puritano. Estas senfinaj ŝercoj pri la kontrasto inter la severecco de la Ulsterano kaj la festenemo de Kolonelo Clancy. Estas ankaŭ iu ŝerco pri la diverskoloraj vestaĵoj de La Vulturo.

”Sed ĉiuj ĉi tiuj malseriozaĵoj estas disrompitaj pere de io, kion oni bone povus nomi klariona eksono. Malantaŭ la angla tendaro kaj preskaŭ paralela laŭ la rivero estis unu el la malmultaj grandaj vojoj de la regiono. Okcidenten la vojo kurbiĝis al la rivero, kiun ĝi transiris per la jam priparolita ponto. Oriente la vojo rapidis malantaŭen en la sovaĝejojn kaj proksimume tri kilometrojn de tie troviĝis la lasta angla antaŭposteno. De tiu direkto alproksimiĝis iun vesperon la briletado kaj tintado de milita ĉevalaro, kiun vidante la simpla taglibristo kun granda miro rekonis la generalon kaj lian oficiraron. Li rajdis sur la granda blanka ĉevalo, kiun vi tiel ofte vidis kaj en ilustritaj gazetoj kaj en pentraĵoj; kaj vi povas esti certa, ke ili akceptis lin per salutoj ne nure ceremoniaj. Almenaŭ li ne malŝparis iom da tempo pro ceremonioj, sed tuj deĉevaliĝinte miksiĝis en la oficiraron kaj komencis emfazan, tamen konfidencan, interparoladon. Nia amiko, la taglibristo, precipe rimarkis, ke li emis diskuti aferojn kun Majoro Murray; tia elekto tamen, kondiĉe ke ĝi ne estu tro elstaranta, estus neniel nenatura. La du viroj estis kvaŝaŭ naskitaj por interkonsento; ili estis viroj kiuj legadis siajn Bibliojn; ili ambaŭ estis oficiroj de la malmoderna evangelia tipo. Kiel ajn tio estu, estas sendube, ke kiam la generalo denove enseliĝis li estis ankoraŭ atente parolanta kun Murray, kaj ke dum li rajdis malrapide laŭ la vojo riveren, la alta Ulsterano ankoraŭ marŝis flanke de la ĉevalkapo en interparolado absorbite. La soldatoj rigardis ilin ĝis ili malaperis malantaŭ arbareto kie la vojo kurbiĝis al la rivero. La kolonelo estis reirinta al sia tendo kaj la soldatoj al siaj

pikedoj; la viro kun la taglibro restis ankoraŭ kvar minutojn kaj vidis mirigan vidaĵon.

”La granda blanka ĉevalo, kiu estis malrapide forpasinta laŭ la vojo kiel ĝi estis paŝinta en tiom multe da procesioj, reen kuregis galopante laŭ la vojo al ili kvazaŭ avidega por gajni kurkonkurson. Unue ili ekkredis, ke ĝi estas forkurinta kun sia rajdanto; sed ili baldaŭ ekvidis, ke la generalo mem, bonega rajdisto, instigas ĝin al pleja rapideco. Ĉevalo kaj rajdanto ekvenis al ili kiel kirlovento, kaj bridante la ŝancelatan ĉevalon la generalo turnis al ili vizaĝon kiel flamo, kaj alvokis la kolonelon kiel la klariono kiu vekas la mortintojn.

”Mi opinias, ke la okazoj de tiu katastrofo amasiĝis en la cerbojn de viroj tiaj, kia nia amiko kun la taglibro. Kun la konfuzita ekscitiĝo de sonĝo ili sin trovis kuregante, unu puŝante la alian, al siaj vicoj kaj sciiĝis, ke oni tuj atakos trans la riveron. Oni diris, ke la generalo kaj la majoro estas eltrovintaj ion ĉe la ponto kaj restas nur sufiĉe da tempo por fari sinsavan baton. La majoro estis tuj reirinta laŭ la malantaŭa vojo por alvoki la rezervitaron; estis dube ĉu eĉ per tiu urĝa peto helpo alvenos sufiĉe frue. Sed ili devis transpasi la riveron tiun nokton kaj ekkapti la deklivojn jam antaŭ tagiĝo. Estas kun la agitado kaj pulsado de tiu romaneca nokta marŝo, ke subite la taglibro finiĝas.”

Pastro Brown estis suprenpasinta antaŭen, ĉar la arbara vojeto fariĝis pli mallarĝa, kruta kaj torda ĝis ŝajnis kvazaŭ ili supreniras tordan ŝtuparon. La pastra voĉo eksonis de supre el la mallumo.

”Estis alia malgranda kaj gravega io. Kiam la generalo instigis ilin al ilia kavalireca atako li duone eltiris sian glavon el la glavingo; kaj tiam, kvazaŭ li hontiĝas pro tia melodramo, reenŝovis ĝin. La glavon denove, vi rimarku.”

Duonlumo penetris tra la supera branĉo teksaĵo, ĵetante ĉirkaŭ

iliaj piedoj la fantomon de reto; ĉar ili denove grimpis al la malforta lumeco de la luno. Flambeau sentis la veron ĉirkaŭ sin kiel etoson sed ne kiel ideon. Li respondis kun konfuzita kapo; "Nu, kial estas la glavo en malbona ordo? Oficiroj kutime portas glavojn, cu ne?"

"Ili ne estas ofte menciataj en moderna militado," diris la alia senpasie. "En tiu ĉi afero tamen oni ĉie renkontas la malbenitan glavon."

"Ho, ĉu tio multe signifas?" grumblis Flambeau. "Ĝi estis okazaĵo kia kaptus popolan intereson; la klingo de la maljunulo rompiĝas dum lia lasta batalo. Oni povus veti, ke la ĵurnaloj bone eldonus tion, kiel ili efektive faris. Sur ĉiuj ĉi tiuj tomboj k.t.p. ĝi estas mont-rita kun forrompita pinto. Mi esperas, ke vi ne kuntiris min al tiu ĉi polusa ekspedicio nur pro tio, ke du homoj, kiuj sciis el kio konsistas bona bildo, rimarkis la rompitan glavon de St. Clare."

"Ne," kriis Pastro Brown, per akra voĉo kiel pistola ekpafo; "tamen kiu vidis ties nerompitan glavon?"

"Kion vi volas diri?" kriis la alia, kaj ekstaris sub la steloj. Subite ili estis elirintaj el la grizaj kradpordoj de la arbaro.

"Mi rediras, kiu vidis ties nerompitan glavon?" ripetis obstine Pastro Brown. "Ne la taglibristo almenaŭ; la generalo reingigis ĝin tro rapide."

Flambeau rigardis ĉirkaŭ sin en la lunlumo, kiel viro frapita de blindeco alrigardus la sunon; kaj lia amiko nun por la unua fojo daŭrigis avide.

"Flambeau," li kriis, "mi ne povas ĝin pruvi, eĉ post serĉado inter la tomboj. Sed mi estas tute certa pri ĝi. Lasu min aldoni nur unu etan fakton plu, kiu disfalgas la tutan aferon. La kolonelo pro stranga sorto estis unu el la unuaj frapitaj de kuglo. Li estis frapita longe antaŭ ol la batalantoj de la du armeoj apudiĝis. Li tamen vidis la

glavon de St. Clare rompita. Kial ĝi estis rompita? Kiel ĝi fariĝis rompita? Amiko mia, ĝi estis rompita antaŭ ol la batalo okazis.”

”Ho,” diris lia amiko kun ia malespera ŝerceco; ”kaj bonvole, kie troviĝas la alia peco?”

”Mi povas tion klarigi al vi,” diris la pastro senhezite. ”En la nord-orienta angulo de la enterigejo de la Protestanta Katedralo en Belfast.”

”Efektive?” demandis la alia. ”Ĉu vi do serĉis ĝin.”

”Mi ne povis,” respondis Brown kun malkaŝa bedaŭro. ”Staras super ĝi granda marmora monumento, monumento al la heroa majoro Murray, kiu falis glorie batalante ĉe la renoma Batalo de la Nigra Rivero.”

Ŝajne Flambeau estis galvanizita subite al ekzistado. ”Vi volas diri,” li raŭke kriis, ”ke Generalo St. Clare malamis Murray kaj murdis lin sur la batalkampo ĉar—”

”Vi estas plena de bonaj kaj puraj pensoj,” diris la alia. ”Estis multe pli malbona ol tio.”

”Nu,” diris la granda viro, ”kiom da malbona imago mi havas, estas elĉerpita.”

La pastro ŝajne estis vere duboplena pri kiel komenci, kaj finfine li diris denove:

”Kie saĝulo kaŝus folion? En la arbaro.”

La alia ne respondis.

”Se arbaro ne ekzistus, li farus arbaron. Kaj se li volis kaŝi senvivan folion li farus senvivan arbaron.”

Ankoraŭ ne estis respondo, kaj la pastro aldonis eĉ pli milde kaj kviete:

”Kaj se iu havus senvivan korpon por kaŝi li farus kampon da senvivaj korpoj en kiu ĝin kaŝi.”

Flambeau komencis brupaŝi antaŭen kun netolero de prokras-

to aŭ tempa aŭ spaca; sed Pastro Brown ankoraŭ parolis kvazaŭ li estus daŭriganta la lastan frazon.

”Sir Arthur St. Clare, kiel mi jam diris, estis viro kiu legis sian Bibliion. Tio estis lia malsano. Kiam homoj ekkomprenos, ke estas senutile al iu legi sian Bibliion se li ne ankaŭ legas ĉies Bibliion? Presisto legas Bibliion serĉante preserarojn. Mormono legas sian Bibliion kaj trovas poligamion; Kristana Sciencisto legas la sian kaj eltrovas, ke ni havas nek brakojn nek krurojn. St. Clare estis malmoderna Angla-Hinda protestanta militisto. Pensu do, kion tio povus signifi, kaj ne hipokritiĝu. Eble viro, korpe timinda, loĝanta sub tropika suno en orienta socio, kaj sin saturante, sence kaj sen gvidado, de orienta libro. Kompreneble li legis la Malnovan Testamenton plivole ol la Novan. Kompreneble li trovis en la Malnova Testamento ion ajn kion li deziris—volupton, tiranecon, perfidon. Ho, eble li estis honesta, kiel vi nomas ĝin. Sed kiel utilas se homo estas honesta pri sia adorado de malhonesteco?

”En ĉiu el la varmegaj kaj sekretaj landoj kien iris tiu viro li havis haremon, li torturis atestantojn, li kolektis hontindan oron; sed certe li estus dirinta kun sentremaj okuloj, ke li tion faras al la gloro de la Sinjoro. Mia propra teologio estas sufiĉe klara se mi demandas, kiu Sinjoro? Tamen estas tio ĉi pri tia malbono, ke ĝi malfermas pardonon post pordo en infero, kaj ĉiam al pli kaj pli malgrandaj ĉambroj. Tio ĉi estas la vera argumento kontraŭ krimo, ke homo ne fariĝas pli kaj pli libera sed nur pli kaj pli avara kaj malnobla. St. Clare estis baldaŭ sufokita per malfacilaĵoj de korupto kaj ĉantaĝo; kaj bezonis pli kaj pli da mono. Kaj kiam okazis la batalo de la Nigra Rivero li estis falinta de mondo al mondo ĝis tiu loko kiun Danto priskribas kiel la plej profunda etaĝo de la universo.”

”Kion vi volas diri?” demandis lia amiko denove.

”Tion,” ripostis la pastro, kaj subite indikis pluvlageton sigelitan

de glacio kiu brilis en la lunlumo. "Ĉu vi memoras, kiun Danto metis en la lastan etaĝon de glacio?"

"La perfidintojn," diris Flambeau kaj ekstremis. Dum li ĉirkaŭen rigardis al la nehoma pejzaĝo el arboj, kun mokantaj kaj preskaŭ malĉastaj konturoj, li povis preskaŭ imagi al si ke li estas Danto, kaj la pastro kun la voĉo kiel rivereto estas ja iu Virgilo lin kondukanta tra lando de eternaj pekoj.

La voĉo daŭrigis: "Olivier, kiel vi scias, estis kiĥota kaj ne permesis spionadon aŭ spionojn. Tio tamen estis farata, kiel ankaŭ multaj aliaj aferoj, sen lia scio. Prosperis al mia malnova amiko Espado tion fari; li estis la gaje vestita dando, kies hokforma nazo gajnis por li la nomon La Vulturo. Pozante kiel iu filantropo ĉe la fronto, li palpeiris tra la angla militistaro, kaj fine li havis la fingrojn sur ĝia sola koruptulo—plaĉas al Dio—la estro. St. Clare fibezonis monon kaj monon amase. La malkredata familia kuracisto estis minacanta, ke li eldonos tiujn eksterordinarajn malkovrojn, kiuj poste komenciĝis kaj ĉesis; onidiroj pri monstraj kaj prahistoriaj aĵoj en Park Lane; agoj de angla evangeliulo kiuj sugestis homoferadon kaj sklavarojn. Mono estis bezonata ankaŭ por la doto de lia filino; ĉar al li la renomo pri riĉaĵoj estis tiel dolĉa kiel riĉaĵoj mem. Li ekrompis la lastan fadenon, flustris la vorton al Brazilo, kaj enŝutiĝis mono de la malamikoj de Anglujo. Krome tamen alia viro estis parolinta al Espado, La Vulturo. Iel la nigreta, severa juna majoro el Ulster estis diveninta la malbelan veron; kaj kiam ili marŝis malrapide kune laŭ tiu vojo al la ponto, Murray estis diranta al la generalo, ke li devas aŭ tuj ekŝiĝi aŭ esti militjuĝota kaj pafmortigota. La generalo prokrastumadis je li ĝis kiam ili alvenis al la areto de tropikaj arboj apud la ponto; kaj tie ĉe la kantanta rivero kaj la sunlumigataj palmoj (mi povas vidi ĝin image) la generalo elingigis la sabron, kaj trapikis la korpon de la majoro."

La vintra vojo kurbiĝis super eĝo kun kruelaj nigraj formoj arbustaj kaj densaĵoj en fenda frosto; sed Flambeau imagis, ke li vidas preter tio malklare la randon de aŭreolo, kiu estas nek stela nek luna lumo, sed tia fajro kian homoj faras. Li observadis ĝin dum la rakonto finiĝis.

”St. Clare estis diabla hundo, li estis tamen hundo pursanga. Neniam, mi ĵuras, estis li tiel klarpensa aŭ tiel forta kiel tiam, kiam kompatinda Murray kuŝis malvarma amaso ĉe liaj piedoj. Neniam en iu ajn el liaj triumfoj, kiel vere diris Kapitano Keith, estis la granda viro tiel granda kiel dum ĉi tiu lasta de la mondo malestimita malvenko. Li rigardis trankvile la ilon por forviŝi la sangon; li konstatis, ke la pinto, kiun li enigis inter la ŝultrojn de sia viktimo, restas forrompita en la kadavro. Li vidis tute trankvile, kvazaŭ tra kluba fenestro, ĉion kio nepre sekvos. Li vidis, ke homoj nepre trovos la neklarigeblan korpon; nepre eltiros la neklarigeblan glavpinton; nepre rimarkos la neklarigeblan rompitan glavon... aŭ foreston de glavo. Li senvivigis sed ne silentigis. Sed lia superreganta intelekto sin levis kontraŭ la malfacilaĵo. Restas ankoraŭ nun unu vojo. Li povus igi la kadavron malpli neklarigebla. Li povus krei monteton el kadavroj por kovri tiun ĉi. Dudek minutoj poste ok cent anglaj militistoj estis marŝantaj al sia morto.”

La pli varma lumo malantaŭ la nigra vintra arbaro fariĝis pli kaj pli ruĝa kaj forta, kaj Flambeau paŝis antaŭen por atingi ĝin. Pastro Brown ankaŭ plirapidis; sed li ŝajne estis nur absorbita en sia rakonto.

”Tia estis la kuraĝo de tiuj mil angloj kaj tia la genio de ilia estro, ke se ili estus tuj atakintaj la monteton, eĉ ilia freneza frapo eble iome sukcesus. La malbona intelekto tamen, kiu ludis ilin kiel ŝakpecojn, havis aliajn celojn kaj kialojn. Ili necese restu en la marĉoj apud la ponto almenaŭ ĝis britaj kadavroj estos tie kutima vidaĵo.

Tiam la lasta granda sceno; la grizhara soldat-sanktulo cedus sian frakasitan sabron por eviti pluan buĉadon. Ho, ĝi estis bone aranĝita, kiel improvizaĵo. Tamen mi kredas (mi ne povas pruvi), mi kredas, ke okazis, dum ili estis tie gluataj en la sanga koto, ke iu ekdubis... kaj iu divenis.”

Unu momenton li estis muta kaj tiam diris; ”Estas voĉo de nenie kiu diras al mi, ke la viro kiu divenis estis la amanto... la edziĝonto de la filino de la maljunulo.”

”Kion do pri Olivier kaj la ekzekuto?” demandis Flambeau.

”Olivier, parte pro kavalireco, parte pro politiko, malofte malfaciligis siajn movojn per kaptitoj,” klarigis la rakontanto. ”Plejofte li liberigis ĉiun. Tiuokaze li liberigis ĉiun.”

”Ĉiun krom la generalo,” diris la alta viro.

”Ĉiun,” diris la pastro.

Flambeau sulkigis siajn nigrajn brovojn. ”Ankoraŭ mi ne ĉion ekkomprenas,” li diris.

”Estas alia bildo, Flambeau,” diris Brown per sia pli mistika murmuro. ”Tion mi ne povas pruvi; sed mi povas fari ion plu... mi povas ĝin vidi. Jen estas militista tendaro disiĝanta tagiĝe sur la nudaj tropikaj montetoj, kaj brazilaj uniformoj kuniĝas en blokojn kaj kolonojn kaj pretiĝas formarŝi. Tie estas la ruĝa ĉemizo kaj longa nigra barbo de Olivier, kiun la vento flirtas dum li staras, la larĝ-randa ĉapelo enmane. Li estas adiaŭanta la grandan malamikon, kiun li estas liberiginta... la simpla, arĝenthara angla veterano, kiu dankas lin en la nomo de siaj soldatoj; la angla restaĵo staras malantaŭ li je la atento; ĉe ilia flanko estas la provizoj kaj veturiloj por la reiro. La tamburoj rulsonas; la brazilanoj formovas; la angloj restas senmove kiel statuoj. Tiel ili restas ĝis la lasta zumado kaj ekbrilo de la malamikoj estas malaperinta sur la tropika horizonto. Tiam ilia mieno tuj ŝanĝiĝas, kiel senvivaj viroj viviĝantaj denove; ili tur-

nas siajn kvindek vizaĝojn al la generalo... vizaĝoj neniam, forgesebaj.”

Flambeau forte eksaltis. ”Ha,” li kriis. ”Vi ne volas diri...”

”Jes,” diris Pastro Brown per profunda, emociita voĉo. ”Estis angla mano kiu metis la ŝnuregon ĉirkaŭ la kolo de St. Clare; mi kredas, ke estis la sama mano kiu metis la ringon sur la fingron de lia filino. Estis anglaj manoj kiuj altiris lin al la arbo de honto; la manoj de viroj kiuj lin adoris kaj lin sekvis ĝis malvenko. Kaj estis anglaj okuloj (Dio pardonu kaj toleradu nin ĉiujn) kiuj rigardis lin svingigantan de la verda palma pendigilo sub tiu alilanda suno kaj preĝis pro sia malamo, ke li defalu en inferon.”

Dum ili ambaŭ atingis la supraĵon de la deklivo ekheliĝis antaŭ ili la forta punca lumo de ruĝkurtenita angla gastejo. Ĝi staris flanke laŭ la vojo kiel flanke staranta malavara gastiganto. Ĝiaj tri pordoj estis invite malfermitaj; kaj eĉ kie ili staris ili povis aŭdi la babiladon kaj ridadon de homoj feliĉaj por unu nokto.

”Ne necesas, ke mi diru al vi ion plu,” diris Pastro Brown. ”Ili juĝis lin en la dezertejo kaj detruis lin; kaj tiam, pro la honoro de Anglujo kaj de lia filino, ili ĵuris por ĉiam sigeli la sekreton pri la perfidula monujo kaj la murdinta glavklingo. Eble—Ĉielo helpu ilin—ili provis tion forgesi. Ni provu do forgesi; jen nia gastejo.”

”Tutkore,” diris Flambeau kaj estis pasanta en la brilan, bruple-nan trinkejon kiam li malantaŭen iris kaj preskaŭ falis sur la vojon.

”Jen, rigardu, je diabla nomo,” li kriis, kaj rigide elmontris la kvadratan lignan trinkejsignon, kiu dependis super la vojo. Ĝi montris malklare krudan desegnon de sabra tenilo kaj mallongigita klingo; ĝi portis skribite per imititaj antikvaj literoj la vortojn, ”La Signo de la Rompita Glavo.”

”Ĉu vi ne estis preta?” demandis Pastro Brown kviete. ”Li estas

la dio de tiu ĉi lando; duono el la gastejoj kaj parkoj kaj stratoj estas nomitaj pro li aŭ lia historio.”

”Mi kredis, ke ni jam priaŭdis tiun leprulon por la lasta fojo,” kriis Flambeau, kaj kraĉis sur la vojon.

”Vi neniam priaŭdos lin por la lasta fojo en Anglujo,” diris la pastro malsupren rigardante, ”tiel longe kiel latuno estas fortika kaj ŝtono daŭras. Ties marmoraj statuoj plenigos je kuraĝo la animojn de fieraj, naivaj knaboj dum jarcentoj; lia vilaĝa tombo bonodoros de lojaleco kiel de lilioj. Milionoj, kiuj vidis lin neniam, amos lin kiel patron—tiu ĉi viro, kiun la kelklastaj kiuj lin konis, traktis kiel sterkon. Li estu sanktulo; kaj la vero pri li estu neniam dirata, ĉar fine mi estas decidinta. Pri la malkaŝo de sekretoj estas tiom da bono, tiom da malbono, ke mi faros provon pri mia konduto. Ĉiuj tiuj ĉi ĵurnaloj malaperos; la kontraŭbrazila ŝtormo estas jam pasinta; Olivier oni jam ĉie honoras. Mi tamen diris al mi, ke, se ie, per nomo en metalo aŭ marmoro kiu kiel la piramidoj daŭros, estus kulpigata malprave Kolonelo Clancy, aŭ Kapitano Keith, aŭ Prezidanto Olivier, aŭ iu senkulpulo, tiam mi parolos. Se nur okazus, ke St. Clare estas malprave laŭdata, mi silentos. Kaj tion mi ja faros.”

Ili enpuŝis sin en la ruĝe kurtenitan gastejon, kiu estis ne nur komforta, sed eĉ luksa interne. Sur tablo staris arĝenta modelo de la tombo de St. Clare, la arĝenta kapo klinita, la arĝenta glavo rompita. Sur la muroj estis koloritaj fotografiaĵoj de la sama sceno kaj reklamo de la veturilkompanio kiu tien portis turistojn por ĝin vidi. Ili sidiĝis sur la komfortaj remburitaj benkoj.

”Venu, estas malvarme,” kriis Pastro Brown; ”ni havu iom da vino aŭ biero.”

”Aŭ konjakon,” diris Flambeau.

LA TRI ILOJ DE MORTO

Kaj pro sia profesia kaj pro konvinkiĝo Pastro Brown sciis pli bone ol la plejmulto el ni, ke ĉiu homo estas dignoplena kiam li estas senviva. Sed eĉ li spertis eksenton de misagordo, kiam oni vekis lin je tagiĝo dirante, ke Sir Aaron Armstrong estas murdita. Estis io absurda kaj nedeca pri sekreta perforto rilate al tia tuta amuza kaj populara figuro. Ĉar Sir Aaron Armstrong estis amuza ĝis komikeco; kaj populara tiel ke li fariĝis preskaŭ legenda. Estis kvazaŭ aŭdi, ke Feliĉa Jocĵo sin pendigis; aŭ ke sinjoro Pickwick mortis en la frenezulejo en Hanwell. Ĉar kvankam Sir Aaron estis filantropo kaj tial interrilatas kun la pli malgaja flanko de nia socio, li sin flatis, ke li rilatas kun ĝi en maniero kiel eble plej gaja. Liaj politikaj kaj sociaj paroladoj, estis kaskadoj da anekdotoj kaj "laŭta ridado"; lia korpsaneco estis de la eksplodema speco; lia etiko estis nur optimisma; kaj li pritraktis la drinkproblemon (lia plej preferata temo) kun tiu senmorta eĉ teda gajeco, kiu estas tiel ofte la signo de prospera abstinulo.

La fama rakonto pri lia konvertiĝo estis konata sur la pli puritajn podioj kaj katedroj; kiel li estas, kiam ankoraŭ knabo, forlogita de Skota teologio al Skota viskio, kie li estas leviĝinta super ambaŭ tiuj kaj fariĝinta (kiel li tion modeste esprimis) kia li estas. Sed lia larĝa blanka barbo, keruba vizaĝo, kaj brilantaj okulvitroj en la nenombreblaj kunvenoj antaŭ kiuj li aperis, igis iel malfacile kredebla la fakton, ke iam ajn li estis homo tiel mense malsana kiel viskiemu-

lo aŭ Kalvinisto. Oni sentis, ke li nepre, el ĉiuj filoj de homo, estas la plej serioze feliĉa.

Li loĝis en la kampara limo de Hampstead en belega domo, alta sed ne larĝa, turo moderna kaj proza. La plej mallarĝa el ĝiaj mallarĝaj flankoj superstaris la krutan verdan deklivon de fervojo, kaj estis tremigata de preterpasantaj vagonaroj. Sir Aaron Armstrong, kiel li mem tumultvoĉe klarigis, havis neniujn nervojn. Sed se ofte la vagonaro konsternis la domon, en tiu mateno la afero estis renversata, kaj estis la domo kiu konsternis la vagonaron.

La lokomotivo malrapidiĝis kaj haltis ĝuste preter tiu loko kie angulo de la domo elstaris sur la abrupta herbkovrita deklivo. La halto de la plejmultaj meĥanikaj aferoj devas esti malrapida; sed la vivanta kaŭzo de tiu ĉi, estis tre rapida. Viro tute nigre vestita, eĉ (oni memoras) ĝis la terura detalo de nigraj gantoj, aperis sur la eĝo super la lokomotivo, kaj svingis la nigrajn manojn kiel ia nigra ventmuelilo. Tio ĉi per si mem apenaŭ haltigus eĉ malrapideman vagonaron. Sed eliĝis el li krio, kiun oni poste preparolis kiel ion tute nenaturan kaj novan. Estis unu el tiaj krioj, kiaj estas terurige klaraj eĉ kiam oni ne povas aŭdi la apartajn vortojn. Ĉiokaze la vorto estis, "Murdo!"

Sed ĵuras la veturigisto, ke tiel same li estus haltinta eĉ se li aŭdus nur la teruran kaj definitivan akcenton kaj ne la vorton.

La vagonaro tuj haltis, kaj ekrigardo plej rapide povus senpere kompreni multajn detalojn de la tragedio. La nigrevestita viro sur la verda deklivo estis Magnus, la servisto de Sir Aaron Armstrong. Ĉi tiu pro sia optimismo ofte ridis pri la nigraj gantoj de sia funebra lakeo; sed en ĉi momento neniu emus ridi pri li.

Tuj kiam unu aŭ du scivolemuloj transiris la fervojon kaj la fumnigrigitan heĝon, ili ekvidis, ruliĝinta preskaŭ ĝis la fundo de la deklivo, la korpon de maljunulo en flava tualetrobo kun brilege

skarлата subŝtofo. Mallonga peco da ŝnurego saĵne estis implikiĝinta kun la kruroj, kredeble dum baraktado. Vidiĝis ankaŭ unu aŭ du sangoŝmiroj, kvankam tre malgrandaj; sed la korpo estis fleksita aŭ rompita al pozo tute neebla ĉe iu vivanta. Ĝi estis Sir Aaron Armstrong. Post unu aŭ du konfuzaj momentoj elvenis granda palhara viro, kiun saluti kiel la sekretarion de la mortinto povis kelkaj vojaĝantoj; tiu estis Patrick Royce, iam bone konata en la bohema kaj artista mondo. En maniero pli malpreciza sed eĉ pli konvinkita, li eĥis la angoron de la servisto. Kiam la tria persono de la domo, Alice Armstrong, filino de la mortinto, elvenis en la ĝardenon ŝanceliĝante kaj tremante, la veturigisto jam ĉesigis sian halton. La fajfilo jam ekfajfis, kaj la vagonaro spiregis antaŭen por venigi helpon de la plej proksima stacidomo.

Tiel Pastro Brown estis urĝe alvokita laŭpete de Patrick Royce, la granda eksbohema sekretario. Royce estis irlandano laŭ nacio, kaj katoliko de tiu senzorga speco, kiu neniam memoras pri sia religio ĝis li trafas vere en truon de embaraso. Eblas tamen, ke la peto de Royce estus malpli senprokraste plenumita, se unu el la oficialaj detektivoj ne estus amiko kaj admiranto de la neoficiala Flambeau; kaj neeblis esti amiko de Flambeau kaj ne aŭdi nenombreblajn rakontojn pri Pastro Brown. Tiel okazis, ke dum la juna detektivo (kies nomo estis Merton) kondukis la malgrandan pastron trans la kampojn al la fervojo, ilia interparolado estis pli konfidenca ol oni atendus inter du tute fremdaj personoj.

”Laŭ mia kompreno,” malkaŝe diris sinjoro Merton, ”troviĝas en tiu ĉi afero nenia ajn senco. Ekzistas neniu suspektinda. Magnus estas seriozaĉa stultulo; tro stulta esti murdinto. Royce estas jam multajn jarojn la plej bona amiko de la kavaliro; kaj ties filino sendube adoris lin. Krome, ĉio estas tro absurda. Kiu volus mortigi tian gajulon, kia maljuna Armstrong? Kiu volus trempi la manojn en la

sango de postvespermanĝa parolanto? Estus kiel mortigi Kristnaskpaĉjon.”

”Jes, tiu estis gaja domo,” jesis Pastro Brown. ”Estis gaja domo dum li ankoraŭ vivis. Ĉu vi kredas, ke ĝi estos gaja nun kiam li estas mortinta?”

Merton ekhaltis kaj rigardis sian kunulon per okulo pli vigla. ”Nun kiam li estas mortinta?” li ripetis.

”Jes,” daŭrigis la pastro solide, ”li estis gaja. Sed ĉu li transdonis sian gajecon al aliaj? Sincere nu, ĉu iu en la domo krom li estis gaja?”

Fenestro en la menso de Merton lasis eniri tiun strangan surprizan lumon, per kiu ni ekvidas por la unua fojo aferojn kiujn ni jam longe scias. Li ofte estis en la Armstrong’a domo, pro malgravaj policaĵaj aferoj de la filantropo; kaj nun kiam venis al li pripenso pri tio, la domo certe estas malgajiga. La ĉambroj estas tre altaj kaj tre malvarmaj; la garnaĵoj avarulaj kaj provincaj; la trablovataj koridoroj estas lumataj de elektro-lumo pli malvarmiga ol lunlumo. Kaj kvankam la skarlata vizaĝo kaj arĝenta barbo de la maljunulo estis flaminta kiel liberfajro en ĉiu cambro kaj koridoro laŭvice, ili postlasis nenian varmon. Sendube tiu ĉi fantoma nekomforto de la loko estis parte kaŭzita ĝuste de la vigla kaj superabundeca karaktero de ĝia posedanto; li dirus, ke hejtilojn kaj lampojn li tute ne bezonas ĉar li portas en si mem propran varmon. Sed kiam Merton memoris la aliajn loĝantojn li devis konfesi, ke ili ankaŭ estas kiel ombroj de sia mastro. La melankolia servisto kun siaj monstraj nigraj gantoj estis preskaŭ inkubo; Royce, la sekretario, estis sufiĉe solida, granda bovsimila viro en skota drapo, kun mallonga barbo; sed la pajlokolora barbo estis striita grize kiel ankaŭ la drapo, kaj la larĝa frunto striita de trofruaj sulkoj. Li ankaŭ estis bonanima, sed estis malĝoja speco de bonanimeco, venante ŝajne el koro muelita... li mienis

kvazaŭ lia vivo iel malsukcesis. Rilate al la filino de Armstrong, estis preskaŭ nekredeble, ke ŝi estas ties filino; ŝia koloro estis tiel pala kaj la konturo tiel sentema. Ŝi estis gracia sed troviĝis tremetado en ŝia formo, kiu estis kiel la formo de tremolo. Merton iufoje scivolis ĉu ŝi kutimiĝis ŝanceliĝi pro timo al la tondrado de la preterpasantaj vagonaroj.

”Vi vidu do,” diris Pastro Brown modeste palpebrumante, ”Mi ne estas tute certa, ke la Armstrong’a gajeco estas vere tiel gaja... por aliaj personoj. Vi diris, ke neniu povas mortigi tian feliĉan maljunulon, sed mi ne estas certa; ne nos inducas in tentationem. Se iam mi murdus iun,” li aldonis tute simple, ”kredeble tiu estus optimisto.”

”Kial?” kriis Merton amuzite. ”Ĉu vi opinias, ke homoj malŝatas gajecon?”

”Homoj ŝatas oftan ridadon,” respondis Pastro Brown, ”sed mi ne kredas, ke ili ŝatas ĉiaman rideton. Gajeco sen humoro estas ege ĝena afero.”

Ili marŝis iom da distanco laŭ la kurba herba krutejo apud la rejloj, kaj ĝuste kiam ili alvenis sub la malproksimen etendiĝanta ombro de la alta Armstrong’a domo, Pastro Brown diris subite, pli kiel iu forĵetanta ĝenan penson ol kiel iu ĝin serioze elmetanta: ”Kompreneble alkoholo en si mem estas nek bona nek malbona. Sed mi ne povas ne senti, ke viroj kia Armstrong bezonas de tempo al tempo glason da vino, por malgajigi sin.”

La oficiala superulo de Merton, griziĝanta kaj kapabla detektivo nomita Gilder, staris sur la verda rando atendante la mortenkteston, kaj parolante kun Patrick Royce, kies larĝaj ŝultroj kaj hirta barbo kaj hararo staris super li kiel turo. Des pli rimarkinda estis tio ĉi, ĉar Royce marŝis ĉiam kun ia fortika kliniĝo kaj ŝajnis plenumi

siajn skribistajn kaj domajn devojn en peza kaj humila maniero, kiel bubalo trenanta infanetan ĉaron.

Li levis la kapon kun neordinara plezuro, vidante la pastron, kaj lin kondukis iom foren. Dume Merton alparolis la pli aĝan detektivon certe respekteme, sed ne sen iom da knabeca malpacienco.

”Nu, sinjoro Gilder, ĉu vi jam multe progresis pri la mistero?”

”Ekzistas neniu mistero,” respondis Gilder, rigardante el sub revemaj palpebroj al la frugilegoj.

”Tamen ĝi ekzistas por mi almenaŭ,” diris Merton ridetante.

”Estas sufiĉe simple, junulo mia,” rimarkis la supera esploristo, karesante sian grizan, pintan barbon. ”Tri minutojn post via foriro por venigi la pastron de sinjoro Royce, malkaŝiĝis la tuta afero. Vi konas tiun past-vizaĝan serviston en la nigraj gantoj, kiu haltigis la vagonaron?”

”Mi rekonas lin ie ajn. Iel li donis al mi senton de nekomforta misteraĉo.”

”Nu,” trenparolis Gilder, ”kiam la vagonaro estis foririnta tiu viro ankaŭ estis for. Speco de aŭdaca krimulo, ĉu vi ne kredas; eskapi ĝuste per tiu trajno kiu iris por la polico?”

”Vi estas jam certa, mi supozas,” rimarkis la junulo, ”ke li efektive mortigis sian mastron?”

”Jes, filo mia, mi estas certa,” respondis Gilder sarkasme, ”pro la negrava kialo, ke li estas forkurinta kun dudek mil sterlingfuntoj en biletoj, kiuj estis en la skribotablo de lia mastro. Ne, la sola afero inda je la nomo de malfacilaĵo estas, kiel li lin mortigis. La kranio estas ŝajne frakasita kvazaŭ de iu granda ilo, sed troviĝas neniu ajn ilo ĉirkaŭe kuŝanta, kaj ĝin forporti ĝenus al la murdinto krom se la ilo estus nerimarkeble malgranda.”

”Eble la ilo estis nerimarkeble tro granda,” diris la pastro kun stranga gorĝrideto.

Gilder sin turnis pro tiu ĉi freneza rimarko, kaj iomete severe demandis al Brown kion li volas diri.

"Stulta maniero prezenti la aferon, mi scias," diris Pastro Brown kvazaŭ pardonpete. "Aŭdiĝas kiel ferakonto. Sed kompatinda Armstrong estas mortigita per gigantula klabo, granda verda klabo, tro granda por esti videbla, kaj kiun ni nomas la tero. Li frakasiĝis kontraŭ tiu ĉi verda deklivo sur kiu ni staras.

"Kiel vi volas diri?" tuj demandis la detektivo.

Pastro Brown turnis sian lunosimilan vizaĝon supren al la mal-larĝa fasado de la domo kaj palpebrumis senespere. Sekvinte liajn okulojn ili ekvidis, ke tie, ĉe la plej alta parto de tiu krome senfenestra malantaŭaĵo, troviĝas malfermita mansardofenestro.

"Ĉu vi ne vidas," li klarigis, indikante iomete embarasite kiel infano, "li ĵetiĝis de tie?"

Gilder brovsulke okulekzamenis la fenestron kaj tiam diris: "Nu do, estas eble. Sed mi ne komprenas kial vi estas tiel certa pri ĝi."

Brown larĝe malfermis la grizajn okulojn. "Do," li diris, "jen ŝnurego ĉirkaŭ kuro de la mortinto. Ĉu vi ne vidas tiun alian pecon de ŝnurego tie supre ĉe la angulo de la fenestro?"

Pro la alteco ĝi aspektis kiel ero da polvo aŭ haro plej malklara, sed la sagaca maljuna esploristo estis kontenta. "Vi plene pravas, sinjoro," li diris al Pastro Brown; "jen nepre unu poento al vi."

Preskaŭ dum li parolis venis ĉirkaŭ la kurbaĵo maldekstre speciala trajno de unu vagono, kaj haltinte, elŝutis pluan taĉmenton da policanoj, en kies mezo aperis la malafabla honta vizaĝo de Magnus, la forkurinta servisto.

"Je Jupitero! ili kaptis lin," kriis Gilder, kaj paŝis antaŭen kun vigleco tute nova.

"Ĉu vi havas la monon?" li kriis al la unua policano.

La viro rigardis al lia vizaĝo kun iomete stranga esprimo kaj diris "Ne." Tiam li aldonis, "Almenaŭ ne tie ĉi."

"Kiu estas la inspektoro, mi petas?" demandis la viro nomita Magnus.

Kiam li ekparolis ĉiu tuj komprenis kiel tiu voĉo haltigis la trajnon. Li estis malbrilaspekta viro kun malhirta nigra hararo, kaj senkolora vizaĝo, kaj la horizontalaj fendetoj, okulaj kaj buŝa, sugestis iel malforte la orienton. Liaj sango kaj nomo efektive restis dubaj, de kiam Sir Aaron lin "savis" el kelnerservado en Londona restoracio kaj (kiel onidiris) el aferoj eĉ pli hontindaj. Sed lia voĉo estis tiel vigla kiel lia vizaĝo estis senviva. Ĉu pro precizeco en fremda lingvo, ĉu pro respekto al lia mastro (kiu estis iomete surda), la tonoj de Magnus enhavis strange sonorajn kaj trapenetreman econ, kaj la tuta aro saltetis kiam li parolis.

"Mi ĉiam sciis, ke tio ĉi okazos," li diris kun aplomba mildeco. "Mia kompatinda mastro ĉiam mokis min ĉar mi vestas min nigre, sed mi ĉiam diris, ke mi estos preta funebri lin."

Kaj li faris rapidan geston per la manoj ambaŭ nigre gantitaj.

"Serĝento," diris Inspektoro Gilder, rigardante kun ekkolero la nigrajn manojn, "ĉu vi ne braceletos tiun ĉi; li ŝajnas sufiĉe danĝera."

"Nu, sinjoro," diris la serĝento kun la sama strange mirigita mieno, "Mi ne estas certa, ke ni povas."

"Kion vi volas diri?" demandis la alia akre. "Ĉu vi ankoraŭ ne arestis lin?"

Larĝigis la fendosimilan buŝon ioma malestimego, kaj la ekfajfo de proksimiĝanta trajno ŝajnis strange eĥi la mokadon.

"Ni arestis lin," respondis la serĝento serioze, "ĝuste kiam li estis eliranta el la policejo ĉe Highgate, kie li deponis la tuton de la mono de sia mastro al la prizorgo de Inspektoro Robinson."

Gilder alrigardis la serviston mirige. "Kial, je ĉio sankta, vi tion faris?" li demandis al Magnus.

"Por savi ĝin kontraŭ la krimulo, kompreneble," respondis tiu persono serene.

"Ĉu," diris Gilder, "oni ne povus lasi nepre sekura la monon de Sir Aaron ĉe ties familianoj."

La fino de liaj vortoj droniĝis en la bruego de la trajno dum ĝi preteriris pendolante kaj klakante; sed super la tuto de tiu bruega infero, kiun suferis de tempo al tempo tiu malfeliĉa domo, ili povis aŭdi la silabojn de la respondo de Magnus, kun tuta ilia sonorila klareco; "Mi havas neniun kaŭzon por fidi al la familianoj de Sir Aaron Armstrong."

Ĉiuj tiuj senmovaj homoj spertis la fantoman senton, ke nova persono ĉeestas; kaj Merton apenaŭ surpriziĝis kiam li suprenekrigardis kaj vidis la palan vizaĝon de la filino de Armstrong super la ŝultro de Pastro Brown. Ŝi estis ankoraŭ juna kaj bela en arĝenta maniero, sed ŝia hararo estis tiel polve kaj senkoloro bruna, ke en iuj lumoj ŝajnis, ke ĝi estas jam tute griza.

"Konsideru kion vi diros," diris Royce raŭke, "aŭ vi timigos fraŭlinon Armstrong."

"Mi esperas, ke jes," diris la viro kun la klara voĉo.

Dum la virino detiriĝis kaj ĉiu miris, li daŭrigis; "Mi iomete kutimiĝis al la tremado de fraŭlino Armstrong. Mi vidadis jam dum jaroj ŝin tremetadi. Kaj iuj diris, ke ŝi tremas pro malvarmo, kaj iuj ke ŝi tremas pro timo, sed mi scias, ke ŝi tremis pro malamo kaj peka kolero... demonoj, kiuj ja festenis ĉi matene. Jam ŝi estus for kun sia amanto kaj la mono krom pro mi. Ja de kiam mia kompatinda mastro malpermesis al ŝi edziniĝi kun tiu ebriaĉa fripono... ."

"Ĉesu," diris Gilder tre severe. "Viaj imagoj kaj suspektoj ne es-

tas nia afero. Krom se vi havas realan atestaĵon, viaj nuraj opinioj... ”

”Ho, mi donos al vi realan atestaĵon,” entrudis Magnus kun sia hakanta akcento. ”Vi devos alvoki min en juĝejon, sinjoro Inspektoro, kaj mi devos atesti la veron. Kaj jen la vero; momenton post la maljunulo estis ĵetita sangante el la fenestro, mi kuris en la mansardon kaj ektrovis la filinon sveninta sur la planko kun ruĝa ponardo ankoraŭ enmane. Permesu al mi tion ankaŭ transdoni al la koncerna instanco.” Li prenis el malantaŭa poŝo longan tranĉilon kun kornaĵa tenilo kaj sure ruĝa ŝmiro, kaj ĝentile transdonis ĝin al la serĝento. Tiam li retiris sin denove, kaj la fendetoj de liaj okuloj preskaŭ malaperis de sur lia vizaĝo pro granda ĉina rikano.

Merton eksentis pro li preskaŭ korpan malsanecon kaj li murmuris al Gilder, ”Nepre vi kredus la vortojn de fraŭlino Armstrong kontraŭ ties, ĉu ne?”

Pastro Brown subite levis vizaĝon tiel absurde freŝan, ke ŝajnis iel, kvazaŭ li ĵus lavis ĝin. ”Jes,” li diris, radiante senkulpecon, ”sed ĉu la vortoj de fraŭlino Armstrong staras kontraŭ ties?”

La knabino eligis timigitan, strangan krieton; ĉiu alrigardis ŝin. Ŝia korpo estis rigida kvazaŭ paralizita; nur ŝia vizaĝo en ĝia kadro de brunhararo estis vigla pro konsternego. Ŝi staris kiel iu subite kaptita per ĵetŝnuro kaj sufokata.

”Tiu ĉi viro,” diris sinjoro Gilder serioze, ”asertas, ke vi efektive estis trovata tenante tranĉilon, senkonscie, post la krimo.”

”Li asertas vere,” respondis Alice.

La tujpostan fakton kiun ili konstatis estis, ke Patrick Royce paŝis kun siaj vastaj kliniĝaj ŝultroj en ilian rondon, kaj eldiris la jenajn strangajn vortojn; ”Nu, se mi devas iri, antaŭe mi ĉerpos iom da plezuro.”

Lia grandega ŝultro leviĝis kaj li sendis feran pugnon krakanta en

la vizaĝon mildan kaj mongolan de Magnus, sternante lin sur la herbon ebene kiel asterio.

Tuj du tri policanoj mankaptis Royce'n; sed al la aliaj ŝajnis, ke ĉia racieco disfalas kaj la universo fariĝas sensenca arlekenaĵo.

"Nenion tian, sinjoro Royce," Gilder kriis severe. "Mi arestos vin pro kontraŭleĝa atako."

"Ne, ne pro tio," respondis la sekretario per voĉo kia fera tamtamo, "vi arestos min pro murdo."

Gilder ĵetis timoplenan ekrigardon al la frapito; sed tial ke tiu atentita persono jam sidiĝis forviŝante iom da sango de vizaĝo preskaŭ nedifektita, li nur diris mallonge, "Kion vi volas diri?"

"Estas tute vere, kiel diras tiu," klarigis Royce, "ke fraŭlino Armstrong svenis kun tranĉilo enmane. Sed ŝi ne ekprenis la tranĉilon por ataki sian patron, sed por lin defendi."

"Por lin defendi," ripetis Gilder serioze, "Kontraŭ kiu?"

"Kontraŭ mi," respondis la sekretario.

Alice lin rigardis kun vizaĝo malsimpla kaj enigma; tiam ŝi diris per voĉo mallaŭta; "Post ĉio, mi ankoraŭ ĝojas ke vi estas kuraĝa."

"Venu supren," diris Patrick Royce peze, "kaj mi montros al vi la tutan malbenitan aferon."

La mansardo, kiu estis la privata ejo de la sekretario (kaj karcerro eble apenaŭ sufiĉe ampleksa por tia ermito) portis efektive ĉiujn postsignojn de dramo perforta. Apud la mezo de la planko kuŝis granda revolvero kvazaŭ forĵetite; pli maldekstre estis ruliĝinta viskibotelo, malŝtopita sed ne tute malplena. La tuko de la malgranda tablo kuŝis trenita kaj piedpremita, kaj iom da ŝnuro, simila al tiu sur la trovita kadavro, estis malorde ĵetita trans la fenestrosojlon. Du vazoj estis disfrakasitaj sur la kamentabulo, kaj unu sur la tapiŝo.

”Mi estis ebria,” diris Royce; kaj tiu ĉi simpleco ĉe la viro tro frue suferinta, enhavis iom de la patoso de la unua peko de infaneto.

”Vi ĉiuj scias pri mi,” li daŭrigis raŭke; ”ĉiu scias kiel komenciĝis mia kariero, kaj tiel ankaŭ ĝi povu bone finiĝi. Oni nomis min iam cerbhavulo, kaj eble mi povus esti feliĉulo; Armstrong savis la restaĵon de cerbo kaj korpo el la drinkejoj, kaj ĉiam sin montris afabla al mi laŭ sia propra maniero, kompatindulo li. Sed li ne volis permesi al mi edziĝi kun Alice; kaj estos ĉiam dirate ke li sufiĉe pravis. Nu do, vi povas fari viajn proprajn konkludojn kaj vi ne dezirus ke mi pritraktu detalojn. Jen en la angulo mia viskibotelo duone malplenigita; jen sur la tapiŝo mia revolvero tute malplenigita. Estis ŝnuro el mia kesto kiu troviĝis sur la kadavro, kaj estis el mia fenestro ke elĵetiĝis la kadavro. Ne estas necese, ke vi igu detektivojn fosaĉi en mian tragedion; ĝi temas pri herbaĉo sufiĉe ofta en tiu ĉi mondo... . Mi min donas al la eŝafodo; kaj je Dio, tio sufiĉas!”

Pro signo sufiĉe takta la policanoj ariĝis ĉirkaŭ la granda viro por forkonduki lin; sed ilia netrudemeco estis iomete ŝancelita de la rimarkinda mieno de Pastro Brown, kiu estis sur la manoj kaj genuoj en la pordo, kvazaŭ plenumante iujn maldignigajn preĝojn. Estante persono tute ne sentema pri kia societa aspekto li prezentas, li restis en tiu ĉi pozo sed turnis supren al la ĉeestantaro vizaĝon brilan kaj rondan, donante la impreson de kvarkrurulo kun tre komika homa kapo.

”Sciu,” li diris bonhumore, ”tio ĉi tute ne bonas. En la komenco vi diris, ke ni trovis nenium ilon. Sed nun ni trovis multajn; jen la tranĉilo por piki, kaj la ŝnuro por sufoki, kaj la pistolo por pafi; kaj fine tamen li rompis la kolon falinte el fenestro. Ne pravas. Ne estas ekonomia.” Kaj li skuis la kapon super la tero kiel faras paŝtanta ĉevalo. Inspektoro Gilder malfermis la buŝon kun seriozaj inten-

coj sed antaŭ ol li povis paroli, la groteska figuro sur la planko daŭrigis tute flue.

”Kaj nun tri tute neblaj aferoj . Unue, la truoj en la tapiŝo, kie eniris ses kugloj. Kial ajn do iu pafu al la tapiŝo? Viro ebria ekpafas al la kapo de sia malamiko, tio, kio ridetaĉas al li. Li ne serĉas kverelon kun la piedoj, aŭ sieĝas la ŝuojn. Kaj jen krome la ŝnuro”... kaj finiĝinte pri la tapiŝo la parolanto levis siajn manojn kaj enmetis ilin en la poŝojn, sed daŭrigis senafekte surgenue... ”en kia imagebla ebrieco provus iu meti ŝnuron ĉirkaŭ ies kolo kaj fine metus ĝin ĉirkaŭ la kruro? Royce almenaŭ ne estis tiom ebriega, alie li jam dormus nevekeble. Kaj el ĉio plej klara, la viskibotelo. Vi asertas, ke drinkmaniulo batalis por la viskibotelo, kaj venkinte, ĝin rulis for en angulon, elverŝante unu duonon kaj enlasante la alian. Tio vere estus ago pleje malprobabla ĉe drinkmaniulo.”

Li rektiĝis mallerte, kaj diris al la sin akuzinta murdinto en tonoj de milda pentemo; ”Mi treege bedaŭras, kara sinjoro mia, sed tio kion vi diras estas certe sensencaĵo.”

”Sinjoro,” diris Alice Armstrong per mallaŭta voĉo al la pastro, ”ĉu estas eble, ke mi parolu kun vi sola por unu momento?”

Tiu ĉi peto pelis la paroleman pastron el la pasejo, kaj antaŭ ol li povis ekparoli en la apuda ĉambro, estis parolanta la fraŭlino kun strange tranĉa maniero.

”Vi estas lertulo,” ŝi diris, ”kaj vi provas savi Patrick, mi scias. Sed tio ne utilas. La koraĵo de tuta tio ĉi estas nigra, kaj ju pli da aferoj vi eltrovos des pli multe montriĝos kontraŭ la mizera viro, kiun mi amas.”

”Kial?” demandis Brown, alrigardante ŝin fikse.

”Ĉar,” ŝi respondis egale neskueble, ”mi mem vidis lin fari la krimon.”

”Ha,” diris Brown nemovite, ”kaj kion li faris?”

”Mi estis en la ĉambro apud ili,” ŝi klarigis; ”ambaŭ pordoj estis fermitaj sed subite mi ekaŭdis voĉon, kian mi neniam aŭdis antaŭe, muĝegante, ‘Infero, infero, infero,’ denove kaj denove, kaj tiam ambaŭ pordojn ekskuis la unua eksplodo de la revolvero. Trifojn denove ĝi krakis antaŭ ol mi malfermis la pordojn kaj trovis la ĉambron plena de fumo; sed la pistolo ankoraŭ fumis en la mano de mia kompatinda, freneza Patrick; kaj mi vidis lin pafi la finan mortigan pafon, per miaj propraj okuloj. Tiam li sin ĵetis al mia patro, kiu alkroĉiĝis pro teruro al la fenestrojlo, kaj en lukto provis lin sufoki per la ŝnuro, kiun li ĵetis ĉirkaŭ lia kapo, sed ĝi glitis ĉirkaŭ la baraktantaj ŝultroj ĝispiede. Tiam ĝi striktiĝis ĉirkaŭ unu kruro kaj Patrick posttrenis lin kiel maniulo. Mi ekprenis tranĉilon de sur la tapiŝo, kaj kureginte inter ilin povis tratanĉi la ŝnuron antaŭ ol mi svenis.”

”Mi komprenas,” diris Pastro Brown kun la sama ligna ĝentileco. ”Dankon.”

Dum la knabino kolapsis sub siaj memoroj, la pastro paŝis rigide en la apudan ĉambron, kie li trovis Gilder kaj Merton solaj kun Patrick Royce, kiu sidis en seĝo katenite. Tie li diris cedeme al la Inspektoro:

”Ĉu mi povas diri vorton al la kaptito en via ĉeesto; kaj ĉu li liberigŭ el tiuj komikaj manumoj dum unu minuto?”

”Li estas tre forta viro,” diris Merton subvoĉe, ”Kial vi volas forpreni ilin?”

”Nu do, mi kredis,” respondis humile la pastro, ”ke eble mi havos la honoron manpremi kun li.”

Ambaŭ detektivoj rigardegis, kaj Pastro Brown aldonis; ”Kial vi ne prirakontas al ili, sinjoro?”

La viro en la seĝo nee skuis la taŭzitan kapon, kaj la pastro sin turnis senpacience.

”Mi mem do tion faros,” li diris. ”Privataj vivoj estas pli gravaj ol publikaj reputacioj. Mi intencas savi la vivantojn kaj lasi la mortintojn enterigi siajn mortintojn.”

Li iris al la fatala fenestro kaj palpebrumis el ĝi dum li daŭrigis paroladi.

”Mi diris al vi, ke en tiu ĉi afero estas tro multaj iloj kaj nur unu morto. Mi diras al vi, ke tiuj ne estis iloj, kaj ne estas uzitaj por kaŭzi morton. Ĉiuj tiuj teruraj iloj, la ligŝnuro, la sangoŝmirita tranĉilo, la eksplodanta pistolo, estis la iloj de kurioza kompato. Tiuj estis uzataj ne por mortigi Sir Aaron Armstrong sed por savi lin.”

”Por savi lin!” diris Gilder. ”Kontraŭ kio?”

”Kontraŭ li mem,” diris Pastro Brown. ”Li estis sinmortigema maniulo.”

”Kio?” kriis Merton kun nekredema tono. ”Kaj la Religio de Gajeco... .”

”Tio estas religio kruela,” diris la pastro elrigardante el la fenestro. ”Kial ili ne povis lasi lin plori, kiel ploris liaj praavoj antaŭ li? Liaj planoj rigidiĝis, liaj opinioj fariĝis malvarmaj; malantaŭ tiu gaja masko troviĝis la malplena menso de ateisto. Fine por tenadi sian ridadan antaŭpublikan nivelon, li reiris al tiu viskidrinkada kutimo kiun jam antaŭ longe li lasis. Sed ekzistas ĝuste tiu ĉi teruraĵo pri alkoholismo ĉe sincera abstinulo, ke li imagas kaj atendas tiun psikologian inferon kontraŭ kiu li estas jam avertinta aliajn. Tro frue ĝi kaptis kompatindan Armstrong, kaj hodiaŭ matene li estis jam en tia stato, ke li sidis tie ĉi kaj plorkriis, ke li estas en infero, per voĉo tiel freneza ke lia filino ĝin ne rekonis. Li estis freneza por morto, kaj laŭ la simiruzoj de frenezuloj li disĵetis ĉirkaŭ si morton sub multaj formoj... ligŝnuron, la revolveron de sia amiko, kaj tranĉilon. Royce eniris hazarde kaj agis rapide kiel fulmo. Li forĵetis malantaŭen la tranĉilon sur la tapiŝon, ekprenis la revolveron, kaj trovan-

te ne sufiĉe da tempo por malŝargi ĝin, pafon post pafado ĝin malplenigis tute ĉirkaŭe al la planko. La sinmortigonto ekvidis la morton sub kvara formo, kaj ekkuregis al la fenestro. La savanto faris la solan eblan agon... kuris post li kun ŝnuro kaj provis lin ligi mane kaj piede. Tiam enkuris la malfeliĉa knabino, kaj miskomprenante la luktheadon provis liberigi per ektranĉo sian patron. Unue ŝi nur vundis la fingrartikojn de kompatinda Royce, de kio estas veninta la tuta malmulta sango en tiu ĉi afero. Kompreneble do vi rimarkis, ke li postlasis sangan sed neniun vundon sur la vizaĝo de tiu servisto? Sed antaŭ ol ŝi svenis la kompatinda virino liberige hakis sian patron tiel ke li falis frakase el tiu fenestro en eternecon.”

Fariĝis longa silento, malrapide rompita de la metalaj sonoj de Gilder malŝlosanta la fermanumojn de Patrick Royce, al kiu li diris; ”Mi kredas, ke vi devus esti dirinta la veron, sinjoro. Vi kaj la junulino valoras pli multe ol la nekrologoj pri Armstrong.”

”Malbenitaj estu la nekrologoj pri Armstrong,” kriis Royce krude. ”Ĉu vi ne komprenas do, ke estis por ke ŝi ne sciu?”

”Ne sciu kion?” demandis Merton.

”Stultulo vi; ke ŝi mortigis sian patron,” tondris la alia. ”Li ankoraŭ vivus, krom pro ŝi. Eble frenezigus ŝin ekscii tion.”

”Ne, mi kredas, ke ne,” rimarkis Pastro Brown, dum li enmanigis sian ĉapelon. ”Iome mi opinias, ke mi informus al ŝi. Eraroj eĉ plej mortigaj ne venas la vivon kiel pekoj; cetere mi opinias, ke nun eble vi ambaŭ estos des pli feliĉaj. Mi devas reiri al la Surdula Lernejo.”

Dum li eliris sur la blovantan herbon lin haltigis konatulo el Highgate kaj diris:

”La mortenketo estas alveninta. La enketo tuj komenciĝos.”

”Mi devas reiri al la Surdula Lernejo,” diris Pastro Brown. ”Mi bedaŭras, ke mi ne povas resti por la enketo.”

<http://www.omnibus.se/inko>

ISBN 91-7303-013-9